

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Graça. - SABADELL

BARCELONA (HISPAŬUJO)

SEN PAGA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

Redaktoro :

Frederich Pujulà

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS ĜUTARO »

ENHAVO :

Feliĉan Novan Jaron, Komitato de « K. E. F. » — Pri... , Fred. Pujulà. — Reziĝnacio, E. Pellicer (traduko el Victor Català). — Klarigo, K. E. — Historio de Esperanto en Katalunujo (Ulldemolins), Dro. Pallejà. — Katalunaj efemeridoj. — Enketo, R. Martorell. — Enlanda Movado, K. E. kaj Korespondanto. — Atilanda Movado, E. Pellicer. — Oficiala parto, « K. E. F. » — Korespondanto, Red. kaj Adm.

ÖNB



+Z46872803

JARO III^a

JANUARO 1912^a

N^{ro} 1^a (22^a)

700.015-B Esp
1912

Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al "Kataluna Esperantista Federacio"

Esperanta Semo.	Sabadell
Nova Semo	Reus
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto.	Barbarà del Vallès
Olota Stelo	Olot
Lumon.	Terrassa
Casino del Comercio	»
Espero Kataluna	Barcelona
Esperanta Juneco	»
La Rondo.	»
Esperanta Fako (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Ĉiam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Frateco	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo.	»
Unió Catalanista	»
Novan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo.	»
Evolucio	»
Universala Frateco	»
¡Supren!	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto.	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Laboro Esperanta	Vilanova y Geltrú
Esperantista Grupo.	Mataró
Kampero	S. Perpetua de la Moguda
Frateco	Vendrell
Esperantista Amikeco.	Manlleu
Esperanta Amo.	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins

Ad els federats

Avent editat «K. E. F.» una gran tirada de les fulles titolades **Tot l'Esperanto en una fulla**, se fa assaber a tots els grups i particulars que'n vulguin per distribuir-les en vetllades, excursions, etc., etc., que poden adquirir-ne al preu de 50 centims el cent.

Així mateix poden demanar números atrassats de K. E. pera propaganda, enviant solament, a dit efecte, l'import del franqueig, o sigui un centim per exemplar.

KATALUNA ESPERANTISTO


MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — **SABADELL**
BARCELONO-HISPANUJO

REDAKTORO:
Frederich Pujulà

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO : *Feliĉan Novan Jaron*, Komitato de «K. E. F.». — *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Rezignacio*, E. Pellicer (traduko el Victor Català). — *Klarigo*, K. E. — *Historio de Esperanto en Katalunujo* (Ulldemolins), Doktoro Pallejà. — *Katalunaj efemeridoj*. — *Enketo*, R. Martorell. — *Enlanda Movado*, K. E. kaj Korespondanto. — *Alilanda Movado*, E. Pellicer. — *Oficiala parto*, «K. E. F.». — *Korespondado*, Red. kaj Adm.



PRI...

ANTAŬVORTO

TRA la fenestro de la ĉambro, kie mi sidas kontraŭ amaso de blankaj paperfolioj, mi vidas tremetantan stelon. Ĝi tremas kvazaŭ ĝi tuj dekreĉiĝos de la nigra vualo, kie ĝi estas fiksita. Ĝi tremas, kaj tamen de antaŭ milionoj da jaroj ĝi staras tie firma, de antaŭ milionoj da jaroj ĝi sendas tiun lumon, kiun mi mizera homo vidas nur nun. Eble por scienculo ĝi estas jam mortinta stelo, sed por mi, simple ekzistanta homo, ĝi estas vere vivanta ĉar mi vidas ĝian lumon, kaj per pli delikataj sentoj mi eĉ povus senti la varmeton de ĝiaj lumradioj! Ĝi kuraĝigas min!

Ĝi kuraĝigas min en la nunaj momentoj kiam mi prenas sur min la taskon, kiun al mi konfidis la kolegoj de K. E. F. kaj kiam mi min demandas pri la utileco de nia laborado. Ankaŭ ĝi tremas, nia verda stelo, ĉar inter ĝi kaj la pacemaj homoj al kiu ĝi lumadas trafluas haladzaj fluoj de malamo; sed ĝi firme staradas sur ĉielo. Ni povas morti, ni; aliaj anstataŭos nin kaj niaj vicoj restos ne malplenaj. Ni povas morti, ĉiuj; la lumo de nia espero postvivos post ni kaj eĉ por plej delikataj sentoj ĝi havos varmetan kaceson. Ni kuraĝe laboradu; la helo de la krepusko estas malproksima ankoraŭ kaj en la nokto, kiu nin ĉirkaŭas, ni lumu senĉese kaj ni ĝoju se ia nia radieto iras alporti tra tempo kaj tra spaco al ia izolita homo kuraĝon por la noblaj laboroj.

 LA ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LA OFICIALAJN LERNEJOJN DE HISPANUJO

Antaŭ du monatoj la hispana registaro regalis nin per Reĝa Ordono permesante la instruadon de Esperanto en la oficialaj Universitatoj kaj Gimnazioj de la lando. La teksto de tiu Reĝa Ordono, la argumentoj per kiuj ĝi motivas la decidon, ili estas tiel aplaudaj por ni, ke niaj deziroj estas vere kompletitaj. Ni tre miras, ke tiu leĝo ne vekis ĉe niaj alilandaj kolegoj la entuziasmon, kiun ĝi meritas; sed ni esperas, ke ili komprenos la gravecon de tiu venko, kiu permesas alporti la Esperantan parolon en la instruojn, kiuj ĝis nun estis al ni fermitaj.

De antaŭ multe da tempo ni bataladas por ke niaj samideanoj instruistoj povu instrui siajn lernantojn pri nia lingvo. Nia rigardo

ne estis fiksita sur la Universitatojn nek sur la Gimnaziojn, ĉar tiuj organizaĵoj pli ol instruitejoj aŭ kapabliĝejoj, estas distribuejoj de diplomoj ebligantaj labori en ia ajn monopolizita fako profesia. La studentoj trapasas tra ili kun la febro eliri baldaŭ. Oni lernas tie ĝuste tion, kio estas necesa por protokole antaŭeniri. Laŭvolajn kursojn ne ĉeestas la studentoj, kaj la enkonduko de Esperanto, kiel deviga, ne estis logika nek ebla en ĉiun programon. Oni komprenas, ke ekzemple advokatoj devas lerni *Politikan Ekonomion*, *Kritikan Historion de Hispanujo* aŭ *Principojn de Literaturo*, — mia kapablo neniam ĝin komprenis; — sed oni tute ne volos akcepti ke advokato devas koni internacian lingvon. Ĉio ĉi estas ŝtataj vidmanieroj, kontraŭ kiuj estas senutile batali. Ni celis rekte la unuagradajn lernejojn; kie la junularo formiĝas, kie formiĝas la tabuloj de amo kaj malamo, kiuj karakterizas poste la homojn, kie la homaro prepariĝas elekti sian direkton. Sed malgraŭ nia deziro kaj la deziro de niaj amikoj instruistoj, tiu vojo restadis al ni barita de la oficialaj regularoj rigidaj kaj netoleremaj. Nia devo estis labori por malfermi la pordojn de tiuj lernejoj.

Niaj samideanoj Sroj. Delclòs, el Vich kaj Tarragona, intencis antaŭ du jaroj prezenti proponon en tiu senco al la Kongreso de Instruistoj okazinta en Barcelono. La Kongreso malsukcesis. Antaŭ unu jaro la komitatoj de K. E. F. kaj mi, ni decidis prezenti la demandon rekte al la Parlamento, kondukante sekrete la klopodojn por eviti ke alilandaj reformistoj — rabfiŝoj de nia movado — superŝutos ĝiajn membrojn per presaĵoj, kiuj kredigos pri ia profunda skismo aŭ nefirmeco de nia lingvo. Mi min turnis al Sro. Corominas, deputito, kun la deziro de niaj samideanoj; la amikeco ne pli prosperis ol la nobleco de la ideo kaj ni atendus ankoraŭ la respondon jesan aŭ nean se ni estus decidinte atendi. Fervora esperantisto promesis labori apud la deputitoj de la «Lliga», sed ĵus antaŭe Sro. Salvador Albert, ekonomia deputito, apartenanta al neniu politika partio de la Parlamento promesis al mi prezenti proponon de leĝo kaj defendi ĝin, profitante la okazon por klarigi la teorion de nia lingvo ĉe tiu alta tribunalo. Ni preferis resti tie ĉi kaj eviti ĉiun politikan miskomprenon.

Tiam ni laboris senhalte. Generalo Sebert, afable kaj kiel ĉiam nelaciĝebla, komunikis al mi ĉiun documenton rilatantan la esperantistan laboradon en la Franca Parlamento, sciigis min pri ĉio, kio koncernis niajn klopodojn. La propono de leĝo estis subskribita de unu deputito por ĉiu partio; kaj ni petis ĉion por atingi ĝin; ni petis la devigan instruadon de Esperanto en la militaj, komercaj kaj

normalaj lernejoj, ni celis militistojn, komercistojn kaj instruistojn, konvinkitaj ke post la kutimaj intercedoj ni tre modeste sed plene kontentige trafos la unuagradajn programojn — nian veran celon.

Sro. Albert, esperantisto li mem, bezonis malmulte da tempo por pretiĝi al la batalo; kaj jen subite la Parlamento fermas siajn pordojn. Ni devis forlasi ĉion por nova kunsidaro. Tio okazis dum Junio. Mi trasomeris ankoraŭ en Francujo kiam Sro. Albert skribis al mi, ke ĉiu klopodo jam estis nenecesa pro la neatendita Reĝa Ordono, kiu donacas malavare tion, kion ni deziris; pli ankoraŭ.

Niaj klopodoj kunvenis kun tiuj de la amikoj de Madrido al kiuj apartenas la gloron de la venko. Brave al ili!

Ni danku Sron. Albert pro lia sindona pretiĝado al la laboro, ni aplaŭdu niajn madridajn amikojn kaj ni profitu la leĝon malfermante kursojn en kiom eble pli da lernejoj. Niaj samideanoj instruistoj havas nun liberan vojon.

* * *

La leĝo estas nebona en tio, kio rilatas la elekton de instruantoj. Ĝi ordonas al Rektoroj de Universitatoj, ke ili elektu la profesorojn laŭ propono de la grupoj esperantistaj. La redaktinto de la leĝo estis prava ne komprenante, kiel homoj, kiuj bataladas por sama ideo en sama urbo ne kunvivas ankaŭ en sama grupo. La reala vivo estas malpli logika bedaŭrinde kaj tiu maniero proponi profesorojn — pro tro multaj ekzistantaj gravaj aŭ negravaj grupoj — ne prezentas ĉiun garantion necesan por inspiri fidon. Mi scias ke la Prezidanto de nia Federacio jam interkonsentis kun tiu de la Hispana societo por kunlabori peti modifon de tiu parto de la leĝo.

La loko, kiun mi okupas nun en KATALUNA ESPERANTISTO, malpermesas al mi publiki en ĝiaj paĝoj la promesitajn 346 rimarkojn pri *Folioj de la Vivo*, la traduko de Sro. A. Sabadell. Mi opinias, kaj mian opinion plifirmigis multaj samideanoj, ke similaj rimarkoj — ekzemple, kiel tiuj pri *La Patrino*, — tre utilas por fiksi la bonan tradukmanieron de niaj naciaj esprimoj, eĉ kiam ili ne estas tute ĝustaj, ĉar tiam ili taŭgas por altiri la atenton de niaj samlandanoj, kiuj trovos la ĝustan formon per si mem kaj post komparo. Tamen, ĉar ne ĉiuj rimarkoj bedaŭrinde estas favoraj kaj kelkaj juĝante laŭ sia propra farmaniero povus aljuĝi al ili personan karakteron aŭ celon, mi estas morale devigata, kiel direktoro de la gazeto prokrasti

la presadon de miaj rimarkoj almenaŭ ĝis kiam estos aperintaj tie ĉi mem aliaj rimarkoj de aliaj aŭtoroj pri aliaj verkoj.

Al ĉiu kolego, al ĉiu amiko, al ĉiu samideano, mi deziras plenan feliĉon dum la nova jaro.

FRED. PUJULÁ

LA NAJTINGALO.—Ni ne estis multaj, sed sufiĉaj; tamen la tradukajo estis tre malproksime de la perfekteco. «La najtingalo» ne restos dankema al ni. Se tiu belega popola kantaĵo entenanta tiom da poezio kaj tiel kortuŝantan poemon estus aperinta unufoje en la formo, kiun fraŭlinoj Gili, Bremón, Dalmau, Pellicer kaj mi, ni donis al ĝi, ho ve! ĝi ne estus akirinta la popula-recon, kiun ĝi ĝuas en kataluna lingvo.

Mi ne povas senkulpigi nin ĉiujn per la manko de tempo: oni ja konas la malrapidecon de niaj vagonaroj, kaj la samideanoj, kiuj akompanis la Majstron al Valencio kaj revojaĝis de Tarragono al Barcelono, ne kredus min; sed mi ja povas konstati por iom senpezigi nian kulpon, ke ni efektive falis de dormemo post nokto pasigita en la Balo, post atendo de du horoj en la *komforta* stacidomo de nia fervojo!

Kiu el ni perfidis la aliajn kaj publikigis la fervojan tradukajon en la numero 18^a de nia revuo? Neniam oni scios. Mistero! *Mistero de doloro*. De vera doloro, ĉar la traduko estis ja tre malfacila!

Ni promesu, por regajni la estimon de niaj samideanoj fari alian tradukon de alia popola kanto, kiam ni revenos de la 111^a Kongreso. Ni jam estis sufiĉaj; tamen ni kore akceptos kunlaborantojn. (Ni ja ilin bezonos!) — F. P.

HARARREVIVIGANTO. — Post kelkaj monatoj, ĉiuj personoj nun senharaj fariĝos esperantisto. Tio bezonas klarigon, tiom pli necesan, se mi aldonas ke eble kiam ili estos en niaj vicoj ili parados kun la plej belaj kaj densaj hararoj, kiujn oni povas imagi. Jen la afero.

Nia eminenta samideano Sro. C. Juando elpensinto de flugmaŝino, de ludiloj por infanoj, de cent noblaj ideoj, kaj suferinto de multaj seniluziigoj pro la homa indiferenteco, certe venis al la konkludo ke oni multe devas sin dediĉi ankoraŭ a la ellaborado de la homakapo. En tiu ordo de eksperimentoj, eble hazarde, kiel okazas ofte kun elpensitaĵoj, li malkovris likvaĵon por revivigi la radikojn de la haroj. Tiun likvaĵon oni vendas nun en Barcelono en tre belaj boteloj kaj skatoloj, kaj ĝi estas konata per la ne tre mallonga sed tre flata por ni nomo de *Hararreviviganto*. Tio ĉi jam estas sufiĉe interesa por ni; sed pli interesa estas ankoraŭ la prospekto el kiu unu tuta pago estas difinita al la klarigo de ĉiu vorto kaj afikso entenata de tiu kunmetita nomo. Leginte la prospekton oni posedas kelkajn sciojn pri la spirito de nia lingvo, kaj mi ne dubas, ke kiuj uzos kun sukceso la likvaĵon, tiuj danke kaj fide ellernos la lingvon, kiu al la likvaĵo pruntis nomon.

Povas okazi, ho ve!, ke post uzado de la specialaĵo, la kranioj restos tiel glataj kaj brilaj kiel antaŭe. Sed oni ne povas havi ĉion en la mondo, kaj la senharuloj ne plendos. Se ili ne revivigis la radikojn de siaj haroj, ili ja estos akirintaj kelkajn radik...vortojn Esperantajn! — F. P.



REZIGNACIO ¹

DEVIZO: «Nur tiu ne eraras
kiu neniam ion faras.»

LA sonoriloj turniĝis malrapide, plende, laŭ longaj interpaŭzaj kaj malgajaj sonoj, kiuj ĉagrenis la koron. Ŝajnis ke la sonorigisto estas artisto scianta dismovi la aman elfajraĵon, kiu kuŝas en la fundo de ĉiuj animoj, eĉ la plej malmolaj, por ŝpruci el ĝi flamon de frataj sento kaj kompato.

Ĉie ĉirkaŭ la enirĉambro, sidantaj sur malaltaj seĝoj apudigitaj al la muro, vico de virinoj senmovaj kaj kun la brakoj plektitaj, estis en eniĝemaj pozoj ŝajnigante sur la vizaĝoj dolorplenan geston, per la brovoj streĉitaj kaj la palpebroj falintaj. Ili ŝajnis mistera gvardio el statuoj, el parolantaj statuoj, kiuj fiore respondis la rozaripreĝon, kiun per plena kaj sana voĉo diris dungita virino, la rondon prezidante de tie, ĉe la plej funda parto de la muro kontraŭa al la strato.

Pendigita per najlo en angulo, la olea lumileto palpebrumis malkviete, kvazaŭ malsana okulo, dismovante per siaj flammovoj de rustkolora lumo la malprecizajn ombrojn, kiuj, kvazaŭ grandaj kurtenoj el nigra gazo, funebrigis la ĉambrom.

Pli funde, en la kuirejo, tute mallumigita, la familio, kuniĝinte, respondis kiel distrita ĉho la unutonan murmuradon de la enirĉambro.

— *Patro nia, kiu estas en la ĉielo...* — diris la dungita virino per plenda tono kaj sen nuancoj.

— ... *Panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ...* — respondis pli mallaŭte la fiore el dolorataj statuoj.

— ... *donu al ni hodiaŭ...* — postzumis malakurate la nesonora murmuro en la mallumigita kuirejo.

Kaj oni aŭdetis malgrandan brueton de movataj rozarioj, kaj la paroŝaj sonoriloj... *ning! nang!... ning! nang!...* dissendis super la vilaĝon, ekdormantan en la noktakrepuska paco, sian plendan sonoradon por mortintoj.

Subite, la avo, la vidvo, stariĝis meze de siaj samfamilianoj kaj, sen bruo, kvazaŭ li ne tuŝas la teron, supreniris la ŝtuparon. Kiam li jam staris sur la lastaj ŝtupoj, la ligna ŝtuparo krakis.

— Iu supreniras! — spire diris la bofilino kun ektimo.

1) Premiita en la 1^a Literatura Konkurso de la II^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio».

— La patro, — silabis la plej aĝa filo per neaŭdebla voĉo.

Kaj ili trankvilanime daŭrigis la preĝadon.

Supre, malforta brilo eliris tra la pordeto de la koridoro : ĝi estis de la lumilo, kiu gvardiis la mortintinon.

La avo, la vidvo, eniris en la ĉambron : li tenis la brakojn pendantaj kaj la kapon sur la brusto. Apud la ruĝa rando de la kataluna ĉapo, elturnita, ¹ la haroj blankis kiel kanaba ŝpinaĵo ; la tuko el nigra merinosa ŝtofo, volvita ĉirkaŭ la kolo kvazaŭ buŝoŝirmilo, kovris al li la mentonon kaj buŝon ; lia brusto ŝajnis pli enfundiĝinta ol kutime sub la trikoto, kaj la dorso pli ĝibiĝinta.

Li alproksimiĝis al la lito malrapide, trenante la piedojn, kvazaŭ li ne povus ilin sekvigi. Sur la littuka freŝo kuŝis la mortintino, tute rigida, nigrestita, kun la brakoj etenditaj kaj la manoj flavaj, je malpura latunkoloro, krucigitaj sur la ventro ; el inter la fingroj eliĝis la rozario el lignosimila ŝelo, kies kvasto dubeblua estis glitinta sur la maldekstran femuron kaj pendis, kun la fadentordaĵoj malkombitaj, kvazaŭ etendita hararo de enabismiĝanta virino. La kapo ripozis sur la lito mem, pli malalte la frunto ol la mentono, kunportante nigran kaptukon kaj alian koloran, ² falditan kaj volviton kiel bandaĝon ĉirkaŭ la makzeloj kaj ligitan ĉe la verto por eviti ke la buŝo de la kadavro malfermiĝos ; kaj la buŝo, perforte fermita, formis malsupre sur la vizaĝo longan trapasantan sulkon, per la lipoj enigitaj, entiritaj de la truo de la sendentaj gingivoj. Apud la sulko, la nazo, akra kiel birda beko, montris la truojn, longajn, nigrajn, malfermitajn. La piedoj, nur vestitaj per linaj ŝtrumpoj, streĉis ambaŭ plandojn kunigitajn, rektajn, rigidajn kiel starigitajn manojn, kiuj volus haltigi la enirantojn.

Malgraŭ la ventaĉo, kiu pasis tra la tute malfermita fenestro, kiel spiraĵo tra gorgo de kvieta monstro, en la ĉambro oni sentis strangan odoron, eteran odoron el la lasta medikamento, kiun la malsanulino trinkis, kaj vaksan odoron el la kandeloj, kiuj brulis dum la sanktoleado. Sur la tableto proksima al la pordo, olea lampo, en tera telereto, kraketis de tempo al tempo, kvazaŭ estus salo ĉe la meĉo ; kaj apud la telero, la ŝuoj de la mortintino ŝajnis akompani ŝin. Oni ne metis ilin al ŝi ĉar piedvesti mortinton venigas malfeliĉon : mort-

1) La katalunan ĉapon — interne nigran — oni elturnas por montri funebbron. Tiam la ruĝo vidiĝas ĉe la faldilo ĉirkaŭ la kapo. (N. de la R.)

2) La esprimo «kolora» por montri ke io estas nek blanka nek nigra ŝajnas al mi internacia kaj logika. (N. de la T.) *H.*, de color ; *F.*, de couleur ; *A.*, coloured ? ; *G.*, bunt ?

into, kiun oni portas piedvestitan al la tombejo, antaŭ unu jaro sekvigas samfamilianon.

La avo, la vidvo, haltis proksime de la litkapejo; li havis la okulojn sekaj kiel du maldiafanaj vitraj pecetoj, kaj laŭlonge la pantalonon, tremis la manoj, malglataj kaj malmolaj kiel ungegoj de raba birdo, kun tiu nekuracebla tremo, kiu lin senutiligis por ĉiaspeca laboro. Li levis la kapon malrapide kaj rigardis la mortintinon; de antaŭ pli ol dudek jaroj li ne ŝin rigardis tiele, intence, pro memvola impulso. Li ŝin rigardis, sed kiel oni rigardas nekonatan aferon, kiun oni eĉ ne deziras koni: per rigardo malbrila, malvarma, pli mortinta ol la mortintino mem; kaj li vidis glatan frunton, kun la haŭto streĉita, kvazaŭ gluita sur la ostoj, kaj malgrasan, maldikan kolon, kiu flavis inter la korsaĵo kaj la kaptukoj kiel diŝsiraĵo de ranca grasaĵo. La avo, la vidvo sentis ke ia strango boris en li, ŝajnigante al li ke tiu rigida virino neniel estas la sama virino je kiu li edziĝis kaj kun kiu li kunvivadis dum tiom da jaroj; kaj mirigita de tiu mirigaĵo, restis rigardante la kadavron per fiksa rigardo, kvazaŭ al li ankaŭ estus haltintaj por ĉiam liaj pupiloj inter la palpebroj.

Dume, tra la malluma fenestra kadro daŭris enirante la dolor-tonaj plendoj:

- *Patro nia, kiu estas en la ĉielo...*
- *Ning!... nang!... ning!... nang!...*
- *... pardonu niajn kulpojn kiel ni pardonas...*

Kaj tra la ŝtupara ŝakto senskue supreniris la malakurata murmuro de la kuirejo:

- *... kiel ni pardonas... niajn ŝuldantojn...*

Subite, tra la kvietaj densaĵo de la cerbo de l' avo, pasis la lumo de penso, kiel pasas luna radio tra maldensejo de primitiva arbaro. Li pensis ke baldaŭ tiuj sonoriloj resonoros por mortintoj, kaj la virinoj, senmovaj, repreĝos rozarie en la enirĉambro. Sed li tion ne aŭdos: li kuŝas kuntirita, rigida, sur tiu geedra lito, tie mem kie nun kuŝas la edzino. Tiu penso estis klara, el pura klareco; sed ĝi restigis la avon serena kaj trankvila kvazaŭ ĝi neniam estus pasinta tra la mallumo de lia cerbo, kvazaŭ ĝi nenion estus kompreniginta. Nek la koro plifortigis sian ritman kaj malfortan batadon de eluzita maŝineto, nek la maldiafanaj vitroj rebrilis pro la eliro de larmo. Li ja sciis ke li estas maljuna kaj ke la maljunuloj devas delasi la vivon kiel delasas la arbon la matura frukto. Tio estis natura, kaj la naturaj faktoj estis tute ne timigaj por la avo. Ĉiu samaĝa kamarado aŭ kamaradino, kiu *foriris*, sajnus montri al li la vojon kaj fari al li signon per ke li lin sekvu; kaj li estis preta volonte sekvi ilin. Ĉar,

fine, «kion li devas plenumi en tiu ĉi mondo?» li diris al si. En ĝia tempo li plenumis sian devon kiel viro, sed li jam ne plu povas levi la fosilon nek teni la branĉtranĉilon, kaj jam delonge la plej aĝa filo kaj la bofilino mastrumas la domon kaj ili ne havas sufiĉan lokon por enloĝigi la idojn. Estis necesa, do, malplenigi lokon: tiu ĉambro plendpostuladas novajn loĝantojn, kaj li, la avo, volonte lasos ĝin al ili. Nun, krom liaj kamaradoj, jam vokas lin *tien supren* la edzino, kiu etendas al li la manon por helpi lin trapasi la pasejon, kiu apartigas tiun ĉi mondon de l' alia. Si faru tion tre baldaŭ, kiel eble plej baldaŭ!... Kaj la avo rigardis la mortintinon, kvazaŭ memori-gante al ŝi tiun sekretan deziron, kaŝitan malantaŭ liaj maldiafanaj kaj fiksjaj pupiloj. Sed, kvazaŭ subite kaptus lin la timo ke la edzino lin forgesos kaj lin lasos sola sur la tero, li havis inspiron por memorigi ŝin.

Malrapide, trenante la piedojn, kiuj ne volis sekvi lin, kun la kapo sur la eniĝinta brusto kaj la dorso pli ĝibiĝinta ol iam ajn, li foriĝis de la lito kaj alproksimiĝis al la tableto, etendante siajn tremantajn manojn; kaj ŝajnis, ke ekvidante tiun agon de la maljunulo, la du veluraj ŝuoj, frate parigitaj kaj movigataj de mistera impulso, antaŭeniris al li, por ke li ilin prenu pli baldaŭ.

Kaj la avo prenis ilin, reiris al la lito, kaj en la moviĝanta lumo de la olea lampo, kiu kraketis kvazaŭ estus salo ĉe la meĉo, li vestis trankvile, serene, la rigidajn piedojn de la mortintino.

Tra la malluma fenestra kadro eniris en la ĉambron la mallaŭtaj lastaĵoj de la finiĝanta rozaripreĝo, kaj la vasta kaj korpremanta *ning!*... *nang!*... de la sonoriloj.

Tradukis, E. PELLICER

VICTOR CATALÁ



KLARIGO

Per tre afabla letero, kiun ni ricevis, kiam la antaŭa numero estis sub presiloj, nia kunfederaciano Sro. Joan Aubeyzon, aŭtoro de la artikolo *Ĉiela Peco* pri kiu ni parolis en la antaŭa numero de K. E., klarigas al ni, ke en la kopistejo, kie oni kopias liajn skribaĵojn, oni forgesis linion, kiu diras: «Arango de la versaĵo *Dins sa cambra*, de la famkonata kataluna verkisto Maragall». Tiu forgeso, tre bedaŭrinda, estas tiom pli pardonebla, ke la skribmaŝinistino ne konas Esperanton.

Sro. Aubeyzon povas esti trankvila: neniu dubos pri lia literatura honesteco; ni mem estis certaj pri ĝi, kaj antaŭsentis nevolan forgeson. Lia letero pli pravigas nin.—K. E.

Historio de Esperanto en Katalunujo¹

ULLDEMOLINS

MALGRANDA estas la esperantista historio de Ulldemolins ĉar ĝi datumas de kiam mi ekloĝiĝis en la urbeto la 25^{an} de Majo 1910: antaŭ tiu dato neniam oni propagandis nian lingvon en tiu angulo de kamparo.

De post la tago de mia alveno, mi kiel ĉiam daŭrigis la diskonigon de Esperanto. Mi parolis pri ĝi al la ĉefaj geloĝantoj de la vilaĝo — konvinkita, ke afero klarigata de kuracisto estas preskaŭ ĉiam akceptata apriorie en la malgrandaj grupoj el homaro. — Mi observis ke ju pli mi propagandis des pli nia afero estis atente rigardata kaj tio montris al mi ke la semo ne falis en malbonan teron.

Mi faris amikajn paroladojn ĉe la kafejo de Sro. Moricco preskaŭ ciudimanche dum la kaftrinkado, montrante al bienuloj tie kunvenintaj la bonon kaj belon de Esperanto, ĉu per gazetoj, ĉu per fremdaj poŝtkartoj, ĉu per ekzemplaj faktoj, kiuj tre bone konvinkis kiel ĉiam. De tiam kreskadis la vilaĝana priokupado pri Esperanto kaj tuj mi komencis kurson al kiu ĉeestis kelkaj gelernantoj.

Dum la longa vintro de nia regiono mi daŭrigas la kurson kaj tiuj gelernantoj estas fervoregaj ĉeestantoj kaj senlacaj propagandistoj.

Je la 25^a de Julio 1911, ni grupiĝis en malgranda rondeto kies nomon «Montsankta Stelo» ni deprenis de la plej granda najbara monto, kiu nin baras ĉe la sudo. Tiu «Sankta-Monto» (Mont-Sant) apartenis al la Monaĥejo el «Scala Dei», kiu de la XIV ĝis la XVIII jarcento superregis tiun ĉi regionon — «Priorato», konata pro sia riĉa vinproduktado, — kaj kies loĝintoj pagadis al la monaĥoj la malaperintan imposton de «dekono kaj primicoj».

Ni solenigis la fondon de nia grupeto per bona kaj plaĉa kaftrinkado ĉe la pastra domo, kie ni eltiris kelkajn kliŝaĵojn. La grupeto akiris la jenan komitaton: Vicprezidantoj, Lto. Isidor Fabregas, paroĥestro; Sro. Domenech Baró, instruisto; Sekretario, Sro. Anton Pere, ĉarpentisto; Kasisto, Sro. Joaquim Barrull tonelisto; Membroj, Sino. Joaquina Pallejà, Fino. Teresa Pere; Pastro Alexandre Osso, instruisto; Salvador Domech, helppastro. Mi havis la honoron esti nomata Prezidanto.

1) Ni publicos sub tiu ĉi rubriko la esperantan historion de la katalunaj vilaĝoj redaktita de niaj plej distingindaj pioniroj.

Nia grupo interesiĝas pri la esperanta movado en Cornudella, kie ni laboras kune kun la samideanoj de Reus. Ni konstatu ke la plejmulto de la ĉirkaŭaj vilaĝetoj konas Esperanton dank' al la senlaciaj amikoj de Ulldemolins.

DRO. ROMAN PALLEJÁ



Katalunaj efemeridoj


JANUARO

- 1^a — 1908 — Apero de la unua numero de la per akcioj fondita gazeto *Tutmonda Espero*, organo de la «Kataluna Esperantistaro».
Apero de la unua numero de la gazeto *Stelo Kataluna*, en Igualada.
- 1910 — Oficiale fondiĝas la «Kataluná Esperantista Federacio».
La gazeto *Tutmonda Espero* fariĝas organo de la grupo «Espero Kataluna».
- 2^a — 1908 — Dro. Barrera fondas la grupon de Teyà.
- 4^a — 1906 — Apero de la unua *Esperanta Fako* en la revuo *Juventut*, el Barcelono, sub la direktado de Sro. Pujulà.
- 5^a — 1906 — La fraŭlinoj ĉeestantaj la unuan kurson de Esperanto en Barcelono iras manifestacie lasi simblan ŝueton sur la balkonojn de la revuo *Juventut*.¹
- 6^a — 1906 — La literatura revuo *Juventut* faras epifaniajn donacojn al 50 fraŭlinoj ĉeestantaj la 1^{an} kurson de Esperanto en Barcelono.
- 10^a — 1908 — Sro. Pujulà malfermas en la Sorbono de Parizo kurson pri Esperanto per kataluna lingvo. Ĉeestas 20 gelernantoj.
- 11^a — 1906 — Aperas la kataluna traduko de la *Fundamento de Esperanto* (revuo *Juventut*, n^o 309).
- 13^a — 1909 — Unua kunveno de la Organiza Komitato de la V^a Kongreso en la sidejo de «Espero Kataluna», kun ĉeesto de Sino. Rebour, kaj Sroj. Bremón, Cases, Claramunt, Pujulà, Sabadell kaj Vila.
- 26^a — 1908 — Vich. Solena inaŭguracio de la grupo «Vika Esperantistaro».
1909 — Dro. Buxó fondas la grupon de Moncada.

Ni petas niajn amikojn bonvolu sendi poŝtkarte noton pri la ple rimarkindaj okazintaĵoj en iliaj urboj de post la eniro de Esperanto en ili.

1) Laŭ kutimo de la lando la bone konduktintaj infanoj ricevas donacojn de la 3 Epifaniaj Reĝoj trakurantaj la mondon la sesan de Januaro. Ili, per sprita letero, komunikis al la profesoro sian intencon lasi librojn kaj florojn por la fervoraj fraŭlinoj. (Klarigo por alilandanoj.)

ENKETO

 T ni, katalunoj, farante esperantan verkon aŭ tradukon, ofte sin prezentas malfacilaĵo, kiu ĉiŝoje estas temo por diskutoj ĉiam kondukantaj al nenia solida aŭ eĉ logika konkludo. Mi priparolas pri la esperanta formo por esprimi plej ĝuste la sencon de la kataluna verbo *anyorar* kaj ĝiaj devenvortoj. La taŭgan formon tradukantan tute fidele tiun esprimon, kiu estas vera lingva apartaĵo de la katalunoj, oni eble ĝis nun ne trafis.

Tiu, ĥaoso, en kiun multaj el ni sin enmetas nevidinte solvon al la demando, igas ilin deklari, ke ni atingos la celon nur se en Esperanton estos enkorpigata la sama kataluna verba radiko, kompreneble esperantigita tiamaniere: *anjora'*. Kiuj tiel opinias, krom la rangeco de la kataluna lingvo rilate al la ceteraj, tiuj forgesas la flekseblecon kaj esprimriĉecon de la internacia lingvo, ecoj kiuj cetere estas la plej firmaj apogiloj por ĝia propagando.

Fiero aparte, ĉu ni ne agas pli bone, se anstataŭ celi la alprenon de nia natura *laissona* esprimo (per kio ni ŝajnus eble speco de reformistoj, — malŝatinda kvalito —), ni celus la elserĉon de la taŭga *laisenca* esprimo bazita sur la principoj de la helpa lingvo kaj tute konforma al la plej klasika verkmaniero? Se oni ĝin eltrovus, oni sendube malŝarĝus la katalunajn esperantistojn je certa embaraso.

Ni pri tio faru enketon, mi proponas, sur ĉi tiuj paĝoj, ĉar mi kredas ke la legantoj de K. E. ne malpravigos la utilon elĉerpotan el tiu afero; en tiu enketo devas partopreni prefere niaj esperantaj stilistoj, kiuj estas sufiĉanombre por klarigi al ni tute plene la demandon.

* * *

Mi antaŭe diris, ke oni eble ne ankoraŭ trafis la internacian formon esprimantan *anyorar*, *anyoransa*, k. a., kaj tion al mi konstatigis la malsamaj manieroj per kiuj oni tradukis tiun esprimon en tekstoj aperintaj; unuj (la pli multaj) ĝin tradukas en la senco «bedaŭri» ĉar la francoj diras *regretter* paralele, sed neegaltrafe, al nia *anyorar*; aliaj skribas *alsopiri*, dum ĉiuj scias ke de unu al alia esprimo estas graveta diferenco; kaj mi ne memoras nun ĉu aliaj pli-malpli similaj tradukoj estas faritaj rilate al tiu ĉi punkto.

Nu, mi permesos min, kun la bonvoleco de K. E., alĵeti tien ĉi novan formon, kiun mi juĝas pli logika ol la ĝisnunaj; mian opinionon

kontraŭdiru (se laŭ ili ĝi tion indas) la eblaj anoj de tiu ĉi proponita enketo, kiun fakte mi ĵus malfermis.

Ĉu dirante *mankosenti*, klarigitan per «senti la mankon de...», ni ne estus pli facile komprenataj de alilingvanoj ol per la uzo de *la*, al ili perforte stranga, diro «anjori» kies akceptigo ja al ni multekostus?

Ekzemplojn: «Mia patrino estas mortinta; ŝi nun mankas en la hejmo; kaj mi sentas ŝian mankon, mi ŝin sentas manki (je manko'), mi *mankosentas* ŝin.

La mankosentita (aŭ mankesentita) patrujo, k. t. p. Ĉu povas esti pli klara?

R. MARTORELL

Kvankam ni ne tute konsentas pri kelkaj detaloj kun nia samideano Sro. Martorell, ŝajnis al ni tre interesa la publicon de lia artikolo kaj ni malfermas la enketon de li deziratan en la espero ke ni havos la okazon koni la opinionon de niaj kleraj samideanoj.

La demandoj estas:

1^e Ĉu *bedaŭri*, *alsopiri* k. a. formoj ĝis nun uzitaj tradukas sufiĉe bone nian ANYORAR? (Ni rimarkigu, ke la rekta traduko de ANYORAR en franca lingvo estas S'ENNUYER. JO T'ANYORO = JE M'ENNUIE DE TOI; laŭvorte: mi enuas je vi.)

2^e Kiu esprimo estus pli ĝusta?

3^e Ĉu plaĉas «mankosenti»?

Ni volonte publicados ĉiun artikolon, kiu pritraktos tiun temon kaj estos klara kaj konciza.

K. E.

EN LA PROKSIMA NUMERO:

Interesa tra hispana lingvo traduko de la japana rakonto *La Spegulo*. Aŭtoro: Sro. Angel Novejarque. (Niaj legantoj povos kompari ĝin kun *Spegulo de Matsujama* la rekta traduko de Ĉif. Toŝio aperinta en la *Japana Esperantisto*, n^o 5-8, 1909, kaj en la *Esperanta Biblioteko Internacia*, n^o 10-11.)

PRI FEMINISMO. Nekonitaj opinioj de konitaj esperantistoj kolektitaj de fraŭlino E. Rosell

1) Kastiloj diras: «echar de menos» aŭ «echár en falta».

ENLANDA MOVADO

Senyors delegats de «K. E. F.» y senyors esperantistes de les viles on no 'y ha delegat :

La secció més important d'una revista d'Esperanto es aquella on se dona compte de l'estat del moviment. La ressenya dels progressos del nostre idioma i de tot quant amb ell té relació posa en contacte tots els esperantistes d'un país entre ells mateixos i amb els estrangers. Els treballs que 's fan a cada població serveixen d'estímul, un cop divulgats, per als mateixos que 'ls han fet i per als qui treballen en altres localitats. Tots hem de tenir un especial interès que aquesta secció sigui ben nodrida i que s'hi doni compte de l'acte més insignificant, si n'hi ha en la nostra propaganda.

La Redacció de K. E. 'ls prega que tinguin a bé, a partir desde ara, enviar cada mes, abans del dia 15 i sobre targeta postal de l'Estat, per evitar despeses i facilitar el treball, una dotzena de linies sobre 'ls darrers actes que agin tingut lloc en la llur respectiva localitat ; i, en el cas que no n'hi agi agut cap de nou, fer-ho constar simplement així. Es necessari 'l que a cada número de la revista 's faci menció de tota vila on hi agi esperantistes, i que puguem conèixer al detall l'estat del moviment per dirigir amb fruit l'exèrcit de conferencians i propagandistes, la tasca del qual sols serà profitable si treballa amb metode. De l'entusiasme de vostès per l'Esperanto esperem aquest servei que demanem.

TERRASSA

El dia 17 del mes passat, en el local de la «Lliga Regionalista», tingué lloc una reunió dels Comitès de la «Federació» i del grupo «Lumon», a la qual assistiren els Srs. Bremon, Planas, Pellicer i Alavedra, Soldevila i Ventura, ademés del Sr. Pujulà i del Sr. Rigol, el simpatic alcalde que fou quan se celebraren les festes d'inauguració del grupo de la nostra ciutat. En dita reunió 's prengueren els acord necessaris per a la celebració a Terrassa del III Congrès de la «Federació Catalana d'Esperantistes». Els membres del Comitè de la «Federació» exposaren les dificultats de caracter local que avien sobrevingut a darrera ora a Vic, i la necessitat en que s'avia vist el Comitè de la «K. E. F.» d'elegir una altra localitat per celebrar-hi 'l Congrès anyal, assegurant-li l'exit que li cal per sa importància i gaire bé per tradició.

El Sr. Alavedra, president de «Lumon», en nom de tots els terrassencs allí reunits, acceptà amb entusiasme l'elecció de Terrassa, manifestant que desde aquell moment tots els fills de la ciutat farien tots els esforços possibles per deixar en bon lloc el nom de l'Esperanto i el de Terrassa mateix.

Tant greu decisió avia de sagellar-se de manera més solemnnial, per a lo qual ambdós Comitès passaren a l'ermós teatre de la societat, on se trobaven convocats tots els *samideanoj* terrassencs i nombroses families encara no esperantistes. Davant de tant distingida concurrència, el Sr. Pujulà donà una conferencia sobre *L'Idea interna de l'Esperanto*, explicant a grans trets l'esperit d'internacionalisme que batega en tots els sers i manifestacions superiors de l'epoca moderna. Féu l'istoria i explicà la raó d'esser de la «Federació Catalana» i dels Congressos que avia celebrat, donà compte de la decisió que acabava de pendre-s, i preguntà als esperantistes allí reunits si acceptaven l'idea de celebrar el III Congrès a Terrassa, y si prometien coadjuvar-hi ple-

nament. La mateixa pregunta dirigí als no esperantistes. Per dugues vegades un sí unaním, subratllat per aplaudiments, se féu sentir en la sala.

L'entusiasme que 's desvetllà, i els comentaris i projectes que començaren a fer-se, sols se moderaren per deixar sentir la paraula del nostre digne vig-president de la «K. E. F.», Mn. Planas, qui sentidament glosà l'idea del mutu amor i regràcià en nom de la «Federació» 'ls terrassencs.

L'acte termenà en mig d'aplaudiments. Se formaren grupos, s'establiren proposits, s'iniciaren idees, se plantejaren programes de festes; els organitzadors dels Jòcs Florals remarcaren lo poc que costaria trobar una reina de la festa maca, essent-ho tant totes les presents; els potser no tant poetes, però més practics, parlaven dels otels, de les cambres per ostetjar els nombrosos congressistes que vindrien; i tots junts, gaire-bé en manifestació, anàrem a l'estació a despedir els *Komitanoj* de «K. E. F.»; la Sra. Rebours, que avia acompanyat el seu espòs; els esperantistes de Barbarà, que avien escortat llur mestre, Mn. Planas.

Si semblava que ja 'y erem, al Congrès!

Entre 'ls que quedàrem s'inicià l'idea de celebrar amb un lunch l'entrada de l'any nou, que ha de deixar tant bons records en el moviment esperantista de Terrassa i en la marxa general de la nostra estimada «Federació».

Korespondanto

(El Comitè organitzador del III Congrès constituirà una Comissió de Propaganda, que desde aquestes planes informarà metodicament, a tots els companys de Federació, dels treballs que 's vagin fent.

Tots els companys que tinguin alguna idea per contribuir al millor exit del Congrès seran ben amables posant-la en coneixement del Sr. *Alavedra*, president del grupo «Lumon» — Terrassa.

La data del Congrès queda com se decidí a Tarragona, això es, pera Sant Pere i el dia següent, diumenge.

Es gaire-bé segur que en el número proxím se publicaran els textos a traduir del Concurs Literari.

Tinguin present, els federats que 's vulguin preparar per obtenir el títol de professor o 'l de capacitat, que forçosament, segons el Reglament de la «Federació», s'han de celebrar examens durant el Congrès, sigui quin sigui 'l nombre de candidats.)



ALILANDA MOVADO

BELGICA

Charleroi. — Gracies a les grans manifestacions del III Congrès belga, i a la visita que 'ls esperantistes estrangers hi feren durant el VII, 156 nous deixebles segueixen el curs del professor Delvaux. La gran sala de l'Ateneu no pot contenir el nombre d'assistents. No es d'extranyar: tota persona una mica culta que comprova l'utilitat de l'Esperanto l'aprèn tot seguit, sense excusar-se amb falta de temps, que moltes vegades es falta... de ganes.

Molenbeek St. Jean. — Ens enterem (i no cal dir que 'ns en alegrem) que a l'Universitat Popular s'hi ha obert un curs d'Esperanto.

ALEMANYA

Köthen, Anh. — Fa més de dos anys que a la «Friedrichs-Polytechnikum» se donen cursos d'Esperanto amb permís del Govern del ducat d'Anhalt. Ara, en aquesta escola, s'hi ha obert una nova secció pera enginyers de comerç, en

la qual l'Esperanto es obligatori en els examens preparatoris; de manera que cada deixeble ha de presentar un treball escrit en diverses llengües i en Esperanto. En l'examen oral poden elegir una llengua d'entre quatre, entre les quals està comprès l'Esperanto. En el començament de l'actual curs ja s'hi han examinat dos senyors que han elegit l'Esperanto pera l'examen oral. Veus-aquí la primera vegada que l'Esperanto es oficialment aprovat pel Govern a Alemanya. Aquest exit el devem als treballs del director professor doctor Foehr i del senyor enginyer W. Kohli.

* * *

Se fa molt difícil resumir, tant sols, el moviment esperantista alemany, a causa de la seva gran intensitat. El *Germana Esperantisto* publica una crònica per la qual se pot veure que 'ls companys alemanys treballen de valent. En més de 50 ciutats i viles s'organitzen continuament conferències, cursos, excursions, festes, i tota mena d'actes de propaganda.

Esperantistes d'aquí casa : a treballar si no volem quedar a reraçaga del moviment esperantista mundial!

E. PELLICER

* * *

OFICIALA PARTO

La Komitato de «K. E. F.», ricevis siatempe komunikaĵojn de Sro. J. Palmarola, el Vic, per kiu li ekzigis kiel membro de tiu komitato, kaj kiel Prezidanto de la organiza Komitato de la III^a Kongreso.

La Komitato de «K. E. F.», akceptonte tiajn ekzigojn faris diversajn klopodojn esperante trovi solvon al tia speciala situacio. Rezultato de tiuj klopodoj estis la konkludo, ke la urbo Vic ne estas sufiĉe preparita por gastigi la III^{an}, kaŭze de specialaj cirkonstancoj de ĝia loka movado, kaj sekve, oni prenis la decidon okazigi la III^{an} en Terrassa, urbo kiu entuziasme akceptis la proponon.

Ni esperas ke niaj kunfederaciaĵoj klopodos kiel eble plej multe por ke la Kongreso atingu grandan sukceson. — «K. E. F.»

* * *

KORESPONDADO

Sro. Johano Gili : Via artikolo, tre amuza kaj verkita en bona Esperanto, eble estus malbone komprenita de multaj. Ni bedaŭras! Sed ni esperas, ke vi ja trovos aliajn *barrilajn* temojn malpli glitigajn! — Sro. M. S., Terrassa : Danko; ni prenas noton pri via sciigo. Ĉu vi havas permeson de la aŭtoro? Vi agos tre bona petante ĝin almenaŭ al la firmo, kiu ĝin eldonis. — Sinjoro J. M.^a Cuadras, Igualada : Ni ricevis vian leteron. — Sro. J. B. Albiñana : Ni atentos vian duan leteron, ĝis la 15 Januaro, kaj ni ne respondis antaŭe al vi ĉar estas neeble la intervido de vi proponita.

Reglament de la Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer. — Queda constituïda amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon. — L'objecte de la «F. C. d'E.» es l'unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin als esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

Art. tercer. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un Reglament especial interior publicat pel cos de redacció i previa acceptació del Comitè Directiu.

Art. quart. — La «F. C. d'E.» constarà únicament de membres individuals, que contribuiran al seu sosteniment amb la quota mínima de tres pessetes anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grup podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que 'ls membres individuals.

Adició aprovada en el Congrés de Tarragona. — Els Presidents dels grups adherits formaran un Consell Consultiu de la «Federació», ad el qual podrà dirigir-se 'l President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en que 'u cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació» sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en lo que fóra de desitjar per a la millor marxa de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

Art. quint. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vic-president, Caixer-administrador de la revista, Vic-caixer-administrador i Secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista.

Art. sisè. — Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son carrec: recollir les quotes dels federats, fer les comunicacions necessaries per als efectes del article segon i demés assumptes del regim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre 'l Comitè Directiu i els seus representants.

Adició aprovada en el Congrés de Tarragona. — Els delegats podran retèner-se, si 'u creuen

convenient, en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

Art. setè. — El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys una vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assamblea o Congrés general, en el qual, previa ordre del dia, se donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà 'l lloc on agi de celebrar-se el vinent Congrés o Assamblea, se nomenaran els individus que agin de formar el Comitè per al següent exercici, i s' discutiran les proposicions que agin sigut presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assamblea, i incloses en l'ordre del dia. Els individus del Comitè podran ésser reelegits tant sols un cop.

Art. vuitè. — El Comitè estarà facultat per crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les Junes de les quals seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

Art. novè. — Tots els acords de les Assamblees i Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

Art. desè. — Les esmenes que vulguin fer-se en aquest Reglament auran de presentar-se en temps convenient per ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podran ésser discutides i aprovades en les Assamblees o Congressos generals.

Art. onzè. — La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la catalana en les Assamblees.

Art. dotzè. — En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.», els fondos existents, o que resultin de la liquidació, passaran a la «Centra Oficejo», domiciliada a París, per a la propagació de l'Esperanto.

Article transitori. — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Sabadell, carrer de Gracia, 12.

Per la Comissió Organitzadora: Domenech Serdá, Joan Piferrer, Antoni Martí, J. Camps, Agustí Badia, Santiago Puigbonet i Joan Romeu.

Aprovat, en data del 14 de febrer de 1910, pel senyor Governador Civil de Barcelona.

Hi ha un sagell que diu: *Gobierno Civil de la Provincia de Barcelona.*

Kolekto de lernolibroj

Katalunaj kaj Kastilaj

	<u>Ptas.</u>
<i>Fundamento de Esperanto</i> , L. L. Zamenhof (Eldono hispana) . . .	1'25
* <i>Gramatica rahunada de la llengua Esperanto</i> , Sro. Pujulà i Vallès. . .	2
* <i>Vocabulari Esperanto-Català</i> , Sro. Pujulà i Vallès.	3
* <i>Vocabulari Català-Esperanto</i> , » » »	3
<i>Poŝvortareto Esperanto-Català i Català-Esperanto</i> , Sroj. Dro. Bremon, Martí i Aldrich	0'75
<i>Kataluna Ŝlosilo</i>	0'05
<i>Quiere V. aprender Esperanto?</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau . . .	0'50
<i>Gramática y Vocabulario Esperanto</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau. . .	3
<i>Vocabulario Esperanto-Español</i> , Sro. F. Pujulà i Vallès	3
<i>Vocabulario Español-Esperanto</i> , » » » »	3
<i>Primeras lecciones de Esperanto de Th. Cart</i> , A. L. Villanueva. . .	0'60
<i>Manual y Ejercicios de la lengua Esperanto</i> , Inglada-Villanueva. . .	1'50
<i>Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto</i> , Inglada-Villanueva	5
<i>Curso Práctico de Esperanto</i> , Duyos-Inglada	3
* <i>Gramática de Esperanto</i> , Sro. J. Garzon Ruiz	2
<i>Prontuario de Esperanto</i> , » » »	4
<i>Programa d'Esperanto</i> , J. B. Albiñana	0'25
<i>El Esperanto al alcance de todos</i> , Fernando Soler y Valls.	3

Tiujn verkojn oni povas mendi ĉe nia administracio sendante kune la monon, plus 0'25 ptojn. por la rekomenditaj poŝtelspezoj.

* Bindita 0'50 ptes. plie.

ATENTU

Ĉiu bona Esperantisto devas havi la belan portreton de nia Majstro, silke teksita ĉe la Industria Lernejo de Sabadell.

Tiu portreto estis donacita al Dro. Zamenhof, okaze de la V^a Kongreso en Barcelono, kaj estas la plej simila al Li el la faritaj ĝis nun.

Estas ricevebla kontraŭ 1'20 Sm. senditaj al nia administracio.

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
BARCELONA (HISpanUJO)
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

Redaktoro :
Frederich Pujulà

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *III^a Kongreso de la «K. E. F.»*; Valenti Alavedra. — *Historio de Esperanto en Katalunujo (Sant Feliu de Codines)*, N. N. — *La spegulo*, Angel Novejarque. — *II^a Literatura Konkurso (Eksterordinaraj temoj)*. — *Pri feminismo*, Varis. — *Katalunaj efemeridoj*. — *VIII^a Universala Kongreso Esperantista (1^a cirkulero)*. — *Enlanda Movado*, A. Badia kaj Delegitoj. — *Bibliografio*, Tamen. — *Oficiala parto, «K. E. F.»* — *Korespondado*, Red. kaj Adm. — (*Suplemento*). *Alvoko al la II^a Literatura Konkurso de la «Kataluna Esperantista Federacio»*



JARO III^a

FEBRUARO 1912^a

N^o 2 (23)

Kara Kolego! Ĉu vi povas interŝanĝi vian gazeton por du ekz. ? Ni atendas vian respondon.

Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al "Kataluna Esperantista Federacio"

Esperanta Semo.	Sabadell
Nova Semo	Reus
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto.	Barbarà del Vallès
Olota Stelo	Olot
Lumon.	Terrassa
Casino del Comercio	»
Espero Kataluna	Barcelona
Esperanta Juneco	»
La Rondo.	»
Esperanta Fako (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Ciam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Frateco	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo.	»
Unió Catalanista	»
Novan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo.	»
Evolucio	»
Universala Frateco	»
¡Supren!	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto.	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallés
Laboro Esperanta	Vilanova y Geltrú
Esperantista Grupo.	Mataró
Kampero	S. Perpetua de la Moguda
Frateco	Vendrell
Esperantista Amikeco.	Manlleu
Esperanta Amo.	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Esperanta Amikaro	Banyolas
Ilerda Espero	Lleyda
Frateco	S. Feliu de Guixols
Esperantista Junularo.	Terrassa
Esperanta Aŭroro	Barcelona

Tot l'Esperanto en una fulla

Edició de la «K. E. F.». A 50 centims el cent. Fulles insostituïbles per a la propaganda en vetllades, excursions, etc.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — **SABADELL**
BARCELONO-HISPANUJO

REDAKTORO :

Frederich Pujulà

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : *Pri...*, Fred. Pujulà. — *III^a Kongreso de la «K. E. F.»*, Valentí Alavedra. — *Historio de Esperanto en Katalunujo (Sant Feliu de Codines)*, N. N. — *La spegulo*, Angel Novejarque. — *II^a Literatura Konkurso (Eksterordinaraj temoj)*. — *Pri feminismo*, Varis. — *Katalunaj efemeridoj*. — *VIII^a Universala Kongreso Esperantista (1^a cirkulero)*. — *Enlanda Movado*, A. Badia kaj Delegitoj. — *Bibliografio*, Tamen. — *Oficiala parto, «K. E. F.»*. — *Korespondado*, Red. kaj Adm. (Suplemento). *Alvoko al la II^a Literatura Konkurso de la «K. E. F.»*

PRI...

PROPAGANDO

NI esperantistoj formas en la mondo apartan socion, bedaŭrinde. Nia celo estas pligrandigi ĝin; nia devo ĝin defendi. La celon ni plenumas per la multenombraj grupoj. La devo ne ĉiam estas bone plenumita; kaj ŝajnas al mi, ke bona konstanta defendo de nia ideo estus tre fekunda por nia movado.

Por bone starigi defendon, ni devas unue bone scii, el kio konsistas la atako. Kiam ni konos la atakantojn ni povos trafe celdirekti niajn armilojn kaj fortojn.

Ni devas esti sentemaj, trosentemaj, kaj principe ni devas vidi atakon en ĉio, kio nur ne estas favora. La simplan intergestadon de du alilingvanoj, kiuj vane penas interkompreniĝi, ni devas konsideri kiel ofendon al ni, kiel homoj kaj kiel esperantistoj. Kiel homoj, ĉar ili malaltigas la gradon de nia gento. Kiel esperantistoj, ĉar ili ne

scias pri nia ekzistado. La unuâ estas kulpo ilia, kiun ni homame devas eviti. La dua estus kulpo niâ se ni ne alproksimiĝus tuj al la kvazaŭmutuloj kaj ni ne nomus al ili trifoje almenaŭ la vorton *Esperanto*, por ke ĝi gravuriĝu en iliajn cerbojn moligitajn tiam de la malfacila situacio. Niaj prapatroj, kiuj eble estis tre delikataj personoj, profitis tamen la ekzekuton de krimuloj kaj vangonfrapis antaŭ ili siajn filojn, per ke la ekzemplo restu neforigebla. Mi ne kuraĝas konsili tian procedon por propagandi Esperanton, ĉar vere tiam la ofico de propagandisto estus iom danĝera. Alilandulo, kiu vane penas komprenigi sin, estâs sufiĉe malbonhumora por ke oni trudu al li tro internacian esprimon. Sed li neniam forgesos, ke *unu fojon*, kiam li estis en grava situacio en fremda lando, ruĝa pro trogestado, klopodema por sin tiri el malfacilaĵo, ia sinjoro trankvila, ridetanta, alproksimiĝis al li kun la manoj en la poŝoj, kaj mieno feliĉa, kaj alparolis al li tri fojojn la vorton *Esperanto*. «Kio estas Esperanto?»

Aparte de tiuj ĉiutagaj okazoj, estas aliaj tiel multe oftaj fajloj al la bazo de nia ekzistrezono, kiujn ni devas eviti kaj kontraŭbatali. Ĉiutage en la gazetoj legiĝas asertoj, kiuj ne rekonas alian kaŭzon ol la teruraj neniam sufiĉe kontraŭbatalataj antaŭjuĝemo kaj pensinercio. Nun estas vualo etendita antaŭ la okuloj de la homoj malpermesante vidi la kaŝitan veron de la aferoj; pli malfrue estas mallaboremo repipensi la stereotipitajn sociajn konkludojn kaj konvenciojn. Kiu el ni ne legis cent fojojn pri la 80 milionoj da homoj parolantaj hispanan lingvon? Mi parolis pri tio en Antverpeno kun nia ĉilia eminenta samideano Dro. Fraga, kaj ni havis okazon rideti iom. Oni enkalkulas la tutan Sud-Amerikon en la hispanlingvajn landojn. Oni forgesas que Brazilio parolas portugale, ke Meksiklando parolas pli ol 60 malsamajn lingvojn!, kaj ke el la cetero, enhavanta ankoraŭ ne 30 milionojn da homoj, restas nur la grandaj urboj por la hispana lingvo, ĉar la kamparo kaj la montoj parolas *guarani*, *quichua*, *aymara* kaj la *araŭkanajn* lingvojn. Ni aldonu nenion pri la granda diferenco ekzistanta inter la Amerika hispanlingvo kaj la hispana lingvo mem. Antaŭ kelkaj monatoj mi estis ofte devigata peti al peruaj parencoj miaj, ke ili klarigu al mi katalune. Kaj mi estis edukita en Kubinsulo! La diferenco estas pli granda ol inter la nuna hispana lingvo, kaj la hispana parolata de la 100 mil hebreatoj loĝantaj Konstantinopolon, kiuj tamen parolas, kiel en la epoko de Cervantes!

Ni devas do, kontraŭstari tiajn asertojn, kiuj kreas atmosferon malbonan por nia propagando. La gazetaro estas tre favora al ni en Barcelono, sed ni ne povas lacigi ĝin individue. Ni devas respondi kaj

korekti, kaj rimarkigi, sed oficiale; ne en la nomo de tiu aŭ tiu alia, kiu subskribas la artikolon, sed en la nomo de la tuta Federacio. Tiu ĉi devas krei komisiitaron de policemaj samideanoj, kiuj traflos la gazetojn al la serĉado de krimoj kontraŭ la vero. Tre korekte, tre afable, sed tre severe kaj argumentite, ili en la nomo de ĉiuj petos kaj se necese postulos la restarigon de la vero difektita.

Antaŭ kelkaj tagoj mi rimarkis, ke la hispana Ministro de Ŝtato, kaj la franca Ambasadoro, devas uzi interpretistojn por interparoli pri la grava afero de Maroko. Oni mortas en Maroko, oni pridiskutas ŝanĝojn en la mondkarto, kaj la pensoj de la diskutantoj devas esti tradukitaj!... Mi partikulare skribis al ambaŭ ŝtatestoj leterojn pri Esperanto. Ĉu ili ne estus pli trafaj ne mi estus povinta oficiale paroli en la nomo de la centaroj da katalunaj esperantistoj?

FRED. PUJULÀ

SELKO KAJ PANTALONO

Perdi ŝelkon estas malagrabla. Ĉar kiam oni perdis ĝin, plimalpli baldaŭ oni perdas la pantalonon. Plej simpla homa logiko certigas ĝin. Tamen kazuisto povus sur tio ĉi starigi plej komplikajn konsiderojn. — Eĉ riskante paroli kvazaŭ ekzercaro li povas diri, ke pli facile ol perdi pantalonon, kiam oni perdis ŝelkon, estas perdi ŝelkon, kiam oni perdis pantalonon. Tion li ja povus pruvi. Efektive, ĉar multaj homoj kunportas pantalonon kaj ne ŝelkon, li ja povus aserti ke ŝelko ne estas necesa por la subtenado de la homa krurvesto. Kontraŭe, ĉar neniu homo kunportas ŝelkon sen pantalonon, li povas kredi ĝi al ni, ke la senpantolona kunportado de ŝelko ne estas ebla. Sekve li povas supozi, ke ĉiu senpantolona homo jam perdis sian ŝelkon; tamen ne supozante, ke li perdis antaŭe la pantalonon; ĉar se li supozus ke li perdis tiun ĉi, li ankaŭ devus supozi, ke eble li perdis ĝin tial ke antaŭe li perdis sian ŝelkon. — Tamen, kvankam la perdo de ŝelko, kiam oni perdis pantalonon, eble logike estas pli facila ol perdo de pantolono kiam oni perdis ŝelkon, la faktoj pravas ke ĝi ne estas tiel ofta, ĉar efektive, ni tute ne scias pri homo, kiu perdis la ŝelkon perdinte la pantalonon, kaj tamen ni bone konas iun, kiu suferis la malan kombinacion.

Cetere, ni komprenas ĉiun katastrofon en la homa vivado; sed ĉu ni povus pensi, kiam nia kara amiko — perdis sian ŝelkon dum la Kongreso de Tarragono, ke li perdis la pantalonon en... la Kongreso de Antverpeno..... post du monatoj?!...

Les felicitacions que hem rebut per la cura amb que ha sigut compost el darrer número de K. E. les trasmetem al nostre *samideano* Sr. Jimeno, el tipograf de «L'Avenç», qui s'en ocupa.

Tromulto da partikulara laboro malpermesas al Sro. Antonio Codorniu resti en sia loko de ĵuganto de la Literatura Konkurso. Ni tre sincere bedaŭras lian neĉeston, kaj profitas la okazon esprimi al nia distinginda samideano nian altan estimon kaj profundan ĉagrenon.



III^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio»

GOJAJ pro la honoro, kiun la Komitato de «K. E. F.» faris al ni, elektante nian urbon por gastigi la III^{an}, kaj kun la kuraĝo, kiun alportis al ni la afablaj kaj kuraĝigaj vortoj de niaj amegataj samideanoj, la Komitatanoj de «K. E. F.», ni entreprenis kun fido kaj fervoro la preparajn taskojn, povante antaŭdiri per la sciigoj, kiuj sekvas, ke tiu Kongreso estos nova sukceso por la celo de Esperanto kaj de la Federacio,

Al la alvoko, kiun «Lumon» faris al kelkaj esperantistoj por atingi ilian decidan kaj valoran kunlaboradon, por bone aranĝi la organizajn taskojn, ni vere devas diri, ke ĉiuj senescepte respondis. Tiu-ĉi vivoplena kunveno, en kiu sin trovis ĉiuj kamaradoj kun nova emo al la laborado por Esperanto, estis tre profita kaj esperdona.

Du komisionoj zorgos respektive pri la organizado de festoj kaj pri la propagandaj aferoj. Ili estos prezidataj de niaj aktivaj kaj nelacigeblaj propagandistoj de la lingvo internacia Sroj. Collet kaj Badía, kunlaborante kun ili la ne malpli fervoraj Rambla, Pineda, Ortiz, Soldevila kaj Arissó, en la unua; kaj Oliart, Ventura, Casanovas, Figueras, en la dua. La Prezidanto, Kasisto kaj Sekretario estos respektive, la Prezidanto de «Lumon» kaj la entuziasmaj esperantistoj Rossendo Roig kaj Marián Solà.

Kaj jen, serio da projektoj per kiuj ni volas vin regali: Popola manifestacio de simpatio al Esperanto, kaj imponanta akcepto kun ĉeesto de la aŭtoritatoj, reprezentantoj de korporacioj, la societoj kun siaj standardoj, la ĥoroj kaj urba muzikistaro por ludi kaj kanti nian himnon. Granda Festo dediĉata al la Gekongresanaro kun la kunlaborado de la aplaŭdata «Escola Choral» kaj ĝia admirinda fako de Ritma Gimnastiko. Niaj «Floraj Ludoj» havos lokon en la belega Teatre Principal, ĵus inaŭgurita; splendida ekspozicio por montri la utilecon kaj disvolviĝon de Esperanto; teatra prezentado; festeno, baloj, vizitoj, ĉio-ĉi kiel propra afero nia; krom tio, ni ankoraŭ havas plenan programon de Ĉefa Festo, okazonta en tiuj kaj sekvantaj tagoj. Tamen ni devas diri ke ĉio-ĉi tio estas ankoraŭ projektoj, fantazio, sed ni estas certaj trovi helpon moralan kaj materialan ĉe la korporacioj kaj privatuloj de nia Terrassa.

En intervido, kiun ni havis kun la respektinda Urbestro de Terrassa, Sro. Josep Ullés, li montris al ni sian entuziasmon por la Kongreso, afable promesante al ni la helpon de la Urba Konsilantaro.

Saman akcepton ni trovis ĉe aliaj gravaj personoj de ni vizititaj.

Per tiuj projektoj, kaj se vi, gekunfederacianoj, pretiĝas por kontribui per via entuziasmo al la sukceso de la Kongreso kaj de nun decidis partopreni en ĝi, ni povas absolute certigi ke nia III^a estos nova kaj granda triumfo por Esperanto kaj por nia Federacio. De ĉiuj kune dependas la sukceso de la Kongreso.

VALENTÍ ALAVEDRA

Prezidanto de «Lumon»



Historio de Esperanto en Katalunujo

SANT FELIU DE CODINES

SEMIS Esperanton en tiu urbeto, kiu sidas sur la montaro inter Caldes de Montbuy kaj Castelltersol, Dro. Joaquim Coll, pastro. Kiam li alvenis, kiel vikario, neniu apenaŭ konis pri la ekzistado de nia lingvo, malgraŭ la V^a Kongreso de Barcelono!

Je komenco de la jaro 1911^a dank' al lia propagando kaj al la kunhelpado de fratoj Mauri, tenistoj de la *Esperantista Panvendejo* de la strato Semoleras, en Barcelono, kaj filoj de tiu urbeto, kvin junuloj kuniĝis ĉirkaŭ pastro Coll por komenci kurson de Esperanto. La kurso certe estis malmultenombra, sed la kvin lernantoj restis fidelaj ĝis nun, ĉeestante senĉese la du semajnajn klasojn, kiujn oni donas en la paroĥestra domo.

Antaŭ du monatoj, oni anoncis per la gazetaro, ke karavano de membroj de *Espero Kataluna* pasos tra nia urbo, ekskurse al Sant Miquel del Fay. Granda estis la intereso, kiu vekigis, sed la esperoj rezultis vanaj pro la tro rapida trapasado de la ekskursistoj. — Pli bonan rezulton kaŭzis la vojaĝo, kiun dum la lastaj festoj de novjaro faris al ni gesinjoroj Rosals, kiuj restis du tagojn ĉe ni, komunikante multe da entuziasmo al la novaj esperantistoj de Sant Feliu kaj promesante alian viziton.

Pro la malgranda nombro de enurbaj samideanoj ne estis ankoraŭ eble starigi grupon. Sed niaj samideanoj trovos ĉi tie krom pastro Coll, la junajn fraŭlinon Encarnació Borrell kaj fraŭlon Lluís Puigcarló, kiuj havos plezuron tre komplezi ilin.

N. N.



La spegulo¹

▮ Japana rakonto² ▮

ANTAŭ multe da tempo kunvivadis trankvilaj viro kaj lia edzino, ambaŭ junaj, kaj kun filino, knabineto, kiun la geparo amegis tutkore. Mi ne povas diri al vi iliajn nomojn, ĉar mi ilin forgesis, sed tiu de la urbo en kiu ili loĝadis estis Matsujama, en la provinco de Eklugo.

Okazis do, ke estante ankoraŭ la infano kvazaŭ pupeto, ĝia patro estis devigata vojaĝi negococele en la urbegon, ĉefurbon de Japanujo. Sidas tro malproksime la urbo, por ke la patrino kaj filino lin akompanus, kaj tial li foriris sola post karesa adiaŭo kaj promeso alporti al ili belan memoraĵon.

Neniam la patrino estis iranta pluen ol ĝis la proksima vilaĝo, kaj tial, ŝi iomete ektimis pripensante la longan vojiradon traĵiratan de ŝia edzo, sed samtempe ŝi fieris pensante, ke li estos la unua homo de la regiono vizitinta la grandan urbon, kie loĝadas la Reĝo kaj la plej altrangaj sinjoroj, kaj en kiu vidiĝas belegaj kaj kuriozaĵoj.

Alvenis, fine, la tago, en kiu la edzo devas reveni; tiam la patrino surmetis al la knabineto ŝiajn plej bonajn vestojn, kaj ŝi ankaŭ sin ornamis per vesto blua, pri kiu ŝi sciis plaĉis al li. Imagu kiom ĝoja estis la bonanima virino, kiam ŝi vidis alvenantan sian edzon sanan kaj sukcesan, kaj kiel la etulino plaŭdis per siaj manetoj kaj gaje ridis, kiam ŝi vidas la belajn ludilojn, kiujn ŝia patro por ŝi alportis. Li multon rakontadis pri la mirindaĵoj, kiujn li vidis dum la vojirado kaj en la urbo mem.

1) Premiita en la 1^a Literatura Konkurso de «K. E. F.» per la premio de la «Camba de Comerç», de Tarragona.

2) Niaj samideanoj certe konas la *Spegulon de Matsujama* esperantigitan de Ĉif Toŝio laŭ la verko de Sazanami Sanjin kaj ĝia angla traduko de sinjorino Ozaki kaj aperintan en *Japana Esperantisto*, n^o 5-8, 1909, kaj en la *Esperanta Biblioteko Internacia*, broŝuro 10-11. Ambaŭ rakontoj estas samaj, aŭ almenaŭ devenas de sama fonto. Kiam nia amiko Sro. Novejarque tradukis el hispana lingvo ĝin, li tute ne sciis pri la tradukaĵo de Ĉif Toŝio. Nek li, nek ni, ni estas partionoj de tradukoj tra tria lingvo. Tamen ĉar la Novejarque'a traduko estas vera spegulo de la hispana originalo ŝajnis al ni tre interesa publikigi ĝin. El la komparo, dank' al la bonega tra hispana lingvo traduko de Sro. Novejarque, oni povas konkludi, kiom multe aliformigas originalojn tradukoj en naciajn lingvojn.

«Mi alportas por vi belegan objekton — li diris al sia edzino; — tion, kio estas nomata spegulo. Rigardu sur ĝin kaj diru al mi, kion vi vidas interne.» Li tiam donis al ŝi lignan skatolon, glatan kaj blankan, en kiu, ĝin malferminte, lia edzino trovis rondan objekton metalan. Unuflanke ĝi estis blanka, kvazaŭ polurita arĝento kaj ornamita per birdaj kaj floraj figuroj reliefaĵ, kaj aliflanke, brilanta kiel la plej klara kristalo; kaj ĝin ekenmanigante, la virino observis, tiel rave kiel mire, ke en ĝia interno vidiĝas vizaĝo feliĉmiena kaj ridema, montranta dividitajn lipojn kaj viglajn okulojn.

«Kion vi vidas?» denove ŝin demandis ŝia edzo, kontenta rimarkinte ŝian miron kaj ĝoja ĉar li estas pruvinta al ŝi ke li iom lernis, dum lia hejma forestado. «Mi vidas belegan virinon, kiu min rigardas kaj movas la lipojn, kvazaŭ parolanta, kaj kia harardo! Ŝi surportas bluan veston tute egalan kiel la mian». «Kompreneble, simplanima infano, tial ke vi vidas en la interno vian bildon mem», respondis la edzo, fiera, ĉar li scias ion, kion la edzino ignoras. «Tiu ronda metalpeco estas nomata *spegulo*, kaj en la ĉefurbo ĉi tiu posedas ĝin, kvankam ni ankoraŭ ne estis ĝin vidinta.»

La memoraĵobjekto ravis la virinon, kaj dum multaj tagoj ŝi senlace sin rigardadis sur la spegulon, ĉar, tial ke tiam estas la unua fojo, kiam ŝi vidas kaj havas tielan objekton, tiam estas ankaŭ la unua fojo, kiam ŝi povas vidi sian vizaĝon spegulita sur la polurita surfaco. Ŝi tuj opiniis, ke tiel miriga objekto estas tro multvalora por ĝin uzadi ĉiutage, pro kio ŝi baldaŭ reenmetis la spegulon en ĝian ujon kaj ĝin zorge gardis inter siajn plejvalorajn objektojn.

Jaroj forpasis; edzo kaj edzino daŭris kunvivadante feliĉaj. La gajeco de ilia vivo estis fiksita sur la juna filino, kiu kreskadis estante viva bildo el la patrino kaj tiel laborema kaj karesema ke ĉiun morgaŭan tagon plu ŝin amas ŝiaj gepatroj.

Ekmemorante kiel vekigis ŝia fiereco sin vidante tiel belega, la patrino zorge kaŝis la spegulon pro la timo ke sin vidante sur ĝin la filino, aperos ĉe ŝi la spirito de la fiereco. La patrino ne plu parolis pri tio, ĝin forgesis la patro, kaj la filino kreskadis tiel simpla kiel estis estinta ŝia patrino, kaj nenion ŝi sciis pri sia belvizaĝo, pri sia gracieco, nek ankaŭ pri la spegulo, kiu ilin estus videbligintaj.

Sed, ian tagon, malfeliĉego ekkaptis ĉi tiun feliĉplenan familion. La bonanima patrino malsaniĝis, kaj kvankam la filino nek dumtage nek dumnokte ŝin lasis, flegante ŝin tre amfervore, tamen ŝi plimal-saniĝadis, tute perdiĝis la resanigaj espero kaj fine ŝi mortis. Kiam ŝi antaŭsentis ke baldaŭ nepre devos forlasi sian edzon kaj filinon, tiam ŝi kortuŝe ĉagreniĝis, pripensante kiujn ŝi postlasos kaj, precipe,

sian filineton. Ŝi alvokis ĉi tiun kaj diris al ŝi : « Filino el mia tuta koro : vi bone scias, ke mi fartas tre malsana : baldaŭ mi mortos kaj mi lasos solaj vin kaj vian patron, kiun mi tiom amas. Promesu al mi ke post kiam mi estos formalaperinta el tiu ĉi mondo, vi rigardos ĉi tiun spegulon ĉiumatene kaj ĉiuvespere. En ĝi vi min vidos kaj vi komprenos ke mi daŭras viglesplorante vin ». Eldirinte ĉi tiujn vortojn, ŝi elskatoligis la spegulon kaj ĝin donis al sia filino. La knabino, plorante, promesis tion postplenumi tiele, kaj la virino, pli trankvila kaj rezignacia mortis iom poste.

La obeema kaj respektema filino neniam forgesis la lastordonon de sia patrino, kaj sekve, ĉiumatene kaj ĉiuvespere ŝi elkaŝejigis la spegulon kaj atentege ŝi rigardas sur ĝin. En tiu, ŝi vidadis la vivan kaj rideteman vizion el sia mortinta patrino, ne palan kaj malsanan kiel en ŝiaj lastaj tagoj, sed belan kaj junan kiel jarojn antaŭe. Ĉiuvespere, ŝi rakontadis al tiu imagaĵo la dumtagajn malĝojojn, kaj ĉiumatene petegis de ĝi karesemon kaj protekton konstantajn. Tiamaniere vivadis la knabino, kvazaŭ ŝin vidadus ŝia patrino, penante kontentigi ŝin, same kiel ŝi kondutis dum ŝia vivo kaj ĉiam evitante ĉion, kio povus malkontentigi kaj malplezurigi ŝin. Ŝia pleja ĝojo estis rigardi la spegulon kaj diri : « Patrino mia : mi kondutis hodiaŭ tiel, kiel vi volas ke mi konduku ».

Observante ŝia patro kiamaniere ŝi, ĉiumatene kaj ĉiuvespere, sin rigardas sur la spegulon kaj kiel ŝi alparolas ĝin, fine li ŝin demandis pri tiel stranga konduto. « Patrino mia, — diris al li la knabino : — mi rigardas ĉiutage la spegulon por vidi mian amatan patrinon kaj paroli kun ŝi. » Ŝi, tiaokaze, informis lin pri la lastdeziro el ŝia mortanta patrino, kaj ke de tiam ne forpasis eĉ unu tago ne plenuminte ŝi tion.

Ravita antaŭ tiom da simplanimeco kaj amsento, la bona patro elverŝis larmojn el kareso kaj amemocio, kaj li zorge atentis ne klarigi al la knabino, ke la spegula bildo estas ŝia propra ridetema vizaĝo, kiu, pro simpatieco kaj rememoreco, ĉiun morgaŭan tagon pli similas al tiu de ŝia mortinta patrino.

Tradukis el hispana lingvo,
ANGEL NOVEJARQUE



II^a Literatura Konkurso

Eksterordinaraj temoj

I. La grupo «Esperanta Semo», de Sabadell, donacos 25 pesetojn (10 sm.) kaj honoran diplomon sur pergamento al la aŭtoro de la plej bona traduko de la jena versaĵo :

LA SEMBRA

Ara es ora de fer la sembrada !
 No esperem arribà a temps millor !
 No deixem que 's rovelli l'arada
 ni que 's begui 'l terror la saor.
 Sembrem, germans ! Sembrem, sembrem,
 que 'ls fruits, més tard, recollirem !
 No 'ns dolgui, no,
 llançar pel món tanta llavò !
 Sembrem, sembrem,
 que collirem !

Ja la terra 'ns espera anyorada ;
 ja 'l seu pit esbatega, enfebrada
 pel desig d'un nou goig fecondant,
 i obre 'l cor, font eterna de vida,
 per donar-nos la nova florida,
 missatgera dels fruits que vindran.
 Treballem, sembradors generosos !
 No 'ns rendim, que la feina va bè !
 No deixem que, amb sos raigs calorosos,
 el vell sol ens assequi 'l terrè !
 Sembrem, sembrem !
 No defallim !
 No 'ns espantem
 si no collim ;

que, a no trigar, ja collirem,
 i triumfants sempre viurem !

No temeu, sembradors, que amb ses ires
 la tempesta 'ns malmeti 'l sembrat.
 Les arades que 'ns facin de lires
 que 'ns animin en mig del combat.
 El nou sol, resplendent, ens saluda
 coronant de llum d'or nostres fronts,
 i la terra amb son baf ens ajuda
 i els aucells ens refilen cançons.
 Tot rebrota i somriu a la vida
 que agermana i ofega 'l rencor,
 esperant la novella florida
 perfumada amb aromes d'amor.

Pels que vindran
 seguim lluitant !
 Sembrem, germans ! Sembrem, sembrem,
 que 'ls fruits, més tard, recollirem.
 No 'ns dolgui, no,
 llançar pel món tanta llavò !
 Sembrem, sembrem,
 que segarem !

IGNASI IGLESIAS

II. Ekzemplero de la verko *Fabiola*, esperanta traduko de E. Ramo, kaj senpaga jarabono al la revuo *Kataluna Katoliko*.

Premio proponita de «Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj» por la aŭtoro de la plej bona traduko de *Les herbes heroïques* el la verko *Estampes y Calcomanies*, de pastro Ramón Garriga. La rakonto estos represata kun permeso de la aŭtoro en la februaran numeron de *Kataluna Katoliko*. Vin turnu al ĝia redakcio por havi ekzemplerojn.



Pri feminismo

Nekonitaj opinioj de konitaj esperantistoj

NEN mia opinio pri feminismo. Mi konas multajn junajn fraŭlinojn, kiuj ne estas feliĉaj. Ili ne volas edziniĝi sen vera kaj sincera amo; la juneco rapide preterpasas kaj forflugas: ili ne sufiĉe lernis por havi kontentigan oficon. Sed nun la gepatroj deziras doni al la filinoj la saman edukadon kiel al la filoj.

Estas ja tute nekompreneble kial oni ne edukas kaj instruas la infanojn egale, kial oni ne donas sufiĉe da instruado al la knabinoj. Ili multe pli bone laboros, kiam ili pli multe estos lernantaj. Mi havas tri nepinojn, kiuj vizitas kaj vizitos gimnazion...

Due, la katalunaj virinoj! Bedaŭrinde mi ilin ne sufiĉe konas. Survoje, en la urbo Gerona, nin salutis junaj samideaninoj; ili treege plaĉis al mi, ili ŝajnis gajaj, afablaj kaj inteligentaj...

Mario Hankel

(Dresden)

Pri la feminismo mi pensas, ke por la virinoj devas esti permesata partopreni en la aferoj de la politika mondo.

Rolland Severance

(New-York)

Vi dezirus koni la opinion de la francoj pri feminismo. Ili kompreneble malsame opinias pri tiu ĉi grava demando. Unuj tute aprobas la feminisman movadon; ili deziras, ke la virino havu ĉiujn samajn rajtojn kaj oficojn kiel la viro; ke ŝi voĉdonu por la parlamento, ke ŝi estu elektebla kiel deputato aŭ senatano, ke ŝi faru la samajn laborojn, k. t. p., unuvorte ke ŝi tute la viroj egalu.

Aliaj opinias, ke la virino devas nur sin okupi pri la domo, la kuirado, la vestoj, la infanoj kaj ke ŝi ne bezonas gravan instruadon.

Nu, mia opinio estas, por tiel diri, *meza opinio*. Laŭ mi, neniam la virino devas forgesi ke ŝia plej bela, plej sankta devo, estas la mastrumado kaj la priinfana zorgado; ŝi devus havi tre bonan guston por bele ornami la hejmon, ŝi devus tre bone koni la kuirarton. **Mi** ne tre aprobas, ke ŝi okupu sin pri politiko, kiu neniam profiton al ŝi povas doni.

Sed mi opinias, ke la virino devas havi tiel gravan instruadon kiel la viro.

Oni ne rajtas malhelpi, ke ŝi lernu, kion ŝi deziras, ĉar ofte okazas, malfeliĉe, ke multaj fraŭlinoj ne povas edziniĝi; tiuokaze ili estas devigataj, per sia laborado, gajni la necesan monon por vivadi.

Se ili ne havus sufiĉan instruadon ili ne povus ricevi sufiĉan salajron. Mi malaprobas, ke multaj profesioj en mia lando, estas tute rezervitaj por la viroj; mi treege malaprobas, ke virinoj, plenumantaj samajn oficojn kiel la viroj, ricevas malpli grandan sarajron. Mi opinias, ke virino rajtas elekti, laŭ sia plaĉo, inter ĉiuj profesioj kaj ricevi la samajn salajrojn, kiujn ricevas viro, kiam li faras la saman laboron.

René Beck

(La Fleche) (Francujo)

Kolektis,

FINO. E. ROSELL

(Daŭrigota.)

Kion opinias niaj samideaninoj pri tiuj opinioj? — K. E.



Katalunaj efemeridoj

FEBRUARO

- 1 1906. — Fondiĝas oficiale en Barcelono la Kataluna Societo sub la nomo «Espero Kataluna».
- 8 1906. — Ekaperas la 1^a Kataluna lernolibro pri Esperanto en la revuo *Juventut* (n^o 313), verkita de Sro. Pujulà.
1909. — Fondiĝas la «Esperantista Grupeto», de Premià de Mar.
- 25 1910. — Inaŭguriĝas la esperantistaj vendredoj en la «Ateneu Enciclopedic Popular».
- 31 1912. — Paco ekregas inter homoj.



VIII^a Universala Kongreso Esperantista

Krakovio, 11-18 Aŭgusto, 1912

Ni ricevis la unuan cirkuleron, kiun dissendis la Loka Organiza Komitato de la 8^a.

Tiu komitato, kiu kompletigos laŭbezone konsistas ĝis nun el la jenaj personoj: Univ. prof. Odo Bujwid, Dro. Stefan Mikolajski, Dro. Leon Rosenstock, Sro. Stanislaw Rudnicki, Dro. Henryk Tislowitz, Sro. Wladyslaw Grabowski kaj Sro. Mieczyslaw Zielenkiewicz.

La provizora programo de la Kongreso estas preskaŭ starigita, kaj ni povas komuniki al niaj kunfederacianoj, ke dum la Kongreso okazos «Jubilea Festvespero» je honoro de nia Majstro kaj lia verko. En ĝi partoprenos eminentaj artistoj.

Plej verŝajne oni ludos la teatrapecon *Mazepo*, de pola poeto Juliusz Slowacki tradukitan de Sro. A. Grabowski.

Pri la ekspozicio zorgas la «Teknikista Grupo de Esperantistoj», en Lvovo, kiu sukcesis jam kolekti riĉan materialon. Ĉar estas dezirinde, ke la jubilea ekspozicio estu vera kaj fidela revuo de la 25-jara disvolviĝo de nia Esperanto, la Komitato sin turnas al ĉiuj samideanoj kun peto, ke ili per sendo de plej diversaj esperantaĵoj helpu la ekspozician sektion kaj pliriĉigu la kolektitan de ĝi materialon. Ĉiu esperantaĵo por la ekspozicio devas esti sendata al Sro. Benedikto Herold, *Lvovo* (Lwów), strato Potockiego, 22 (Austrio-Galicio).

La adreso de la Komitato mem estas: VIII Universala Kongreso Esperantista, *Krakowo* (Aŭstrio-Galicio). Ni gratulas la Komitaton pro tio, ke ĝi prenis simplan adreson Esperantan, kiel jam faris la Komitato de la V^a. Nenio estas p'i terura ol esti devigata desegni adreson per nekonata lingvo. Mi konfesas, ke nun, se mi devus min turni al la karaj komitatanoj de Antverpeno, mi estus devigata traserĉi kaj redesegni.

Aliĝilojn oni sendos nur al tiuj personoj, kiuj antaŭe sciigos la Komitaton per simpla poŝtkarto, ke ili intencas partopreni la Kongreson citante nur 1) familian nomon 2) antaŭnomon, 3) profesion, 4) precizan adreson kaj 5) la nombron de eventuale kune venontaj familianoj.

La kosto de la vojaĝo al Krakovio de Barcelono (tra Portbou - Marseille) estas je 48'50 sm. en 3^a klaso. La daŭro de ĝi estas je 60 horoj.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

La 31^{an} de lasta Decembro okazis en la sidejo de «Ateneu Barceloní» la ekzameno de la kandidatoj al la diplomo de Profesoro de Esperanto, kreita de la 11^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio».

La Tribunalo konsistis el niaj du lingvkomitatanoj Sroj. J. Bremón kaj Fred. Pujulà kaj Sro. J. Rosals, kiu pro malsano ne povis ĉeesti.

Tuj post la skriba pruvo, la unua ekzamenito estis Dro. J. Coll, pastro, nomita oficiale profesoro en la Barcelona Universitato. Ĉar li devis rapide forvojaĝi, la ekzamenintoj ne povis inviti lin anstataŭi sinjoron Rosals. Tion ĉi faris Sro. Grau post brilanta parolado pri la du temoj, kiujn li devis elvolvi. Fariĝis diplomitaj profesoroj: Fino. Estela, el Reus, kie jam klarigas kurson al multenombraj samideaninoj kun granda profito; Sro. Dalmau, la fervora redaktoro de la *Esperanta Rubriko*, en *La Publicidad*; Sro. Pellicer, nia kara sekretario; Sro. Campdelacreu, prezidanto de «La Rondo»; Sro. Aguadé, prezidanto de la grupo de Reus, kaj la nomitaj pastro Dro. Coll kaj Sro. Grau.

En tiuj ekzamenoj, vere malfacilaj, ĉiuj montris profundajn konojn ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri abstrakta kaj kataluna gramatiko. Estis vera plezuro aŭdi la ekzamenatojn klarigi per flua korekta Esperanto la malfacilajn demandojn de la Tribunalo.

TERRASSA

Ĉiu estinta ano de la malaperinta grupo «Esperanta Lando» devas rememori afable Sron. Graells, ĉar li estis la unua profesoro de Esperanto, kiu instruis nian lingvon en niaj Industriaĵaj Lernejoj, subvenciita de Lia Urbkonsilantara Moŝto.

Sro. Joan Graells Rovira estis dudeksesjara kaj mortis la 8^{an} de Novembro. Li estis lerta lingvisto, sed ne fervora esperantisto.

Tamen li havis liberan spiriton kaj indan noblecon. Li klopodis sentrafe kune kun lia gvidanto Sro. Sallent, la starigon de «Popola Biblioteko», intencante movigi la korojn de niaj pacemaj riĉuloj... En maltrankvila tempo, kiam nigra nubo superplena de malamoj kaj venĝemoj minacis terure nian amatan urbon, li celis vane la intermiksadon de neŭtralulojn por interpacigi la animojn kaj amikigi la korpojn...

Pace ripozu la sincera amiko kaj amata profesoro. — *A Badia.*

La dimanĉon 24^{an} de pasinta Decembro okazis en la grupo «Lumon» ĝenerala kunsido por elekti la direktan Komitaton por dum la jaro 1912^a.

La nova Komitato konsistis el la jenaj Sroj.: Prezidanto, Valentí Alavedra (reelektita); Sekretario, Josep Ventura; Kasisto, Adolf Soldevila; Bibliotekisto, Jascinto Figueras; Voĉdonantoj, Vicens Bufi, Marian Solà kaj Balta-

sar Pineda. En la sama kunsido Sro. Rossendo Roig faris paroladon montrante la festojn, kiujn oni intencas efektivigi dum la tria Kongreso de «K. E. F.»

Regas granda entuziasmo ĉe la Terrassa-aj esperantistoj por organizi Kongreson inda je nia Federacio kaj je nia urbo. — *La delegito.*

MANLLEU

Estimata Sro. Direktoro de K. E. :

La 6^{an} de Januaro okazis ĉe nia societo «Esperantista Amikeco» grava kaj bela esperanta balo, en kiu partoprenis multaj geesperantistoj, havante ĝi plenan sukceson, tiel pri la multenombraj ĉeestantoj, kiel pri la bonega disvolvigo.

Ni povas komuniki al vi interesan laŭdindaĵon. Nia societo, kaj certe kun ni ĉiuj esperantistoj, ĝoje laŭdas la aplaŭdindan geston. kiun faris la estraro de nia vilaĝo, akceptante nian proponon pri subvencio de 100 pesetoj al la senpaga instruado de Esperanto farata de nia societo, kiu nun donas du kursojn, unu por viroj, kaj alian por virinoj, ĉe kiuj ĉeestas multaj gelernantoj. — *La Komitato de «Esperantista Amikeco».*

KATALUNA ESPERANTISTO plej respektive gratulas la urbkonsilantojn de Manlleu, kiuj per sia decido faris pruvon de klereco kaj progresamo. — K. E.

VILANOVA Y GELTRÚ

La unuagradan kaj duagradan kursojn en grupo «Laboro Esperanta» klarigitajn de Sro. Mari Vadell kaj Fino. Teresa Rosell ĉeestas ĉiam multenombraj gelernantoj. Ankaŭ plene sukcesas la ĉiu-dusemajnaj kunsidoj, kiuj okazas posttagmeze en nia societo kelkajn festajn tagojn. La lastan, kiun ni okazigis, ni dediĉis al bedaŭrinda verkisto Joan Maragall. Post studado de la bela Esperanta traduko de *La Vaca Cega*, premiita en la 1^a Literatura Konkurso de la «K. E. F.», oni legis prozajn kaj versajn verkojn de tiu fama publicisto. — F. M.



BIBLIOGRAFIO

Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

Krestomatio por infanoj kaj komencantoj. Verkita en kunlaborado de diverslandaj esperantistoj sub redaktado de Romano Frenkel. Kajero Unua. — Bucuresti. Editura «Esperanto», 5, str. I. C. Bratianu, 5.

Sro. Romano Frenkel entreprenis redaktadon de *Krestomatio por infanoj kaj komencantoj*, kies unua kolekto ĵus aperis en kajero. Lia ideo estas aplaŭdinda. Ĝi estas «enverŝi en nian Krestomation la riĉaĵojn de la infana literaturo de la tuta mondo, kun la plej pitoreskaj kaj diversaj stiloj, kiuj tiel reliefe montriĝas en la naciaj fabeloj, fabeloj, enigmoj, proverboj, k. t. p.»

Multajn konsiderojn ni povus fari pri tio se la loko ne mankus por elvolvo de niaj ideoj pri tiu ĉi temo. Eble alian fojon ni pli longe parolos. Nun,

atendante la originalan literaturon Esperantan por la maturaj homoj kaj sekve por la infanoj ankaŭ, ni gratulu la aŭtoron de tiu kolekto, kiu permesos al la esperantistoj infanoj ellabori sian spiriton ne nur per la spirito de sia lando sed ankaŭ per tiu de la aliaj. Ĝi ne malmulte ŝaŭgos por internaciigi la morgaŭajn homojn.

La kajero estas havebla per 0'50 fr. (0'20 sm.) aŭ du respondkuponoj.

En la libro estas noto de Sro. Frenkel, kiu diras:

«Oni petas pri alsendo de artikoloj por la aperantaj (sekvantaj) kajeroj de tiu ĉi Krestomatio rekte al *Romano Frenkel, Enisejsk* (Rusujo, Siberujo). 40 % de la pura profito estos dividita inter la kunlaborantoj proporcie de ilia enpresita teksto».

Esperanta Psikistaro. — Dua eldono. — Anvers. Eldono publikigita per la zorgoj de la «Belga Spiritista Federacio». 1911. Presejo de Jules de Winter. Petit Marché, 13, Anvers.

Por obteni ekzempleron de tiu ĉi broŝuro adresu vin al la «Bureau permanent d'étude des phénomènes spirités», 8, rue des Babillards, Anvers, Belgujo.

Raporto pri la Subkongreso de Esperanta Psikistaro, kies unua kunsido okazis en «Café Anselmo», Anvers, la dimanĉon 20^{an} de Aŭgusto je la 10^a matene. Ankaŭ eldonata per ia zorgo de la Federacio Spiritista Belga.

Tiu ĉi libro estas havebla senpage ĉe la sekretario de «Esperanta Psikistaro», rue Appelmans, 26, (Anvers-Belgujo).

Ni bone scias ke la Kongresoj de Esperanto, pli ol Kongresoj estas Kongresaroj. La plej diversaj profesianoj kaj partianoj de ideoj apartaj profitas la okazon por organiziĝi kaj solvi siajn proprajn demandojn. Tiel agis la Psikistoj, kaj tre interesa raporto pri ilia kongreseto estis eldonata per la zorgoj de la Federacio Spiritista Belga. La broŝuro enhavas krom raporto specimenojn kaj provon de Psikisma Terminaro.

Neniu, kiom psikisto-spiritisto, tiom multe bezonas internacian lingvon. La konstanta komunikado kun ĉiulandaj spiritoj devigas ilin kaj ĉi tiujn esti poliglotoj. Ni esperas ke la uzado de Esperanto inter la spiritoj fariĝos pli kaj pli ĝenerala kaj ke ni ne estos limigitaj al la interparolado kun spiritoj de nia propra lando. La nuna internacia vivado interesigas nin pri la aferoj okazantaj en la tuta mondo, kaj multe pli facile estos al la spirito de mortinta fino lerni la esperantan lingvon ol al ni lerni la lingvon mandarenan.

La spirito de Rubens bone devas kompreni tion, ĉar en la kunsido, kie li aperis, al la demando. «Ĉu vi lernas Esperanton?» li respondis per «*Pas encore*», kio ja efektive signifas «Sed mi lernos!»

Ni kopias la jenan eksperimenton de hipnotismo, kiu tre certe interesos niajn kunfederacianojn:

«Aganto: Sro. Coppens. kun Sro. de Nogales.

C. — Kie vi estis antaŭ 10 jaroj? N. — Ciudad Rodrigo. C. — 20 jaroj? N. — San Roque. C. — 30 jaroj? N. — En la spaco. C. — 40 jaroj? N. — En Madrid. C. — Nomo? N. — José Gutiérrez. C. — Edzigita? N. — Ne. C. — Jaroj? N. — 61. C. — Strato? N. — Leganitos, 4. C. — Ĉu oni povas demandi ion al vi? N. — Jes, oni povas demandi la spiritojn! (Tiam ŝanĝo okazis kaj estis videble ke alia spirito estis tie.) C. — Kiu vi estas? N. — Cárnovas. C. — La fama politikisto? N. — Jes. C. — Kion vi pensas pri la afero de Maroko, ĉu estas bona? N. — Bonne-mauvaise (Bona-malbona). C. — Ĉu estas bona? N. — Jes, por Francujo. C. — Kaj malbona? N. — Por Hispanujo. — La subjekto estis laca kaj Sro. Coppens lin vekis.

Eksperimento de Tiptologio. La tablo estis aranĝita tiamaniere. Fino. Mag-

deburg kontraŭ Sro. Chaigneau. Sro. Zajcev kontraŭ Sro. de Nogales. — La movoj de la tablo estis tre mallertaj kaj neniu komunikaĵo obtenebla, nur la nomo Cánovas, kiu elmontras ke la spirito de tiu fama homo denove volis komuniki kun ni, sed, malfeliĉe. pro manko de tempo la eksperimento estis senfrukta. — La sekretario, A. Stas.»

Ni komprenas la insistadon de Cánovas komuniki kun esperantistoj. Li estis konservativa kaj scias kiel bone sin kondukis kun ni la konservativa ministraro de Sro. Maura kiam la V^a Kongreso. Li deziras sekvi la tradicion de la partio. Ĉar ni ne povas supozi ke li deziras altiri simpatian, ĵaluza pro la ĵusa Reĝa Ordono de la liberala partio pri la instruado de Esperanto!

Ni ankaŭ ne havas dubojn pri tiu José Gutiérrez, kiu antaŭ 40 jaroj loĝis en Madrido, strato Leganitos, 4. Nia amiko Sro. Perogordo povus kontroli. Niaflanke ni povas certigi ke ankoraŭ nun loĝas en Barcelono kelkaj dekoj de samnomuloj!

TAMEN



OFICIALA PARTO

Durant la primera quinzena d'aquest mes reberan els Srs. Delegats els rebuts anyals per al seu cobrament.

Si algun federat desitja no continuar dintre nostre organizació, se li prega que tingui a bé donar-ne coneixement immediatament an aquesta administració, retornant a la vegada els numeros de K. E. que agi rebut, car es de doldre que per un malentès hi agin persones que resultin deutores a «K. E. F.»

Por starigi la Konsultan Komitaton oni petas al la Prezidantoj de la grupoj aliĝintaj, ke ili sciigu antaŭ la 15^a de Februaro sian nomon. adreson kaj daton de sia naskiĝo : oni elektos el ili, laŭ decido de la II^a Kongreso, la plej maljuna kiel Prezidanton kaj la plej juna kiel Sekretarion.

La sekretarioj de la aliĝintaj grupoj estas petataj sendi liston kun la nomoj kaj adresoj de la anoj de sia grupo. Tiuj nomaroj taŭgos por la «Adresaro de katalunaj esperantistoj» kiun ni intencas eldoni. — «K. E. F.»



KORESPONDADO

Sro. X., Sro. Ag., Reus : Mi rememorigas vin pri via promeso. — Sro. J. V., Terrassa : Gratulon kaj dankon. Tre bela kaj korekta. Bonvolu resendi al mi la unuan versaron. Mi ne komprenas la lastan vorton de la kvina verso. Aperos en Marto. — Sro. J. Aulina, Banyolas : Ni ricevis vian leteron kaj la aliĝojn. — Sro. D. Dalmau, Barcelona : Ni ricevis vian p. k. kaj aliĝojn de Sroj. Puiggalí kaj Grau. — Sro. G. Galcerán, Vilanova i Geltrú : Ni ricevis vian leteron kaj plennumis vian mendon. — Sro. P. Alsina, Premià de Mar : Same kiel la antaŭa. — Sro. J. Juanola, Olot : Ni ricevis la p. k. kaj ŝanĝis la nomojn. — Sro. A. Llinàs, Santa Coloma de Farnès : Ni ricevis vian leteron kun 3'10 ptj. kaj ni devas diri al vi, ke la jarkotizaĵo restas same kiel la antaŭaj jaroj, trankviligu viajn samurbanojn.

Reglament de la Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer. — Queda constituïda amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon. — L'objecte de la «F. C. d'E.» es l'unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin als esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

Art. tercer. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un Reglament especial interior publicat pel cos de redacció i previa acceptació del Comitè Directiu.

Art. quart. — La «F. C. d'E.» constarà únicament de membres individuals, que contribuiran al seu sosteniment amb la quota mínima de tres pessetes anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grup podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que els membres individuals.

Adició aprovada en el Congrés de Tarragona. — Els Presidents dels grups adherits formaran un Consell Consultiu de la «Federació», ad el qual podrà dirigir-se el President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en que u cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació» sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en lo que fóra de desitjar per a la millor marxa de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

Art. quint. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vic-president, Caixer-administrador de la revista, Vic-caixer-administrador i Secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista.

Art. sisè. — Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son carrec: recollir les quotes dels federats, fer les comunicacions necessaries per als efectes del article segon i demés assumptes del regim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre el Comitè Directiu i els seus representants.

Adició aprovada en el Congrés de Tarragona. — Els delegats podran retenir-se, si u creuen

convenient, en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

Art. setè. — El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys una vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assamblea o Congrés general, en el qual, previa ordre del dia, se donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà el lloc on agi de celebrar-se el vinent Congrés o Assamblea, se nomenaran els individus que agin de formar el Comitè per al següent exercici, i s' discutiran les proposicions que agin sigut presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assamblea, i incloses en l'ordre del dia. Els individus del Comitè podran ésser reelegits tant sols un cop.

Art. vuitè. — El Comitè estarà facultat per crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les Juntes de les quals seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

Art. novè. — Tots els acords de les Assamblees i Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

Art. desè. — Les esmenes que vulguin fer-se en aquest Reglament auran de presentar-se en temps convenient per ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podran ésser discutides i aprovades en les Assamblees o Congressos generals.

Art. onzè. — La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la catalana en les Assamblees.

Art. dotzè. — En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.», els fondos existents, o que resultin de la liquidació, passaran a la «Centra Oficejo», domiciliada a París, per a la propagació de l'Esperanto.

Article transitori. — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Sabadell, carrer de Gracia, 12.

Per la Comissió Organitzadora: Domenech Serdà, Joan Piferrer, Antoni Martí, J. Camps, Agustí Badia, Santiago Puigbonet i Joan Romeu.

Aprovat, en data del 14 de febrer de 1910, pel senyor Governador Civil de Barcelona.

Hi ha un sagell que diu: *Gobierno Civil de la Provincia de Barcelona.*

LLISTA DE DELEGATS AUTORITZATS PER LA ADMINISTRACIÓ DE K. E. F. PER A REBRE LES QUOTES

Sabadell	Lloc Social	Gracia, 12.
Reus.	Sr. E. Aguadé	Presó, 15.
Vilanova i Geltrú	» F. Mestres	Sant Antoni, 1 i 3.
Barbarà.	» J. Puigbonet.	Sant Pere, 39.
Balaguer	» M. Espar Boquer	Miracle, 7.
Cambrils	Sta. J. Masaguer.	Hostal Nou.
Olot.	Sr. I. Juanola.	Superior, 25, 2. ^{on}
Terrassa.	» A. Oliart	Clarís, 24.
Manlleu.	» Ll. Coll	Vora del Ter, 21.
Barcelona	» D. Dalmau	Diputació, 327, 3. ^r , 1. ^a
Tarragona.	» J. Molas	Plassa de la Catedral, 7.
Castellar del Vallès.	» F. Blanquer	Fonts Calents.
Arbós	» G. Rovirosa	Major, 2.
Vendrell	» J. Constantí	Sant Sebastià, 20.
Igualada	» A. Mosella	Sant Magí, 21.
Girona	» F. Anguet	Progrés, 20.
Vilafranca del Panadès	» A. Robreño	Puigmoltó. 14.
Ulldemolins	Dr. Roman Pallejà	Carretera, 2.
Sta. Coloma de Farnés	» Anton Llinás	Vall, 45.
Lleida	Sr. Lluís Abadal.	Major, 12 i 14.
La Escala	» Josep Ximinis	Fàbrica gèneros de punt
Mataró	» Josep Solà	Sant Josep, 46.
Premià de Mar	» P. Alsina	Camí Reial, 81 i 79.
Tivissa	» F. M. Brú	Avall, 16.
Moncada	Dr. Joan Buxó	
Berga	Sr. Josep Cardona	Farmaceutic.
Sant Feliu de Codinas.	» Joaquim Coll	Vicari.
Banyolas	» J. Aulina	Turers, 49.
Sant Feliu de Guixols.	» J. Blanch	Caymo, 32.

Ademés poden enviar-se també directament a l'Administració :
Gracia, 12, Sabadell, amb sagells de 15 centims

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracla. - SABADELL
BARCELONA (HISPANUJO)

Redaktoro :
Frederich Pujulà

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *Historio de Esperanto en Katalunujo (Ripollet)*, N. N. — *Pejzaĝo*, Jozefo Grau. — *Enketo pri sanyorav*, Dro. Joakimo Coll, Ptro.; C. Huecás, Komandanto, kaj Jozefo Grau, Kaporalo. — *Katalunaj efemeridoj*, K. E. — *II^a Literatura Konkurso (Eksterordinaraj temoj)*, La Komitato. — *III^a Kongreso de la «K. E. F.»*, Agusti Badía. — *VIII^a Universala Kongreso Esperantista (2^a cirkulero)*. — *Enlanda Movado*, K. E. kaj Deleĝitoj. — *Balanço de l'any 1911*, J. Pierrer. — *Goĝiga fakto*. *Atilanda movado*, E. P. — *Korespondaĵo*, Red.



Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al "Kataluna Esperantista Federacio"

Esperanta Semo.	Sabadell
Nova Semo	Reus
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto.	Barbarà del Vallès
Olota Stelo	Olot
Lumon.	Terrassa
Casino del Comercio	»
Esperantista Junularo.	»
Esperanta Juneco	Barcelona
La Rondo.	»
Esperanta Fako (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Ĝiam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Frateco	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo.	»
Unió Catalanista	»
Novan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo.	»
Evolucio	»
Universala Frateco	»
¡Supren!	»
Esperanta Aŭroro	»
Esperanta Racionala Grupo	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallés
Laboro Esperanta	Vilanova y Geltrú
Esperantista Grupo	Mataró
Kamparo	S. Perpetua de la Moguda
Frateco	Vendrell
Esperantista Amikeco.	Manlleu
Esperanta Amo.	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Esperanta Amikaro	Banyolas
Ilerda Espero	Lleyda
Frateco	S. Feliu de Guixols
Gerona Esperantista Ligo	» »

Tot l'Esperanto en una fulla

Edició de la «K. E. F.». A 50 centims el cent. Fulles insustituibles per a la propaganda en vetllades, excursions, etc.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

REDAKTORO:
Frederich Pujulà

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO: *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Historio de Esperanto en Katalunujo (Ripollet)*, N. N. — *Pejzaĝo*, Jozefo Grau. — *Enheto pri «anyorar»*, Dro. Joakimo Coll, Ptro.; C. Huecas, Komandanto, kaj Jozefo Grau, Kaporalo. — *Katalunaj efemeridoj*, K. E. — *II^a Literatura Konkurso (Eksterordinaraj temoj)*. La Komitato. — *III^a Kongreso de la «K. E. F.»*, Agustí Badía. — *VIII^a Universala Kongreso Esperantista (1^a cirkulero)*. — *Enlanda Movado*, K. E. kaj Delegitoj. — *Balanço de l'any 1911*, J. Piferrer. — *Ĝojiga fakto*. — *Atilanda movado*, E. P. — *Korespondado*, Red.

PRI...

ESCEPTO, KIUN ONI FARIS EN ANTVERPENO POR KATALUNOJ

MI tre bedaŭras, ke miaj karaj kolegoj el la Komitato de la 7^a Kongreso faris escepton por katalunoj. Ke ili ne konas mian nomon, kvankam mi havis la nemerititan honoron prezidi la V^{an} estas al mi tute indiferenta. Estas al mi egale, ke sur ĉiu karto, bileto kaj listo mia nomo kaj tiu de mia edzino estis aliformigitaj en Pulula (svärmas), kvankam ni ja nur estis du. Mi esperis ke sur la definitiva protokolo, la vorto korektiĝos, sed mi esperis vane. Mi ricevis ĝin hodiaŭ, kaj mi rekonstatis kun miro, ke mi ne ĉestis la 7^{an}. La afero ne estas grava.

Sed vere grava estas, ke ĉar oni apartigas la esperantistojn laŭ lingvoj, oni enmiksas nin, baskojn kaj kástilojn en saman grupon kaj sub saman nomon.

Ĝenerala regulo por ĉiuj povas esti nelogika; sed escepto por unu, aŭ kontraŭ unu estas nekonvena. Lingva estas nia afero, kaj ne

laŭ ŝtatoj, gentoj, sklavaroj aŭ registaroj oni devas nin grupigi sed laŭ lingvoj. Se morgaŭ la tuta mondo apartenas al unu sola nacio, la morgaŭa Kongreso de Esperanto ne starigos tamen unu solan grupon por ĉiuj kongresanoj. Kiel oni agis kun poloj, finoj, islandanoj, skotoj, k. t. p., oni ja povis agi kun ni. Nia forto kaj nia ekzistrezono, kiel esperantistoj, estas la diverseco de lingvoj. Tion oni devas kompreni, kaj tion oni komprenis. Nur por ni, miaj karaj kolegoj de Antverpreno forgesis la nivelon; kaj tio ne estas ĝusta pago al la fervora laborado de katalunoj.

Francujo entenas tiom da bask— kaj katalunlingvanoj kiom Hispanujo. Niaj amikoj hispanaj, sekve ne bezonas ke mi klarigu al ili ke ne ni protestas, ĉar oni enmiksas nin kun ili en saman grupon. Fakte, tio estas honoro por ambaŭ flankoj, kaj teorie, ni esperantistoj apartenas al sama familio. Sed, esperantiste, lingve, tio estas absurdaĵo.

La fakto, ke oni loĝas Katalunujon, ne pruvas konon de hispana lingvo. Mi estas certa ke miaj Krakoviaj kolegoj ne faros tiajn esceptojn por ni. Sed se ili malgraŭ ĉio deziras fari, ni sendos niajn aligilon de Krakovio mem, ni donos nian krakovian adreson, kaj fulme, meĥanike ni havos la honoron kaj ĝojon esti poloj, kaj koni polan lingvon.

Niaj nomoj en listo de Polujo ne aspektos pli strange ol tiuj de Fino. Sofio kaj Sro. Adam Zamenhof en listo de Svisujo.

Por kio diable taŭgas insiste demandi pri ilia natura lingvo la kongresanojn, se fine la adreso estos la ĉefa klasigilo!

... Oni ne diru, ke kongresanoj nur plendas pri ĉambroj de hoteloj!

FRED. PUJULÀ¹

RILATAS LA DELEGITOJN

Granda kaj multepeza estas la laboro de nia sekretario Sro. Pellicer. La pligravigo de K. E. F. postulas de li ĉiutagan multnombrian korespondaĵon ne nur por internaj sed ankaŭ por eksteraj aferoj. Tiel granda ankaŭ estas la laboro de nia kas-administrato Sro. Piferrer, kaj de la amikoj el Sabadell, kiuj fervore helpas la administradon de nia gazeto. Ni klopodu ne supersarĝi ilian taskon. Sendonte demandon ni antaŭe rigardu ĉu respondo ne troviĝas en nia Regularo; sendinte demandon ni tralegu la fakon «Korespondado» de nia gazeto, kie troviĝas la respondo kiam ĝi ne urĝis. Demandojn rilatantajn la Kongreson bonvolu turni rekte al ĝia Prezidanto Sro. Alavedra en Terrassa. Estos bone ĉiam, konsulti unue la Delegitojn.

1) Pro manko de loko, mi retiris mian jam kompostitan opinion pri *anyorar* kaj *mankosenti*.

Kiam K. E. F. estos vere riĉa ni havos la jam nun bezonatajn pagitajn oficistojn kaj ni povos malavare elspezi por korespondado. Ĉiu el ni trudu al si la devon havigi al la Federacio novan membron ĉiun jarduonon. Post tri jaroj, je la fino de la 1914 ni estos 32.000 membroj, nia kasisto Piferrer enkasigos ridete 96.000 pesetojn, kaj li dungos por ni oficistojn kun brodita stelo sur la dorso kaj eĉ orumitaj galonoj ĉe la ĉapo.

Laŭ tiu tre facila, dank' al nia fervoro, progresio, je la komenco de la jaro 1919, nur post 7 jaroj!, ni estos 16,384.700 membroj en la Kataluna Federacio, 1,409.824 grupoj aliĝintaj, nia kaso ricevos 53,279.072 pesetojn (per kio subvencii niajn autoritatojn), kaj venos por ni la okazo peti helpon al la alilando por krei Federacieton de neesperantistoj! Al la varbado, karaj amikoj!



Historio de Esperanto en Katalunujo

RIPOLLET

RA esperantista movado komenciĝis en nia urbeto dum Julio 1909 dank' al la klopodoj de Dro. Joaquim Coll. Tial ke Ripollet staras en la Valles'a regiono, kiu estas tre Esperantama, la voko de la propagandisto tuj grupigis ĉirkaŭ lin 25 junulojn, kiuj kuraĝe komencis kurson sub lia direktado trifojn ĉiusemajne. Post malmulte da tempo ili decidis la starigon de la grupo «*Esperanta Akvofalo*», kies prezidanto estis Sro. F. Comenges, instruisto en la urbo, kaj kies sekretario estis Sro. Roca.

La 14^{an} de Oktobro de sama jaro, tiu grupo organizis kampiron al la ermitejo Santiga, kiu tre sukcesis, kun delegitoj de Sabadell, Montcada, Barcelono kaj ĉiuj aŭtoritatuloj kaj esperantistoj de Sankta Perpetua. La celo de la kampiro estis festi la inaŭguron de la grupa standardo.

Post la foriro de pastro Coll, la entuziasmo iom malvarmiĝis, kaj kvankam la grupo vivadas ankoraŭ estus tre utile ke la fervoraj kaj firmaj amikoj el Vallès, zorgu alporti iom da kuraĝo al la Ripollet'anoj por ke ili daŭru antaŭen sur la vojo al niaj idealoj.

N. N.



PEJZAGO

Al Esperantista Grupo
ILERDA ESPERO

GRIZA estis la tago. La plumbokolora ĉielo igis pli malgajaj ankoraŭ la malpurajn stratojn de la antikva urbo kuŝanta apud rivero kaj min mi sentis peza, kvazaŭ laca. Restado dum tuta mateno ĉe troe varmigita ĉambro estis ennebuliganta mian kapon, kaj por spiri ion pli sanigan aeron, mi formarŝis el la stratamaso. Baldaŭ la bradon de la rivero mi aŭdis kaj apud ĝiaj bordoj mi vojiris kelktempe rigardadante la graciajn alfleksiĝojn de la akva fluaĵo sur la ŝtonoj kaŝitaj sub ĝi.

La akvo petole transsaltis sur ili, kaj kvazaŭ triumfa premio por ĝia lerteco ekaperis sur ĝiaj ondoj ŝaŭmoblankaj kronetoj tuj diserigantaj, kiuj kantadis mallaŭte la ĝojon preterkuradi al la maro, forlasante la senmove restadantaj stonaĵojn similajn je malnoblaj baroj kontraŭ la gaja kaj ĉarma fluo.

Sur bela ponto delikate eniganta en la sablaron subfluejan siajn subtenajn kolonojn, mi transiris la riveron. De tie la konstruajaro ŝajnas malproksima kaj la urba ĝardeno proponas allogan rifuĝejon. Mi eniris en ĝin, ĝia longa aleo ŝajnis tapiŝita per la amaso de velkintaj folioj, kiuj defalis de la apudstarantaj altaj arboj: simila al oro estis la flavkoloro de la foliaro kaj ĉar mi estis tute sola, mi libere povis fantazie admiri ĝin. Eĉ plej malgranda aerblovo ne movis la branĉojn de l'arboj: la aero ripozis; kantantaj birdetoj malestis; silento plene regadis.

Poeto certigas, kaj tiam mi bone komprenis lian diron, ke en la rektolinio de unu aleo ĉia meditado nobliĝas; ja mi konstatis, dum mi zorge pasadis sur la ora tapiso, ke tio estas vera. Kvazaŭ ensorcite malaperis el mia penso firealaj prozaĵoj kaj subite venis en ĝin plej idealaj poezioj neverkitaj ankoraŭ de homa poeto.

Ili estis tre ravaj, kaj min dorlotis dum revo, ĉar, je la fino de l' longa kaj bela aleo, ĉe ronda placeto en kies mezo staras fontano, mi sidigis sur benko, kaj mi komencis revadi, pensante ke miajn ekztaĵojn antaŭ tiom bela spektaklo mi rakontos al vi per prozo eleganta, kiun vi legos ĝojkore, laŭdante la aŭtoron.

Per vortoj plej mildaj mi antaŭverkis priskribon allogan, trapektotan per ĉarmaj koloroj, kiujn mi eligados el rava pejzaĝo; ora, el la flanko belflave kovrita de l' ŝanceliĝe falintaj folioj; smeraldo-simila, el la akvo staranta ĉe l' malgranda fontano; blanka, el pur-ebriila krizan ema bedo; griza, el la ĉielpecoj trans la branĉaro

videblaj; kaj tiel ĉiujn nuancojn de l' vintraj floroj, de la malaltaj arbustoj, mi alligos al mia rakonto, kaj ĝi estos bukedo. Bonodoron al ĝi mi havigos eltiritan el ravo, kiu nun min ĉirkaŭas kaj ĝentile la homojn amantajn poezion mi regalos per mia verkaĵo.

Ja mi revadis pri l' Gloro; ĝi ŝajne estis facile atingebla; nur estas necese traduki per vortoj la belon, kiun mi ĝue vidas, kaj ilin kantadi per voĉo laŭtega antaŭ la mondo ŝatanta belaĵojn, por ricevi la helan stelon nur brilantan sur frunto de iuj elektitoj.

Post kelke da tagoj mi ekverkis ĉi tion, ĉar mi volis akiri la gloran aŭreolon; miajn impresiojn mi intencis priskribi; sed mia plumo mallerta ne taŭgas skribi la vortojn sonorajn, kiuj en mia animo harmonie kantadis.

Leganto, kompatu revinton, pensante ke puno tre granda ja estas, sentadi ĉe l' koro la kanton sonoratan de mirinda Naturo, kaj nur per senritma malbela prozaĵo esprimi ĝian ĉarmon.

JOZEFO GRAU



Enketo pri anyorar

1^e. — Por difini la ĝustan vorton, kiu tradukas nian esprimon *anyorar*, mi opinias necesa pristudi la internan signifon de tiu kataluna vorto. Laŭ mia opinio, *anyorar* signifas la doloron aŭ suferon en la koro de tiu, kiu sentas la mankon de kio ajn, kaj la egan deziron en la volo por trafi tion kies mankon oni sentas. Eble pli koncize mi difinos tiel: *Bedaŭro kaj alsopiro pro sento de manko*.

2^e. — Mi tute konsentas pri la propono Hankel (aperinta en la lasta decembra kajero de *Oficiala Gazeto Esperantista*), laŭ kiu la Akademio malaprobas la enkondukon de *superflujaj vortoj*. Tamen aprobas ĝi la enkondukon de nova vorto kondiĉe: «ke ĝi ne estas superflua, alivorte, ke ĝi ne estas anstataŭebla per taŭga vorto, ĉu fundamenta, ĉu almenaŭ tre ĝenerala uzata».

3^e. — Nek *bedaŭri*, nek *alsopiri*, nek *mankosenti* tradukas sufiĉe bone nian *anyorar*.

a) Ne *bedaŭri* (*esser llástima; sentir*); ĉar bedaŭro estas afekto kaj nur peco de la difinaĵo (1^e).

b) Ne *alsopiri* (*sospirar per, o vers*); ĉar alsopiro estas ankoraŭ

efekto, aŭ almenaŭ la celo de tiu kiu sentas manko de io ajn. Ankaŭ ĝi estas nur peco de la difinaĵo (1°).

c) Ne *mankosenti* (*trobar a fallar*); ĉar mankosento estas nur tio kio kaŭzas la bedaŭron kaj alspiron, sekve ĝi nur kune kun ĉi tiuj vortoj estas la plena signifo de *anyorar*.

4°. — Ĉar mi ne konas en la ĝenerala uzo nek en la komuna vortaro taŭgan vorton, mi proponas tiun: ANJORI.

Mi ne konsentas kun Sro. Martorell pri la malhelpaĵoj, kiujn li montras deveneblaj pro la uzo de tiu laŭ li *stranga* vorto, ĉu al alilingvanoj, ĉu al ni. Ne al alilingvanoj, ĉar ili, tiel kiel ni, devis ja lerni *strangajn vortojn*. Ne al ni ĉar la vorto estas tute nia. Plie mi rifuzas la esprimon *echar de menos*, anstataŭante al *añoranza*, ĉar ambaŭ ne estas samsignifaj laŭ mi, kaj mi pensas ankaŭ laŭ Kastila Akademio, kiu prenis la duan vorton el nia kataluna vortaro. Fine mi opinias ke la vorto *anjori* estas ja tute belsona kaj konforma al la esperanta vortfarado.

5°. — Mi varme petas al la pioniroj de nia lando ke ili parolu pri tiu demando. Mi aludas Srojn. Bremon, Codorniu, Galceran, Rosals, k. t. p., al ĉiuj la profesoroj de «K. E. F.» kaj fine al la kastilaj stilistoj. Parolu ĉiuj kaj tiel ni bone povos fiksi la ĝustan vorton.

DRO. JOAKIMO COLL, Ptro.

Unu el niaj malvirtaj emoj, apenaŭ ni iomete scias paroli aŭ skribi esperante, estas nesatebla dezirego enmeti en la esperanta vortaro novajn radikojn, ĉu el la gepatra lingvo, ĉu el aliaj ajn, aŭ elpensi aŭ aranĝi kunmetitajn vortojn, ne ĉiam internacie kompreneblaj, kredante plibone esprimi aŭ klarigi etajn sencnuancojn, kiuj, laŭ ni, ne estas sufiĉe klaraj en la radikoj jam akceptitaj kun vera internacia senco: bedaŭrinda emo, kiu multege malutilas kaj malfaciligas nian lingvon pro ne matura studo de niaj esperantaj radikoj.

Ne estas do necese, elpensi novajn kunmetitajn vortojn por traduki la katalunan *anyorar* nek ĝin esperantigi, ĉar ni ja havas multajn rimedojn por tion fari nur uzante internaciajn radikojn.

Bedaŭro, *ĉagreno*, *enuo*, *malgajeco*, *malĝojeco*, *nostalgio*, *plendo*, *sopiro* kaj multaj aliaj ĉiuokaze sufiĉos laŭ la senco, kiun la uzonto volos esprimi.

Kial trudi la devon uzi ĉiam ian radikon aŭ kunmetitan vorton por traduki la katalunan *anyorar*? Ĉar ne estos bezone rimarkigi ke, la ekzilito kiu gravege *nostalgiiĝas* kaj la kamparano loĝanta urbegon

kiu nur bedaŭras siajn tedhejmajn legomkuiraĵojn, estas du sentoj (anyorances aŭ anyoraments) tre malsamegaj.

Do, ni lasu libere ke ĉiu, laŭokaze, uzu plej taŭgan esperantan vorton. Kaj, per Dio!, mi ekgenue petegas de vi ne enkonduki novajn nebezonaĵajn radikojn, ĉar se la aliaj nacilingvanoj simile agus, mi multe timas ke baldaŭ ni bezonos grandan valizon kaj eĉ veturilon por porti la esperantan vortaron.)

C. HUECAS

Ĉe la januara numero de K. E. aperis, sub tiu sama titolo, artikolo lerte verkita de Sro. Martorell, demandanta pri kia estas la esprimo ĝuste tradukanta la signifon de la kataluna verbo *anyorar*.

La Redakcio de K. E., en la celo fruktigi la enketon, ĝin resumas per tri demandoj, kies respondojn, laŭ mia opinio, mi donas jene:

Nek *bedaŭri*, nek *alsopiri*, bone tradukas *anyorar*. La formon francan *enui je*, kiu estas aldonata klarige, mi ankaŭ ne ŝatas. Laŭ mi ĝi ne estas ĝusta. Ankaŭ mi ne juĝas bona la esprimon *mankosenti*; ĝi ne estas klara.

Mi proponas la formon *nostalgii je*. Ekzemploj: *jo anyoro ma patria*: mi nostalgias je mia patrujo. *Ells anyoraven sa llar*: ili nostalgiiis sian hejmon, aŭ je sia hejmo. *L'anyorança va matar-lo*: nostalgio lin mortigis. *Va morir-se d'anyorament*: li mortigis pro nostalgio, aŭ de nostalgio. *Anyorar*: nostalgii.

Jen kial mi proponas tiun radikon: 1^e Ĉar ĝi estas esperanta, kaj ne nove enkondukita. 2^e Tial ke, *nostalgio* signifas laŭ la vortaro: *malsano kaŭzata de trecege forta deziro reveni en la patruan landon, aŭ dolorego kaŭze de restado for de amikoj, parencoj*, k. c.; kio, mi pensas, estas ĝusta traduko de nia *anyorança*, ĉar ni uzas tiun vorton, ne nur en la senco de *sento*, sed ankaŭ kiel esprimon de la nomo de malsano.

Ĉu tiu traduko, kiun mi proponas, estas tute akceptebla? Mi jese respondas.

JOZEFO GRAU



Katalunaj efemeridoj¹

MARTO

24^a 1909. — Sinjoroj Amades, Barrot kaj Martinez fondas en la «Popola Enciklopedia Ateneo» la grupon «Semo».

1) La vorto *efemerido* ne ŝajnas sufiĉe bona. Konsilojn!

II^a Literatura Konkurso

Eksterordinaraj temoj (Sekvo)

Ne vane niaj distingindaj amikoj Sroj. Carlo Bourlet kaj Barono de Méuil, ĉeestis unufojon ĉe la Festo de Katalunaj Floraj Ludoj. Ili komprenis la gravecon de tiaj festoj por la renaskiĝo de lingvo, kaj tial *La Revuo* per mirinda organizo prosperigis la «Unuaj Esperantistaj Floraj Ludoj»-on, kiuj bedaŭrinde ne kreis ankoraŭ tradicion... Sed, ni havas esperojn, ĉar ni estas esperantistoj! Tial ankaŭ, ili, tuj respondi al nia peto proponante premiojn kaj temojn por nia konkurso. Certe, niaj samlandanoj konkurante amase al tiuj temoj scios danki niajn francajn amikojn kaj montri la grandan estimon kaj simpatian, kiujn ni havas por ili.

III. Premio de *La Revuo* : 20 frankoj da esperantaj libroj elektotaj el la katalogo de la firma «Hachette et C^{ie}».

Tema : Originala aŭ tradukita artikolo pri Scienco aŭ Historio, vulgarka artikolo facile komprenebla por ĉiuj. (La premiita artikolo estos publikigita en *La Revuo*).

IV. Premio de *Franca Esperantisto* : Jarabono al ĝi.

Temo : *Kiaj devas esti la reguloj por bone traduki en Esperanto naciajn kantojn, kanzonojn kaj operajn aviojn?*

Ĉiu esperantisto konas sinjoron Chavet. Li estas la senlaca blonda viro, kiun oni vidas apud amasego da dokumentoj sur la estrado de la Internaciaj Kongresoj; li estas la ĉiam staranta celtabulo, kien de ĉiu flanko de la mondo oni celpafas demandojn kaj instrukcipetojn dum la tuta jaro; li estas la inteligenta verkisto de lernolibroj por francoj kaj altvidaj artaj kritikoj por delikataj gustumuloj; li estas la sprita kanzonisto, kiu inter batalo kaj batalo por Esperanto, alportas al nia movado la ĉarman rideton de Parizo, je kiu oni enuas ĉiam, post kiam oni konis ĝin. Por ni katalunoj li estas ankoraŭ la amiko, la membro de la kataluna kolonio en Parizo. Li ne povis manki en nia festo de la Literatura Konkurso, kaj por ni estas speciala ĝojo povi proponi temon kaj premion de li.

V. Premio de Sro. Gabriel Chavet : Lia plena verkaro dediĉita al la aŭtoro de la plej bona studo pri

Temo : *Literaturo kreas kaj vivigas lingvon.*

Niaj samlandanoj, kiuj ĉeestis la V^{an}, ne forgesis nian karan amikon Sinjoron Jules Borel. Cetere la nomo de la firma «Möller & Borel» estas konata de ni ĉiuj, pro ĝiaj grava gazeto *Germana Esperantisto* kaj populara «Esperanta Biblioteko Internacia. Siaflanke, Sro. Borel ne forgesis nin kaj rapide

respondis al nia invito sendante temon kaj premion, kiuj estos certe tre ŝataj de ĉiuj.

VI. Premio de «Esperanto Verlag Möller & Borel» : 3 Ekzempleroj de ĉiu ĝis nun aperinta broŝuro de la «Esperanta Biblioteko Internacia».

Temo : *Paĝo pri la Esperanta Biblioteko Internacia.*

VII. Premio de la grupo «Semo» (Popola Enciklopedia Ateneo) : 25 pesetoj (10 sm.) al la aŭtoro de

Temo : la plej bona traduko de *L'Emigrant* de nia nacia poeto Jascinto Verdaguer.

VIII. Premio de Moŝto Alfonso Sala, Parlamenta Deputito : Artaĵo.

Temo : *Enkonduko de Esperanto en la Industriajn Lernejojn.*

IX. Premio de Moŝto Joan Barata, Provinca Deputito : Artaĵo.

Temo : *Esperanto en la praktika vivo.*

X. Premio de Moŝto Francesch Alegre, Provinca Deputito : Artaĵo.

Temo : *Esperanto en Komerco.*

XI. Premio de *Esperantista Junularo* : Artaĵo.

Temo : *Esperanta dialogo por infana deklamado.*

XII. Premio de Honorinda Ekonomo de Terrassa : Artaĵo.

Temo : *Eklezio amis ĉiam la veran progresadon de la homo.*

Notoj. — Responde al demandoj, la Komitato de la Literatura Konkurso sciigas ke ĝi ne estas ekskluziva por katalunoj, sed malfermita al ĉiuj la esperantistoj de ĉiuj landoj. Por konkuri al iu ajn temo oni ne bezonas esti kataluno nek «K. E. F.»ano. Nia Federacio respondas al la bezono de propagando kaj socia vivo, ne al la kapriceto boligi apartan barĉon.

— En la rakonto de Sro. Ruyra *Les senyoretas del mar* proponita kiel temo en nia Konkurso, estas kelkaj malfacilaĵoj, kiuj venas de nia lingvo, kaj pri kiuj la komitato opiniis estos bone doni kelkajn klarigojn.

La esprimo *senyoretas del mar* ne apartenas al nia popola mitologio. Ĝi estas simple elpensita de la aŭtoro. Laŭ la aŭtoro, kiun ni konsultis, ia vorto *senyoreta* ne enhavas ĉi tie ideon de fraŭlineco.

La vorto *grotta* (*garotta*) estas uzata en kelkaj vilaĝoj de la marbordo por nomi la *eriĉo de mar*, laŭ Verax «ekino», ne akceptita pro «-ino» de kelkaj, kiuj proponas «marerinaco». Laŭ Sro. Galceran, tiu ĉi lasta vorto eble povus krei konfuzon kun la *Diodon hystrix*. L. kiu cetere malofte troviĝas en nia maro. *Pues de grotta* sekve ne devas esti tradukita per «stalaktitoj» kiel aperas en ia kastila traduko de Carner. Boirac citas ankaŭ *marurselo*.

Serrà, fiŝo, *Serranus hepatus*, *Serranus anthias*, laŭ Dro. Joan Vilanova Piera; *Serranus cabrilla*, laŭ d'Orbigny (*Dict. Univ. d'Hist. Nat.*). Sen ia dubo, tiu de nia maro estas la *serranus anthias*.

D'Orbigni kaj aliaj nomas la *serra'ojn*, *perques de mar*. Pro tio, kelkaj opinias ke en Esperanto ni povus ilin nomi «marperkoj».

La konkursontoj elektos. — La Komitato.



III^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio»

TNUAJ vortoj en ĉiu entrepreno realigonta estas ofte danĝeraj; la intertempo de la inspiro ĝis la efektiviĝo, ŝanĝas iliajn verajn signifojn anstataŭigante per elfluantaj ĵusdiritaj vortoj la maljuniĝintajn. Tion-ĉi kredante, mi ne riskos tian aventuron! Ĉar mi estas devigata informi miajn kunfederacianojn pri hodiaŭaj kongresaferoj nur mi klarigos tion, kio estas neŝanĝebla; aliparte la inko ankoraŭ estas malseka kaj la iluzio rekonciiĝis el tiu dolĉa dormeto al kiu invitis nin la legado de la projektaro pri la III^a, subskribita de mia amiko V. Alavedra, kaj publikigita ĉi-tie mem.

Ni estas ja en plena kongreslabora aranĝado. La loka komitato projektas ĝeneralan esperantistan propagandadon por enigi Esperanton en ĉiun enurban societon. Ankaŭ ni celas partopreni en tiu popola disvastiĝado de nia kara lingvo por plisukcesigi la III^{an}. Ni ne akceptas kongreson konsistantan nur el oficialaj faroj, ni volas ankaŭ apud ni, ĉe ni mem, interfratiĝante, tiun nian korsenteman sed nepotencigeblan popolon.

Dum niaj unaj interbabiladoj ni esploris atente niajn protektantojn — kiuj koncistas el ĉiuj diversaj enurbaj rangoj — kaj per iliaj ampromesoj al Esperanto ni povas konstati ĉi-tie ke Terrassa akceptos futkore nian jaran kunvenon. Mi ne kredas dece laŭdi ĉi-tie mian praurbon, sed nur por rimarkigi personan esprimon, mi permesas al mi, rememori al ĉiu alestinta en Terrassa okaze de la neforgesebla por mi kaj por ĉiuj, inaŭguracia festo de «Lumon», la ĉies helpon, kiun ni atingis de niaj sindonaj samurbanoj. De tiam ĉiuj pordoj estas malfermitaj al Esperanto kuraĝigante nin en nia antaŭenira klopodo.

La aŭtoritatoj donacis malavare premiojn por la Floraj Ludoj krom kelka inda kaj imitinda societo; sed ni havas aliajn valorantajn premiojn, kiuj, unuj estos disdonitaj al la laŭreatoj kaj aliaj al ĉiuj. Tiuj ĉi premioj multe valorantaj, mi devas diri, nur estos por la ĉeestontoj.

Ĝen nia unua deklaro. Ni kuraĝis senkomplimente je via nomo peti helpon al ĉiuj Terrassa'anoj. Tion ni atingis ja. Mi ne bezonas vin pretigi por via ĉeesto. Ni fidas al vi.

AGUSTÍ BADÍA
El la loka Komitato



VIII^a Universala Kongreso Esperantista

Krakovio, 11-18 Aŭgusto, 1912

DUA CIRKULERO

Aliĝoj. — La Komitato eldonis aliĝilojn, kiuj estis senditaj al ĉiuj ĝisnunaj provizoraj aliĝintoj: — La Kongresa karto kostas Sm. 6 = K. 14'40. — Post ricevo de aliĝo, akompanata de mono tuj estos sendita provizora kongreskarto kun definitiva numero. — La unuaj kelkcent aliĝintoj ricevas kune kun la provizora kongreskarto, kiel premion, la belegan esperantistan himnon, (kun notoj) *La Tagiĝo*, verkitan de Sro. A. Grabowski kaj malavare donacitan de Sro. J. Günter, redaktoro de *Pola Esperantisto*.

Familianoj (edzinoj kaj infanoj) kune venantaj kun la famiilestr (in) o, pagas nur Sm. 3, kaj ricevas tn. suplementajn kartojn, sed la kongresajn dokumentojn ricevas sole la famiilestr (in) o.

Same geblinduloj pagas duonan prezon, sed ili plenrajte ĝuos ĉiujn privilegiojn de la Kongreso.

La kongresa karto numero 1, havas specialan karakteron, ĉar ĝi estos aŭkcie vendita, — Ĝin ricevos tiu kongresano, kiu ĝis la unua de majo oferos por ĝi la plej altan sumon. — Oni sendu proponojn!

Adreso. — La sola adreso de la Organiza Komitato estas: Kongreso Esperantista en Krakovo, Aŭstrio-Galicio.

Loĝado. — La loĝigan sekcion efike helpas la urbestro, kiu metis je dispono de la Komitato riĉan materialon koncernantan ĉi tiun fakon. — La preparaj laboroj de la aludita sekcio baldaŭ estos finitaj kaj ili povos en plej proksima estonto publikigi tarifojn kun prezoj de loĝado kaj mangado.

Ĉar ni ricevis de diverslandaj studentoj avizojn, ke la studentaro intencas grandare partopreni en la VIII^a Kongreso, ni zorgas por havigi al ili kiel eble plej malkaran loĝejon. Ni do sukcesis trovi por la studentoj agrablan hejmon, en kiu la loĝado dum ses tagoj koston nur Sm. 1'25.

Oficiala helpo. — La Organiza Komitato sendis konformajn petskribojn al ministerio por publika instruado, ministerio por fervojaj aferoj, ministerio por publikaj laboroj kaj ministerio por Galicio. La galicia ministro dum speciala audienco firme promesis al la Komitato subtenadi ĝiajn klopodojn ĉe la aluditaj estraroj. Same estis sendita al la provinca parlamento petskribo pri subvencio, kiun subtenos la krakova urbestro, Dro. Leo, estanta samtempe provinca deputato.

Gvidlibroj. — Estas presataj gvidlibroj tra Zakopane kaj Tatroj, kie okazos postkongresa ekskurso kaj speciala gvidlibro tra krakovaj preĝejoj, famaj pro siaj multenombraj artaĵoj. Laŭ siu eksteraja la cititaj gvidlibroj similos la gvidlibron tra Krakovo.

Akceptejoj. — Por aranĝo de akceptejoj kun apartenaĵoj (skriboĉambro, legejo, poŝtofiĉejo, vestejo, lavejoj, k. t. p.) de ekspozicio kaj vendejo la

Komitato ricevis la vastan kaj belegan konstruaĵon de Komerca Akademio, kiun la direktoro Sro. Kannenberg, granda amiko de nia movado, bonvolvis doni je dispono de la Kongreso.

Teatro. — Estos ludita *Mazepa*, kortuŝanta tragedio de Julius Slowacki. La libron eldonis la firmo Hachette kaj Co, en Parizo, kie ĝi estas ricebebla por Fcs. 2. La tragedion ludos la plej eminentaj aktoroj de krakova urba teatro.

Literatura konkurso. — Ni varme petas, ke bonvolemaj personoj, instigitaj de nia unua cirkulero, prokrastu sian intencan pri difino de temoj kaj premioj, ĉar pri tiu grava punkto ni donos interesajn detalojn nur en la plej proksima cirkulero.

Vojaĝo al Krakovo. — Ĉiu aliĝinto ricevas kune kun la provizora kongreskarto specialan tabelon de distancoj inter Krakovo kaj 30 plej gravaj urboj en Europo kaj Azio. La tabelo montras detalajn prezojn de fervojoj (nur en unu direkto, ne ire kaj revene!) kaj la daŭron de la vojaĝo.

Peto. — Fine grava peto al ĉiuj samideanoj, kun kiuj ni interrilatas pri kongresaj aferoj. Ili ne prokrastadu siajn respondojn kaj tiamaniere ne malfruigu niajn laborojn, memorante la anglan proverbon: «Time is money». — *Loka Organiza Komitato.*



ENLANDA MOVADO

NIA PROSPERADO. — Tri novaj grupoj kaj amaso da izolitaj esperantistoj ĵus aliĝis al la «K. E. F.». Ĝi enhavas nun 43 grupajn kaj proksimume 500 individuajn membrojn. Al la novaj alvenintoj fratane saluton.

La «K. E. F.» funkciadas aŭtonomie; tial ĝi ne povas nek devas decidi pri aferoj, kiu nur rilatas la esperantistojn mem. Oni atentigu ekzemple pri tio, ke la Delegitoj, pli ol reprezentantoj de la Federacio en la urboj, grupoj, aroj da samideanoj, estas reprezentantoj de niaj samideanoj en la Federacio. Tial la grupoj kaj samideanoj mem devas zorgi elekti la proprajn delegitojn laŭ sia volo, reelekti aŭ ne ilin, ilin ĉesigi en la delego. (Vidu Regulon 6^{an} de nia Regularo). La «K. E. F.» kompreneble havos ĉiam la rajton konsili kaj sugestii, sed nur en okazo de neinterkonsento, neelektio, aŭ neebleco elekti, ĝi rekte intervenos por la bono de ĉiuj. En tiu senco ĉiam oni respondos al la demandoj, kiuj rilatas la delegitojn.

BARCELONO

«Esperanto kaj Patrujo» okazigis sian Ĝeneralan Kunvenon ordinaran, ĉe kiu oni montris la intencan de ĉiuj la gesocietanoj por nia afero.

Tian intencan sen ia dubo profitos la nova komitato, kiu estis elektata laŭ la jena formo:

Prezidanto, Sro. J. Mateu; Vic-prezidanto, Sro. J. Albiñana; Sekretario, M. Bermúdez; Vic-sekretariino, Frino. E. Valls; Kasisto, M. Rodríguez Cabós;

Kontisto, J. Blanch; Bibliotekistino, Frino. C. Sandalinas, kaj Voĉdonantoj, Sroj. J. Romagosa kaj D. Viger.

Tiu ĉi komitato, komprenante la senton de ĉiuj gesocietanoj, salutas la geesperantistaron kaj promesas al ĝi labori senĉese por Esperanto, tial ke ni «en laboro paca ne laciĝos». — *La Nova Komitato.*

SANTA COLOMA DE FARNES

La 7^{an} de Januaro «Esperanta Idealo» okazigis en la teatro «Círculo Columbense» de Santa Coloma de Farnès, sukcesplenan paroladaron, en kiu paroladis Sroj. Viktoro Llu s, Francisko Lusilla, Johano Abon, Cesareo Huecas kaj Petro Costa.

Antaŭ kiam parolis Sro. Costa, Fino. Benturino Estragués deklamis la poezion titolitan «Lingvaĵo de la ventumilo» kaj ŝia kuzineto Mario Tereso Huecas ĝin tradukis hispane; ambaŭ estis bruege aplaŭditaj.

La urbestro Sro. Josefo Mario Iglesias, kiel prezidanto de la kunsido, fermis ĝin dankante la multnombran aŭdantaron pro ĝia atento kaj gratulante la organizintojn pro la sukceso.

La kunsido daŭris du horojn, finiĝante je la unua posttagmeze.

En la festeno regis grandega entuziasmo precipe ĉe la toastoj, kiujn komencis Sro. Huecas kaj finis originala poezio de Sro. Mon dediĉita al nia respektindaj gastoj kaj «kolombaj»¹ geesperantistoj.

La prezidanto de «Círculo Columbense», Sro. Josefo Codina, ĝentile okazigis kinematografan presentadon je la honoro de la geesperantistoj.

La venontan monaton mi raportos pri la propagandaj fruktoj. — *La Prezidanto.*

REUS

Je la 7^a de Januaro, «Nova Semo» okazigis sian kutiman ĝeneralan kunvenon, dum kiu, post balotado estis elektitaj, kiel estroj de ĝi la jenaj: Prezidanto, Sro. Petro Aguadé; Vic-prezidanto, Sro. Henriko Aguadé Parés; Kasisto, Sro. Francisko Simó; Voĉdonantoj, Fino. Tereso Barrufet Puig kaj M. Domingo Giralt; Bibliotekisto, Sro. Johano Simó Rom; Sekretario, sinjoro Francisko de P. Baró, kaj konsilanto, Sro. Antonio Clivillés.

«Nova Semo» aranĝos propagandan kunvenon en Valls. — *La Delegito.*

BARBARÁ DEL VALLES

Ĉe la esperantistoj, kaj speciale tiuj de la societo «Esperanta Nesto» ĉi tiea, la sciigo pri la okazigo de la III^a Kongreso de «K. E. F.» en Terrassa vekis grandan entuziasmon.

Nian koran gratulon al la Terrassa'aj esperantistoj por la elekto, kiu pruvas, ke ili okupas altan lokon en la kataluna movado.

Ankaŭ kaŭzis bonan impreson la scio ke por la venonta printempo la samideanoj de la regiono *Vallès Alt* organizas grandan esperantistan feston. — *La Delegito.*

Tre bedaŭrinda manko de loko devigas la Redakcion retiri de la presilo la laste ricevitajn informojn pri aliaj urboj.



1) La kara prezidanto de «Esperanta Idealo» tre trafe ludas la vorton. Ni per multaj okazoj sciis pri la fervoro de niaj gesamideanoj de «Sankta Kolombino de Farnès» (1). Ili daŭru alte flugante.

Balanç de l'any 1911

SORTIDES DE CAIXA EN 1911

Mes	Dia		Pessetes
Janer	2	Factura J. Horta	13
»	31	Correu i remesa Revista	6'40
Febrer.	9	Factura «L'Avenç».	200
»	28	Correu i remesa Revista	6'25
Març	21	Factura «L'Avenç».	94
»	31	Correu i remesa Revista	9'15
Abril	21	Factura «L'Avenç».	140
»	30	Correu i remesa Revista	6'65
Maig	17	Factura «L'Avenç».	111
»	25	Despeses d'organització Congrés Tarragona	27'60
»	31	Correu i remesa Revista	7'30
Juny	23	Factura J. Recort	9'50
»	26	Col·lecció obres Zamenhof enquadernades.	56'25
»	30	Correu i remesa Revista	10'55
Juliol	4	Factura «L'Avenç».	75
»	8	Dos llibres per a secretaria	5
»	31	Correu, remesa Revista i agència	17'55
Agost	14	Factura J. Horta.	100
»	31	Correu i remesa Revista	9'85
Setembre	1	Adesió al VII Congrés Internacional	13'60
»	»	Factura «L'Avenç».	262
»	30	Correu i remesa Revista	9'30
Octubre	20	Factura Segalà	16'50
»	25	Factura «L'Avenç».	75
»	30	Correu i remesa Revista	6'75
Novembre	28	Factura «L'Avenç».	182
»	30	Correu i remesa Revista	7'25
Desembre.	20	Correu i remesa Revista	8'15
»	29	Factura «L'Avenç».	75
»	31	Gastos diversos secretaria	7'60
<i>Total.</i>			1,568'20

ENTRADES A CAIXA EN 1911

	Pessetes	
Donatiu de K. K. K. a «K. E. F.»	747	
Valor de 338 <i>membrokartoj</i> de 1911	1,164	
» » 12 » » 1910	36	
» » 10 inscripcions a examens.	50	
Ingressat per venda <i>ponumere</i> de K. E. i <i>Tol l'Esperanto en una fulla.</i>	39	
<i>Total</i>		2,036

RESUM

	<u>Pesettes</u>
Despeses generals	1,568'20
Valor 5 per 100 de pesettes 194, retingut per diversos delegats .	9'70
Pendent de cobrança de 1911	99'10
Incobrabla de 1911.	33
Existencia en caixa	<u>326</u>
<i>Total</i>	2,036'00

Hi ha en deposit 12,200 *flugfolioj* . . Ptes. 61
 70 col·leccions 1910 K. E., completes. » 140

El President, *J. Bremón Masgrau*. — El Secretari, *E. Pellicer*
 El Tresorer, *J. Piferrer*



Ĝojiga fakto

Reĝa biblioteko kaj muzeo de Esperanto nun estas fondita en Dresden, administrata de reĝa bibliotekisto, aranĝata en reĝa konstruaĵo. Ĉiu povas pruntepreni librojn, ĉiu povas vidi la valorajn manuskriptojn, fotografajojn, bildojn, statistikajn tabelojn, k. t. p. Por ke tiu ĉi reĝa kolekto estu kiel eble plej kompleta, ni petas ĉiujn geamikojn sendi iliajn verkojn aŭ literaturaĵojn aŭ presaĵojn. Eĉ nekompletaj jarkolektoj de esperantistaj gazetoj, nuraj regularoj, prezaroj, programoj, k. t. p., estas volonte akceptataj. Ĉiujn donacojn oni sendu sub la adreso : Reĝa Biblioteko, Dresden : Ständehaus, Zimmer, 83 (Germanujo).



Mortis en Antverpeno nia atestimata samideano kaj amiko SRO. AMATUS VAN DER BIEST, prezidanto de la VII^a Kongreso Internacia. Ankoraŭ nun pioniro, kiu forlasas nin en ĉagreno kaj senkonsolaj! KATALUNA ESPERANTISTO, en la nomo de la «Kataluna Esperantista Federacio», deziras al la belgaj samideanoj animenerĝion por surporti la doloron, kaj sendas al lia tiel kruele frapita familio siajn sincerajn kondolencojn!

SRO. W. CURRIE, P. O., BOX 27, Milton (Nov-Zelando), deziras interŝanĝi belegajn kolorigitajn p. k. kun gesamideanoj de la tuta mondo; preferas tipojn de Belulinoj aŭ Aktorinoj.

Alilanda movado

FRANÇA

Paris. — Els nostres *samideanoj* francesos saben fer propaganda! *Paris-Esperanto* 'ns anuncia que a la cavalcada de la *Mi-Carême* hi prendrà part un carro esperantista. «Stela-Concert» ha obert un Concurs de projectes de carro, i a més s'ocupà activament d'organitzar una gran festa de gala per al dia 30 de desembre. Molt bé pels esperantistes parisencs!

* * *

Copiem del *Franca Esperantisto*:

«*Dirigit als marins.* — Ad els arguments a favor de l'Esperanto, llengua marítima internacional, s'ha d'afegir el fet, bastant comic, ressenyat en el següent cablegrama:

» Enviat de Vellington (Nova Zelanda) al *Times*:

» L'expedició antàrtica japonesa manada pel lloc-tinent Shirassé ha arribat aquí. Com que cap dels seus membres parla l'anglès, i com que ningú aquí comprèn el japonès, s'han produït algunes dificultats per resoldre 'l que volien fer. De totes maneres, gracies a aver-s'hi posat el consul de la Xina, ja que 'ls japonesos poden desxifrar l'escriptura xinesa encara que estiguin en l'impossibilitat de parlar-hi, s'ha pogut comprendre que l'expedició tenia necessitat de carbó i de provisions.

» L'expedició ha de marxar el dissabte cap a l'Antàrtic. La formen, en conjunt, vint-i-set omes i dotze goços.»

Un senzill comentari:

Si 'y águés agut, en el navili japonés, un ome, *un sol*, coneixent l'Esperanto, tota dificultat auria desaparegut, perquè sabut es que d'esperantistes fervents no 'n manquen a Nova Zelanda.

Generalitzem i diguem:

Si 's trobés, a bord de cada bastiment, almenys *un* esperantista, ¡quants inconvenients greus, dubtes llastimosos, perdues de temps enfadoses, en les comunicacions amb terra i amb navilis de nacionalitats diferents, s'evitarien!»

Afegim: Fins *una sola* claueta d'Esperanto seria suficient, car tots sabem que elles poden ésser usades amb fruit pels no esperantistes.

Companys: la «Marista Komisiono» de K. E. es l'encarregadà de començar a fer desapareixer semblants inconvenients. Ajudeu-la: un petit esforç cada mes per part de cadaú pot fer que aviat, en cada navili, no falti l'*un* esperantiste que tanta propaganda 'ns podria fer. ja que continuament, i mercès ad ell, se solucionarien difícils situacions. — E. P.

★ ★ ★

KORESPONDADO

Dro. B., Moncada: Tre koran dankon. — Sro. J. Vidal, Reus: Mi gojas scii pri vi. Dankon; mi akceptas. — Sro. Ventura, Terrassa: Dankon. Mi respondos ĝiatempe pri la dua afero.

Reglament de la Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer. — Queda constituïda amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon. — L'objecte de la «F. C. d'E.» es l'unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin als esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

Art. tercer. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un Reglament especial interior publicat pel cos de redacció i previa acceptació del Comitè Directiu.

Art. quart. — La «F. C. d'E.» constarà únicament de membres individuals, que contribuiran al seu sosteniment amb la quota mínima de TRES ptes anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grup podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que ls membres individuals.

Adició aprovada en el Congrés de Tarragona. — Els Presidents dels grups adherits formaran un Consell Consultiu de la «Federació», ad el qual podrà dirigir-se el President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en que 'u cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació» sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en lo que fóra de desitjar per a la millor marxa de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

Art. quint. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vic-president, Caixer-administrador de la revista, Vic-caixer-administrador i Secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista.

Art. sisè. — Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son carrec: recollir les quotes dels federats, fer les comunicacions necessaries per als efectes del article segon i demés assumptes del regim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre 'l Comitè Directiu i els seus representants.

Adició aprovada en el Congrés de Tarragona. — Els delegats podran retèner-se, si 'u creuen

convenient, en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

Art. setè. — El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys a vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assamblea o Congrés general, en el qual, previa ordre del dia, se donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà 'l lloc on agi de celebrar-se el vinent Congrés o Assamblea, se nomenaran els individus que agin de formar el Comitè per al següent exercici, i s' discutiran les proposicions que agin sigut presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assamblea, i incloses en l'ordre del dia. Els individus del Comitè podran ésser reelegits tant sols un cop.

Art. vuitè. — El Comitè estarà facultat per crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les Juntes de les quals seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

Art. novè. — Tots els acords de les Assamblees i Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

Art. desè. — Les esmenes que vulguin fer-se en aquest Reglament auran de presentar-se en temps convenient per ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podran ésser discutides i aprovades en les Assamblees o Congressos generals.

Art. onzè. — La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la catalana en les Assamblees.

Art. dotzè. — En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.», els fondos existents, o que resultin de la liquidació, passaran a la «Centra Oficejo», domiciliada a París, per a la propagació de l'Esperanto.

Article transitori. — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Sabadell, carrer de Gràcia, 12.

Per la Comissió Organitzadora: Domenech Serdà, Joan Piferrer, Antoni Martí, J. Camps, Agustí Badia, Santiago Puigbonet i Joan Romeu.

Aprovat, en data del 14 de febrer de 1910, pel senyor Governador Civil de Barcelona.

Hi ha un sagell que diu: *Gobierno Civil de la Provincia de Barcelona.*

Kolekto de lernolibroj

Katalunaj kaj Kastilaj

	Ptas.
<i>Fundamento de Esperanto</i> , L. L. Zamenhof (Eldono hispana) . . .	1'25
* <i>Gramatica rahunada de la llengua Esperanto</i> , Sro. Pujulà i Vallès.	2
* <i>Vocabulari Esperanto-Català</i> , Sro. Pujulà i Vallès.	3
* <i>Vocabulari Català-Esperanto</i> , » » »	3
<i>Poŝvortareto Esperanto-Català i Català Esperanto</i> , Sroj. Dro. Bremon, Marti i Aldrich	0'75
<i>Kataluna Ŝlosilo</i>	0'05
<i>Quiere V. aprender Esperanto?</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau . . .	0'50
<i>Gramática y Vocabulario Esperanto</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau.	3
<i>Vocabulario Esperanto-Español</i> , Sro. F. Pujulà i Vallès	3
<i>Vocabulario Español-Esperanto</i> , » » » »	3
<i>Primeras lecciones de Esperanto de Th. Carl</i> , A. L. Villanueva . . .	0'60
<i>Manual y Ejercicios de la lengua Esperanto</i> , Inglada-Villanueva. . .	1'50
<i>Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto</i> , Inglada-Villanueva	5
<i>Curso Práctico de Esperanto</i> , Duyos-Inglada	3
* <i>Gramática de Esperanto</i> , Sro. J. Garzon Ruiz	2
<i>Prontuario de Esperanto</i> , » » »	4
<i>Programa d'Esperanto</i> , J. B. Albiñana	0'25
<i>El Esperanto al alcance de todos</i> , Fernando Soler y Valls.	3

Tiujn verkojn oni povas mendi ĉe nia administracio sendante kune la monon, plus 0'25 pojn. por la rekomenditaj poŝtelspezoj.

* Bindita 0'50 ptes. plie.

ATENTU

Ĉiu bona Esperantisto devas havi la belan portreton de nia Majstro, silke teksita ĉe la Industria Lernejo de Sabadell.

Tiu portreto estis donacita al Dro. Zamenhof, okaze de la V^a Kongreso en Barcelono, kaj estas la plej simila al Li el la faritaj ĝis nun.

Ĝi estas ricevebla kontraŭ 1'20 Sm. senditaj al nia administracio.

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDACIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
BARCELONA (HISPAJUJO)

Redaktoro :
Frederich Pujulà

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *VIII^a Universala Kongreso Esperantista* (3^a cirkulero), La loka organiza Komitato. — *Grava Avizo*, K. E. — *La Simbolaj Brulaĵoj*, Angel Novejarque. — *II^a Literatura Konkurso* (Eksterordinaraj temoj), La Komisiono. — *Katalunaj efemeridoj*, K. E. — *Enlanda Movado*, Delegitoj. — *Bibliografio*, Tamen.
Korespondado, K. E.



JARO III^a

APRILIO 1912^a

N^o 4 (25)

Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al "Kataluna Esperantista Federacio"

Esperanta Semo.	Sabadell
Nova Semo	Reus
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto.	Barbarà del Vallès
Olota Stelo	Olot
Lumon.	Terrassa
Casino del Comercio	»
Esperantista Junularo.	»
Esperanta Juneco	Barcelona
La Rondo.	»
Esperanta Fako (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Giam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Frateco	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo.	»
Unió Catalanista	»
Novan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo.	»
Evolucio	»
Universala Frateco	»
¡Supren!	»
Esperanta Aŭroro	»
Esperanta Racionala Grupo.	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto.	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvofalo	Ripollat
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Laboro Esperanta	Vilanova y Geltrú
Esperantista Grupo.	Mataró
Kampero	S. Perpetua de la Moguda
Frateco	Vendrell
Esperantista Amikeco.	Manlleu
Esperanta Amo.	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Esperanta Amikaro	Banyolas
Ilerda Espero	Lleyda
Frateco	S. Feliu de Guixols
Gerona Esperantista Ligo	»

Tot l'Esperanto en una fulla

Edició de la «K. E. F.». A 50 centims el cent. Fulles insustituibles per a la propaganda en vetllades, excursions, etc.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

REDAKTORO:
Frederich Pujulà

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO: *Pri...*, Fred. Pujulà. — VIII^a *Universala Kongreso Esperantista* (3^a cirkulero), La loka organiza Komitato. — *Grava Avizo*, K. E. — *La Simbolaj Brulaĵoj*, Angel Novejarque. — II^a *Literatura Konkurso* (Eks-terordinaraj temoj), La Komisiono. — *Katalunaj efemeridoj*, K. E. — *Enlanda Movado*, Delegitoj. — *Bibliografio*, Tamen. — *Korespondado*, K. E.

PRI...

ANYORAR

MIAN opinion mi diris en du fojoj. Unue en miaj vortaroj katalunaj; due en la noto, kiun mi aldonis al la artikolo de Sro. Martorell, korektante la aserton, ke *bedaŭri* estas francismo ĉar, laŭ li, *anyorar* = regretter.

En miaj vortaroj mi diris:

Anyorament = nostalgio.

Anyorar = bedaŭri : sopiri (pri, pro, al); havi nostalgion. (Eble mi devis diri «senti nostalgion» aŭ tute simple «nostalgii».)

Nostalgio = *anyorament*, *nostalgia*.

Bedaŭri = (2^a senco) *anyorar*.

Mi konsentas do principe kun Sro. K^o Huecas. Kompreneble, ni ne povas uzi saman vorton por esprimi ĉian nuancon de la vorto *anyorar*. Sed, ni ne bezonas novan vorton. En katalunà lingvo same oni *anyor*-as fazeolojn¹, kiel patrinon, amàtinon, landon, k. t. p.

1) Nacia legomo.

Esperante, ni ja povas *bedaŭri* la legomojn nehavataj, *sopiri pri* aŭ *al* patrino, amätino, lando; senti, havi *nostalgion*. Ni eĉ povas *sopiri pro*, ĉar sopiro, krom la unua senco, havas duan, kiu korespondas ĝuste al nia «*sospirar*». (Vidu Vortaro de Kabe. Vidu «Patro kaj Filoj» de Kabe, «la sopiremaj fraŭlinoj».) Ĉu tiu riĉeco ne sufiĉas? Ni eĉ povas diri «ĝi suferas sopiron» (*Folioj de la Vivo*, p. 45. A. Sabadell), (kiom ĝusta ĉi tie la vorto nostalgio!) ĉar oni povas supozi, ke intence ni forigis la prepozicion por rekte traduki la strangan esprimon de Rusiñol *sofria una anyorança* (eble *patia d'anyorament*). Ni havas ankoraŭ alian vorton. Mi ĝin montris en mia noto, kaj mi intence ne diris de kiu aŭtoro mi ĝin pruntis. Ĝi estas la vorto *ennui*, kaj ĝia aŭtoro, Dro. Zamenhof, kaj la libro en kiu ĝi troviĝas, la *Fundamento!* «Enuo je la patrujo», kion povas signifi, se ne *anyorament de la patriä!*

Mi estas certe, ke Sro. Grau, konante la fonton de tiu vorto, kaj la argumenton, kiujn mi diros jene, tuj modifos sian opinion pri ĝi.

Mia noto gajnis al mi lecioneton de Sro. F. el Olot, kiun mi profitos, respondante al li, por klarigi kelkajn punktojn de la demando.

Sro. F. diras al mi ke la rekta traduko de *s'ennuyer* en kataluna lingvo estas *aburriŝe, fastiguejarse*, ke *anyorar* = *regretter*, sed **NE-NIAM** *s'ennuyer*.

Nia samideano terure konfuzas la vortojn katalunajn, kaj la duan eĉ trian, eĉ metaforan sencion de la vortoj kun ilia unua ĝusta senco. Li certe tro fidis al komuna vortareto, certe hispana, ĉar ne ekzistas vortaro Franca-Kataluna krom vortaro de Littré. La duobla traduko erarigis lin. Efektive, *fastiguejarse* = *se dégouter de*; kaj *aburriŝe* (de *ab-horr-erre*) nur metafore povas havi tian sencion. En kelkaj vortaroj katalunaj, ĝi eĉ ne troviĝas; kaj en tiu de *Labernia* aperas kun tre stranga senco («sin doni spite al laboro, aŭ ago!»). Kompren-eble *aburriŝe* signifas «havi malamom, malŝaton (*avoir' en horreur*), delasi laboron de komencita verko; ekmaltimi (*aburriŝe l'aigua*), kaj fine ĝeni, lacigi». Ĉu sinjoro F., kies nomo montras katalunon, neniam uzis nian vorton *enutjar*. Tamen! Tamen, li povus trovi en vortaro de Littré apud *ennui* = *Provençal: enueg, enuet, enuey*, k. t. p.; *catalan: enutg*, kaj apud *ennuyer* = *Provençal: enoiar, enujar*, k. t. p.; *catalan ancien: enojar, ennujar*; *catalan modern: enujar*. Li vidas, kiel rekta traduko de *s'ennuyer* ne estas *aburriŝe, fastiguejarse*, sed tute simple *enutjarse*. (Se li estas hispana, li vidu hispanan vorton *enojar*, kiu en Ameriko signifas kolerigi!)

Lau li *anyorar* = *regretter*. Pri la etimologio de vorto *regretter* ne samkonsentäs ĉiuj aŭtoroj. Sed ĉu Sro. F. ne konas la familion de

katalunaj vortoj : *greu, greuge, greujar, greument* (*de mala gana*), kies portreto nur, jam divenigas iliajn francajn parencojn? Eble etimologistoj longe povos diskuti ĉu eble aŭ neeble *t* korespondas al *u*, ĉu *greu* korespondas al *grée*, ĉu *regretter* venas aŭ ne de *grée*; sed fakte, la diron *ce qu'on donne aux mechants toujours on le regrette* oni tradukos katalune ne uzante *anyorar*, sed tiel: *Lo que 's dona als dolents sempre sab greu*, kaj la diron *je regrette l'argent perdu* = *me sab greu el diner perdut*, kaj la diron *faire quelque chose à regret* = *fer qualche cosa greument*. Nu! Ĉu kiam mi *regrette* (*ne pas être dans*) *ma patrie*, mi ne *me sab greu* (*no ésser en*) *ma patrià*?

Ni vidu nun, ĉu *anyorar* neniam estas *s'ennuyer*.

Anyorament = Nekvieteco, ĉagreno por la manko de io... (Labernia).

Ennui (1^a senco) = Turmento de la animo kaŭzita de la morto de amataj personoj, de ilia foresto, de la perto de esperoj, de iaj grandaj malfeliĉoj (Littré).

Nu! Eĉ la difino de Littré estas pli bona por *anyorament*, ol tiu de Labernia!

Ĉu tio ne sufiĉas? Ni vidu, do, eĉ ne atentante al tio, ke la grafikajoj de la vortoj mem jam montrás ilian parencecon, la etimologion. (Ni rimarku ke la ortografio de *enutg* estas nebona; ke la bona estas *enuig*, kiu donas al ni *enutjar* ĉar sono *ig=tj=g*). Ni scias ke *anyorar* venas de lat. *ang-or*, pòst aliformigo de *g* en *y*, kiel en *agnus* = *anyell*.

Nu, en la «Granda Enciklopedio» estas dirite:

Ennui = ...ĝi estas la *ennui*, kiun kantis Lukrecio en la famaj versoj : *Medio de fonte leporum surgit amari aliquit...*

Kaj kiel Sro. F. scias, la famaj versoj daŭras : *quod in ipsis floribus* ANGAT. Ĉu oni ne rekonas tiun *angat*, el *ango*, kiu cetere troviĝas en nia Esperanta leksikono kun sia senco = *angoro*? Du aferoj similaj al tria, estas egalaj inter si!...

Littré devenigas *ennui* de *est mihi in odio*, kiu donis substantivon *inodium*! Ne tiel komplike estas, opinii, ke nia *anyorar* estas formo de niaj antikvaj provencaj kaj katalunaj *enoiar, enuiar, ennujar*, k. t. p.! kiuj permesas al ni fari de *s'ennuyer de* = *anyorar*, de *s'ennuyer* = *anyorarse* kaj de *ennuyer* = *enutjar*?

Ni rimarku ke la netransitiva formo de *anyorar*, *anyorarse*, jam tute nur signifas «sin trovi malbone en iu loko!» Tio estas : *s'ennuyer*!

Sinjoro F. vidas, kiel mia noto ne estis erara, aŭ almenaŭ nepripensita.

Nun, mi korektus miajn vortarojn, kaj apud *anyorar* mi skribus unuavice «enui je» sekvante nian Majstron. Ni uzu laŭvole bedaŭri,

sopiri, nostalgii, kaj ni estu certaj, ke Dro. Zamenhof sciis kion li faris uzinte la Fundamentan formon. Krom la valoro etimologia de «enui» (ne konfuzu kun «tedigi»), ĝi havas la valoron de «je» tuta klara en tiu okazo. Kaj se iu deziras esti tre, tre preciziga, li diru «angordon», «angori», terura esprimo, kiu kontentigos la puristojn sciantajn, ke latina *ango* = ĝeni, sufoki, kaŭzi fizikan doloron, kaŭzi moralan doloron, turmenti, malkvietigi, k. t. p. Mi ne uzos ĝin!

Karaj amikoj, kaj nun mi revenas al la partianoj de nova radiko, nia kataluna lingvo estas aminda. Ĉu mi bezonas diri mian amon al ĝi? Sed estu certaj, ke ni «ne elpensis la pulvon» Vidu la *morrinha* de galicianoj!¹

— Ĉu vi iam havis okazon kunvivi kun ili en malproksima lando? Mi, jes. Ili fakte, materie mortas pro enuo je la patrolando. Mi kunvivis ankaŭ kun katalunoj for de la ombro de nia Montserrat. Mi certigas ke ili eĉ ne bezonas la vorton «nostalgio»!... Nu, mi diru inter krampoj, ke laŭ mia opinio, tio ne estas malsupera kvalito!

MANKOSENTI, kion signifas? Ĉu senti la mankon? Tute nel! Ĝi signifas, se ĝi signifas ion: «manke senti». Komparu kun aliaj transitivaj verboj: Bastonfrapi, piedfrapi, manskribi... Mi scias ke oni kutime diras esperante «vangofrapi», sed tio certe estas ĝentila diro, kiu supozas ke la jam sufiĉe ofendita, frapis li mem per sia vango nian manon. «Ofte la ludistoj de piedpilko vangofrapas la pilkon», sed la pilko, ĝi vangonfrapas. Intence mi uzis tiun formon en mia februara artikolo. Ĉu vi konsentas?

FRED. PUJULÀ

La samideanoj el Terrassa timas ke la III^a Kongreso de «K. E. F.» havos aspekton de ekzercoj de Ruĝa Kruco. Ili estas konvinkitaj, ke la Prezidanto kaj Sekretario de la Federacio kaj la Redaktoroj de K. E. kaj de la E. R. de *La Publicidad* ne povos ĉeesti la kongreson tutaj, aŭ almenaŭ kun malrompitaj korpoj. Efektive, de post kelkaj tagoj, tiuj sinjoroj freneze sin donis al malstariga sporto, kaj radglitas senhalte kaj ronde kvazaŭ ili elĉerpas akvon per hipoteza elĉerpilo. Sro. Bremón kaj Pellicer ruladas sufiĉe bone, ĉar ili ne nur ruliĝadas per la radoj sed ankaŭ ofte per la tuta korpo. Sro. Pujulà mirigas la ĉeestantojn ĉe la kunrulo per sia grandioza prudento. Laŭ li, ne virto staras en la mezo (de l' glitejo) sed malstaro. Kiel li bedaŭras ne esti multbraka hinda statuo por sin teni pli bone je la muroj! Sroj. Bremón kaj Pellicer kelkfoje kuraĝas desegni S-ojn kaj 8-ojn. Sro. Pujulà opinias, ke ne estas necese desegni ĉifrojn sur la glitejon, ĉar kvazaŭ sur ĝi jam estus

1) *Galicia* okcidentnorda gentlando en Iberio kun aparta lingvo! Kia maniere diri por ne konfuzi kun la lando de la Oka?!

desegnita la akuzativo *n* ĉiu movo de li farata finiĝas kun li nepre sur la asfalon. Same okazas al Sro. Dalmau. La Redaktoro de la «Rubriko», kiel bona kataluno, konfuzas rubrikon kun parafo, kaj ofte parafo per sia tuta korpo.

La samideanoj el Terrassa, timas; sed la plej malfeliĉa en ĉio ĉi estas nia kara samideano Sro. Codorniu, kiu rigardas la spektaklon de la galerio de sia domo. Li ja fine aŭ krevos de rido aŭ akiros anevrismon pro la ektimoj!

Kion intencas niaj pioniroj, ĉu efektive kripligi sin, ĉu veturi per tiaj ŝuoj al Krakovio, ĉu prepari varietcon por la Kongreso?! Pioniraj misteroj!!



VIII^a Universala Kongreso Esperantista

Krakovio, 11-18 Aŭgusto, 1912

TRIA CIRKULERO

Fervoja rabato. — La klopodoj de la Komitato ĉe la Ministro por fervojaj aferoj ne restis sen sukceso. La ministerio konsentis doni al la kongresanoj rabaton sur ĉiuj aŭstriaĵaj ŝtataj fervojoj dum unu semajno antaŭ la Kongreso kaj unu semajno post la Kongreso. Ĉar la Komitato deziras ricevi ankoraŭ pli favorajn kondiĉojn, ol tiuj, kiujn la registaro jam donis, ĝi faras plujn klopodojn en tiu rilato.

Vegetarana restoracio. — Konsiderante la fakton, ke inter la esperantistoj troviĝas sufiĉe multaj vegetaranoj, la Komitato faris kontrakton kun vegetarana restoracio, kies mastrino kaj servistaro parolas Esperanton.

Interesa ekspozicio. — La «Landa Industria Ligo», en Galicio, instigita de la Komitato decidis konatigi la kongresanaron kun tre originalaj nenie aliloke renkonteblaj produktoj de pola hejma industrio. Tiucele la Ligo aranĝos speciale por la kongresanoj, konforman ekspozicion kun klarigoj, informoj, surskriboj, k. t. p., en Esperanto. La direktoro de la citita Ligo, Sro. Krzaczynski, mem studas nian lingvon, dezirante fari dum la Kongreso lumbildajn paroladojn en Esperanto.

Distraĵoj. — La Krakova «Teatro de Novaĵoj» preparas esperantan prezentadon kun gaja varietea programo. Ne mankos do humorplenaj monologoj, kupledoj kaj burleskaĵoj — ĉio kompreneble nur en Esperanto — ĉar la direktoroj de la teatro, Sroj. Polenski kaj Pilarski, intence lernas nian lingvon kun sia tuta personaro.

Mazepe. — Ĉiu persono intencanta veni Krakovon mendu tuj ĉe la Organiza Komitato tiun belan dramon. Ĝi estas ricevebla por la sumo de K. 2, krom poŝtelspezoj.

Literatura konkurso. — La Komitato decidis rompi la ĝisnunan tradicion, kiun oni povus jene karakterizi : Multaj konkursoj, malaltaj premioj. — Tute kontraŭan metodon aplikis la Oka : Oni starigis nur tri konkursojn kun altaj premioj. — La temoj estas :

I. Prozaĵo beletristika.

II. Poeziaĵo.

III. Scienca disertacio.

Oni vidas, ke la temoj estas tute ĝenerale difinitaj kaj lasas al la verkistoj grandan liberecon. Detaloj estas troveblaj en la marta numero de *Pola Esperantisto*, al kiu la Komitato konfidis la organizon de la literatura konkurso.

Fakaj kunsidoj. — Ĉiuj fakaj societoj, intencantaj aranĝi dum la Oka siajn kunsidojn, estas insiste petataj komuniki al la Komitato siajn dezirojn, ĉar oni devas rezervi al ili necesajn ĉambrojn. La lasta neprokrastebla templimo por tiuj avizoj estas la 1^a de Majo.

Suplementaj kartoj. — Oni malkomprenis la regulon pri suplementaj kartoj. *Ne* ĉiuj familianoj *kune* pagas sm. 3, sed ĉiu aparte *pro* sm. 3.

Propraj nomoj. — Plenigante la aliĝilojn oni ne esperantigu la nomojn de la urbo, strato, sia nomo, k. t. p., ĉar tio estas tute malĝusta kaj kaŭzas konfuzon ĉe la poŝto, kiam la Komitato skribas al la aliĝintoj laŭ simile redaktita adreso.

Tabelo de distancj. — El multego da urboj ni ricevas riproĉojn, ke ni konsideris tiujn urbojn en nia tabelo. Se ni volus en la tabelon enmeti ĉiujn urbojn, en kiuj estas esperantistoj ni devus eldoni dikvoluman libron. En la tabelo ni konsideris ne la naciajn aŭ esperantistajn, sed nur la fervojajn centrojn.

Alvoko. — Ni insiste petas, ke per frua aliĝado oni helpu kaj plifaciligu la laboron de la Komitato. — *Loka Organiza Komitato.*



GRAVA AVIZO

Nia atestimata samideano Sro: G. H. Backman (adreso : Helsingborg, Suecia) sciigas al ni, ke okaze de propono ĵus prezentita al la Sveda Parlamento por estigo de Delegitaro por *kreado* de internacia lingvo, la sveda esperantistaro decidis protesti per cirkulero sendota al ĉiu parlamentano, kiu montrus ke tiu lingvo jam ekzistas en *Esperanto*. Por apogi la argumentojn, ili intencas kunsendi kun la cirkulero kiel eble plej multe da esperantistaj presajoj. Tial li petas ke ĉiu samideano sendu al la adreso supre montrita gazetojn, broŝurojn, reklamilojn komercajn, gvidilojn, k. t. p.

Ni esperas ke la Prezidanto de niaj grupoj atentos tiun gravan peton kaj helpos niajn svedajn samideanojn. La «K. E. F.» jam sendis kolekton de K. E. kaj aliajn presajojn.

VALENCIAJ MOROJ

LA SIMBOLAJ BRULAĴOJ

: : : : : (LES FALLES) : : : : :



VALENCIO, tute eble la plej festema urbo el Hispanujo (la lando de la suno) konservas de antikve kuriozajn festmorojn. Tiuj festoj, kvankam ili ne estas dediĉitaj al scienco, tamen okazas oportunte, kvazaŭ ili estus elpensitaj por festesigni kelkajn rimarkindajn punktojn de la tera astrovojo dum la traĵiro de nia planedo.

Sub deziro de mia karega direktoro Sro. Pujolà mi penos laŭscie priskribi al la legantoj de KATALUNA ESPERANTISTO la *Simbolbrulaĵojn de Sankta Jozefo* en Valencio. Ĉi tiuj okazas dum 18-20^a tagoj de Marto; sekve oni povas titoli tian feston la «Eniro en la Printempon».

Efektive, tiu festo okazas proksimume, kiam la suno transiras la ekvatoron, tial ĝi estas por la valencianoj kvazaŭna trumpeto, kiu adiaŭas la vintron kaj malfermas al ni la belsezonon «Printempo».

Les falles de Sen Xusep (La simbolbrulaĵoj de Sankta Jozefo), konsistis antikve nur el la bruligo de la lignaj forĵetaĵetoj, efektivigita de la lignajstoj por honori sian patronon Sankta Jozefo (la 19^{an} de Marto), kaj ankaŭ por festi la finon de la subarteluma vesperlaborado, dum la noktlongedaŭra sezono.

Post kelka tempo, oni enmetis tiujn lignajn restaĵetojn en homvestojn kaj alpendigitaj de balkono al balkono meze de la strato ili restis tiele dum la tago ĝis la ekvesperiĝo, kiam tiuj estis bruligataj kun granda kriego kaj gajo de la ĉeestantoj.

Post paso de kelkaj jaroj, tiaj figuroj jam prezentis moke kaj simbole personojn kaj scenojn el la reala intima vivo de la strataj genajbaroj; figuroj, kiujn oni starigis sur tabularan piedestalon, kaj same kiel iliaj estintaj, tiuj estis bruligataj ekvesperiĝe.

En tiaj scenoj, inspiritaj sub la privata vivo el iaj cenzurindaj genajbaroj, kelkafoje estis tro travidebla kaj akra ĝia signifo, pro kio la aluditaj personoj ofenditaj, tiam renversis la tabularon kaj kaŭzis malpacojn.

Jaron post jaro la simbolaj brulaĵoj estas pliarte konstruataj kaj la festo okazas nuntempe sub la jena ordo kaj maniero.

De la komenco de la monato Marto la knaboj el la stratoj, kie estas starigota la brulaĵa tabularo trairas la stratojn de la kvartalo trenante eluzitan mateton entuziasme kriegante la popolan rekantadon *Una estoreta vellela pera la falla de Sen Xusep, el tio Pep* (Unu

eluzitan mateton por la brulaĵo de Sankta Jozefo, la Onklo Joĉjo ¹⁾). Ili kolektas tiamaniere sur la mateton bruligindaĵojn, kiujn la najbaroj liveras al ili, liberigante la domojn de forĵetindaj eluzitaĵoj. Tiele daŭrigas la knaboj sian amuzan kolektadon ĝis la antaŭvespero de Sankta Jozefo, en kia tago, ĉiujn kolektaĵojn oni enmetas internen de la tabularo por taŭgi kiel brulaĵo.

Dume la najbaroj de la stratoj, kie estas starigota la simbola brulaĵo, elektas komitaton, kiu aranĝas kaj pretigas la necesajn antaŭlaborojn; kolekti helpmonon, kiun oferdonas la najbaroj, projekti kaj skizi argumenton, konstrui la tabularon, k. t. p.

La 17^{an} de Marto noktomeze komenciĝas la starigo de la tabulara piedestalo kaj figuroj, kies karikatura kaj groteska argumento konsistas prefere el aktualaĵoj; strataj kaj politikaj (urbaj kaj naciaj) aferoj, kiuj tiatempe ial priokupas la publikopinion.

Samtempe alian artvidiĝon prezentas tia Valencia festo. Ĉe la pordo de la likvortrinkejoj staras granda laŭro de kies branĉoj pendas multenombraj kringoj ornamitaj per ruĝaj kaj flavaj rubandoj.

Tia strangaĵo anoncas ke en la trinkejo ankaŭ oni liveras kringojn ĵus faritajn. Efektive, ĉe la cnairejo, antaŭ multentenebla kaldrono da bolanta oleo staranta sur fajro sidas virino festevestita, kun la manikoj falditaj ĝis la kubuto kaj blanka antaŭtuko; ŝi senĉese brogas kringojn, kiujn ŝi trempas en grandan apudestaran argilvazon.

Tiu kaldrono estas kvazaŭa parfumvazo, kies oleodora fumo densigas la atmosferon de la placo kaj stratoj.

La starigo de la simbola tabularo daŭras gaje inter la konstruantoj ĝis la ektagiĝo (antaŭtago de Sankta Jozefo). La fino estas anoncata al la najbararo per gaje surdiga sonorado, kiun ordinare ludas vilagana muzikistaro kaj ankaŭ per tamburado, marokflutado kaj kelkokaze per eksplodoj de piroteknikaĵoj. Tia infereca bruegado vekas la genajbarojn, kiuj sin pretigas por ornami la balkonojn, fenestrojn kaj pordojn per centojn da flagetoj kaj aliaj drapiraĵoj multekoloraj ŝajnigante la stratojn flagornamitaj ŝipoj. Estas nepra eco esti valenciano por tutkompreni la gajecon, kiu regas dum tiaj festotagoj en mia naskiĝurbo.

Frumatene, antaŭ la suneliĝo la simbolbrulaĵojn komencas viziti la popolamaso, kiu en tiuj matenhoroj konsistas el oficistoj, servistinoj, metiistoj, studentoj, geknaboj, lernantoj kaj aliaj, kiuj ial estas devigataj eliri frue el siaj hejmoj, kaj ankaŭ el sempacienculoj,

1) En Valencio oni nomas onklo iun ajn sinjoron, kaj ofte, kiel en tiu ĉi okazo, la esprimo estas ŝerca.

kiuj deziras admiri kiam eble plej frue la spritajn verkojn el la konstruintoj. Tiuj frumatenuroj havas okazon vidi la simbolaĵajn argumentojn plej komplete, ĉar iom poste la urbestroj ekzamenante vizitas la simbolaĵajn bruelaĵojn kaj ordonas forigi, aliformigi aŭ forstreki ĉiajn objektojn, kiaj tro klare ofendas la personojn aŭ instituciojn simbole aluditajn.

Dum la tuta tago kaj ankoraŭ plinombre la sekvantan (tago de Sankta Jozefo) estas vizitataj la simbolbrulaĵoj. El ĉie alkuras multope la promenantoj kaj ĉirkaŭas la tabularon. De la proksimaj vilaĝoj ankaŭ alvenas granda popolamaso. kaj la vilaĝanoj restas antaŭ la tabularo kun la buŝo larĝe malfermita rigardante la figurojn, precipe tiujn, kiuj moviĝas per artifikaj risortoj.

Ĉirkaŭ la tabulara piedestalo knabetoj vendas klarigbroŝuretojn kriegante senĉese: « *Cinc centims val el llibret, en la relació y explicación de tot lo que conté la jalla* ». (« Kvin centimojn kostas la broŝureto kun priskribo kaj klarigo de la surstaranta sceno. ») Sur la flankoj de la piedestalo estas surgluitaj versaĵoj kaj hieroglifoj, kiuj iom vualite montras la signifon de la simbole prezentata sceno.

Intertempe, sur tabularo starigita proksime de la brulaĵo kaj ornamita per drapiraĵoj, la antaŭcivita muzikistaro ludas muzikpecojn.

Samtempe en proksima likvortrinkejo kaj kringofarejo la vizitantoj englutas kringojn kaj trinkas likvorojn, prefere brandon. Kompreneble el tiuj ejoj ofte eliras drinkuloj, kiuj, per siaj groteskaĵoj gajigas la publikon. La kringo estas frandaĵo, kiun tiatempe tre ŝatas la valencianoj.

Antikve la simbolbrulaĵoj estis senartaj verkoj, sed iam post iam fariĝis nuntempe tiel artplenaj, ke la urbestro kaj ankaŭ kelkaj societoj liveras premiojn al tiuj plej arte konstruitaj. Al plej sprite verkita klariga broŝureto ankaŭ oni aljuĝas premion. Tial la juĝantoj de tiaj korporacioj vizitas la simbolbrulaĵojn kaj disdonas la premiojn, kiujn oni fiksas tuje sur la piedestalon por montri al la publiko la rangon atingitan, laŭ la juĝistoj.

Tiamaniere daŭras la gajeco la 18^{an} kaj 19^{an} de Marto (iam ankaŭ la 20^{an}). Oni povas aserti ke ĉiuj simbolbrulaĵoj estas vizitataj de la plimulto de l'valencianoj.

La nombro da starigataj brulaĵoj dependas jare de la tiama bonhumoreco de la organizantoj. Kelkajn jarojn pro malfeliĉaj cirkonstancoj, aŭ oni malpermesis la starigon aŭ mankis gajeco en Valencio por organizi ilin.

La vespero de la ekbruligo antaŭ kiam alvenas la difinita horo,

jam la senpaciencema publiko komencas kriegi petante la ekbruligon : «¡Fuego!» («Fajron!»). Je la difinita horo la ekbruligantoj surverŝas petrolon en la tabularon kaj ĝin ekbruligas kun varma ĝojo de la ĉeestantoj, kiuj aplaŭdas entuziasme la bruliĝon de ĉia figuro kaj simbolobjekto, dum la muzikistaro ludas la lastan muzikaĵon. Kiam jam restas malmulte da brulaĵo, la knaboj aljetas sur la fairflamon raketojn, kiuj eliĝas lasante post si fajreran postsignon kaj bruege eksplodante en la aero. Ĉi tiu marokeca kutimo forpelas la ĉeestantojn iom rapidpuŝe. Restas tiam nur la knaboj, kiuj finas la feston diable transsaltante unu post alia super la fajrflamon, ĝis la lasta fajrero estingiĝas.

Laŭ la priskribita maniero disvolviĝas la *Valencia Sankta Jozefa Brulaĵmoro*, kvazaŭa ŝlosilo, kiu malfermas al la valencianoj la pordon de la belega, amindumiga kaj viviganta sezono LA PRINTEMPO !!...

Angelo NOVEJARQUE

Valencio, 1912.



II^a Literatura Konkurso

Eksterordinaraj temoj (Sekvo)

XIII. De la «Casino del Comercio», de Terrassa. Laŭvola temo (originala). Premio : Artajo.

XIV. De la Urbestra moŝto de Terrassa. Laŭvola temo (originala). Premio : Artajo.

XV. De la Urbestro de Terrassa. Laŭvola temo (originala). Premio : Artajo.

XVI. De la Direktoro de la gazeto *La Comarca del Vallés*, de Terrassa. Temo : *Graveco de la esperantista gazetaro*. Premio : *Historio de la Kataluna lan-industrio* (2 verkoj de la sama direktoro), *Urbo Egava* kaj senpaga jarabono al *La Comarca del Vallés*.

XVII. De «Vika Esperantistaro». Al la plej bona traduko de verko de Vika verkisto. Premio : 25 ptoj. (10 sm.).

XVIII. Afable kaj propramove proponita de «Universala Esperantista Asocio». «Praktika signifo de U. E. A.». Premio : 5 sm.

Noro. — La konkursoj al la premioj XIII, XIV kaj XV, bonvolos aldoni noton, klarigante al kiu el ili, ili aspiras.

Al la temo XVII : Estos konsiderata kiel verko : artikolo, versaĵo, prozaĵo aŭ ia ajn fragmento havanta unuecon. — *La Komisiono*.

Katalunaj efemeridoj

APRILLO

- 1 1911. — La ĵurnalo *Las Circunstancias*, en Reus, malfermas Esperantan Fakon en siaj paĝoj.
- 9 1910. — Edziĝas en Barcelono niaj blindaj gesamideanoj Fino. de Chalmot (holandino), kaj Sro. Sapater (kataluno).
- 19^a 1908. — Solena Esperantista Festo en Sabadell, kun ĉeesto de ĉiuj katalunaj grupoj. Aplaudegata parolado de la Prezidanto pri la «Kataluna Esperantista Federacio».
- Vizitas Barcelonon Sro. Dro. H. W. Jemans, M. D. Prezidanto de la «Esperantista Asocio de Filipinoj».
- Fondo de la grupo «Ĉiam Antaŭen», en Clot.
- 2 Paroladoj en Barcelono de la usonano Sro. Maro B. Jones, profesoro de la Universitato de Cleveland pri *La Instruado en la Nordaj Ŝtatoj de Ameriko kaj Usono kaj ĝiaj homoj*.

ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Kun granda sukceso funkciadas en la Universitato la kurso de Esperanto klarigata de nia kara samideano Dro. Pastro J. Coll. Pli ol 25 gelnantoj ĉeestas la klason, kiu baldaŭ fariĝos supera pro la granda progresado atingita per klera profesoro kaj fervoregaj gestudentoj.

Nia laborema kaj aplaŭdinda samideano Delfi Dalmau, la Direktoro de la «Esperanta Rubriko» de la ĉiutaga ĵurnalo *La Publicidad*, tre sukcese organizis serion de paroladaroj, kiuj altiris la publikan atenton ĉar ili estas anoncigitaj kaj faritaj tute kiel la politikaj kunvenoj ĉe ni nomataj *meeting*'oj. Ne plu disertacio po kunsido, sed multaj oratoroj po kunveno, flama paroloj, kaj libera tribuno. Post ĉiu parolinto, la prezidanto invitas la ĉeestantojn okupi la tribunon kaj kontraŭparoli. La invito al la publika diskutado estas ankaŭ farita per la ĉiutagaj ĵurnaloj de Barcelono. Ĝis nun, neniu ankoraŭ paroladis kontraŭ, kun granda bedaŭro de la oratoroj, sed kun ĝojo de la samideanoj, kiu konvinkigas ke nia ideo povas havi indiferecentulojn ĉe ni, sed ne malamikojn. En tiuj kunvenoj, krom Sroj. Pujulà, Bremón kaj Dalmau, paroladis ankaŭ Sroj. Nin, Rocamora, Albiñana, Serrat, Campdelacreu kaj Grau, kiuj ekaperis en nian rondon kiel plej bonstilaj kaj entuziasmigaj oratoroj.

La kunvenoj havis lokon en la politikaj kazinoj el ĉiu partio laŭ regula *protokola* ordo (Societo de Komercaj oficistoj, Karolista Societo, Naciista Societo de la IV^a Kvartalo, Katalunista Societo de la Urbodoma Kvartalo).

republikista societo sidejo de «Barcelona Stelo, Metiista Ateneo sidejo de «La Rondo», k. t. p.). Por la lastaj kunvenoj, la tramveturiloj de Barcelono *surportis aĵiŝojn!*

Brave al juna Dalmau, kiun ĉiu laborema kaj fervora esperantisto de Katalunujo estimas; estimo, kies esti modesta pruvo la festeno per kiu la pioniroj de Barcelono honoris lin antaŭ du semajnoj.

GERONA

La kursojn en la grupoj «Gerona Esperantistaro» kaj «Amoj kaj Espero» ĉiam ĉeestas multaj gelernantoj.

La fraŭlinoj de «Gerona Esperantistaro», kiel pruvo de amo al Esperanto, donacis, por tiu societo, tre belan standardon. — *La Delegito.*

MANLLEU

La grupo «Esperantista Amikeco elektis la jenan estraron por la nuna jaro: Prezidanto, Sro. Joan Mir; Sekretario, Sro. Gaspar Caballeria; Kasisto, Sro. Miquel Suriñach; Vic-prezidanto, Sro. Felip Guardia; Vic-sekretario, Sro. Joseph Oriol; Membroj, Manel Roca, Jaume Fluvià.

Reĝas granda entuziasmo en nia grupo, tiel ĉe la gelernantoj, kiel ĉe la ceteraj grupanoj. — *La Komitato.*

OLOT

La grupo «Olota Stelo» sciigas, ke de la unua de Januaro ĝi translokis sian sidejon en la Azilon, bieno de nia Urbeŝtaro, unuan etaĝon (salonon de la Olota Biblioteko) malfermitan la tutan semajnon de la 7^a $\frac{1}{2}$ ĝis la 10^a nokte kaj la festojn de la 11^a matene ĝis la 13^a.

Ĝi elektis por sia estraro la jenajn sinjorojn: Prezidanto, Jozefo M. Garganta; Vic-prezidanto, Petro Roqué; Sekretario, Manel Prat; Vic-sekretario, Jozefo Boix; Kasisto, Petro Coscoy; Bibliotekisto, Candido Agustí; Membroj, Amparujó Bassol, Mario Coscoy.

Nia kara pioniro Jozefo Pi, kiu nun loĝas en Germanujo sendis al ni interesajn sciigojn pri la tiea movado. La konata batalanto Pastro Sebastiano Pubill piskolano loĝas nun en Guanabacoa (Habano). Al ili ni deziras bonfarton kaj bonsorton.

La 10^{an} de Marto ni okazigis literaturan kunvenon.

Post paroladoj de kelkaj anoj, Sro. Petro Costa el Sta. Coloma de Farnés, paroletis pri nia afero, kaj internacia lingvo. Sro. Prezidanto fermis la kunsidon parolante longe pri diversaj artefaritaj lingvoj. — *I. Juanola.*

SANTA COLOMA DE FARNES

La stato de Esperanto en ĉi tiu urbeto certigas la konstantan kunlaboradon de la anoj, ĉar ili trafis kaj venkis kelke da kontraŭaĵojn.

Dum la pasinta karnavala tago, nia grupo «Esperanta Idealo» sin regalis per festeto partoprenante en ĝi la knaboj, kiuj deklamis poeziojn esperante, finante la feston en plena sukceso. — *La Delegito.*

TARRAGONA

La grupo «Tarragono Esperanta» elektis la jenan estraron por la nuna jaro: Prezidanto, Domingo Obiol; Vic-Prezidanto, Fulgenci Agusti; Kasisto, Daniel Roig; Kalkulisto, Mariano Alegret; Sekretario, Joseph Albornà; Vic-sekretario, Francesch Gibert; Bibliotekisto, Frederich Agràs; Membroj, fraŭlinoj Teresa Balart kaj Francesca Juan Muntané.

La grupo publicas ĉiudimanĉe de post la 1^a de Januaro «Esperantan Fakon» en la tagjurnalo *La Cruz*. Baldaŭ ĝi publicos alian per alia semajna gazeto.

En la lasta kunveno de gefederacianoj en Tarragona oni elektis Delegito Sron. Domenech Obiol. Post malmulte da tagoj forvojaĝos al Zaragoza por enkorpusiĝi en la tian Regimenton la lerta esperantisto kaj milita kuracisto Sro. Antonio Martin.

Ni tre bedaŭras la forestadon de tiu bona amiko. — *La Delegito.*

TERRASSA

Ĉiuj la ĵurnaloj kaj gazetoj el tiu ĉi urbo, malfermis fakon de Esperanto por montri ĝian internacian movadon kaj por konigi sciigojn pri la organizado de la III^a Kongreso de «K. E. F.».

La Urbkonsilantaro subvenciis la grupon «Lumon» per cent kvindek pesetojn pro la senpagaj kursoj de nia lingvo, kiujn ĝi malfermis.

Por la nuna jaro, la nova direktanta komitato de la grupo «Esperantista Junularo» konsistas el la jenaj sinjoroj: Emil Garriga, Prezidanto; Francisco Puig, Sekretario; Josep Girona, Kasisto; Isidre Llosas kaj Roman Vergés, Voĉdonantoj. La prosperado de tiu ĉi grupeto (sekcio de «Lumon») konsistanta sole el junuloj, ĉiutage pligrandiĝas.

La Pasintan monaton, Sro. Valenti Alavedra (Prezidanto de «Lumon») edziĝis kun la bela kaj simpatia federacianino Irmina Imbers. Ni deziras al la novaj geedzoj multajn feliĉojn.

La komisionoj de la III^a, laboras kun granda fervoro por ke ĝi atingu neforgeseblan sukceson. — *La Delegito.*

VIC

«Vika Esperantistaro». Tiu societo, kiu reorganizis sian taskon, entreprenas veran esperantan laboron. Plie la du kursoj, kiuj estas klarigataj de Sroj. Albagés kaj pastro Ribas, komenciĝis dimanĉaj kunvenoj por la praktikado de nia kara lingvo. La ĉeestantoj kiuj estas multenombraj, siavice parolas per disertacioj, legaĵoj, rakonto de anekdotoj, k. t. p. Ni devas esperi belan rezulton laŭ la entuziasmo kaj la sukceso per kiu ili komencis.

Jen la nova komitato: Prezidanto, Jozefo Albagés; Vic-prezidanto, Francisco Navés; Sekretario, Jacinto Comella; Bibliotekisto, Salvadoro Baliellas; Kasisto; Jozefo Comas; Voĉdonantoj, Mariano Noguera kaj Mikaelo Anglada.

Nuna adreso de la grupo: Argenters, 9, 2^o. — X.

VILANOVA I GELTRÚ

Grupo «Laboro Esperanta». — En generala kunveno okazinta la 31^{an} de Januaro oni elektis la jenan komitaton: Prezidanto, Sro. G. Galcerán; Vicprezidanto, Sro. M. Mas, Sekretarioj, Fino. T. Rosell kaj Sro. M. Vadel; Vicsekretario, J. Pérez; Kasisto, Srino. S. Brillas; Bibliotekisto, Sro. A. Figueras; Voĉdonantoj, M. Galcerán, P. Pascual, J. Escofet, L. Codina kaj M. Vives. Oni decidis en sama kunsido aligi la grupon «L. E.» al «II Congrès d'Ateneus i Asociacions de Cultura», kiu okazos en tiu-ĉi urbo dum la tagoj 21^a, 22^a kaj 23^a de la venonta Majo. — La grupo «L. E.» disvatigis februare 500 «Esperanto en una fulla». — *F. M.*



BIBLIOGRAFIO

Maja nokto aŭ la dronintino. Rakonto el N. V. Gogol; tradukita, el la rusa lingvo, de Romano Frenkel. — Bucuresti. Editura «Esperanto». 5, Str. I. C. Bratianu, 5. — Prezo: 0'50 fr. aŭ 2 respondkuponoj.

Tiun ĉi belan rakonton ni legis en «Danubo» kie poĉapitre aperis: Nia kara amiko Sro. Frenkel montris ankoraŭ per ĝi sian tradukistan talenton. La flua lingvo en ĝi uzita legindigas kaj literaturigas la tradukon. Kelkaj esprimoj ŝajnas rekte tradukitaj de nia kataluna lingvo! Ekz: *mezvoĉe*: a mitja veu; *vi havas alian knabinon*: tens una altre xicota!! Rimarkinda — la vorto *ŝaragüells* (tre larĝa pantolono, sed longa nur ĝis la genuoj), certe nia valencia «ĉaragüells»!

Unu esprimon ni tute ne komprenas el la verko: «Ĉu ne vere, tio ja la anĝeloj de Dio estas malfermintaj la fenestretojn... Ĉu jes, Levko? Tio ja ili rigardas sur nian teron?»

Ambaŭ *tio*'j estas tute fremdaj al ni katalunoj. Certe bedaŭrinde ne tro klaraj elipsoj estas en la frazoj,

La traduko estas dediĉita al la neforgeseblaj rememoroj pri la III^a Esperantista Kongreso en Kembrigo.

Seĉa Universala Kongreso de Esperanto. (Anvers, 20-27 Aŭgusto 1911). — Oficiala parto. Sekcio A: Kongresoj. Paris. Esperantista Centra Oficejo. 51, rue de Clichy. 1912. Prezo: 3 fr.

Tiu libro ĵus distribuita al la membroj de la 7^a Kongreso enhavas: la Preparajn dokumentojn de la 7^a, la oficialan Protokolaron, la Aldonojn al la oficiala Protokolaro, la Nomaron de la Kongresanoj, kaj la Raportojn de la Kunvenoj de specialistoj, kaj de la Festoj, Ekskursoj kaj Diversaj Kunvenoj.

Pourquoi les postiers doivent apprendre l'Esperanto. Gabriel Chavet. Paris. Office Central Esperantiste. 51, rue de Clichy. 1912. Prix: 0 fr. 25.

Legonte poresperantajn librojn mi enŝlosas mia kvinpintan stelon en trikeston de mia skribotablo. Nenia ĝuo egalas al la ĝuo esti konvinkita. Kiam la libro konvinkis min mi festas la ĝuon remetante la insignon en ĝian lokon. Tion mi faris leginte la verkon de Chavet, kaj eĉ mi skribis al li petante ekzemplerojn kun la intenco vendigi ilin per la pordisto de la Centra Poŝtoficejo, kiu ja vendas aliajn broŝurojn. Chavet ne nur sendis ilin, sed

malavare donacis la profiton por nia propaganda kaso. Kun la pakajeto sub la brako mi iris al la Poŝtoficejo pli kontenta *ol bubo kun novaj ŝuoj*.

Mi ekparolas al la pordisto : — *Ĉu vi venas plendi?* — *Tute ne!* (*Dio ne permesu!*). Klarigon mian. Kuntiro de nazo lia. Esplora rigardado sur min kaj sur la broŝuron.

Nova kuntiro. Montra fingro, Ŝtuparo. Unua etaĝo. Direktejo. — *Ĉu vi venas plendi?!* — Kvietiga rideto mia. — *Tute ne!* (*Dio ne permesu!*). Mi memoras pri la pakajoj de broŝuroj de nia Havena Komisiono, kiuj anstataŭ atingi la ŝipojn revenas al la sendinto. Mi memoras ke ĉe la ricevo de letero oni pagas soldon, kaj ĉe la ricevo de presaĵoj oni bedaŭrinde pagas nenion. Sed ni ja estas kontentaj, ke la pakajoj ne perdiĝas kaj revenas. Kial ni plendos!... Klarigon mian. Kuntiro de nazo lia. Esplora rigardado de mia ĉapelo kaj ŝuoj kaj ree la ĉapelon. Klarigon lian. Oni bezonas permeson de la ĉefdirektoro, de la Ministro, de la Parlamento, de la Senato kaj de la Ŝtata Konsilantaro!! Tute same, kiel por starigi lanternon sur strato aŭ ŝanĝi de loko ian ŝtonon. Mi forgesis.

Saluton. Ŝtuparo. Vestiblo. Afiiŝo de broŝuro vendata de la pordisto: «*Notoj pri ortografio kaj prozodio*». Miro. Strato. Aero enŝpirebla. Reveno por relegi la afiiŝeton. Konstato ke mi ne eraris. Kia nova argumento por Chavet!!

Karaj hispanaj samideanoj : superŝutu la poŝtovicistojn de Barcelono per viaj propagandaj broŝuroj. Perfortu ilin!

Kraków-Urbo de Jubilea Kongreso 1912.

La societo «*Esperanto*» el Krakovio eldonis «*Ilustritan Gvidlibron*» de la urbo de la Jubilea VIII^a Kongreso kaj ĉirkaŭaĵoj. Ĝi estas bona antaŭgustumigo de la ĝuoj, kiuj atendas la kongresanojn de la VIII^a, kaj lerta incitilo al aliĝo al tiu Kongreso kaj al la trakurado de la 60 horoj, kiuj nin katalunojn apartigas de Krakovio.

Ĝi estas bele eldonita kaj dissendata senpage al partoprenintoj de la VII^a Kongreso, kaj kontraŭ du respondkuponoj al personoj, kiuj ilin sendos al la Komitato per la jena adreso : VIII Universala Kongreso Esperantista en Krakovo (Aŭstrio-Galicio).

Karaktero, laŭ Mr. J. M. Van Stipriaan Luiscius, advokato en Hago. Tradukita laŭ la 5^a eldono de l' Nederlanda Originalo. — Hago, 1912, Librejo «*Espero*». Prezo : fl. 0'25 = 0'200 sm.

Verko kies celo konvinkas aŭ ne konvinkas, sed kies noblecon oni ne povas nei. Ĉu ĝi estas difino aŭ instruo? Ni persone ŝatas tiujn filozofiajn difinojn, kiuj permesas ĝui la talenton de la aŭtoro. Ni ne kredas pri la instrua efikeco de tiaj verkoj. Ili nur povas esti komprenitaj de la personoj, kiuj jam posedas la virton en ili pritraktita. Senvolulo ne povas kompreni volon; senkarakterulo ne povas kompreni karakteron. La traduko de Sro. Van Stipriaan, aŭ de la verko de li — ĉar la koverto de la libro estas iom konfuza pri tio — estas tre interesa. Ĝi permesas al ni konatiĝi kun verko konsistanta el oftaj profundaj pensoj — kiuj tuj montras la originalan personecon de la aŭtoro, — kaj el penoj kolektitaj el la komuna moralo en uzo, kiuj tuj komprenigas la sukceson de la originalo. Respondon aŭ kritikon al similaj verkoj, oni nur povas fari per nova pli ampleksa verko, ĉar ĉiu ideo de ili enhavata naskas amason da ideoj kaj komentarioj. Tial ni eĉ ne intencas ektuŝi la aferon. Sed ĉu la ĉefa kvalito de filozofia verko ne estas la pensiga forto? Pasis jam la tempo, kiam homoj celis nur konvinki unu la alian. Pensigado, vibrigado de la dormantaj internaj povoj estas la celo nuna de la superaj homoj. Ĉar ne konvinko, ne samkredo, sed penso kaj emocio kondukos nin al la komuna punkto, kie konverĝas la vivoj. Se «*Karaktero*» povas ne konvinki iun, ĝi pripensigas. Tio estas la plej bona laŭdo, kiun oni povas fari al ĝi.

Gia stilo estas ke kurioza; kelkaj esprimoj surprizas, ekz : «Tial ni devas vivi por aliaj; se povas kun zorgo por propra feliĉo, se ne povas, sen ĝi!» «la unu tagon, sed ne la alian» «dekorajoj» (por ordeno—laŭ kelkaj ankaŭ *dekoracio!*) «trakti iun afable» (*konduti?*) «maniereco?» «ĉe la plej bonaj intencoj apartenas granda dozo da takto» «oni estu *nete* vestita», «takto» (en la senco de delikata, lerta sinkondufado. Eble tre ĝusta vorto), k. t. p.

TAMEN



LA «OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA»

Por proksima venonta numero ni verkos specialan artikolon porrekomendi al niaj kunfederacioj la abonon al la *Oficiala Gazeto*, kiun ĉiu bona esperantisto devas legi por bone koni la staton de nia movado, kaj aĉeti por helpi niajn oficialajn instituciojn.

Ni ŝuldas al la malinternaciemo de la Hispana Ŝtato la malfacilecon spezi monon al kaj de la alilando kaj tio ofte malebligas al niaj samlandanoj mendi librojn kaj revuojn, k. t. p.

Nian malfeliĉan kondiĉon povas iom plibonigi la organizo de la «K. E. F.» per siaj Delegitoj. Ĉiu esperantisto, kiu decidis aboni la *Oficialan Gazeton*, donu la monon (5 frankoj por jaro) al la Delegito en sia urbo, kaj la «K. E. F.» zorgos sendigi al li regule la nomitan gazeton. — «K. E. F.»



KORESPONDADO

Sro. E. R. : Jes, sinjoro; ni uzis kelkajn fojojn la vorton *Komisiono*, ĉar ĝi ŝajnis al ni internacia, kaj por eviti la tro longan *komisiitaro*. La klarigon de *Danubo*, kiun vi citas, ni ankaŭ legis; ĝi ne konvinkis nin. Ĝi diras «*Komisio* = komisiitaj personoj (komisiitaro—laŭ la F.); *komisiitaĵo* = komisiita afero. Egale bone estas uzi *komisio* en senco de *komisiita afero*, kiam la frazo ne malhelpas». Tio ne estas tute certa. 1^o *Komisio* estas la ago komisi; ĝi ne povas signifi personon kaj ankoraŭ malpli personaron. Komparu kun ordono, sendo, k. t. p. 2^o *Komisiitaĵo* estas efektive *afero komisiita*, kiel *senditaĵo* estas *afero sendita* (aŭ eble de la *sendito!*), sed ĉar *komisii* laŭ la F. signifas «*charger quelqu'un de*» *komisiitaĵo* signifas ne la aferon pri kiu oni komisiis iun, sed aferon, kiu ricevis komision pri! aŭ la aĵon de la komisiito, la valizon ekzemple. 3^o Ne egale bone, sed tute malbone estas uzi *komisio* en senco de *komisiita afero*, ĉar kiom tio, ke *komisio* signifas agon, la ideo de *komisiita afero* estas tiel malofta kaj stranga, ke ĝi bezonas bonan precizigon.

Aliflanke, ĉar *komisiono* estas internacia, ni povas uzi ĝin laŭ la regulo 15^a de la *Fundamento*.

Ankaŭ ni, kiuj estas Fundamentistoj, ne povas akcepti la *akuzativojn hostan, agodaŭran, datan kaj mezuran*, kiuj estas klarigitaj en sama numero de *Danubo* kaj pri kiuj vi demandas nin. Ni ne povas akcepti ke la «*hosta akuzativo estas uzata ĉiam kiel komplemento de la verbo hosti*», ke la «*agodaŭra montras la tempon*», k. t. p. Nenie ni trovis tion ĉi en la *Fundamento*. Tiuj akuzativoj estas tute simple permesitaj de la 3^a paragrafo de la regulo 14^a laŭ kiu oni povas uzi «la akuzativon anstataŭ prepozicio».

Vi ne estas do justa nomante nin kontraŭfundamentistoj. Se ni ne troparolas pri la *Fundamento*, tio tute simple montras, ke ni tre respektas ĝin.

Sro. J. C., Vich : Ĉio, pro manko de loko!

LLISTA DE DELEGATS AUTORITZATS PER LA ADMINISTRACIÓ DE K. E. F. PER A REBRE LES QUOTES

Sabadell	Lloc Social	Gracia, 12.
Reus	Sr. E. Aguadé	Presó, 15.
Vilanova i Geltrú	» F. Mestres	Sant Antoni, 1 i 3.
Barbarà	» J. Puigbonet	Sant Pere, 39.
Balaguer	» M. Espar Boquer	Miracle, 7.
Cambrils	Sta. J. Masaguer	Hostal Nou.
Olot	Sr. I. Juanola	Superior, 25, 2. ^{on}
Terrassa	» A. Oliart	Clarís, 24.
Manlleu	» Ll. Coll	Vora del Ter, 21.
Barcelona	» D. Dalmau	Diputació, 327, 3. ^r , 1. ^a
Tarragona	» D. Obiol	Unión, 9, 3. ^r .
Castellar del Vallès	» F. Blanquer	Fonts Calents.
Arbós	» G. Rovirosa	Major, 2.
Vendrell	» S. Esvertit	Cristina Baixa, 5.
Igualada	» A. Mosella	P de la Constitució, 11.
Girona	» F. Anguet	Progrés, 20.
Vilafranca del Panadés	» A. Robreño	Puigmoltó, 14.
Ulldemolins	Dr. Roman Pallejà	Carretera, 2.
Sta. Coloma de Farnés	Sr. P. Costa	
Lleida	» Lluís Abadal	Major, 12 i 14.
La Escala	» Josep Ximinis	Fàbrica géneros de punt
Mataró	» Josep Solà	Sant Josep, 46.
Premià de Mar	» P. Alsina	Camí Reial, 81 i 79.
Tivissa	» F. M. Brú	Avall, 16.
Moncada	Dr. Joan Buxó	
Berga	Sr. Josep Cardona	Farmaceutic.
Sant Feliu de Codinas	» Joaquim Coll	Vicari.
Banyolas	» J. Aulina	Turers, 49.
Sant Feliu de Guixols	» J. Blanch	Caymó, 32.
Vic	» J. Comella	Plassa Major, 18.
Borjes Blanques	» F. Rubinat	
Palafrugell	» J. Marqués Isern	Pals, 1.
Bégas	» J. Esteve Jacas	Arrabal S. Martí, 19.
Manresa	» I. Bosch	Bruch, 1.

Ademés poden enviar-se també directament a l'Administració :
Gracia, 12, Sabadell, amb segells de 15 centims



**FAKSIMILO de la marko eldonita
de la Komitato de la IIIª Kongreso
de Kataluna Esperantista Federacio**

Prezo : 1 centimon

*Sendu mendojn al
Grupo « Lumon »*

*Strato Nort, 26
TERRASSA*



≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
BARCELONA (HISPANUJO)
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

Redaktoro :
Frederich Pujolà

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujolà. — 11^a Literatura Konkurso (Eksterordinara temo-Verkoj ricevitaj), La Komitato. — Katalunaj efemeridoj, K. E. — VIII^a Universala Kongreso Esperantista (4^a cirkulero). — III^a Kongreso de la «K. E. F.», Agusti Badia. — Bibliografio, Tamen. — Enlanda Movado, Delegitoj. — Ankoraŭ pri anyorar, Jozefo Grau. — Korespondado.



JARO III^a

MAJO 1912^a

N^o 5 (26)

Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al

"Kataluna Esperantista Federacio"

Esperanta Semo.	Sabadell
Nova Semo	Reus
Frateca Kunigo	»
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto.	Barbarà del Vallès
Olota Stelo	Olot
Lumon.	Terrassa
Casino del Comercio	»
Esperantista Junularo.	»
Esperanta Juneco	Barcelona
La Rondo.	»
Esperanta Fakoj (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Ĝiam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Frateco	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo.	»
Unió Catalanista	»
Novan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo.	»
Evolucio	»
Universala Frateco	»
¡Supren!	»
Esperanta Aŭroro	»
Esperanta Racionala Grupo.	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallés
Laboro Esperanta	Vilanova y Geltrú
Esperantista Grupo.	Mataró
Kamparo	S. Perpetua de la Moguda
Frateco	Vendrell
Esperantista Amikeco.	Manlleu
Esperanta Amo.	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Esperanta Amikaro	Banyolas
Ilerda Espero	Lleyda
Frateco	S. Feliu de Guixols
Gerona Esperantista Ligo	» »
Badalona Stelo	Badalona

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

REDAKTORO: 
Frederich Pujulà

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO: Pri..., Fred. Pujulà. — II^a Literatura Konkurso (Eksterordinara temo - Verkoj ricevitaj), La Komitato. — Katalunaj efemeridoj, K. E. — VIII^a Universala Kongreso Esperantista (4^a cirkulero). — III^a Kongreso de la «K. E. F.», Agusti Badia. — Bibliografio, Tamen. — Enlanda Movado, Delegitoj. — Ankorau pri anyorar, Jozefo Grau. — Korespondado.

PRI...

PRAKTIKA APLIKO KAJ UTILO DE NIA
«KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO»

LEGI ĉion, kio publikigas en Esperanto, estas neeble por la plimulto de niaj samideanoj. Ofte mankas tempo kaj mono. Legi ion estas ja devo. Tute kiel en la naturaj nacioj, ekzistas en nia interkonsenta internacio civitaj devoj, kiujn ni ne povas forgesi kaj malplenumi sen akraj riproĉoj de nia konscienco. Ni devas kontribui kaj interesiĝi eĉ al la malplej grandaj okazintaĵoj de nia Ŝtato. En kia ajn lando oni vivas, la rolo de izolita taŭpo ne estas la plej nobla. Kiam oni ĝuas la profitojn de civilizita socio oni devas korespondi almenaŭ per interesiĝo. Kiam oni foje havis la feliĉon akiri la novan animon vekitan de la Internacia Lingvo, oni ne plu rajtas izole atendi en angulo de mondo ke la laboro de la batalantoj estu plene sukcesinta. En lando almitita, ĉiuj honestuloj batalas por la defendo : la fortaj per la brakoj, la nefortaj per la penso, la riĉaj per la mono; junulinoj flegas, maljunulinoj elŝpinas ĉarpiojn, infanoj pridemandas. Ĉiu helpas iel ajn.

Kiel en nia Esperantujo konstante militanta kaj al militata homoj povas resti kun plektitaj brakoj en indiferenteco al ĉio, kio okazas en nia granda batalo?

La leĝoj de ĉiu lando supozas, ke ili estas konataj de ĉiu civitano. Leĝa nescio ne estas senkulpigaĵo. En nia Esperantujo ne ekzistas aliaj leĝoj ol la 16 reguloj de la *Fundamento*; sed logiko kaj racio regas super ni. Se ili rimarkigas al ni ke en ĉiu lando eĉ la infanoj de la lernejoj konas la funkciadon de la propra Ŝtato kaj legis la klasikajn naciajn verkojn, kiel ni povus resti renriproĉe en nescio de niaj Oficialaj Institucioj kaj de la verkoj de nia Majstro? Kiel ni povus resti sen intimaj rilatoj kun la samideanoj de nia propra natura lando?

Mi invitas miajn samlandanojn al la aliĝo al «K. E. F.», kiu sciigos al ili ĉiumonate per K. E. la sangbatojn de nia enlanda movado. Mi invitas al abono al *Oficiala Gazeto Esperantista* kaj al aĉeto de ĉiu verko de Dro. Zamenhof.

La *O. G. E.* publicas lingvajn respondojn de nia Majstro, ĉiun dokumentojn rilatantaj la Ligvan Komitaton kaj la Konstantan Kn. de la Kongresoj kaj la Centran Oficejon kaj la Inter. Konsilantaron. Ĝi estas la oficiala organo de la Int. Scienca Asocio kaj de la Tutmonda Unuiĝo de Esp. Verkistoj. Ĝi diskonigas la ĝeneralajn informojn pri libroj, gazetoj kaj societoj; ĝi distribuas kiel aldonon la interesan Bibliografion de Esperanto. Per abono al ĝi, ne nur ni sciigas pri la vera stato de nia movado, sed ankaŭ ni senpere helpas al la funkciado de niaj Oficialaj Institucioj, kies presorgano ĝi estas.

Aĉeti la tutan verkaron de Dro. Zamenhof estas neeble al multaj samlandanoj niaj, preskaŭ ĉiuj laboristoj, pro manko de mono. Sed ĉar la verkoj de nia Majstro aperas unue en *La Revuo*, la abono al tiu ĉi gazeto solvas la problemon.

Ĉiu esperantisto, laŭ mia opinio, devas aboni kaj legi: 1^o La enlandan gazeton (ĉe ni riceveblan per nura aliĝo al la Federacio Kataluna). 2^o La verkojn de Dro. Zamenhof (riceveblajn en la kunteksto de *La Revuo*). 3^o La *Oficialan Gazeton Esperantistan*. Ĉio kostas entute 17 pesetojn jare! Ankoraŭ ne 5 centimojn ĉiutage!! Kiu samideano povas rifuzi tiun kvanton al nia afero?

Mi scias ke neniu el ni rifuzus ĝin, sed ankaŭ, ke ofte 17 pesetoj estas ja tuta semajna salajro, kaj ke eĉ kun plej bona volo multaj samideanoj niaj ne povas doni ilin en unu fojo. Sed por tio ekzistas nia Federacio, nia organizaĵo. 17 pesetojn en unu fojo oni ne povas doni, sed 1^o 20 pesetojn ĉiumonate (kosto de *La Revuo* kaj la *O. G. E.*) ja estas eble al ĉiu.

La «Kataluna Esperantista Federacio» antaŭpagos, kaj respon-
dos pri ĝi, la abonon al *La Revuo* kaj al *Oficiala Gazeto*
Esperantista, de ĉiu federaciano, kiu promesos al la Prezid-
anto de la grupo al kiu li apartenas aŭ al Delegito de
«K. E. F.» regule pagi ĉiumonate 1 peseton 20 centimojn

La mono, la kredo kaj la povo de ĉiuj kune estas al la servo de ĉiu individue, kaj de la ĝenerala movado. Mi vivas en la espero ke la Prezidantoj de niaj aliĝintaj grupoj kaj niaj Delegitoj laboros, por ke nia lando havu la honoron enteni la pli grandan nombron da legantoj de Zamenhof kaj da konantoj de nia oficiala movado.

FRED. PUJULÀ

EKZEMPLA KOMERCISTO

Kiam vi dezirus aĉeti de Sroj. Mas kaj Febres la artan buston de Zamenhof, kiun ili skulptis, vi devos unue aĉeti revolveron, eniri la laborejon de niaj samideanoj kaj sub minaco de morto demandi la prezon kaj pagi. Eble tiam vi povos aĉeti, kaj ni povos scii, kiom kostas la artaĵo. — Mi ŝuldas al Sro. Mas publikan senkulpigon. Mi suspektis lin, kiam antaŭ kelkaj semajnoj li min vizitis kun pakajo sub la brako. Kvankam oni jam ne plu ĵetas bombojn en Barcelono, diable, el tenilo de balailo unufojon pafiĝis sep kugloj! Sed mia timo ne daŭris multe. Malamikojn mi jam havas, sed ili estas malakraĝaj, kaj nur agadas en mallumo. Min trankviligis la afabla kaj artista mieno de Sro. Mas. La pakajo estis la busto de Zamenhof, eble una el la plej belaj kaj trafitaĵoj el ĉiuj, kiujn oni faris ĝis nun. — Ĉu vi vidis lin? — Ne! — Ĉu vi konas lin? — Ne! — Ĉu vi...? — Ne, ne.

Inspiro nur; kaj kiom da vereco en la verko! Nu, ĉi tien mi petas la laŭnaturemaj arttraktistoj! Mi volis aĉeti la skulptaĵon. Sro. Mas donacis ĝin al mi. De tiam, Sro. Mas ĉeestas ĉiun propagandan paroladaron, kaj li ĉiam opinias, ke ĉe la scenejo inter la flagoj, la steloj kaj la floroj, io mankas. Mankas la busto de Zamenhof. Kaj li tuj donacas la buston.

Unufojon estis homo, kiu mortigis de ĝentileco! Li ja dum sia tuta vivo nur renkontis ĉie malafablaĵojn! Mi komprenas nenion el la kabalaj kombinoj de komercistoj, sed mi timas ke la tago, kiam oni aĉetos buston de Dro. Zamenhof al nia kara amiko Sro. Mas, li nepre bankrotos!



II^a Literatura Konkurso

Eksterordinaraj temoj (Sekvo)

Ni memorigas ke la templino por akcepto de verkoj en la II^a Literatura Konkurso de «K. E. F.» estas la 15^a de majo.

xix. — *Olota Stelo*, el Olot donacos artaĵojn al la plej bona traduko de la popola kanzono «La Pastoreta» (*Que li donarèm a la pastoreta.... etc.*)

Listo de devizoj de l' verkoj ricevitaj ĝis la 25^a de Aprilo

Noj. 1^a, Sapiro al printempo. — 2^a, Ni semas kaj semas... — 3^a, Nur rekte, kurage... — 4^a, Pratempa imito. — 5^a, En nigra nokto tute sole. Mi staros gardon senparole. — 6^a, Mallonga recenzo. — 7^a, Ne por traktaĵo filozofa, En mia kor' ekbrulis flam': Per Bela lingvo Zamenhofa, Mi vin glorigos, sankta am'!... — 8^a, Vivu Katalunujo. — 9^a, Ensorĉo — 10^a, Amo. — 11^a, Bone laboras panfaristo sed li estas... — 12^a, Ĝi estas nepre necesa. — 13^a, Herboj montaj, bonaj herboj. — 14^a, Amo. — 15^a, Tradukisto... perfidanto. — 16^a, La Maro ŝajnas kantadi. — 17^a, Plenda adiaŭo. — 18^a, El Letero. — 19^a, Lingvo internacia, la mondo estu via. — 20^a, Jen. — 21^a, Antaŭe senfine. — 22^a, Ne-grava provo. — 23^a, Ĉielarko. — 24^a, La manojn trans la maron. — 25^a, Teruriga puno. — 26^a, Al la Amatino. — 27^a, Kiom dolĉaj estas la unuaj amoj. — 28^a, Raviĝo. — 29^a, Traduko el hispana lingvo. — 30^a, Al la maro la koro nin tiras. — 31^a, Ve, se mankus al mi maro kun sekretoj el profund'! ve, se mankus marfeino', ĉe l' kor' iĝus morta vund'! — 32^a, Mitologio. — 33^a, La Musko Rivera. — 34^a, Simplaĵo. — 35^a, La Kastelo estas elpentrita blanka. — 36^a, Malriĉeco. — 37^a, Ravajn ĉarmoĵojn enhavas la maro. — 38^a, Ami: jen bezono de nia Koro! — 39^a, Hako post hako estas la plej efika atako. — 40^a, Kuranta ĉeno. — 41^a, Ĉiu, ĝia stilo. — 42^a, Ĉiameco. — 43^a, Justa Veru. — 44^a, Naskiĝanta floro, diverĝa vojo. — 45^a, Ĵusfederaciano. — 46^a, Arĝenta Spugulo. — 47^a, Ja segarem. — 48^a, Amor de la mea vida, Vida de la mea amor. — 49^a, Humileco. — 50^a, Malfeliĉaj! — 51^a, Ni semu kaj semu konstante. — 52^a, La scienco estas tutmonda.



Katalunaj efemeridoj

MAJO

- 1 1908. — La ĉiutaga kataluna ĵurnalo «Acció Catalana» el Sabadell ekpublicas esperantan rubrikon. Iuaŭguriĝo de infana grupo en Terrassa.
- 5 1908. — La Barcelonaj esperantistoj vizitas urbon Teya afable invititaj de D^o Barrera.
- 5 1911. — Parolado en grupo Semo de *A. E. P.*, pri Antverpeno (F. Pujulá)
- 7 1908. — Parolado de Sro. Rosals en «Casino del Comerç» el Terrasa. Oni anoncas kreon de grupo kaj malfermon de kursoj en tiu urbo.

- 7 1910. — Malfermo de ekspozicio de esperantaj gazetoj en grupo *Semo*.
- 8 1908. — Alvenas Barcelonon post foresto de 3 jaroj Sro. Fred. Pujulà, por propaganda vojaĝo.
1909. — Antaŭkongresa vizito al Barcelono de Sroj. Carlo Bourlet kaj Barono de Menil. Grava kaj estima manifestacio en la Franca stacidomo.
- La geesperantistoj de Gerona salutas Sojn Bourlet kaj de Menil en la stacidomo de sia urbo.
- Teatra prezentado en la Teatro del Bosch en honoro de Sroj. Bourlet kaj de Menil.
- 9 1909. — Ĉeesto de la francaj vizitantoj ĉe la Floraj Ludoj Katalunaj en la palaco de la Borso.
- Grava festeno en «Mundial Palace» en honoro de la Francoj. Sro. Bourlet dancas la Sardanon!
- 10 1909. — Ĉeesto oficiala de la Organiza Komitato de la I^a Kongreso ĉe la *Festo de la Bela Parolo Kataluna* en la Palaco de la Kataluna Muziko.
- 11 1909. — Vizito de Sroj. Bourlet, de Menil, Pujulà, kaj Bremón al la aŭtoritatuloj de Barcelono okaze de la okazigotaj *Esperantistaj Floraj Ludoj*.
- Parolado de Sro. Bourlet en la *Ateneu Barceloni* pri Esperanto.
- 12 1909. — Intima festeno en la Monto Tibidabo organizita de la Komitatanoj de la V^a en honoro de Sroj. Bourlet kaj de Menil kun ĉeesto de Sro. Comas, astronomo. Vizito al la Fabra Observatorio.
- Honora teatra prezentado en la *Teatro Principal*. S^o Urbez ludas majstre monologon en Esperanto.
- 13 1909. — Sroj. Bourlet kaj de Menil estas nomataj honoraj membroj de Espero Kataluna. Lunĉo en la sidejo de la tiama Kataluna Societo. Danca festo en la sidejo de «L' Esbart Dançaire».
- 14 1909. — Sroj. Bourlet kaj de Menil, vizitas la kurson de Sro. Pujulà en la Ateneu Barceloni. Paroladeto de Sro. Bourlet.
- 15 1908. — Unua priesperanta parolado en la Ateneo Barceloni farata de Sro. Fred. Pujulà.
- Unua priesperantista fotografajo publicita de la Kataluna gazeto ¡Cu-Cut!
- Sroj. Bourlet kaj de Menil forlasas Barcelonon, returnen al Parizo.
1910. — Malfermo de la 1^a Kongreso de Katalunaj Esperantistoj en la Urbodomo de Sabadell.
- 16 1910. — Fermo de la 1^a Kongreso de Katalunaj Esperantistoj en Sabadell.
- 20 1908. — Festeno kaj parolado de Sro. Fred. Pujulà en Vich.
- 22 1908. — Parolado de Sro. Fred. Pujulà en Sabadell.
- 27 1908. — Parolado de Sro. Fred. Pujulà en St. Marti.

28 1908. — Unua honora festeno en Mundial Palace kun ĉeesto de 100 kunmanĝantoj kaj ŝipa esperantista promenado tra la Barcelona haveno.

La katalunaj esperantistoj decidas port vizito de Soj. Pujolà, O. Marti, kaj E. Tintorer al la Barcelonaj aŭtoritatoj inviti la Esperantistojn okazigi la V^{an} en Barcelono.



VIII^a Universala Kongreso Esperantista

Krakovo, 11-18 Aŭgusto, 1912

KVARA Cirkulero

Loka publiko. — La krakova loĝantaro tre forte interesigas pri la kongreso kaj preparas sin por inde akcepti la fremdajn gastojn. Tion pravas interalie 17 kursoj, kiuj nun okazas en la kongresurbo. Inter ili speciale citinda estas kurso, organizita de la Krakova Komerka Ĉambro por ĝia tuta oficistaro kaj kurso por policanoj, en kiu partoprenas regule 15 personoj.

Ĵurnaloj. — La loka ĵurnalistaro tre favore rilatas al la Kongreso, aperigante regule du fojojn ĉiusemajne notojn kaj komunikaĵojn pri la Oka. Krom tio ĉiuj redakcioj delegis po unu el siaj membroj, kiuj lernas nian lingvon por ĉeesti la kongresajn kunsidojn kaj redaktadi raportojn.

Honora Kongreskarto. — Por la karto Nro. 1, kiu/vidu la duan cirkuleron, estos aŭkcie vendota, oni oferas jam 12 Sm. Tiun lastan proponon faris unu konata angla samideano. Kiu oferos pli multe?

Ekspozicio. — Ni ree faras varman alvokon al ĉiuj eldonistoj, aŭtoroj, grupoj kaj izolaj esperantistoj, ke ili helpu la ekspozician sekcion per alsendo de libroj, broŝuroj, muzikaĵoj, cirkuleroj, afiŝoj kaj ĉiuspecaj aliaj dokumentoj. Ĉiuj objektoj estos zorge konservataj kaj tuj resendataj post la 30 de Aŭgusto. Adreso de la ekspozicia sekcio estas : Sro. Benedikto Herold, Lwow, Potockiego 22, Austrio — Galicio.

Jubilea Festvespero. — La vesperon organizas Sroj. Drozdowski, Barabasz, Kalinowski kaj Walewski, profesoroj de Krakova Muzika Konservatorio. Ĉi tiu fakto certigas al la vespero altan, vere artistan nivelon.

Ekspozicio de pola arto. — La ĉi tiea «Societo por belaj artoj» instigita de la Organiza Komitato, preparas por la kongresa semajno, en sia palaco, specialan ekspozicion de pola pentr-kaj skulptarto. La surskriboj kaj katalogoj estos redaktitaj en Esperanto.

LA ORGANIZA KOMITATO



III^a Kongreso de la

«Kataluna Esperantista Federacio»

Vane la pasintan monaton ni skribis sur blankan paperon la tiamajn Kongresimpresojn kaj desegnis tute klare kiel ni povis, la adreson de Sro. Pujulá sur la koverton, kaj konvene arankis kaj enmetis ĝin en la poŝtkeston la 19^a de marto, la 10^a matene de la estanta jaro! La letero ne reaperis plu. Mirinda kaj laŭdinda hispana poŝtadministracio, kiu faros la feliĉon de Rifanoj! Ni dankas al ĉiuj, kiuj interesiĝis por nia kongreso. Dankon kaj vidu nun la unuajn fruktojn de nia laborado.

Propagandado. — Persista kaj konstanta propagandado aŭguras tutplenan sukceson. Unue, estas por ni ja grava sukceso, la malfermo de «Esperanta fako» preskaŭ en ĉiuj enurbaj ĵurnaloj, akceptita de ĉiu direktoro kun gracia rideto kaj nobla konsento aranĝi la Kongreson. Ankaŭ kelkaj el tiuj ĵurnaloj eldonos numeron dediĉitan al la Kongreso kaj al Esperanto mem. Ni devas ilin honori ĉi-tie kiel *samideanojn*, ĉar kiel ni, ili laboras kaj helpas nian aferon. Ili estas *La Sembra* (regiona partio) *La Comarca del Vallés* (ĉiutaga informilo). *Crónica Social* (katolika ĉiutaga ĵurnalo), *La Voz del Pueblo* (laborista organo), *Heraldo de Tarrasa* (demokrata organo). Al ĉiuj longan daŭron en sia antaŭenira vojo ni deziras, kaj persistecon por Esperanto! Sed tio ne sufiĉas, kaj apud tiu enurba agado la Komitato opiniis bone instrui ĉiujn sencsepce, pri ĝeneralaj kongresaferoj, per oficialaj komunikaĵoj senditaj al la Barcelonaj ĵurnaloj kaj al la delegitoj por transdoni al siaj respektivaj lokaj ĵurnaloj. Estas aperintaj la 1^a kaj 2^a oficialaj komunikaĵoj.

Kongresaj eldonoj. — La graveco de nia kongreso permesis al ni eldoni kongresmarkon kaj poŝtkarton dediĉitan al la Floraj Ludoj. La Kongresmarko estas jam konita de la legantoj de K. E. kaj tre ŝatata de ĉiuj kiel certigas la mendaro; ni ne bezonas laŭdi ilin ĉi tie. La poŝtkarto, kiu baldaŭe aperos, estas verkaĵo de fama terrassa' a petrismo Sro. Tomaso Viver. Ambaŭ kongresesperantaĵoj estas haveblaj per I kaj 10 centimoj la specimeno. Por plifaciligi la korespondadon kaj sendadon de tiuj esperantaĵoj ni avertas ke estos sendataj kelkaj el tiuj, al ĉiuj grupoj aliĝintaj al la Federacio. Pluajn mendojn sendu al la grupo «Lumon».

Vojaĝo. — «La malrapideco malproksimigas la urbojn». Ni decidis peti rabaton al ĉiuj enlandaj fervojaj kompanioj. Komitatano zorgas por starigi post kelkaj tagoj la tarifon X-17. Ni informos vin oportune pri la rezultajo.

Loĝado. — La loĝado estas por ni nefacila problemo. Ni zorge entreprenis tiun-ĉi aferon, pri kiu lastajn vortojn ni reservas por la proksima numero. Nun ni avertas vin ke la Komitato nur respondos pri la mendoj senditaj al ĝi, antaŭ la 15^a de junio. Vidu la ĉi-suban tabelon nekompletan ankoraŭ.

Hoteloj	Ĉiutaga nutrado	Apartaj manĝoj
Peninsular	6, 7 kaj 8 pesetoj	minimumo 3 pesetoj
Espanya	minimumo 6 »	» 3 »
Bonavista	» 5 »	» 3 »
Univers	4 kaj 5 »	» 3 »
Catalunya	5 »	» 3 »
Almirall	minimumo 2'50 »	» 3 »

Festeno. — La 30^a de junio kelkaj momentoj post la fino de la «Floraj Ludoj» okazos Festeno. La prezo de la festenkarto ne superos 6 pesetojn!

Esperanta Ekspozicio. — Ni luis belan, lumoplenan halon, kiu sin trovas en unu el la plej trairataj stratoj, por enloki ekspozicion el esperantaĵoj. Ni volas ke ĝi estu pruvo de nia potenca povo, elmontrado de nia animo hela kaj brilanta kiel nia pura idealo. Nia afektemo-por tiel paroli-vadas en la frankvila rivero de la dolĉa iluzio rememorante ke nia urbo ne estos tia, dum la okazo de la Kongreso, sed ĝi estos dum tiuj solenaj momentoj Katalunujo mem kaj ĉiajn Katalunajn esperantajn manifestacion ni dezirus amase kunordigi kaj kolekti en la vera Esperanta Kataluna ekspozicio.

Tial ni nin turnas al ĉiuj katalunaj esperantistaj grupoj senescepte petante la sendadon de fotografaĵoj de ia ajn festo, specimenan ekzempleron de ĵurnaloj kiuj enhavas esperantan fakon k. t. p.

Al la aŭtoroj kaj eldonistoj enlandaj ni petas la sendadon de ĉiuj esperantaj libroj precipe lernolibroj kiuj estos disvendataj en tiu esperantujeto mem. Apartaj kondiĉoj estas klarigotaj private; bonvolu sin turni al la grupo «Lumon», strato Nort, 26, Terrassa.

Festoj. — Tio estas dirite: la festa estas ornamo de la Kongreso kaj ni devas festi. Unue oni organizos post la oficiala alveno de la Kongresanoj imponantan manifestacion en kiu partoprenos la tuta ĉiuranga enurba societaro. Akcepto de la urbestro en la Urbdomo fermos tiun popolan elmontradon, kiun honoros la lokaj ĥoroj ludante nian himnon.

Poste, inter vizitoj kaj kunsidaj laboroj okazos koncerto, teatra prezentado, kaj aliaj floroj de nia malgranda sed amata ĝardeno.

Privataj kunvenoj. — Estas par ni plezuro konstati ĉi-tie la deziron de amataj federaciaĵoj okazigi dum nia Kongreso kunvenetojn privatajn similajn al tiuj de la internaciaj kongresoj, kies rezultaĵoj estas efikaj.

Ĝis nun ni scias pri la certa agado tiaflanke de U-E-A. anoj, kaj katolikoj. Antaŭen!

Estas petataj tiuj kaj aliaj kiuj deziras laboradi tiaflanke sin turni al la Loka Komitato por ordigi la definitivan programon kaj antaŭzorgi pri loĝado k. t. p.

AGUSTÍ BADÍA
El la loka komitato



BIBLIOGRAFIO

Cours élémentaire pour apprendre l'Espéranto sans professeur, par Marcelle Fauvart-Bastoul. — Paris. Librairie Hachette et C.^{ie}; 79, Boulevard Saint Germain. Fr. 1^{rs}50.

La firmo Hachette ne ŝparas rimedojn por ke ni povu diri ke nur tiu ne lernas Esperanton, kiu simple ne volas. Al la multaj lernolibroj laŭ diversaj metodoj kaj sistemoj de ĝi eldonitaj, ĝi aldonis tiun ĉi de nia eminenta samideanino Sino. Fauvart-Bastoul, kiu ebligas lerni nian lingvon sen helpo de profesoro. El la prezenta antaŭvorto de rektoro Boirac ni traduke kopias: «Ĝi ne postulas, kiel la plimulto da samspecaj verkoj, la helpojn de parola instruado por kompletigi kaj klarigi la lecionojn. Ni speciale rimarkigos la tre lertan kaj novan manieron prezenti la demandon pri la akuzativo kompleto de objekto (erare nomita rekta kompleto en la malnova gramatika terminaro) kaj la trafitan novaĵon apartigi la posesivon *sia*, klarigitan en la 8^a leciono, de la posesivoj *lia*, *ŝia*, *ĝia*, *ilia* montritaj en la 4^a.»

Ĉiuj vortoj el la vortaroj de tiu verko nur estis elĉerpitaj el la *Fundamento*. La aŭtorino estas preta senpage korekti la ekzercojn, kiujn oni sendos al ŝi kun afranko por la respondo.

Esperanta Biblioteko Internacia, n^o 21. *Hungaraj Rakontoj*, de Ferenc Herczeg, tradukitaj de A. Panajott. Prezo: 0^{rs}100 sm. — Berlin. Esperanto Verlag Möller & Borel. Lindenstr. 18-19.

Nova broŝuro de tiu interesa biblioteko, kiu per malkaraj kaj bone eldonitaj verkoj kontribuas al la diskonigo de la enlandaj literaturoj kaj de la esperantistaj stilistoj. Multon ni povus diri pri ĝi, sed ni ne intencas konkuri de ĉi tie kun la bonegaj paĝoj, kiuj aspiras al la premio proponita en la konkurso de «K. E. F.» de la firmo Möller & Borel. Ni aldonu nur ke la simpla kaj bela stilo de la tradukinto igas la tradukaĵojn bona libro de ekzercado.

Poŝvortaro Hispano-Esperanta kaj Esperanto-Hispana, basado en el de don P. Boulet, profesor de Esperanto y en el último de D. E. Boirac, presidente de la Academia Esperantista, por Antonio Tuduri Zala, procurador de los Tribunales y delegado de la Sociedad Universal Esperantista, con una carta de aprobación de D. R. Codorniu y prólogo de D. H. Hodler. 2 pesetas. — Madrid. Imp. de A. Marzo. 1911. — Representanto en Katalunujo: Sro. J. Gili: Mallorca, 202, Barcelona.

Dro. Zamenhof diras en la *Ekzercaro*: «Vortaro hispana-germana». Kaj efektive tiu formo estas pli bona ol la uzita de Sro. Tuduri, ĉar «hispano» montras nur personon. Pri *Esperanto-Hispana* la afero estas tute alia ĉar Esperanto ja signifas lingvon. La parto naci-esperanta estas du fojojn pli granda ol la Esperant-nacia. Tio ne plaĉas al ni, kiu partoprenas la opinion de

Dro. Zamenhof montritan en la Lingva-komitata kunsido de la 6^a Kongreso. Krom tio, en la esperanta parto estas multaj radikoj, pri kies utileco kaj boneco ni ne estas certaj. La aŭtoro forgesis ke la vortaro de Sro. Boirac estas mirinda labora vortaro sed ne oficiala. Mi neŝcias ĉu estos tre utila al nia movado enkonduki en *poŝvortaron* vortojn kiel *kvoto*, *kroĉo*, *kvakerismo*, *landaŭo*, *lazo*, *legato*, *lispi*, *magnifikato*, *malversacio*, *mergi*, *onani*, *pajnto*, *transpara*, kiujn ni tute eĉ senatente rimarkas. Agi tiamaniere, ne montrinte la oficialajn radikojn kaj sen specialaj klarigoj estas tre danĝere. La aŭtoro ne konas certe la decidojn de la Akademio pri la litero *w*. Li enkondukas en sian verkon *waĉi*, *warfo*, *westo*, *winĉo*, eble tre necesaj por la personoj, kiuj bezonas poŝvortaron!

Krom tio ĉi ni trovas en ĝi erarojn tiel gravajn kiel blato-*polilla* (anstataŭ *cucaracha*), cimbal-*timbal* (anst: *platillos*), ĉarmi (kiel radiko verba kaj transitiva), ekspertizo-*informe forense* (anst: *peritaje*), kutimi-*acostumbrarse* (anst: *tener costumbre de*), nombro kaj numero-*número* (kun klarigo por la 2^a: vulgara senco!), oratorio-*oratoria* (anst: *oratorio*), pleto-*tabla* (anst: *platillo* de balanza), sarĉi-*sarchar* (anst: *escardar*), skurĝo-*disciplinas* (anst: *látigo*), tramvojo-*tranvia* (kiel radiko, ne citante *tramo*), k. t. p. Krom tio, amaso da fundamentaj vortoj mankas!

Kio ja devas okazi en la parto hispana-esperanta! Nia samideano ne faris grandan servon al la hispana movado.

La Verda Kakatuo, unuakta groteskajo de Arturo Schnitzler, tradukita de Joh. Schröder. — Wien 1912. — Komisie ĉe Druckerei und Verlags Aktiengesellschaft vorm. R. v. Waldheim, Jos. Eberle & Co. Prezo: sm. 0'75. Mondformato: 16 ¹/₈: 11 ¹/₂.

Tre bonan ideon havis Sro. Schröder traduki la verkon de Arturo Schnitzler kaj konigi al ni tiun groteskajon — pli satira ol groteska — pli serioza ol unuavide ĝi aspektas. Tiu verko, kiu troviĝas en la repertuaro de la *Deutsches Volkstheater*, en Wien certe devas esti tre impresa sur scenejo kaj tre teatra. Tre movoplena kaj farĉita de neatenditaĵoj ĝi devas subteni de la komenco ĝis la fino la interesigon de la spektantoj. La tipoj, vestaĵoj, agoj, diroj, loko de la scenoj, estas tre karakterizaj. Ili eĉ tre bone impresas el la libro mem. Cetere, la traduko de Sro. Schröder estas tre bona kaj korekta; la stilo tre flua kaj natura. Ĝi forgesigas ke teatrapeco estas verkita por teatro, kaj la legado jam plene kontentigas. Sro. Schröder enkondukas la vortojn *engaĝo* (dungo de aktoro), *kurtizano* (amistino), *suo* (soldo). Ni persone ne opinias ilin necesaj. Eble ĉar en nia lingvo la unuan radikon ni ne havas, la duan ni uzas en alia senco (korteganino, flatistino), kaj la tria (ĉe ni *sou* elparolita soŭ) ŝajnas pli grafiki la francan elparolon ol la etimologion, kaj ĝin ni vidis uzita ofte en la formo *soldo*. Malgrandaj detaletoj — kiuj neniel forprenas valoron de la traduko.

TAMEN



ENLANDA MOVADO

Nia kara amiko, Sro. Joan Campdelacreu, havis la malĝojn perdi sian patron dum la pasinta monato. La «Kataluna Esperantista Federacio» plej sincere kondolencas al sia fervora membro kaj diplomita profesoro.

La Ĝeronaj esperantistoj portas funebron. Komandanto Cesareo Huecas, la fervora kaj laborema prezidanto de la aliĝinta al nia Federacio grupo «Amo kaj Espero», mortis post rapida kaj senkompata malsano. La Konsulta Komisiono de «K. E. F.» perdas kun li altvaloran membron; ni ĉiuj bonegan samideanon. La «Kataluna Esperantista Federacio» esprimas al la Grupo, kiun li prezidis, sian profundan ĉagrenon; al lia nekonsolebla familio ĝi plej respekte prezentas siajn kondolencojn.

VENDRELL

En Majoroko mortis nia altestimata samideano Ramón Corbella, ano de la Vendrell'a grupo «Frateco».

Nia samgrupano mortigis tre juna, ĝuste kiam nia grupo bezonis la laboron de homoj tiel konvinkaj kaj fervoraj kiel nia samcelinto. Nia grupo partoprenas la kordoloron de la familio kaj kliniĝas jetante la verdajn florojn sur la tombon de nia plorinda samideano. — *La Delegito*.

BARCELONA

La «Societo de Komercaj kaj Industriaj oficistoj» jam de longe interesigas al Esperanto. Ĝia Esperantisto Sekcio estas aliĝinta al «K. E. F.». Dum la 7^a Kongreso, ĝi delegis Sron. Pujulà por ke li partoprenu en ia anoncita prepara kunveno por starigo de Internacia Federacio de Komercoficistaj Societoj. Pri tiu kunveno, kio okazis?! Se la organizinto daŭras en sia ideo, aŭ se aliaj similaj societoj jam sentis la bezonon de tutmonda unuiĝo por la defendo de siaj interesoj, kaj se ili legas tiun ĉi raporton, ili sciu ke la «Centre de Dependents del Comerç y de la Industria», de Barcelono, gravega societo, kiu entenas nun 2,700 membrojn, tre volonte interrilatiĝos per Esperanto por la solvo de tia problemo.

En la granda festa salono de la societejo, «K. E. F.» okazigis la 11^{an} de aprilo, propagandan paroladaron por malfermi la kursojn donotajn de tri profesoroj. Ekprezidis la kunsidon Sro. Bas, prezidanto de la instrua fako, kiu cedis, post afablaj parolaj, la lokon al Sro. Pujulà. Parolis laŭvice Sinjoro Dalmau, Sro. Rocamora, Sro. Serrats, nia tragedikomika oratoro, kiu skurĝante la mokantojn de Esperanto kaj rakontante la mizerojn de la lingva neinterkompreniĝo, intermiksigas ridon kaj emociion sur la vizaĝoj de la aŭdantaro. Sro. Pujulà sintezis la paroladojn, dankis Sron. Bas por la Societo, kaj rememoris ke ĝi neniam estis nur profitema, kaj egoisma, ĉar ĝi ankaŭ kaj

ĉefe laboradas por la ideala bonigo de Katalunujo, kio igas nin esperi, ke ĝi estos la plej firma defendanto de tiu internacia lingvo, kiu tiom da kulturo alportas kaj alportos al nia lando.

La kunsido finiĝis en granda entuziasmo.

La 14^a de aprilo posttagmeze, «K. E. F.» organizis paroladaron en la politika societo, kie aŭtonome sidas la grupo «Aŭroro», el Sant Gervasi. Parolis Sroj. Campdelacreu, Dalmau, Rocamora, Serrats kaj Pujulà. Ĉiuj parolintoj pritraktis ankaŭ la demandon pri fina unuiĝo de ĉiu grupo de Barcelono jam nun unuiĝintaj en la Kataluna Federacio. Estas neeble priskribi la interesajn paroladojn. Eble en la proksima numero ni parolos kun prosperaj detaloj pri la demando mem. Dum la kunsido kaj ĉe la fino la aplaŭdoj montris la konvinkon de esperantistoj kaj ne ankoraŭ esperantistoj.

BADALONA

Kiam kelkaj samideanoj el Badalona petis helpon por starigi grupon, Sro. Rey memoris ke la grupo «Barcelona Sstelo», kiun li prezidas estis la unua, kiu faris propagandon en tiu marborda urbo, kaj li sin oferis por la zorgoj de ĉiu organizaĵo. La nuna propagando farata de «K. E. F.», en Barcelono, havas tion bonan, ke aperigis en nian rondon la figurojn de kelkaj organizemaj samideanoj, el kiuj la barcelona movado povas multon atendi. En unu flanko, Sro. Campdelacreu kun sia stabo konsistanta el Sroj. Molgosa, Agustí, Igual; en alia Sro. Rey kun Sroj. Grau, Gili, Puig... Ili laboras en apartaj grupoj kaj kvartaloj, kaj tamen ili scias kuniĝi la fortojn por entreprenoj de ĝenerala intereso. Al ili ni ŝuldas, ke la tramveturiloj de Barcelono surportis dum kelkaj tagoj grandajn afiŝojn anoncantajn la propagandajn kunvenojn en iliaj sidejoj. Eble al ili ni ŝuldos pli bonajn rezultojn, pri kiuj estas ankoraŭ tro frue paroli.

Kiam la inteligenta Direktoro de la Tramveturila K^o, Deputita Moŝto Sro. Foronda, pligrandigis la salajron de la enspezistoj, kiuj scias paroli fremdajn lingvojn, Sro. Rey kaj lia grupo «Barcelona Stelo» atingis saman pligrandigon por la enspezistoj esperantistoj. De tiam en «Barcelona Stelo» multaj oficistoj de tramveturiloj lernas Esperanton, kaj estas tre kostuŝante vidi tre maturajn homojn ĉeesti la kurson post laciga laboro ofte ankaŭ ne vespermanĝinte. Multaj el ili komencis lerni por la nura profito. Ha! kia euraŝanĝanta semo, nia semo! Ĝi mordas en la koron! Nun ili ĉeestas ĉe la propagandajn festojn, kaj eĉ ili trudas al si la devon surporti la standardon — la belegan standardon de «B. E.» — kiel en Badalona.

Kompreneble, ni traveturis la 10 kilometrojn, kiuj apartigas Badalona'on de Barcelono, en speciala grandega tramveturilo rezervita por la esperantistoj, kiu atendis nin ĝis kiam la festo estis finita je la 1 kaj 1/2 de la nokto. Ni salutis dum la vojaĝo Sinojn, Hernández kaj Puig, Finojn, Puig (la inteligentan aktorinon), kaj Rey (filinon de nia pioniro). Ni premis la manojn de niaj oratoroj Sroj. Pujulà, Rocamora, Nin, Campdelacreu, kiuj gardis sian

voĉon inter la pli babilemaj Sroj. Rey, Gili, Pérez, Novas, Puig, Molgosa, Guixà, Miró, fratoj Graell, Monjonen, Borjas, Bonchuli, Andrés, Castells, Forns, Sorolla, Serrats, fratoj Jornet, Albert, Barnils, Carmona, Rousa, Llaball, Suriol, Montserrat, Mas, Estrems, Delclós kaj aliaj.

La Esperantistoj de Badalona atendis nin ĉe la haltejo de la tramveturiloj, kaj ĉiuj kune, ni manifestacie, post la flago de «Barcelona Stelo», iris al la «Politeknika Societo», sidejo de la nova grupo, kie la propagando devis havi lokon.

La «Politeknika Societo», de Badalona (urbo el 30,000 loĝantoj), konsistas nur el diplomitaj membroj. Ĝiaj pordoj estas fermitaj al ĉiu, kiu ne elfinis studojn en Universitato, kaj ni ŝuldas al Sro. Panzano, Prezidanto de la Societo, kaj al Sro. Mongió, ambaŭ apotekistoj, ke la ĝis nun netransireblaj pordoj estas malfermitaj de post la 1^a de aprilo al ĉiuj esperantistoj. Tiu privilegio samtempe honoras la gravan societon kaj nin. Tial la nombro da aliĝintoj al la Esperantista Grupo de la «Politeknika Societo», tuj fariĝis granda.

Post tre afabla regalado de la Societo al la vizitantoj, Sro. Panzano malfermis la kunsidon per elokventa parolado promesante ne nur ĉian helpon, sed ankaŭ ke ĉiu membro de li prezidata klopodos lerni nian lingvon. Oni povas imagi per kia aplaŭdado ni ricevis en nian rondon tiun amason da kleraj homoj! Sro. Panzano cedis la prezidan lokon al Sro. Pujulà, kiu donis la vicojn paroli al Sroj. Campdelacreu, Nin kaj Rocamora. La fervoron de Sro. Campdelacreu, kiu antaŭ kelkaj tagoj havis la malfeliĉon perdi sian patron, estis tre aplaŭdita. Tre belan, poeziplenan kaj kortuŝantan paroladon faris Sro. Nin. Dum unu horo, Sro. Rocamora, starigis antaŭ la plenege salono la sociajn argumentojn de nia movado. Alian horon uzis Sro. Pujulà por prezenti la sciencajn argumentojn. Ni aŭdis tre novajn kaj kuriozajn aferojn: la apliko de la ekonomia leĝo pri maksimumo de produktado per minimumo de forto, laŭ Sro. Rocamora; la Darwin'a teorio de natura elekto aplikita de Sro. Pujulà al la provo ke nur internacia esprimilo povas adaptiĝi al nuna internacia ambio, entuziasmigis la klerajn aŭskultantojn.

Barcelona tagjurnalo raportis: «Kion mirindan entenas la parolo de tiuj apostoloj de Esperanto? Ĉe koridoroj kaj pordokadroj, staranta publiko, kiu ne trovis okupeblan lokon, fervore restis auskultante dum tri horoj!»

Sro. Sió, prezidanto de la Grupo, dankis publikon kaj oratorojn. Ĉirkaŭ la tablo de l' gazetaro ni rimarkis Srojn. Bori, korespondanton de *Las Noticias* kaj *El Poble Català*; redaktoron de *Acció*; Monés, de *Gent Nova*; Estrany, de *Juventut Rebelde*; Romeva, de *Sol Ixent*, kaj Planas, de *Eco de Badalona*.

Kion ni devus diri se ni volus danki Srojn. Sió Amat, Fonollà kaj Fabregas, la kvar samideanojn, kiuj en Badalona atingis al nia afero tiel gravan venkon?!

BANYOLAS

La 11^{an} de aprilo je la 10^a vespere ni sciis per telefono tre grandan malfeliĉaĵon: la morton de la fervora esperantisto Sro. Cesareo Huecas, koman-

danto de la infanteria regimento de Azio, prezidanto kaj fondinto de l' grupo «Amo kaj Espero», de Ĝerono.

La sekvantan tagon je la 4^a posttagmeze okazis la entombigo. Tri membroj el nia Grupo kuniĝis kun kelkaj eksterlandanoj al la Ĝeronaj esperantistoj, kiuj en granda amaso iris en la funebra sekvantaro de nia plorinda samideano. Lia grupo teksigis belegan esperantistan kronon, sur kies rubandoj brilis du steloj, kaj per oraj literoj la frazo: *Estu dum ĉiam prezidanto de sia «Amo kaj Espero»*.

Ĉiuj devas plori ĉar malaperis unu el la homoj, kiuj plej laboris por la bono de Esperanto. De la fundo de nia koro ni partoprenas en la ĉagrenoj de lia respektinda familio. R. E. P.

Dum la pasinta Pasko ni havis la honoron saluti nian samurbanon la Prezidanton de «K. E. F.», Dron. J. Bremón. Ni salutis lin tutan; nenia korpeco mankis al li malgraŭ la glitirado. Ni tre ĝojis. «Esperanta Amikaro» deziras al li multedaŭran kompletecon por ke li ofte nin vizitu. — *La Delegito*.

GIRONA

La nelacebla batalinto de nia idealo esperantista Sro. Cesareo Huecas Carmona, mortis! Tia malfeliĉaĵo okazis la 11^{an} tagon de la nuna monato, post longedaŭraj kaj teruraj suferoj.

De kelkaj jaroj li konstante laboris por nia celo; li atingis ke la Gerona urbestro estu protektanto de Esperanto, kaj kalkulante kun ĝia multvalora helpo, li vokis la geronanojn en la urbestrejon, parolis al ili pri la granda elpenso de nia kara Majstro Dro. Zamenhof, kaj invitis la ĉeestantaron ke ĝi lernu la belsonan, la facilan lingvon, tutplenan de universala amo. Siaj vortoj estis religie aŭskultataj, kaj de tiam en la urbestreja domo ĉiutage kunvenis multaj personoj, kiujn li esperantigis; eĉ la kontraŭulojn.

En tiu salono okazis la unuaj esperantaj ekzamenoj, la 21^{an} de julio 1909^a, kie 21 gelnantoj, pruvis esperante sian kapablecon kaj atingis ateston de la Tribunalo, formita de Sroj. Sebastiano Pubill, Skolpiulo, prezidanto-delegito de «Hispana Societo»; Cesareo Huecas, instruanto, kaj Francisko Viver, pastro, sekretario.

Post la ekzamenoj li naskis la ideon formi esperantan grupon, kaj feliĉe li sukcesis, ĉar la 12^{an} tagon de la oktobra monato, estis malfermata la societo «Amo kaj Espero» (li estis ĝia prezidanto), kie oni instruadas kaj propagandas Esperanton.

Sro. Huecas mortis, sed la fruktoj de lia konstanta laborado neniam pereos, lia nomo vivos ĉiame en la koro de la ĝeronaj esperantistoj. Pace ripozo! — *Josefo Domenech* (sekretario de «Amo kaj Espero»).

LLEIDA

La Esperantista grupo «Ilerda Espero», kiu jam enkalkulas 20 geanojn, elektis la jenan komitaton por la jaro 1912^a: Sro. Johano Melons, prezidanto; Sro. Francisko Fonta, vicprezidanto; Sro. Ludoviko Abadal, sekretario;

Fino. Rosario Salazar, kasistino; Sro. Ludoviko Carreras, kunkalkulisto; Sro. Johano M. Morante, bibliotekisto; Fino. Konceptio Borrás kaj sinjoroj Arturo Anadón kaj Jako Llorens, gemembroj.

Ĉiuj ĉeestantoj en la kursoj ĉiutage donataj de Sro. Jozefo Grau, diplomita profesoro de «K. E. F.», montras varman entuziasmon, kio esperigas fruktodonan sukceson.

Propagande, la Grupo disdonadas ĉien foliojn *Tot l'Esperanto en una ĵulla*, kiuj bone helpas la kreskadon de nia juna rondo, varbante novajn gesamideanojn. — *La Delegito*.

SANTA COLOMA DE FARNÉS

La 7^{an} de aprilo «Esperanta Idealo» inauguris standardon, kiun solenigis per literatura kunveno por rememorigi tian gravan okazintaĵon.

Post la malfermo, sekretario Sro. Camps elmontris la kordezirojn de la komitato por antaŭenpuŝi nian movadon; Sroj. V. Lluis, J. Gener, J. Rodó, N. Jofré, J. Solà, J. Perich, T. Serra, M. Gener, Fino. T. Rodó, K. Vidal, L. Planas, R. Vidal, R. Rodó kaj J. Rotllan, gracie deklamis elektitajn poeziaĵojn; Sro. T. de Tuero paroladeti kaj Sro. P. Costa finigis la feston per entuziasma kaj plena parolado, pro kiu li estis varmege aplaŭdita. Ankaŭ meritis specialajn aplaŭdadojn Sro. Jozefo Rodó, Fino. Jozefino Rotllan kaj Rosalio Rodó.

Oni dankegis al la fraŭlinoj, kiuj artiste kaj afable ellaboris nian standardon. — *Jozefo Gener*.

REUS

«Nova Semo» el Reus kaj «Tarragono Esperanta» el Tarragona, kunvenis aranĝonte grandan propagandan akton en Valls.

La ekskursiva fako el «Nova Semo» estas preta por sukcesigi ŝatindan ekskurson al Tamarit, je la 5^a majo.

Ĵus fondita grupo sub la nomo «Frateca Kunigo» aliĝas al K. E. F.

Je la 7^a aprilo estis disdonitaj, donacitaj de «Nova Semo», 1500 flugfolioj enfoliigitaj en la ĉiutagaj Reus'aj gazetoj. Tiu disdono rezultis vera profita afero por nia movado. — *La Delegito*.

TERRASSA

La dimanĉon 31^{an} de la Marta monato okazis en la grupo «Lumon» la festo por la disdonado de premioj al la plej lertaj partoprenintoj en la konkurso kiun oni oranĝis, konsistanta el traduko el esperanta verko al kataluna lingvo.

Sro. Vicens Bufi, prezidanto de la Juĝantaro malfermis la feston per malonga parolado dum kiu li rimarkigis la gravecon de tiaj festoj; Sro. Oliart, sekretario, parolis je la nomo de la Juĝantaro, elmontrante ĝian laboron ĉe la

Konkurso; oni legis verkaĵojn belan kaj entuziasman sendita de Sro. Solà; Sro. Ventura legis unu el siaj belegaj poeziaĵoj; Sro. Alavedra parolis iom pri la festo kaj tuj oni disdonis la premiojn, konsistantajn el du diplomoj bele pentritaj de nia artama samideano Sro. Basso, kiujn gajnis laŭ meritoj Sroj. Miquel Grané kaj Marian Solà. Oni legis la premiitajn manuskriptojn, kiuj tre plaĉis al la aŭdantaro kaj sinjoro prezidanto proponis alian novan konkurson, kiun ĉiuj akceptis entuziasme, finante la festo per kantado de *La Espero*.

Ĉiuj ĉeestantoj priparolis favore la sukceson de tiu festo.

Por praktikiĝo de nia lingvo, oni kunvenos ĉe nia grupejo du tagojn ĉi-semajne dum kiuj nur oni parolos esperante. — *La Delegito*.



Ankoraŭ pri anyorar

Sro. Pujulà, en la aprila numero de «K. E.», rekte aludas min, dirante ke mi, konsciinte la argumentojn de li elmontratajn, modifos mian opinion pri la pridiskutita vorto. Kaj li elvolvas sian rezonadon, celante konstatiĝi ke la ĝusta pli bona formo tradukanta *anyorar* estas *enui je*, pri kiu mi diris, (vidu numeron 3(24) de K. E.): *la formon francan «enui je» mi ankaŭ ne ŝatas*.

Laŭ mia kutima koncizeco mi respondas: Varma fundamentisto, mi de nun akceptos kiel bonan la formon *enui je*, kiun mi ne estis trovinta uzitan de nia Majstro.¹

Mi konsiderados plej bona la vorton *nostalgii* en tiuj okazoj, kiam *anyorança*, *anyorament*, *anyorar*, enhavas iel ideon pri sufero, pri malsano, eĉ se tiuj ĉi estos etaj; kaj mi uzos la aliajn cititajn formojn, kiam tion postulos la senco de la tradukotaĵo. El la ekzemploj, kiujn mi prezentis, estas laŭ mia opinio facile rimarkebla la senco je kiu mi tradukis *anyorar*; des pli se oni konsentas, ke ĝi estas ne nur nomo de *sento*, sed ankaŭ de *malsano*.

Fine: Mi ĝojas, ke la enketo jetis tiom da lumo sur tiun nian vorton, kiu pro enlandaj cirkonstancoj tiel multe aspektis, kiel *sole nia* propraĵo.

Ĉion ĉi mi diris, nur ĉar mi opinias, ke estus neafable silenti post la klera argumentado de nia kara pioniro.

JOZEFO GRAU

1) Eble ĉar en la Hisp. eldono de la *Fundamento* la ekzemplo estas anstataŭata per «je la lasta fojo = *por la última vez*!» (Noto de la Red.)



KORESPONDADO

A. Mosella, Igualada. Ni ricevis vian leteron.

LLISTA DE DELEGATS AUTORITZATS PER LA ADMINISTRACIÓ DE K. E. F. PER A REBRE LES QUOTES

Sabadell	Lloc Social	Gracia, 12.
Reus.	Sr. E. Aguadé	Presó, 15.
Vilanova i Geltrú	» F. Mestres	Sant Antoni, 1 i 3.
Barbarà.	» J. Puigbonet.	Sant Pere, 39.
Balaguer	» M. Espar Boquer	Miracle, 7.
Cambriils	Sta. J. Masaguer.	Hostal Nou.
Olot.	Sr. I. Juanola.	Superior, 25, 2. ^{on}
Terrassa.	» A. Oliart	Clarís, 24.
Manlleu.	» Ll. Coll	Vora del Ter, 21.
Barcelona	» D. Dalmau	Diputació, 327, 3. ^r , 1. ^a
Tarragona.	» D. Obiol	Unión, 9, 3. ^r .
Castellar del Vallès.	» F. Blanquer	Fonts Calents.
Arbós	» G. Rovirosa	Major, 2.
Vendrell	» S. Esvertit	Cristina Baixa, 5.
Igualada	» A. Mosella	P de la Constitució, 11.
Girona	» F. Anguet	Progrés, 20.
Vilafranca del Panadés	» A. Robreño	Puigmoltó. 14.
Ulldemolins	Dr. Roman Pallejà	Carretera, 2.
Sta. Coloma de Farnés	» J. Gener	Verge Maria, 1, 2. ^{on}
Lleida	» Lluís Abadal.	Major, 12 i 14.
La Escala	» Josep Ximinis	Fàbrica géneros de punt
Mataró	» Josep Solà	Sant Josep, 46.
Premià de Mar	» P. Alsina	Camí Reial, 81 i 79.
Tivissa	» F. M. Brú	Avall, 16.
Moncada	Dr. Joan Buxó	
Berga	Sr. Josep Cardona	Farmacèutic.
Sant Feliu de Codinas.	» Joaquim Coll	Vicari.
Banyolas	» J. Aulina	Turers, 49.
Sant Feliu de Guixols.	» J. Blanch	Caymo, 32.
Vic	» J. Comella	Plassa Major, 18.
Borjes Blanques.	» F. Rubinat	
Palafrugell	» J. Marqués Isern	Pals, 1.
Bégas	» J. Esteve Jacas.	Arrabal S. Martí, 19.
Manresa	» I. Bosch	Bruch, 1.

Ademés poden enviar-se també directament a l'Administració :
Gracia, 12, Sabadell, amb sagells de 15 centims

La ĵunia numero de «Kataluna Esperantisto» estos eksterordinara okaze de la III^a Kongreso en Terrassa; ĝi enhavos Suplementon sur baritpapero kun fotografuraĵoj kaj informaj artikoloj. Federacioj kaj aliĝintaj membroj de aliĝintaj grupoj ricevos ĝin sen plialtigo de la kotizaĵo. «Unuĝo estas forto»

Tot l'Esperanto en una fulla

Edició de la «K. E. F.». A 50 centims el cent. Fulles insostituibles per a la propaganda en vetllades, excursions, etc.

«K. E. F.» vendas la propagandajn foliojn **Tot l'Esperanto en una fulla** por la sama prezo, kiun ili kostis al ĝi. Ĉar ĝis nun «K. E. F.» disvendis en tri monatoj pli ol 10,000 foliojn, kaj la disvendado pligrandiĝas ĉiam pli (nova eldono estas preta por ke neniam ili manku) la aŭfrankaj elspezoj estus post kelke da tempo graveta perdo por nia Federacio. «K. E. F.» petas la mendontojn estu aŭfrankaj aldoni al la mendoj 5 centimojn po cento da aĉetitaj folioj.

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
BARCELONA (HISPANUJO)
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

Redaktoro :
Frederich Pujulà

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *Kelkaj vortoj pri la nova edukado per la Ritmo, de Jaques Dalcroze*; Joan Llongueras. — III^a Kongreso de K. E. F. : Honora Komitato de la III^a Kongreso; Organiza Komitato; Programo de la Kongreso, II^a Literatura Konkurso; La Komitatoj. — Verdikto de la II^a Literatura Konkurso de K. E. F. — Katalunaj efemeridoj. — Bibliografio. — Enlanda Movado. — Premio Universitat. — Part Oficial.



Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al

"Kataluna Esperantista Federacio"

Esperanta Semo	Sabadell
Nova Semo	Reus
Frateca Kunigo	»
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto	Barbarà del Vallès
Olot Stelo	Olot
Lumon	Terrassa
Casino del Comercio	»
Esperantista Junularo	»
Esperanta Juneco	Barcelona
La Rondo	»
Esperanta Fakoj (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Ĝiam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Frateco	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo	»
Unió Catalanista	»
Novan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo	»
Evolucio	»
Universala Frateco	»
¡Supren!	»
Esperanta Aŭroro	»
Esperanta Racionala Grupo	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Laboro Esperanta	Vilanova y Geltrú
Esperantista Grupo	Mataró
Kampano	S. Perpetua de la Moguda
Frateco	Vendrell
Esperantista Amikeco	Manlleu
Esperanta Amo	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Esperanta Amikaro	Banyolas
Herda Espero	Lleyda
Frateco	S. Feliu de Guixols
Gerona Esperantista Ligo	»
Badalona Stelo	»
	Badalona

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

REDAKTORO:
Frederich Pujulà

NIA DEVIZO: «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO: *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Kelkaj vortoj pri la nova edukado per la Ritmo, de Jaques Dalcroze*; Joan Llongueras. — *III^a Kongreso de K. E. F.*: *Honora Komitato de la III^a Kongreso*; *Organiza Komitato*; *Programo de la Kongreso*, *II^a Literatura Konkurso*; *La Komitatoj*. — *Verdikto de la II^a Literatura Konkurso de K. E. F.* — *Katalunaj efemeridoj*. — *Bibliografio* — *Enlanda Movado*. — *Premio Universitat*. — *Part Oficial*.

PRI...

NIA III^a NACIA KONGRESO

NU jaro pasis. Ni denove vivadas en la febro de la nacia Kongreso. Unu jaro pasis, dum kiu la arbo de nia organizaĵo sin ornamis per novaj fortikaj branĉoj. Ĝi elburĝonis konstante; por ĝi vintro ne frostis. Kelkaj el ĝiaj floroj falis falĉitaj de l' kruela falĉilo de la Morto; sed eniĝinte en la teron ilia parfumo kvazaŭ resupreniris tra radikoj kaj trunko alporti fortojn al la novaj floroj.

Post unu monato, nia arbo donos frukton, kaj ni ĉiuj, kune sub ĝia protektanta ombro, povos ĝui la kontentecon de plena sukceso antaŭ la abunda rikolto.

Malgranda estas nia lando, sed granda — nia plezuro revidi nin unu la alian. La acideco de ĉiu peno kaj klopodo kvazaŭ malaperos kaj ni akiros novajn fortojn por rekomenci kun pli fervora entuziasmo. La harmonio, kiu regis la pasintan jaron, regos ankaŭ nun kaj

unu fojon pli ni konstatos la bonon de frata kaj interkonsenta laborado.

Grandega estis la laboro de niaj kamaradoj el Terrassa, de la Komitato de la Federacio, de la Juĝintoj de la Floraj Ludoj, de la propagandistoj, kiuj dum la tuta vintro ne havis eĉ momenton de ripozo, kaj, pro kompreneblaj kaŭzoj, mi ne volas paroli pri la laboro de *Kataluna Esperantisto* kaj ĝiaj kunlaborantoj. Tamen ĝi estus eraro opinii ke nur al ili ni ŝuldas ĉiun progreson kaj sukceson. Iia, nia laborado valorus nenion sen la ĉies helpo, kiun meĥanike alportas la plej malgranda ago en komuna organizaĵo. La plej izolita en montaro esperantisto eĉ tute nescie kontribuis al la sukceso nur per la simpla deziro. Volo estas forto. Ni profitu ĝin apudigante ĉiam pli niajn vicojn. Ni ĉiuj al Terrassa, sub la ombro de nia granda arbo! Ke ĝiaj branĉoj kresku! Ke ili plilongiĝu ĝis ektuŝi la branĉojn de alinaciaj arboj! Ni laboru por ke la Esperantista movado ne plu estu *aro da arboj* sed *arbaro* sub kies branĉaro eĉ unu peco da tero ne restos neŝirmita kontraŭ la *veteraj* rigoroj.

LA BULTENO DE «BARCELONA STELO»

La paĝoj de *Kataluna Esperantisto* ne plu sufiĉas por detale raporti pri la kataluna movado. Tion komprenis la membroj de «Barcelona Stelo», tiu grupo, kiu precipe en la du lastaj jaroj tiel bone kaj multe laboris, ke ĝi meritis honoran feston organizitan de alia grupo «La Rondo»: afero tute rimarkinda en nia movado!

«Barcelona Stelo» decidis eldoni Bultenon por raporti pri la grupa agado, kaj tiel senpezigi la paĝojn de nia gazeto. Sed ĝi agis en tio tiel samideane kaj dankinde, ke certe ĉiuj aplaŭdoj de niaj kunfederacioj iros al ĝi. LA BULTENO, PAGITA DE «BARCELONA STELO» ESTOS SENPAGE DISDONITA AL ĈIU MEMBRO DE LA K. E. F. Eldonante ĝin, ĝi tute ne intencis starigi interŝanĝon kun alilandaj gazetoj, nek permesi ke oni kredis pri konkureco kaj rivaleco; ĝi celis nur solvi bezonon, kaj sin pretigi al la granda laboro, kiun ĝi trudis al si, kaj kiu permesas al ni supozi, ke tiu Bulteno pligraviĝos ĝis fariĝi la presorgano de la Barcelona Esperantistaro.

Sinjoro Jozefo Grau zorgos la redaktadon de la Bulteno.

FRED. PUJULÀ



Kelkaj vortoj pri la nova edukado per la Ritmo, de Jaques-Dalcroze

TRE plaĉas al mi, ke mi povas de tie ĉi kunhelpi al pli granda sukceso de la III^a Kongreso de K. E. F. akceptante, alte honorita, la peton, kiun faris al mi ĝia Organiza Komitato, alvenigi en vian vastan kulturen agadkampon iun bonan sciigon pri tiu metodo de *Ritma Gimnastiko* de Jaques Dalcroze, kiu tiel brile triumfas plene en tiu ĉi ĉarma Ĝardeno-Urbo Hellerau.

Jes; plaĉas al mi, kaj multe en tiu ĉi okazo, ke inter amikoj kaj amantoj de ĉio, kio prezentas homan progreson, mi povas paroli kvankam mallonge pri tio, kion tiu ĉi bonega edukmetodo muzika kaj estetika celas kaj efektivas, kaj ke mi povas vin atentigi pri la transcenda graveco, kiun ĝi povas havi ĉe la kultura disvolviĝo de la rasoj.

Pli efike, ol ĉio kion rapide mi al vi diros, certe estus se mi povus en praktiko montradi al vi la metodon, kaj la rezultaĵojn atingitajn de miaj instruatoj, dediĉante al ĉiuj kaj precipe al la studemaj kongresanoj, kiuj venos honori nian amatan Terrassa'n, prezentadon kun pruvoj muzikaj kaj plastikaj, ĉe kiu, por granda ĝojo de viaj okuloj kaj oreloj kaj de via tuta cerba organismo, vi estus trovintaj la *ritmon muzikan* kaj la *ritmon plastikan* forte kunigitaj kaj tute identigitaj en unu saman korbato de vivo, montrantaj al la nunaj, aŭ pli bone, al la estontaj generacioj novajn vojojn al delikatiĝo, al pliperfektigiĝo kaj al beleco. Sed ĉar tion mi ne povas hodiaŭ efektiviĝi kiel mi dezirus, permesu ke mi proponu al vi, kvazaŭ en resumo, kelkajn ĝeneralajn ideojn pri la *Ritma Gimnastiko* de Jaques-Dalcroze. Mi ne pretendas prezenti per tiuj ĉi sintezon de la vasta kaj kompleksa verko, sed simple vekti en vi interesemon kaj scivolemon je ĝi, kaj mi deziras tion atingi, ĉar tiel ja tio estus kvazaŭ antaŭpreparo al plena konado, al kiu oni povas veni nur per studado kaj proprapersona sperto.

Eĉ post simpla ekmedito kaj profundigo en la fundamentan ideon de *Ritma Gimnastiko*, — kiu estas, sendifine esprimite, *igi vivantaj en ni ĉiajn leĝojn de l' Ritmo, por ke ni povu per ili kulturaj kaj perfektigi nian propran personecon* — baldaŭ oni rimarkas la grandegan agadan spacon, kiu prezentiga al tia edukado kaj la novajn deirejojn, kiujn oni povas eltrovi ĉe la kampoj de l' pedagogio kaj arto,

La realigo, logika kaj laŭrezona, atingita de Jaques-Dalcroze,

unuigi kaj harmoniigi la korpajn movojn, per kiuj ni esprimas kaj eksterigas niajn sentojn kaj emociojn, kun la sonoraj movoj de Muziko, per kiuj ŝajne esprimiĝas ĉiuj diversaj kaj intensivaj nuancoj de spirita vibrado, kiujn la parolo, malgraŭ sia grandega povo, neniam povas difini, estas vere, laŭ mia humila opinio, unu el la okazintaĵoj pli rimarkindaj, kiujn oni en la historion de la homa eduko kaj de l'arto povas enskribi.

Mi konsideris ĉiam la Muzikon kiel unu el la plej ĉefaj kaj plej efikaj faktoroj en la homa edukado. De la plej malproksima tempo kaj de la pli antikvaj civilizacioj, ĉiuj eminentaj pedagogoj sentis por tiu arto altan ŝaton kaj, eĉ mi diros, preferan estimon. Sed, spite tio, Muziko estadis ĝis nun kvazaŭ enigmo, kiun diveni ni ne povis. Ĝi plaĉis al ni, nin emociigis, sugestiis al ni diversajn emocistatojn; ni sentis ĝin iel potence en - kaj elirantan nin, sed ni ne sciis kiel, nek kial tio estas. Ni bone sciis ke Muziko estas forto, sed restis ĉiam en ĝi io mistera, kion ni ne sciis penetri. Ni kulturis ĝin pro naturdevena inklino, kaj ni deziris ĝin pro natura instinkto, sed ne kun klara konscio pri l'alta efiko, kiun ĝi venis plenumi en nin. Ni nesciis ĝis kie ĝia influo povas alveni.

Nun, de kiam mi konas kaj praktikas la *Gimnastikon Ritman*, mi komencas havi klaran ideon pri la ĝusta valoro de Muziko; estas nun, kiam mi komencas senvualigi ĝian tutan kaj senliman povon, kaj kiam mi certiĝas pli kaj plie pri tio, ke studado pri ĝi ne nur estas tutnecesa, estetike konsiderite, sed ke eĉ fiziologie estas nerefuteble kaj neforlaseble utila. La *Ritma Gimnastiko* estas kvazaŭ la ŝlosilo malŝlosanta unu el la multaj pordoj de tiu senfina mistera enspaco de Muziko, ĉe kiu unu tuta nova mondo da surprizoj, da malkovroj kaj da belaĵoj nin atendas. Ĝi estas kvazaŭ stariganta standardo, kiu vokas la dise sendirekte irantajn personarojn por ilin konduki al la almito de nova idealo.

Ve, kiel ĝi montras jam de la unua momento, ke ni estas ankoraŭ ĉe la komencoj, malgraŭ la multo, kiun oni faris, en la mondo de l'arto kaj la sentoj..! Ĝi alportas kvazaŭ novan lumon radiontan, post tempopasado, de la lernejo ĝis la teatro, de la danco popola ĝis la plej rafinita kaj eklektika.

Unu sola generacio edukita, jam de ĉe siaj juntagoj, per la leĝoj de *Ritmo*, kiuj estas fine la ĉefunuaĵ leĝoj de ĉia vero, de ĉia arto kaj de ĉia beleco, kian klarsenton de l'objektoj en ĝeneraleco havus, kaj per kia eksterordinara sentopovo, plene de ni nekonita, ĝi estus dotita! Kian neesprimeblan junigon ĝi portus en la arton kaj en la concepton pri l' vivo ĝenerale! Ion el tio, kion mi ekmontras, komencas

iniciatiĝi maldifinite ĉi tie, en Hellerau; kaj *maldifinite iniciatiĝi* ĉar, kvankam la sukceso nuna de la Instituto Jaques-Dalcroze, mi pensas, ke la agado de la *Ritma Gimnastiko* ne estas ja agado subite blindiga, sed, ke kiel ĉiu agado ĉefe pedagogia, ĝi bezonas la kunhelpon de l' tempo, kaj malgraŭ ĝia nuna beleco, mi estas forte konvinkita, ke ĝiaj veraj fruktoj ne estos vidataj ĝis post du aŭ tri generacioj iniciatitaj pri tiu ĉi metodo. Estas ĉiam por la estonto — vi, pli ol kiu ajn, tion scias — ke la homo konscia pri sia eduka kaj homa devo pensas, laboras, serĉas aŭ kreas.

Laŭ tia senco, la vastega ideo de Profesoro Dro. E. Jaques-Dalcroze tiel, kiel ĝi nune disvolviĝas — entenante krom la popolaj ludoj, facilaj kaj gajaj, kaj la kanzonoj kaj dancoj infanaj, simplaj kaj naivaj, la altgajn studojn pri muzika esprimado, individue kaj grandare, (per la movoj kaj la korpa plastiko) tra ĉiuj gradoj de l' plenaj kaj rezonadaj studoj pri aŭdado, laŭnotkantado, improvisado, koro, direktado, muzikilaro k. t. p., ne lasante tion, kio rilatas la fizikan kulturon, kaj donante al ili aplikon (kiel ni diris supre), vivan kaj korbatan, kiu, vivigante kaj nobligante niajn junjarojn, igos nin gajaj, disciplinaj, kuraĝaj kaj ordemaj; kiu kontribuos al harmonia kreskado de niaj korpo kaj spirito, kaj kiu retrovigos de ni en ni mem kaj en niaj propraj esprimperoj la fundamentan esencon de l'arto kaj de l'eterna belo — igas tiun ĉe Instituton en Hellerau ne nur unu plia konservatorio, kie laŭsisteme estas studata la tekniko, sed ĝi, per tiu nova kompreno pri la Muziko, ĉe kiu la Ritmo kaj Harmonio fariĝas en ni mem agoj vivaj kaj moviĝantaj, plenaj de povoj kaj instruoj, plialtigas ĝin al kategorio de vera socia instituto difinita por havi profundan signifon kaj altan transcendon en la *estonteco*.

Nun restas al mi, nur diri kiel finon, kiom mi varme deziras, ke en nia Katalunujo, kie tiu ĉi agado estis tiel ĝustatempe komencita, ĝi povu forte enradikiĝi; ke Instituto, frato de tiu en Hellerau povu baldaŭ plenvive kaj riĉe flori inter ni, kaj ke en nia fortohave kultura renaskiĝo eksentiĝu kaj firmiĝu la opinio ke la studo pri, kaj formala disvastigo de, la *Ritma Gimnastiko* estas por ĉiu vere progresema spirito, io tre urĝa, nepra, kio vivas atente al la palpitado de la moderna civilizacio.

JOAN LLONGUERAS¹

Hellerau, 27 an de Aprila 1912^a

Tradukis J. GRAU

1. *Direktoro de la Asocio kiu regalos la kongresanojn per festo en S. A. R. la 30^{an} Junio je la 9.^a vespere.*

III^a KONGRESO DE K. E. F.

Honora Komitato de la III^a Kongreso

Prezidanto : Sinjoro Urbestra Moŝto Josep Ulles. — Vicprezidantoj : Moŝtoj Tomas Pursals, Ekonomo, kaj Luciano Torrente.

Honoraj membroj : Sinjoraj Moŝtoj D. Josep Balta de Cela; Direktoro Industriaj Lernejoj, Direktoro de Piaj Lernejoj; D. Tomas Parellada, Prezidanto de la komisio de Publika Instruado de la Urbkonsilantaro; Prezidanto de la Ruĝa Kruco; Sro. Eugenio Blanco Abella, Juĝisto; D. Joan Puigbo, Prezidanto de la Oficiala Komercia Ĉambro; D. Alfons Sala, deputito; D. Joan Barata, provinca deputito; D. Francesc Alegre, provinca deputito.

Organiza Komitato

Prezidanto : Valentí Alavedra. — Sekretario : Marian Sola; Kasisto : Rosèn Roig.

Komisiono por festoj

Prezidanto : Josep Colet. — Miquel Rambla; Baltasar Pineda; Josep Ortiz; Adolf Soldevila; Josep Ariso.

Propaganda Komisiono

Prezidanto : Agustí Badia. — Josep Ventura; Albert Oliart; Jacint Figueras; Josep Casanovas.

Honoraj voĉdonantoj

Sroj. Direktoroj de la ĵurnaloj La Sembra; Heraldo de Tarrasa; La Voz del Pueblo; Crónica Social; La Comarca del Vallès.

Programo de la Kongreso

29^a DE JUNIO

Matene. — 9^h 18, Oficiala alveno de la Kongresanoj; manifestacio al Urbodomo. (La Grupoj estas petataj kunporti la standardojn.) — 10, Oficiala akcepto en la Urbodomo, Paroladoj de Sro. Bremon, kaj Moŝto la Urbestro. (Ĉiuj horoj de la Urbo akompanataj de la Urba muzikistaro, kantas la Esperon.) — 11, Malfermo de la Kongreso. —

Posttagmeze 1, Tagmanĝo. — 3, Labora kunsido. — (5 ĝis 7.) Skriba ekzameno. — 5, Vizito al «Industriaj Lernejoj» kaj Esperanta Ekspozicio. — 8, Vespermanĝo. — 9, Teatra prezentado en la Teatro Principal.

30^a DE JUNIO

Matene. — 7, Vizito al la romepokaj preĝejoj de S. P. — 8, Meso por katolikoj. — 9, Ekzamenoj. — 9, Kunveno de U. E. A. kaj «Katolika Ligo de K. E». 11, Festo de la Floraj Ludoj. *Posttagmeze*. — 1, Festeno popola. — 3, Labora kunsido kaj fermo de la kongreso. — 9, Honora festo dediĉita al la Kongresanoj en S. A. R.

La Kongresanoj povos resti en Terrassa la tagojn 1^{an} kaj 2^{an} de Julio, dum kiuj okazos la ĉefa festo de la urbo, kaj rajtos eniri senpage en la festojn, kiuj havos lokon en la Societejoj de Terrassa.

Hortabelo de la vagonaroj, kiuj iras de Barcelono al Terrassa

Matene : 6'25, 7'15, 8'23 (Ekspresa vagonaro, kiu alvenas al Terrassa je la 9'18. La plimulto de federacianoj uzos ĝin. La aŭtoritatoj ĉeestos la Stacidomon je ĝia alveno. Vidu la Programon¹⁾ 9'48, 11'46.

Posttagmeze : 13'16, 14'16, 16'16, 17'33, 18'40, 19'23, 20'56.

Vagonaroj, kiuj iras de Terrassa al Barcelono

Matene : 6'06, 6'30, 7'09, 9'06, 9'58, 12'19.

Posttagmeze : 13'30, 14'36, 15'51, 17'05, 18'36, 19'18.

Hoteloj. — La federacianoj, kiuj ĉeestos la Kongreson, estas insiste petataj antaŭmendi la loĝejon al la Komitato de la III^a en Terrassa. (Grupo «Lumon», str. Nort, 26). La Komitato ne respondos pri la malfacilaĵoj, kiujn povas renkonti tiuj, kiuj ne sciigis sian alvenon, antaŭ la 20^a de Junio.

En tiu ĉi numero estas entenata la insigno, kiun la federaciano devos kunporti por ĉeesti la laborajn kaj festajn kunsidojn de la III^a Kongreso de K. E. F. kiu okazos en Terrassa la 29-30 de la nuna monato.

1. Ni Konsilas tamen niajn amikojn uzi la antaŭan vagonaron, kiu eliras el Barcelono je la 7'15 kaj alvenas en Terrassa je la 8'32, ĉar la kosto de la vojaĝo per ĝi estas duone malkara, kaj krom tio ili havos tempon por havigi al si loĝejon kaj poste reveni en la stacidomon por partopreni la manifestacion.

II^a Literatura Konkurso

Preseraro en la antaŭa numero dirigis nin, ke la templimo por akcepto de verkoj estas la 15^a de Majo anstataŭ la 10^a. Pro tio ni ricevis kelkajn verkojn post la 10^a, kiujn kompreneble ni akceptas kiel regule senditajn. Ni petas pardonon por la eraro kaj ĝojas, ke ĝi havigis al ni kelkajn bonajn tekstojn.

Listo de devizoj de l' verkoj ricevitaj ĝis la 15 de Majo

53^a, Amo regas Universon. — 54^a, Lúgubre. — 55^a, Gefratoj, estu bonaj. — 56^a, La vereco de la Historio terurigas. — 57^a, Margherita. — 58^a, Bone scripiste. — 59^a, La vivado mara estas tre agrabla. — 60^a, Disreviĝo. — 61^a, En antikva formo. — 62^a, La fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam netuŝebla. Zamenhof. — 63^a, Senkore vi ne vidis. — 64^a, Nostalgia kanto. — 65^a, Amo. — 66^a, Senliteratura lingvo estus kvazaŭ mondo el nur ŝtonoj kaj riveroj. — 67^a, Lumon. — 68^a, Nur tie estu via hejmo, kie kanto sonas; ĉar sole homoj malbonaj nek unu kanton konas. — 69^a, Krueleco. — 70^a, Belo mara min delogas. — 71^a, Bukedo. — 72^a, Tri anekdotoj. — 73^a, La fiŝkaptistoj songas... songas. — 74^a, Abomeno por la krimo, kompato por la krimuloj. — 75^a, Tiu nur ne eraras, kiu iam nenion faras. — 76^a, Per amo kora, al ĉiu favora, Tutmondon ĉirkaŭprenu. — 77^a, Mi volas traduki ne litere, sed libere. — 78^a, Kaj rapide kreskos la afero, per laboro de la esperantoj. — 79^a, Kie ajn vi veturados, Esperanto vin helpados. — 80, Marinesca. — 81^a, Prova traduko. — 82^a, Fantazio. — 83^a, Blinduleto. — 84^a, Se pro tempo, jen. — 85^a, Mi eniras en la arenon, etc. — 86^a, Antaŭ semi, plugu ĉiam. — 87^a, Bukedo de nigraj floroj. — 88^a, Kateno. — 89^a, Konu vin mem. — 90^a, La Paŝtistineto. — 91^a, (Sen devizo kaj subskribita!). — 92^a, Ho mia patrineto. — 93^a, Koron kompreni, povas nur koro... Fez. — 94^a, En la mondon venis nova sento. — 95^a, Kvieteco. — 96^a, Maro kaj ĉielo. — 97^a, Amu ĉiam kaj floros via koro. — 98^a, No temem esculls ni vent traidor; plens de joia avui volem estar. «L'Holandès Errant». — 99^a, La persistecon kronos la sukceso. — 100^a, Verum est id quod est. — 101^a, (Sen devizo kaj subskribita!). — 102^a, Verda, kvinpinta stelo, Signo de paco kaj belo! — 103^a, Multe pli ol en ĝojado, estas ĝoj' en dezirado. Bartrina. — 104^a, Maro estas gutaro. — 105^a, Filozofio, Scienco de Sciencoj. — 106^a, Al la bonodora timiano. — 107^a, Vivu Zamenhof. — 108^a, Forteco. — 109^a, Lernu Esperanton. — 110^a, Sempre adorada. — 111^a, Donu al mi la junularon, kaj mi ŝanĝos la mondon. Victor Hugo. — 112^a, Ĉe la komenco de ia libro. — 113^a, (Sen devizo kaj subskribita!) — 114^a, Ĉar tio ĉi estis

feino, kiu prenis... — 115^a, Perfida kiel la ondo, Shakespeare. — 116^a, Iam mi vivis trankvile, En mia blanka dometo, Sur tre modesta monteto, Meze de verda l'arbar'. — 117^a, Ŝi nin honoras. — 118^a, Kiu ne amas, ne scias vivi. — 119^a, Milda. — 120^a, Semu, ni semu fratojn. — 121^a, Naturo. — 122^a, Amo estas vivo. — 123^a, En soleco mi trovis mian konfidanton.

Verdikto de la II^a Literatura Konkurso de K. E. F.

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. *Versaĵo pri Amo*. — La juĝantaro aljuĝas la premion al la verko, kies devizo estas : «Margherita.» La decido en tiu konkurso estis iom malfacila pro la multaj bonaj verkoj ricevitaj. La juĝantaro opiniis, ke meritas specialan mencion la du verkoj, kies devizo estas «Amo», precipe tiu, kies unua verso diras : «Am' estas ĉie en Naturo». La alia, kies unua verso diras : «En fundo de strato, sub lumo malbrila» meritas esti citita por la formo.
- II. *Prozaĵo pri Amo*. — Meritis la premion la verko, kies devizo estas : «En nigra nokto tute sole, mi staras gardon senparole.»

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. *Traduko de la «Reu de mort»*. — Neniu el la naŭ senditaj verkoj meritis la premion. La juĝantaro, konsiderinte la valoron de la originala versaĵo, kies devizo estas «Amo» kaj kies unua verso diras «Am' estas ĉie en Naturo», decidis donaci tiun ĉi premion al ĝia aŭtoro.
- II. *Traduko de «Les senyorettes del Mar»*. — Meritis la premion la verko, kies devizo estas : «No temem esculls ni vent traidor; plens de joia avui volem estar : L'Holandès errant.»

La **Natura Floro** estas aljuĝita al la aŭtoro de la versaĵo pri Amo, kies devizo estas «Margherita». Al li apartenos la rajton elekti la Reĝinon de la Festo. (Li estas tre petata konigi tuj sian nomon kaj adreson al Sro. Fred. Pujolà, — Rambla de Catalunya, 89. Barcelono. — por interkonsenti kun li pri multaj detaloj.)

La juĝantaro decidis donaci la premiojn de la

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. *De Esperanta Semo de Sabadell. Traduko de «La Sembra»*. — Al «Ja segarem».
- II. *De Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj. Traduko de «Les herbes heroiques»*. — Al «Mi volas traduki ne litere, sed libere.»
- III. *De Sro. Gabriel Chavet. Literaturo kreas kaj vivigas lingvon.* — Al «Negrava provo.»
- IV. *De Esperanto Verlag Moller & Borel. Paĝo pri la Esperanta Biblioteko Internacia.* — Al neniun.

- V. *De la grupo Semo. Traduko de «L'Emigrants»*. — Al neniŭ.
- VI. — *De Moŝto Alfonso Sala, Deputito. Enkonduko de Esperanto en la Industriaĵn Lernejojn*. — Al «Donu al mi la junularon kaj mi ŝanĝos la mondon.»
- VII. *De Moŝto Joan Barata, Deputito. Esperanto en la praktika vivo*. — Al neniŭ.
- VIII. *De Moŝto Francesch Alegre, Deputito. Esperanto en Komerko*. — Al «Ĝi estas nepre necesa.»
- IX. *De Esperantista Junularo. Esperanta Dialogo por infana deklamado*. Al «Cindrulino.»
- X. *De Honorinda Ekonomo de Terrassa. Eklezio amis ĉiam la veran progresadon de la homo*. — Al «Lumon.»
- XI. *De Casino del Comercio de Terrassa. Laŭvola*. — «Al la maro la koro min tiras.»
- XII. *De la Urbestra Moŝto de Terrassa. Laŭvola*. — Al «Koron kompreni povas nur koro.»
- XIII. *De la Urbeŝtraro de Terrassa. Laŭvola*. — Al «Antaŭ semi plugu ĉiam.»
- XIV. *De la Direktoro de la gazeto «La Comarca del Vallés». Historio de Kataluna lanindustrio*. — Al neniŭ.
- XV. *De Vika Esperantistaro. Traduko el Vika verkisto*. — Al «Traduko el hispana lingvo.»
- XVI. *De Universala Esperantista Asocio. Praktika signifo de U. E. A.* — Ne konkursita.
- XVII. *De Olota Stelo. Traduko de «La Pastoreta»*. — Al «Ho mia patrineto.»

Nota. La verdiktoj de *La Revuo kaj Franca Esperantisto* ne ankoraŭ alvenis kiam komenciĝis la presado de tiu ĉi numero.



Katalunaj efemeridoj

JUNIO

- 1 1908. — Malaperas la gazeto «Stelo Kataluna» de Igualada.
- 14 1908. — Solena entuziasmoplena kunsido de Delegitoj de la Katalunaj Grupoj en la Kunsida Salono de la Barcelona Urbodomo por leĝe starigi la *Katalunan Esperantistan Federacion*.
- 24 1911. — Malfermo de la II^a Kongreso de K. E. F.
- 25 1911. — Fermo de la II^a Kongreso de K. E. F.
- 29 1910. — Mortas en Sabadell la direktoro de *Kataluna Esperantisto* Domenech Serdà.
1909. — Fondiĝo de la grupo Frateco en Vendrell.



BIBLIOGRAFIO

«*La Organizado de la intelekta laboro per «La Pontos», de K. W. Bühner kaj Ad. Saager, esperantigita de J. Schmid, L. K. — Ansbach, 1911. Eldono de la Librejo Fr. Seybold.*

«Ĉi tiu libro — diras la Antaŭparolo — estu konsiderata kiel la unua publikaĵo de la prepara laborkomisiono por la fondado de Internacia Instituto por la Organizado de la intelekta laboro.»

Verkita en germana lingvo, ĝi estis tradukita al Esperanto de Sinjoro Schmid kun helpo de kelkaj eminentaj gesamideanoj por faciligi — aŭ pli bone ebligi — la tradukon al 12 naciaj lingvoj. Tio sola, sufiĉas por montri, kiel interesa estas por ni tiu verko, kiu povas esti grava konvinkilo en manoj de propagandisto. Ĝia celo nepre interesos ĉiun esperantiston; la libro — ĉiun amanton de belaj eldonaĵoj.

«*Albrecht Durer* — lia vivo kaj elekto el liaj verkoj, kun klarigoj de la apartaj folioj. Je komisiono de la Instruista unuigo por artedukado, Nürnberg», Eldonita de Dro. Friedrich Nuchter. Esperantigita de la Germana Esperanto Asocio (G. E. A.). Kun 53 bildoj ĉe la teksto kaj 1 kolorpresaĵo. Librejo Fr. Seybold, Ansbach. (Esperantia Entrepreneo.)» Prezo 2 Sm. (5 frankoj.)

Aparte de la socia valoro, kiun havas tiaj verkoj, kiuj diskonigas la arton en la popolon, kaj pri kiu ni ne parolos por ne ripeti tion, kio milfoje estis dirite, estas en verkoj kiel la eldonita de Sr. Seybold propaganda valoro, kiun ni neniam tro multe atentos.

Ni mem, esperantistoj, pro la ĉiutaga kaj natura uzado de nia internacia lingvo, devus esti konvinkitaj pri la forto kaj disvastiĝo de Esperanto. Tamen, kiam la verko «Albrecht Durer» venas en niajn manojn ni ne povas eviti geston de surprizo, kaj ne montri ravite nian miron. Imagu la efekton, kiun ĝi povas produkti ĉe ne esperantistoj, ĉe tiuj, kiuj ankoraŭ ridigas siajn perdistinojn, dirante ke Esperanto estas lingvo de spicistoj, ĉe tiuj — pli interesaj, kiuj nur havas dubojn pri la efikeco de internacia lingvo. Mi certigas, ke ĉiuj, al kiuj mi montris tiun verkon, restis konvinkita kaj decidis komenci la lernadon de Esperanto. Ĝi egalvaloras multajn paroladojn. Ĝi estas samtempe konvinkilo kaj kribilo. La homojn, kiuj vidinte tiun verkon ne konvinkigis al nia ideo, ni ne bedaŭru: ilia inteligenteco alportus nenian sableron al la internacia movado. Kaj se ili alportus, ilia sablero nur taŭgus por impliki la funkciadon de la radoj.

Programa del Curso de Esperanto en la Universidad de Barcelona, por el profesor Lic.º Joaquín Coll Agramunt, Pbro. Año 1911-12.

Ni ricevis la programon per kiu ekzameniĝos la lernantoj de la kurso, kiun pastro J. Coll, nia diplomita profesoro de la K. E. F., klarigis dum la pasintaj monatoj. Ni profitas la okazon por gratuli nian karan amikon, por la sukceso kiun li atingis kaj atingos.

LA LLENGUA INTERNACIONAL, konferencia llegida en el «Círculo Olotense» el dia XXIII d'Abril de MCMXI. per Joseph M.^a Garganta, President de la societat esperantista «Olot Stelo». — Olot. Imprempta de Vda. de Planadevall. MCMXII.

Nia distinginda kaj malnova samideano Sro. Garganta, kies eniron en la aktivan movadon ni ŝuldas al la absurdaj atakoj de Remy de Gourmont, eldonis en eleganta broŝureto la paroladon, kiun li legis en la plej grava Societejo de Olot la 23^{an} de Aprilo de l' pasinta jaro. Sro. Garganta, kiu estas persono tre influa kaj amata de ĉiu Olotano, certe multe antaŭenpuŝos nian movadon per siaj parolado kaj broŝuro. La «Olot Stelo» kiu konsistas el plej fervoraj kaj viglaj esperantistoj, havas, en nia poeto kaj inteligenta heraldikisto, la Prezidanton kiun ĝi meritis.

TAMEN



ENLANDA MOVADO

Ni legis kun ĝojo, ke en la teatra prezentado, kiu havis lokon en Parizo okaze de la Federacia Kongreso, unu kataluno, Sro. A. Sabadell havis grandan sukceson per sia traduko de la verko de Rusiñol «La ĉiama kantajo». Ni gratulas Sron. Sabadell.

BARCELONA

La manko de spaco malpermesas al ni longe raportiri pri la gravaj paroladaroj, kiuj havis lokon lastatempe en nia urbo.

La 2^a de Majo, nia samideano Sro. Delfi Dalmau faris paroladon en la C. de U. F. N. R. de la II^a kvartalo pri «Efekto de la naciismo sur la lingva evoluado. Signifo de l'Esperanto en tiu ordo de ideoj»

La ideojn elvolvitaĵn kun la originaleco, kiu karakterizas Sron. Dalmau longe raportis kelkaj gravaj ĵurnaloj de nia urbo.

La 11^{an} de Aprilo okazis paroladaro ĉe la «Casa del Pueblo» de la kvartalo 5^a. Parolis Sroj. Cruz, Vilà, Serrats, Dalmau, Campdelacreu, Nin, Rocamora kaj Pujulà kiu prezidis.

La 14^{an} de Aprilo parolis en la C. N. R. de Gracia, sinjoroj Dalmau, Serrats, Campdelacreu, Nin, Rocamora kaj Pujulà, kiu ricevis la prezidan lokon de Dro. Mer y Güell. En ambaŭ kunvenoj, la multenombra publiko forlasis la salonon entuziasmigita.

Pri la «Teo dum dancado» per kiu regalis la grupo *La Rondó* al la *Barcelona Stelo*, estas raportite en la Bulteno de tiu ĉi lasta grupo.

«Supren!» kiam fondiĝis maltrafis sian nomon, tial ke anstataŭ Grupo, ĝi devus esti nomata «Gefrataro» ĉar ĝiaj geanoj ne nur estas samgrupanoj, sed gefratoj. Ekzistas jam, de antaŭ longe, pruvoj de tio-ĉi, sed oni povis rekons-tati tion la pasintan dimaĉon, 26^{an} okaze de la ekskurso de ĝi organizita. Multnombraj belaj fraŭlinoj ĉeestis en tia ekskurso, kiuj montris sian kuraĝon kaj ekskursemon, enirante en «les coves del Orb» ĝis la fino, kaj ir venante piede inter Barcelono kaj Sta. Creu d'Olorde, Cim de la creu (je 435 metroj de alto) kaj nomitaj subterajoj. Dank'al oportuna ilaro, oni povis ilin esplori, kaj vidi iliajn belecon kaj grandecon. La granda nombro de geekskursintoj restis kontentega kaj promesis ĉeesti la proksiman ekskurson al Sant Llorens del Munt kaj ĝiaj subterajoj baldaŭ okazontan.

SITGES

La grupo «Espero Kataluna» el Barcelono organizis ekskurson al nia urbo, kiu okazis la 12^a de la pasinta monato. Bedaŭrinde, pro la stato de la maro la ekskursanoj ne povis uzi jam frajtitan ŝipon, kaj devis veturi per la vagonaro. La akcepto estis tre kora kaj dum la tuta tago regis granda entuziasmo inter ĉiuj.

CLOT

Estis tre kortuŝanta la festo kiu okazis la 12^{an} de Majo en la publika lernejo de Sinjorino Mensa tre afable cedita de la Reĝa Delegito de Instruado por la distribuado de premioj al la lernantoj de la «Col·legi de Catalunya», kiun direktas Sro. Frederich Mensa.

La festo estis dediĉita al Dro. Zamenhof. La grava lernejo de nia kara amiko estas vere sembedo de Esperantistoj. Li devis multe batali kontraŭ gepatroj obstinaj, li devis eĉ rifuzi lernantojn, ĉar estas regulo de la lernejo, ke ĉiu devas lerni Esperanton. Sed, kiajn rezultatojn! Cento da infanoj, kiu parolas nian lingvon, kiu kantas per ĝi, kiu *sentas* per ĝi! Sro. Mensa diras al la obstinaj patroj. «Eble, ne certe, vi rajtas rifuzi ian instruon al viaj filoj; sed certege vi ne rajtas, devigi min malŝpari horojn kaj horojn por lernigi gramatikon al miaj lernantoj; kaj mi scias ke per Esperanto, tio estas ludo.»

Ĉiutage, posttagmeze kaj vespere, ĉe la fino de la klasoj, la lernantoj staras kaj kantas la *Esperon*. Ne mirige, ke dum la festo belege ili kantis ĝin, la *Bonvenon*, *Novan Kanton*, la *Akcepton* de Pujulà, kaj la *Blindulineton*.

La festo, kiu komenciĝis je la 3.^a porttagmeze daŭris ĝis post la 8.^a. Sur la programo estis anoncita paroladoj de Dro. Bremon, prezidanto de a *Kataluna Esperantista Federacio* kaj de Sro. Pujulà.

Ni vidis en la granda lernejo plenigita de ĉiuj familioj de Clot, kiuj tre malfacile trovis lokon por sidi, Sinjorojn Bartomeus, kaj Serrats el Barcelono, kaj Boyer y Llonch de la «Ĉiam Antaŭen» kun ĝia prezidanto Sro. Soler al kies fervoro kaj laboremo dum sep jaroj ni ŝuldas la progresojn de nia lingvo en tiu Barcelona kvartalo.

Niajn plej varmajn gratulojn al Sro. Mensa kaj al lia inteligenta edzino, kiu ankaŭ en sia lernejo de infaninoj lernigas Esperanton kaj kantigas nian himnon.

SANT FELIU DE GUIXOLS

La 29^{an} de Aprilo, okaze de vojaĝo, kiun li faris kun sia edzino en nian urbon, Sro. Fred. Pujulà estis petata fari paroladon pri nia Internacia Lingvo en la Sidejo de la U. F. N. R. ĉar bedaŭrinde ĉiuj teatroj de la urbo estis okupitaj. Sro. Pujulà estis tre gratulita je la fino de la longaj klarigoj per kiuj li montris la internan ideon de nia afero, kontraŭstaris la argumentojn de niaj malamikoj kaj analizis la utilojn de Esperanto en ĉiu fako de la socia vivo.

«Frateco» malfermis tuj kurson al kiu aliĝis novaj adeptoj.

Dum la pasinta monato fondiĝis en nia urbo la Havena Sub-Komisiono kun la jena komitato : Sro. Vicens Raurich, prezidanto; Sro. Jaume Bendrell, Sekretario; Sro. Emili Presas, Kasisto. Ili komencis tuj labori en la interesa kaj utila propagando inter la maristojn.

La grupo «Frateco» disdonis la 1^{an} cirkuleron pri la III^a Ĝerona Esperantista Kunveno, kiu okazos en nia urbo la 15^{an} kaj 16^{an} de Septembro. La celo de tiu kunveno estas la disvastiĝo de Esperanto kaj unuiĝo de ĉiuj Esperantistoj kaj Societoj. La ĝeronaĵ esperantistoj estas petataj sendi la proponojn diskutotajn. La membroj de la Organiza Komitato estas : Sroj. Emili Presas, Prezidanto; J. Blanch Vendrell, Sekr.; Vicenç Rourich, Vic-Prez.; Narcís Solà, Frederic Verriè, Vic-Sek.; Rosèn Reixach, Kas.; A. Llinàs, T. Duran, Juan Corts, J. Casanovas, P. Campistas, kaj Fraŭlinoj D. Garbera, D. Vilaseca, Gemembroj.

SANTA COLOMA DE FARNÉS

La 5^{an} de Majo «Esperanta Idealo» fondis klubon de sporto kaj ekskursoj por faciligi varbadon al Esperantismo de kelkaj personoj sportamaj. Por aliĝi al tiu faka klubo estos nepre aliĝi en la esperantistan societon, kvankam ambaŭ socioj aparte funkciadas. Tiu konkludo estis bone aplaŭdata de ĉiuj samideanoj, tial ke ĝi helpos nian prosperadon.

Ni multe bedaŭras foreston de nia kara amiko kaj samideano Sro. Viktor Lluis, kiu la unua kunhelpis fondiĝon de esperantista rondo en tiu ĉi urbo. Ankaŭ ni bedaŭras la malfeliĉan samideanon Sron. Johano Trafac kiun la kruela morto forrabis tiel junan ankoraŭ. — *Jozefo Gener.*

BADALONA

La grupo «Badalona Stelo» elektis la jenan komitaton.

Sroj. Ramón Teixidó, Prezidanto. — Josep Sio, Viceprezidanto. — Ramon Amat, Sekretario-Kasisto, — Jaume Puig, Vicsekretario. — Josep Planas, kaj Salvador Fabregas, Membroj.

La 22^{an} de Majo Sro. Johano Gili malfermis kurson de Esperanto, kiu okazos ĉiujn merkredojn kaj vendredojn en la sidejo de la grupo (Centro Politécnico de Badalona). — *Ramón Amat.*

LLEIDA

La 27^{an} de lastepasinta Majo la grupo «Ilerda Espero» okazigis paroladon pri Esperando, kiun donis nia kunfederaciano Sro. Jozefo Grau en la belaj

salonoj de la «Circulo Mercantil», kiujn plenigis grandnombro da personoj.

La parolinto prezentis antaŭ siaj aŭskultantoj la tutan problemen pri lingvo internacia, kaj post ekzamenado de ĝiaj diversaj aferoj kaj punktoj, li venis al la konkludo, kiujn ĉiuj alestantoj akceptis, ke la sola ebla lingvo helpa estas Esperanto.

Sro. Grau, kiun atente aŭskultis ĉiuj dum horo kaj duono, ricevis gratulojn por sia ago, kiu sendube helpos varbadon de novaj samcelanoj.

La organizinta grupo disdonis inter la ĉeestantojn foliojn propagandajn.
— G.



PREMIO «UNIVERSITAT»

Unu distinginda samideano kaj kunfederaciano, kiu deziras resti en inkognito, sciigas al ni ke li decidis starigi premion de 100 PESETOJ, kiu estos donacita ĉiujare al la plej bona lernanto de la Universitata kurso de Esperanto, kiun klarigas kun tiom da sukceso la Federacia Profesoro Dro. Pastro Coll. La premio estos aljuĝita per konkurso, kiu por la nunaj lernantoj okazos dum la unua semajno de Junio. La premiito ricevos la premion en mono aŭ en libroj, laŭ sia deziro.

«Kataluna Esperantisto» kredas esprimi la ĝeneralan senton dankante sian distingindan kaj modestan amikon por la malavara donaco per kiu li helpas la propagandon de Esperanto.

«K. E.»



Part Oficial

PROPOSICIONS PRESENTADES A L'APROBACIÓ DEL III CONGRÉS DE K. E. F.

Els abaxi sotscrits tenen l'onor de sotsmetre a la deliberació del Congrès de K. E. F. les següents addicions i modificacions al Reglament de la mateixa, que jutgen de necessitat per al millorament i prosperitat de la Federació.

Addició al paragraf segon de l'article 4.º:

«i llurs membres podran pagar les quotes per mensualitats. Pera aquest fi 'ls Presidents s'entendran amb el Caixer-Administrador directament».

Addició i reforma de l'article 5. Al primer paragraf s'hi afegirà : «i Subsecretari».

Al final de l'article s'hi afegirà : «El carrec de Caixer-Administrador serà

permanent. El que 'l desempenyi continuarà en el carrec fins a ordre de la Junta, que farà ratificar pel proxim Congrès.»

Supressió en l'article 7.^o de l'apartat : «Els individus del Comitè podran esser reelegits tant sols un cop.»

Barcelona, 10 de maig de 1912.

J. AMADES

Ab el fi de que la K. E. F. puga presentar-se en sos actes externs amb lo lluïment corresponent a sa obtinguda importancia, se proposa que la K. E. F. adquireixi una Senyera.

DRO. JOAKIMO COLL, PASTRO

En tiu ĉi numero estas entenata aliĝilo al nia Internacia Kongreso en Krakovio. Detalojn pri ĝi niaj legantoj trovos en la oficiala Gazeto de la Kong. «Pola Esperantisto».



Lingvaj demandoj

DANUBO, responde al ni, persistas en tio ke *komisio* estas sufiĉe bona por signifi «aro da komisiitoj» aŭ pli bone «Komisiitaro», kaj ni devas persisti ankaŭ en nia opinio, ke *komisio* signifas agon kaj ne povas montri personon nek personaron, tute same kiel *sendo*, ne povas signifi *senditaro* 'n. Inter la ago kaj la *afero*, kiu ricevas la agon ekzistas ofte en la homa penso tre malaltaj muroj; tial manĝo-manĝaĵo, sendo-sendaĵo pafopafajo.... povos iafaje uziĝi unu aŭstataŭ la alia («ke ŝi donu al ŝi trinki» La Feino); sed la muroj estas ĉiam tre altaj inter la ago kaj la *persono* kiu ricevas ĝin : *kondamno* neniam vekos ĉe ni ideon de *kondamnito*, *mortigo* neniam eĉ signifetos *mortigiton*. Neniam eĉ kun la plej granda bonvolo la vorto *Komisio* pensigos nin pri personoj komisiitaj. La klarigo, ke ĝi substantivigita per la finiĝo *o*, ne plu estas verbosenca, kiel okazas kun *krono*, *broso*, k. t. p.» ŝajnas al ni tute ne akceptinda, ĉar *kron'* kaj *bros'* estas radikoj kiuj montras aferon, dum *komisi'* estas radiko, kiu montras agon. La Komparo kun tiuj radikoj ne estas trafita.

Ni vane traserĉis en la Fundamento la akuzativojn *kosta*, *data*, *agodaŭra*, k. t. p. En la ekzercoj montritaj de DANUBO ni vidis uzadon de akuzativo anstataŭ prepozicioj kaj nenion plu. Laŭ nia modesta opinio paroli pri tiaj akuzativoj kaj aserti ke ili troviĝas en la Fundamento, estas eraro. Ĉi kondukus nin al la akuzativoj *restadaj*. («Loĝi Barcelonon»), *spacaj* («longa tri metrojn»), *disputaj* («batali iun»), *situaciaj* («surstari monton») kaj al tiom da akuzativoj, kiom prepozicioj povas esti aŭstataŭitaj! Nomi *agodaŭra* la akuzativon de la jena Fundamenta frazo («li staris tutan horon apud la fenestro») ŝajnas al ni ŝerco. Danĝera ŝerco; ĉar se ni akceptas kiel fundamentajn tiajn akuzativojn ni fine opinios eraraj la esprimojn «li staris dum tuta horo» «en la unua de junio» «po tri frankoj» «je tri metroj», k. t. p. Enkonduko de novaj vortoj eble estas danĝera, sed enkonduko de novaj reguloj.....!!! Pripensu niaj samideanoj de DANUBO!

Sro. Johano Rosals, Portaferriŝa, 30, Barcelona. Deziras interŝanĝi marajn riverajn aŭ terajn konkajojn.

Reglament de la Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer. — Queda constituïda amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon. — L'objecte de la «F. C. d'E.» es l'unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin als esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

Art. tercer. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un Reglament especial interior publicat pel cos de redacció i previa acceptació del Comitè Directiu.

Art. quart. — La «F. C. d'E.» constarà únicament de membres individuals, que contribuiran al seu sosteniment amb la quota mínima de TRES ptes. anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grup podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que 'ls membres individuals.

Adició aprovada en el Congrés de Tarragona. — Els Presidents dels grups aderits formaran un Consell Consultiu de la «Federació», ad el qual podrà dirigir-se 'l President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en que 'u cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació» sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en lo que fóra de desitjar per a la millor marxa de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

Art. quint. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vice-president, Caixer-administrador de la revista, Vice-caixer-administrador i Secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista.

Art. sisè. — Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son carrec: recollir les quotes dels federats, fer les comunicacions necessàries per als efectes del article segon i demés assumptes del regim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre 'l Comitè Directiu i els seus representants.

Adició aprovada en el Congrés de Tarragona. — Els delegats podran retenir-se, si 'u creuen

convenient, en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

Art. setè. — El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys una vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assamblèa o Congrés general, en el qual, previa ordre del dia, se donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà 'l lloc on agi de celebrar-se el vinent Congrés o Assamblèa, se nomenaran els individus que agin de formar el Comitè per al següent exercici, i s' discutiran les proposicions que agin sigut presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assamblèa, i incloses en l'ordre del dia. Els individus del Comitè podran ésser reelegits tant sols un cop.

Art. vuitè. — El Comitè estarà facultat per crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les Juntes de les quals seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

Art. nonè. — Tots els acords de les Assamblèes i Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

Art. desè. — Les esmenes que vulguin fer-se en aquest Reglament auran de presentar-se en temps convenient per ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podran ésser discutides i aprovades en les Assamblèes o Congressos generals.

Art. onzè. — La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la catalana en les Assamblèes.

Art. dotzè. — En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.», els fondos existents, o que resultin de la liquidació, passaran a la «Centra Oficejo», domiciliada a París, per a la propagació de l'Esperanto.

Article transitori. — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Sabadell, carrer de Gracia, 12.

Per la Comissió Organitzadora: Domenech Serdà, Joan Piferrer, Antoni Martí, J. Camps, Agustí Badia, Santiago Puigbonet i Joan Romeu.

Aprovat, en data del 14 de febrer de 1910, pel senyor Governador Civil de Barcelona.

Hi ha un sagell que diu: *Gobierno Civil de la Provincia de Barcelona.*

FEDERACIANOJ!

Neniu manku en Terrassa la 29^{an} kaj
30^{an} de Junio okaze de la

III^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio ❧ ❧

Ni iru tien por

Labori por nia Nacia Federacio!

Frate kunveni!

Festi la poeton, kiu gajnis la Naturan
Floron!

Propagandi nian karan ESPERANTO!

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : Frederich Pujulà

Sek. de Red. : Joseph Grau

SENPAĜA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *Katalunaj ĉjemeridoj.* —
III^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federa-
cio. — *Silento*, F. Pujulà. — *Bibliografio*, Tamen. —
Enlanda Movado. — *Kongresoj kaj Ekspozicioj.* —
Oficiala Parto. — *Korespondado.*



JARO III^a

Julio-Aŭgusto 1912^a

N^{roj} 7-8 (28-29)

Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al

"Kataluna Esperantista Federacio"

Esperanta Semo.	Sabadell
Nova Semo	Reus
Fratega Kunigo	»
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto.	Barbarà del Vallès
Olot Stelo	Olot
Lumon.	Terrassa
Casino del Comercio	»
Esperantista Junularo.	»
Esperanta Juneco	Barcelona
La Rondo.	»
Esperanta Fakoj (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Ciam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Frateco	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo.	»
Unió Catalanista	»
Novan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo.	»
Evolucio	»
Universala Frateco	»
¡Supren!	»
Esperanta Aŭroro	»
Esperanta Racionala Grupo.	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Laboro Esperanta	Vilanova y Geltrú
Esperantista Grupo.	Mataró
Kamparo	S. Perpetua de la Moquda
Fratego	Vendrell
Esperantista Amikeco.	Manlleu
Esperanta Amo.	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Esperanta Amikaro	Banyolas
Iherda Espero	Lleyda
Fratego	S. Feliu de Guixòls
Gerona Esperantista Ligo	»
Badalona Stelo	»
Paco kaj Amo	Badalona
	Palafrugell

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : FREDERICH PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEPH GRAU

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO: *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Katalunaj ejemeridoj*. — III^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio. — *Silento*, F. Pujulà. — *Bibliografio*, Tamen. — *Enlanda Movado*. — *Kongresoj kaj Ekspozicioj*. — *Oficiala Parto*. — *Korespondado*.

PRI...

NIA REDAKCIA SEKRETARIO

DE tiu ĉi momento, Sinjoro Jozefo Grau plenumos la oficon de Sekretario de «Kataluna Esperantisto». Li estas sufiĉe konata de niaj samideanoj kaj mi povas ŝpari la prezenton. De post kiam li fariĝis esperantisto, tio estas: dum la V.^a Internacia Kongreso, li ne ĉesis unu momenton labori en niaj vicoj, malgraŭ la milita servado, kiu ofte retenis lin malproksime de ni. En Ilerdo (Lleyda) lia nomo restos por ĉiam nedisigebla de la unuaj paŝoj de nia lingvo. Tre amata de siaj estroj pro sia inteligenta laborado en la Regimenta Oficejo, li kun kapitano Sro. Melóns gajnis al nia movado aron da oficioj de la Hispana Armeo, kiuj aliĝis tuj al nia Federacio. En la lastaj jaroj, Sro. Grau tiel multe perfektigis en la uzado de nia lingvo, ke li estas nun unu el la plej bonaj esperantistoj en Katalunujo. Lia inteligenteco, lia kono de la tekstoj de Zamenhof, kiujn

li scias parkere dank'al privilegiita memoro, kaj lia fervoro por la Fundamento estas garantio por ni ĉiuj.

Du kaŭzoj incitis nin inviti nian amikon akcepti lokon en nia redaktejo : bezono kaj kompansemo. Bezono : la laboro por nia gazeto estas tiel granda, ke ni estis devigataj voki al ni helpantojn. Aliflanke, nia deziro, tiel por la gazeto, kiel por la federacia organizaĵo estas kiel plej eble dividi la laboron, ĝis atingi mekanikan funkciadon ĉe ĉiu organo de nia Asocio. Ju pli nia Federacio malvolviĝos, des pli ni devas klopodi, ke ĉiu estu *utila* al ĝi, sed ankaŭ, ke neniu estu *necesa*.

Kompensemo : Sinjoro Grau, gajnis tiom da premioj, kaj aŭdis tiom da aplaŭdoj en la Festo de la Floraj Ludoj, ke estas preskaŭ juste kompensi lian gloron per la kruceto de redaktoro de gazeto, kiu, per rifuzo de originaloj kaj korektado ĉe la akceptitaj, havigos al li areton da *bonvolemaj amikoj!*

Li volos pardoni, ke mi ĝenis lian modestecon per miaj vortoj. Ili estis merititaj, kaj ili estos la lastaj. Post lia eniro en *Kataluna Esperantisto*, la perdo de miaj laŭdoj estas fermita por li.

FRED. PUJULÀ



Katalunaj efemeridoj

JULIO

- 1 1908. — La kataluna ĵurnalo «Empordà» el Figueres malfermas esperantan rubrikon redaktotan de Sro. Delfi Dalmau.
- 2 1908. — Sro. Rosals faras paroladon pri Esperanto en Figueres.
- 3 1908. — Sro. Coll y Calvet malfermas kurson en Manlleu.
- 5 1908. — Solena inaŭguracio de la Grupo de *Vilassar de Mar*. Dua kunveno de delegitoj de Katalunaj Grupoj en Vilassar por la leĝa starigo de la «Kataluna Esperantista Federacio».
- 21 1909. — Kunveno en Vallvidrera de pli ol 300 esperantistoj por festi la datrevenon de Esperanto.
1910. — Mortas en Sabadell niaj junaj samideanoj Sroj. Camps kaj Sanllehi.
- 28 1908. — La kataluna ĵurnalo «La Veu de Catalunya» malfermas ĉiutagan esperantan rubrikon redaktotan de Sro. Fred. Pujulà (*Tamen*).
1909. — Aperas la Kataluna ŝlosilo.
- 30 1911. — Parolado de Sro. J. Grau en la Kazino «Nuevo Apolo» en Badalona.
- 31 1910. — Teatra prezentado en Grupo *Supren* en Barcelono, okaze de la inaŭguro de standardo. («Vivu Esperanto» «La Renkonto» «Edziĝo malaranĝita»).

III^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Por bone montri la gravecon de nia III^a Kongreso sufiĉos diri du vortojn pri la IV^a. Tio povas ŝajni strange kaj tamen, nenio estos pli taŭga kaj pli ĝusta. Se ni konsideras, ke du gravaj urboj, Reus kaj Olot, diskutis inter si, kiu el ili devos loĝigi kaj gastigi nian IV^a; ke la reprezentantoj de tiuj urboj parolis ne nur en la nomo de la lokaj esperantistoj, sed ĉefe de la provincestroj, urbestroj, urbestraĵoj, prezidantoj de Komercaj Ĉambroj kaj specialaj societoj; se ni konsideras tion, ni devos nepre konkludi ke la sola preparado de nia III^a jam bruis tra la lando kaj antaŭvidigis gravan sukceson de nia esperantista movado. Se al tio ni aldonas la konatan fervorecon kaj laboremon de niaj samideanoj el Terrassa, kies grupo «Lumon» prezidata de Sro. Alavedra estas ekzemplo de esperantista entuziasmo, kaj la gravan decidon de la Terrassa'a Urbestro, doni la nomon de Dro. Zamenhof al placo de la Kongresa Urbo, oni komprenos, ke ni estas fieraj de nia III^a, kiu varmigis ankoraŭ pli la entuziasmon kaj fervoron de la katalunaj esperantistoj.

29^a DE JUNIO

ALVENO

De frumatene la stacidomo de Terrassa pleniĝis de la amaso da terrassanoj, kiuj atendis la alvenon de la esperantistoj. En la placo antaŭ la stacidomo restis granda aro da tartanoj¹ portintaj en la kongresurbon la samideanojn loĝantajn en la proksimaj vilaĝoj. La urba muzikistaro kun belaj uniformoj de parado atendis ankaŭ. La aŭtoritatuloj kun Sro. Pujulá, la samideanoj el Olot, la raportistoj de la barcelonaj ĵurnaloj, kaj de la loka gazetaro, la reprezentantoj de la komercaj, politikaj kaj artistaj societoj, la ĥoroj de la urbo kun siaj standardoj, atendante la alvenon de l'ekspresa vagonaro staradis sur la irejoj.

En la stacidomo de Barcelono estis rimarkebla la nekutima svarmado de verdasteluloj veturontaj al Terrassa. Ni vidis tie reprezentantojn kaj delegitojn de ĉiuj barcelonaj grupoj kaj multenom-

1. Katalunaj veturiloj.

brajn esperantistojn, kiuj enlokiĝis en la vagonojn. Jam ni ekveturis, kaj trakuras tra la bela pejzaĝo de la urbaj ĉirkaŭaĵoj. En ĉiu fako la interparolado estis tre animita; oni gaje babilis, kiam veninte en la duan stacion ni sciigis pri tio, ke la antaŭa vagonaro, plena ankaŭ kiel la nia de kongresanoj, rompiĝis apud Serdanyola, kio prokrastas nian foriron. Feliĉe okazis nenia katastrofo, kvankam tia estis laŭŝajne la celo de la rompiĝinta vagonaro, kiel supozis kelkaj el niaj kunfederacianoj, kiuj konsideradis, ke veturado per fervojaj vagonaroj, venkita kaj postlasita de aŭtomobiloj, submaraj ŝipoj kaj flugmaŝinoj, protestis tiamaniere kontraŭ nia granda progresemo por venĝi sin je la malagrablaĵoj de la malvenko.

Post iom longa atendo, fine ni alvenis en Terrassa'n. Brua aplaŭdado kaj gaja muzikludado salutas nin. Nia prezidinto Dro. Bremon, pastro Coll, kaj multaj aliaj samideanoj estas salutataj de la Urbestro Sro. Ullés, de la provinca deputito Sro. Alegre, de la urbkonsilantoj, de la reprezentantoj de ĉiaj societoj, de la komitatanoj de «Lumon», k. t. p., k. t. p.

Manifestacio organiziĝas. La urba muzikistaro, sekvata de la aŭtoritatuloj kaj de niaj pioniroj, antaŭiras. Poste marŝas grandega aro da samideanoj, kiuj starigas entuziasme la grupajn standardojn, dum tiuj de la ĥoraj societoj vidiĝas per siaj seriozaj nuancoj ĉe la fino de la irantaro. Tio estas bela spektaklo, kiun filmistoj fotografas. De tempo al tempo aŭdiĝas aplaŭdadoj : simpatia elmonro de la esperantemaj urbloĝantoj, kiuj kun afabla mieno salutas kaj bonakceptas nin.

AKCEPTO

La bele ornamita Urbodomo pleniĝas de la kongresanaro; niaj verdaj flagoj, kiujn oni metas ĉe la balkono apud la katalunan standardon, ricevas varman salutaplaŭdon de la terrassanoj starantaj en la placo.

En la kunsida salono akceptas la kongresanojn lia Urbestra moŝto Sro. Ullés kaj la urbkonsilantoj Sroj. Busqué, Llofím, Navarro, Salvans, Font, Fábregas, Albiñana kaj aliaj ankoraŭ, kies nomojn ni ne povis bedaŭrinde noti.

La Urbestro per mallonga kaj bela parolado salutas nin kaj konstatis ke Terrassa, urbo vere progresema, sin sentas fiera gastigi la esperantistojn. Plej alte li laŭdas la celon de esperantismo kaj deziras ke ni povu konservi longe bonmemoron pri Terrassa. Varna aplaŭdado kronas liajn parolojn.

Dro. Bremón dankas afable lin en la nomo de ĉiuj katalunaj

esperantistoj kaj salutas kore la urbon Terrassa, kiu tiel gastame akceptas la esperantistaron. Denove aplaŭdado aŭdiĝas longtempe, kaj ĉiuj ni iras al la korto de l'Urbdomo, kie la Urba muzikistaro ludas nian himnon «La Espero», ĝusttone kantatan de la laboristaj ĥoroj. Oni ripetis ĝin, kaj la duan fojon ĝin entuziasme kantis ĉiuj kongresanoj.

MALFERMO DE LA KONGRESO

Ni forlasis la Urban Domon kaj aliris al la belega sidejo de la «Komercesta Kazino», en kies granda festosalono okazis la malferma kunsido de la III^a Kongreso Kataluna.

Je la 10 kaj duono matene la Urbestro Sro. Ullés malfermas la Kongreson per kelkaj vortoj, dezirante ke ĝi estu plej fruktodona al la K. E. F. Krom li, prezidas ankaŭ la kunsidon, la urbkonsilantoj kaj la reprezentanto de la ekonomia moŝto de Terrassa. La salono estas tute plena de kongresanoj kaj terrasanoj, kiuj volis esprimi tiamaniere la simpatian kiun la urbo havas por nia ideo.

Moŝto la Urbestro transdonas la prezidan lokon al Dro. J. Bremon, kiu donas la parolon al la sekretario Sro. Pellicer por legi la raporton de la agado de K. E. F. dum la intertempo 1911^a-12^a.

Sro. Pellicer dediĉas unue rememoron al la formortintaj samideanoj kaj poste pritraktas la diversajn aferojn pri kiuj niaj kunfederaciaj jam sciiĝis per K. E.: ŝanĝo de kongresurbo, ekzamenoj, devizo de K. E. F., elekto de redaktoro de K. E., Konsulta Komitato, Havena Komisiono, k. t. p.

La konciza kaj klara raporto de nia sekretario gajnigas al li longan aplaŭdon.

Post la legado de la sekretaria raporto, Dro. Bremon stariĝas kaj komencas legi sian jenan belan paroladon.

Karaj kunfederaciaj:

Mi konfesas al vi, ke la elekto de la temo traktota en mia malferma parolado ĉe la 3.^a Kongreso de Katalunoj esperantistoj, pensigis min longtempe. Oni tiom diris pri propagando, pri organizo de la esperantistaj rondoj, pri Esperanto kaj Komerc, Esperanto kaj Scienco, Esperanto kaj Ruĝa Kruco k. t. p., k. t. p., ke por diri al vi ion novan rilate tiujn ĉi punktojn, mi devus longe serĉi, kaj longe mediti, perdante tiamaniere kvanton da tempo, kiun mi urĝe bezonas por aliaj aferoj.

Unu temo, tamen, konstante kaj persiste venis en mian cerbon: Vane, mi klopodis por forigi ĝin for de mi: kun nova persisteco ĝi

revenis, invitante min al ĝia disvolvado. Mi rezistis ankoraŭ, mi rezistadis, ĉar ne estis por mi kaŝitaj la malfacilaĵoj, kiujn ĝi entenas: mi ne ignoris ke eble mi povas diri vortojn, kiuj ne plaĉos al ĉiu; tamen, malgraŭ tiuj ĉi motivoj, mi prenis la decidon disvolvi en tiu ĉi momento mian delonge pensitan kaj meditan temon, petante al vi iom da atento, kiun certe vi, karaj amikoj, havos dum duono da horo.

Alia kaŭzo puŝis min al sama celo: tiu ĉi fojo estas la dua kaj lasta, kiam mi havas la honoron prezidi kongreson de Kataluna Esperantista Federacio. Post ĝia okazigo, mi sentos la bezonon enŝlosi min hejme, kie profesiaj aferoj min atendas: dum ĉirkaŭ dek jaroj mi partoprenis la propagandon de Esperanto en nia lando, kun la entuziasmo kuŝanta nur en koroj, kiuj kiel la mia estas plene konvinkitaj pri la boneco de la ideo, kiun ni defendas: dum dek jaroj mi havis la fervoron de apostolo, kaj centon da fojoj mi prenis la plumon por defendi atakon al nia lingvo, kaj centon da fojoj mia buŝo malfermiĝis por konvinki la homojn pri la bonoj de la lingvo internacia...

Ne restis, feliĉe, senfrukta la apostola periodo en kiu mi ĝis nun partoprenis. Pruvoj? La granda kunveno kiun ni nun faras, la fortikeco de la K. E. F., la disvastiĝo de Esperanto tra nia tuta lando.

Tiuj ĉi faroj, plene konvinkantaj pri la rikolto, kiun ni nun, post jaroj da semado, kolektas, montras al ni, unuaj esperantistoj de Katalunujo, ke ĝi estas pli granda ol ni mem esperis, kaj donas al mi similan feliĉon al tiu, kiun sentas patro kiu vidas siajn filojn maturaj, kapablaj por eniri en la batalojn de la vivo kun certeco pri la atingota triumfo.

Mia foresto de la esperantista kampo ne signifos, ke mi ne plu min okupos pri esperantaj aferoj: mi estas dankema, kaj senpartie parolante mi devas konfesi, ke malgraŭ la etaj malĝojoj, kiujn en ĉiu manifestacio de la socia vivo oni renkontas, kaj Esperanto ne konstituas rilate tion, escepton, — mi havis tiom da plezuroj en ĝi, ke ili forgesigas al mi la malplezurojn. Per Esperanto mi konatiĝis kun personoj kiuj fariĝis por mi veraj amikoj; per Esperanto mi povis koni literaturojn ĝis nun tute fermitajn al homo; per Esperanto mi povis travojaĝi landojn, kies lingvojn mi ne konas, kun pli da sukceso kaj kun pli da profito ol riĉulo kiu devas konstante meti sian poŝon al dispono de gvidistoj kaj interpretistoj; kaj ĉio tio ĉi estas aferoj kiujn oni ne forgesas facile.

Tio signifas, ke se iam la esperantistaro el mia lando konsiderus mian kunlaboradon necesa por sia savo, denove, kun la entuziasmo

kiun mi havis en la unuaj jaroj de esperantistiĝo, mi oferus mian modestan kunagadon.

Kaj, jen mi, tion dirinte, eniranta en la disvolvadon de la temo promesita. Mi intencas paroli pri «Esperanto kaj Katalunujo» t. e. pri la lingvo internacia en siaj rilatoj kun la karaktero, homoj, lingvo patriotismo, literaturo k. t. p. de la lando en kiu ni naskiĝis. Vere, multe oni priparoladis pri tio, sed, el la multo dirita, nenio restis skribita : pli ol polemikojn sur la papero, oni havis buŝajn diskutadojn rilate mian temon. Pro tio mi deziras antaŭ ol forlasi la prezidantecon de K. E. F., kiun mi nemeritite okupis dum du jaroj, esprimi miajn opiniojn.

Kelkaj sinjoroj, kies celo estas verŝajne kritiki, ne agi, kiam oni fondis la unuan societon esperantistan en nia lando, protestis kaj kriaĉis tial ke la societo estis krom esperantista, kataluna. La unua organizaĵo esperantista de la lando ne forgesis ke ĝi naskiĝis en kataluna lando, ke katalunoj estis ĝiaj anoj, kataluna la urbo en kiu ĝi elburĝonis..., kaj kompreneble ĝi aldonis al sia esperantista karaktero, sian katalunan animon. Kaj tio ĉi, kio estis nura pruvo de logiko..., ŝajnis al kelkaj (tre malmultaj feliĉe) politika elmontro, politika deflankiĝo de la societo. Kaj komenciĝis la periodo dum kiu la ĉe ni famekonata frazo «fari politikon» ekfloris en katalunaj lipoj : ni estas tre malproksime nun, de tiu epoko, feliĉe por ĉiuj, sed la frazo, kaj la argumentoj, kiuj ĝin subtenis, faris prozelitojn en iuj katalunaj rondoj. «Ĉu Esperanto ne estas lingvo kies celo estas fratigi la tutan homaron? Kial do dividi ĝin en ankoraŭ pli malgrandaj rasoj kaj landetoj?»

«Ni estas pacaj batalantoj; ne miksu do politikon kun Esperanto, se vi ne volas ke malpaco venu al ni».

La solidecon kaj fortikecon de tia argumentado, ĉiu kataluno sciis ĝuste taksi kaj mezuri, se ni konsideras ke post tiu periodo de semado, oni rikoltis *Federacion Katalunan* kun pli da 50 grupoj aliĝintaj kaj ĉirkaŭ 500 membroj izolitaj.

Sed ĉu vere ni miksis politikon kun Esperanto? Lasu al mi fari kelkajn konsiderojn pri tiu ĉi punkto.

Katalunujo, sentis en la modernaj tempoj fortan deziron de reviviĝo : intensa volo skuadas ĝin por la akiro de perditaj rajtoj: ĝia lingvo, ĝia propra lingvo, tute diferenca kaj tute sendependa de la hispana, forgesita por literaturo kaj altaj uzoj dum jarcentoj kaj uzita de la laborista popolo kaj mezklasa burĝaro revivas denove kaj eniras en la koncerton de vivantaj idiomoj pruvante sian taŭgecon por ĉiu lingva afero.

Ju pli ĝi estis iam forgesita des pli ĝi estas nun amata : ju pli kelkaj registaroj kontraŭstaris ĝin, des pli la popolo ĝin estimis kaj uzadis... En la mezo de la pasinta jarcento, unuaj tagoj de la lingva revivigo kaj ĝenerale, de la integrala movado kataluna, iu registaro, volante iel bari la vojon al tiam naskiĝanta kataluna teatro¹, donis ordonon ke oni povos prezenti neniun katalunan verkon, se iu el la roluloj ne parolas hispane... La ordonon, kompreneble, plenumis la aŭtoroj, sed ne laŭintence de la leĝdonanto, ĉar de tiam la unika rolulo, kiun la aŭtoroj devigis paroli hispane sur la scenejo, estis la ridindulo de la verko : ŝtata oficisto, inspektoro de impostoj, ĝendarmo.

Kiel esterordinare estas do, ke la unuaj esperantistoj, kiuj krom esperantistoj estas katalunoj, estimu sian lingvon kaj volu per respekto kaj amego forgesigi sian idiomon pri maljustaĵoj kaj insultoj antaŭe faritaj al ĝi de registoj malsaĝaj?

Tial ke iu societo aŭ grupo esperantista uzis la lingvon katalunan en la statutoj, en la komunikoj, en la diskutado, donante al ĝi flanke de la esperanta, karakteron *oficialan* : «ĝi faris politikon».

Tial ke iu societo aranĝis sian markon tiamaniere ke vidiĝas en ĝi la kvinpinta stelo simbolo de esperantismo — homaro, kun la kataluna standardo simbolo de katalunujo — patrujo, «ĝi faris politikon».

Nu, sinjoroj : se «fari politikon» signifas ami sian landon, respekti ĝiajn kutimojn, uzadi ĝian lingvon : tiam jes, la societoj «faris politikon», sed tiu «politiko» ne povas esti kontraŭa al la fundamentoj de l'esperantismo, ĉar se oni konsiderus ĝin tia en la kampo esperantista, se *pro amo* al artefarita lingvo, ni devus kaŝadi kaj malbonami nian gepatran, ni esperantistoj, — kaj ne estas tiu ĉi fojo la unua, kiam ni diras tiajn vortojn — kiuj krom esperantistoj estas katalunoj ĵetus kolere for el ni la verdans telon, simbolon de ideo kiu juĝas kontraŭaj la amon al la homaro kaj la amon al la patrujo, la amon al la lingvo homa kaj la amon al la lingvo gepatra.

Feliĉe, ne estas tia la penso de la esperantistaj rondoj, kaj ni devas sincere konfesi, ke ni katalunoj ĉiam trovis la plej bonajn disponojn en la Oficialaj Institucioj de la Esperantismo : la Lingva Komitato — reprezentantaro de ĉiulingvaj kaj ĉiulandaj eminentaj esperantistoj — enhavas de post ĝia fondigo reprezentantojn de la Kataluna Lingvo : en ĉiu Internacia Kongreso estas akceptita dele-

1. La nuna kataluna teatro havas verkojn de tre granda valoro. Kelkaj estas tradukitaj alilingven, nome *Terra Baixa* (10 lingvoj) *Els Vells, Les Garces* (francan) *Misteri de Dolor* (hispanen, esperanten) k. t. p.

gito de nia lando, kaj la nomo Katalunujo estas ĉies konsiderata kun respekto, kun simpatio, kun admiro.

Nu : se la Oficialaj Institucioj de la Esperantismo donas al ni la ekzemplon de respekto al nia lingvo, kion malpli povas fari niaj societoj, ol sekvi ilian ekzemplon kaj agi laŭ ili agas? Ni dividas egale nian estimon, por la natura lingvo kaj por la artefarita kaj, kiom da fojoj ni devis defendi Esperanton kiel katalunoj, kaj katalunan lingvon kiel esperantistoj!!

Ne antaŭ longe, okaze de la Reĝa Ordonon permesanta la instruadon de Esperanto en ĉiu Universitato, kataluna ĵurnalo, kiu cetere ĉiam estis tre favora al nia movado (La Veu de Catalunya), rimarkigis en ĉefartikolo la kontraston, ke de nun oni povos instrui en la Barcelona Universitato en artefarita lingvo, kaj tamen malgraŭ diversaj petoj de katalunoj, la pordoj de la Universitato estas fermitaj al kataluna lingvo. La artikolo ne estis atako, sed plendo, kaj kiel kataluno, ni plendas ankaŭ ke la registaro hispana, malpermesas la instruadon en kataluna lingvo en la Universitato — sed se la plendo estus fariĝinta atako por Esperanto, mi havis jam pretan artikolon plenan de argumentoj en defendo de la Zamenhofa lingvo, kiun mi ne devis uzi.

La esperantistoj de Katalunujo amas egale ambaŭ lingvojn, kaj la amo al unu ne malfortigas tiun al la alia : jen la tuta «politiko» kiu kuŝas en tiu ĉi afero.

La lingvoj de malvastaj landoj, kiel la nia, kaj la landoj mem, povas profiti Esperanton por siaj apartaj interesoj. La literaturo speciale, havas en la lingvo internacia la plej taŭgan rimedon por sia diskonigo : oni tradukas multe el la germana al la franca, el la franca al la angla, el la angla al la hispana, sed oni preskaŭ nenion tradukas el la vaska al la angla, el la kroata al la franca, el la kataluna al la germana. Kiam ni scias ke iu ajn verko el nia literaturo estas tradukita alilingven, ĉiu ĵurnalo enpresas la noton kun ĝojo, kaj oni festas la aŭtoron kaj tradukanton. Kiel prave diras talenta kaj esperantema verkisto, «neniu rezignas ke liaj verkoj estu nur legataj en rondo familia : oni skribas por la homaro kaj oni deziras ke la verko transiru la limojn de la lando». El nia verkmila literaturo, nur dudeko da libroj meritis la honoron de tradukado : oni ja facile komprenas ke ne multe da germanoj, angloj aŭ francoj dediĉos kaj uzos sian tempon por la lernado de lingvo ne grandnombre parolata, kies praktikaj rezultoj kompare kun la «grandaj lingvoj» estas sensignifaj: kion signifas 4 milionoj de katalunlingvanoj, en komparo kun 60 milionoj de francparolantoj; kion reprezentas la negranda litera-

turo de malvasta popolo, flanke de angla aŭ germana literaturo?

La homo, praktika ĉiam, fariĝis pli pozitivistan ankoraŭ en la nuna epoko, kaj malmultaj, nur tre malmulte da ili lernas la malgrandajn lingvojn : katalunoj, vaskoj, kroatoj, bohemoj, finnoj eĉ hungaroj, danoj, norvegoj havas en Esperanto la savilon, la diskonigilon de sia literaturo, kaj ankaŭ siaokaze la aŭdigilon de siaj plendoj aŭ ĝemoj.¹

La kataluna literaturo profitis jam el tiu progreso, kaj kelkajn el niaj verkoj oni konigis en eksterlando dank'al Esperanto. «Mistero de Doloro» de Gual : «La Patrino» (*La Mare*) «La Ĉiama kantaĵo» (*La Cançó de sempre*) «Folioj el la Vivo» (*Fulls de la Vida*) de Rusiñol. rakontoj kaj fragmentoj el Verdaguer, Guanyabéns, Maragall, Ruyra, Guimerà, Victor Català, Apeles Mestres : eĉ kun rakonto de Apeles Mestres okazis, ke ĝi tiom plaĉis al rusa esperantistino, ke ŝi petis permeson por traduki ĝin el Esperanto, rusen, kaj ĝin publici en rusa gazeto. La tradukintino bonvolis sendi du numerojn de «Kostroma Gazeta» enhavanta la rakonton, kies unu numero konservas l'aŭtoro, kaj l'alian la tradukinto : kiel oni vidas, Esperanto ektaŭgas por io al la kataluna literaturo, kaj taŭgos pli ankoraŭ post kelke da tempo.

La facileco per kiu oni ellernas Esperanton, la kuraĝemo de multaj (junuloj speciale), kaj la stulteco de kelkaj, povus esti kaŭzo de diskredito por nia literaturo se «manio de tradukado» grava mal-sano, kies unuaj simptomoj ekaperis en nia lando, disvastiĝus.

Esperanto estas ja lingvo tre facila lernebla : sed en Esperanto kiel en ĉiu lingvo ekzistas du lingvoj; tiu vulgara, kiu taŭgas por «peti al kelnero rostitajn terpomojn», kaj tiu literatura, nobla, nur uzata por altaj celoj : la unua estas tre facile akirebla; kelkaj semajnoj, nur tagoj sufiĉas por ĝin scii : la alian nur oni akiras kaj plene posedas post jaroj de tralegado de la plej bonaj verkoj, post longa pristudado kaj interkomparo de multnombraj stilistoj.

Nu, ĉe ni, povas okazi ke iu konfuzu ambaŭ lingvojn, kaj sciante nur la vulgaran, li sentas sin kun forto por traduki iun verkon katalunan : en tia okazo, ve! por la verko! por ĝia aŭtoro! por li mem!! Verko malbone tradukita povas supozigi ke ĝia malboneco dependas de si mem, aŭ de l'aŭtoro kiu ĝin skribis, kaj tiam, oni ja ne faris grandan servon al nia literaturo : tradukinto malbone farinta sian metion riskas severan juĝon de la «Studkomisio pri ĉiulanda ver-

1. Vidu : «Slovakoj kaj Magiaroj».

karo», kiu metas la punktojn super la i'oj, kaj metas en grava danĝero sian propran reputacion por aliaj tradukoj.

Tion devas mediti egale aŭtoroj kaj tradukantoj : la unuaj ne donu siajn verkojn al la tradukado de la unua alveninto; la dua ne entreprenu ian laboron se ĝi estas supera al iliaj fortoj.

Mi finas tiu ĉi parton de mia parolado, notante la simpation kun kiu ĝenerale la katalunaj verkistoj rigardas Esperanton : unu el ili Ruyra, (unu el la plej bonaj prozistoj) estas federaciano : aliaj kiel Guanyabéns kaj Puig Ferrater estas esperantistoj praktikaj: la restantaj, esperantemaj. Certe, antaŭ nelonge, unu literaturisto vomis en ĵurnalo serion da insultoj kontraŭ la esperantistoj, sed apenaŭ ili havis tempon desalti de la kamelo por vipi la hundon kiu bojis al la karavano, ke alia verkisto, sur ĉiutaga ĵurnalo, pledis en defendo de la lingvo, akre riproĉante tiun malnoblan agon. Apenaŭ la esperantistoj pretiĝis por sia defenso, literaturisto estis jam rompinta lancon en ilia honoro kaj estimo.

Kaj mi transiras al la tria kaj lasta parto de mia tezo.

Tute same kiel Esperanto povas taŭgi al katalunoj en defendo de la lingvo kaj literaturo katalunaj, povas taŭgi ankaŭ en aferoj pri patriotismo. La popoloj subpremitaj, neliberaj, bezonas iafoje rakonti la maljustaĵojn kiujn ili suferas de la popolo reganta : ni estas malproksime ankoraŭ de tiu tempo songita de nia kara Mastro mem, kiam «ne plu ekzistos sur la tero popoloj mastrantaj kaj popoloj mastrataj», kaj dume, kio pli bona ol Esperanto por diskonigi tra la mondo civilizita staton de opinio de subpremata lando? Ni ja scias ke multfoje oni atingas neniun praktikan tuĵan rezulton. Kiam antaŭ jaroj okazis la striko de lernantoj en germana Polujo oni nenion atingis malgraŭ la diskonigo de la fakto : sed tio kreis atmosferon de simpatio ĉirkaŭ la pola popolo, ekstreme favora al ĝiaj interesoj.

Mi bedaŭras ke Pastro Parker, ne atingis ankoraŭ sian celon; sed la kulpo apartenas al li mem grandparte. Jen la intenco de tiu entuziasma samideano irlandano:

«Formi ligan tutmondan por la defendo de malvastaj landoj.»

Post kelkaj artikoloj publikigitaj en Belga Esperantisto klarigante sian projekton, li sukcesis kunvenigi en la Kongreso de Antverpeno, kvardekon da esperantistoj apartenantaj al malvastaj landoj : irlandanoj, poloj, finoj, kroatoj, hungaroj, katalunoj, bohemoj k. t. p. Oni entuziasme aprobis la Parker'an projektis, oni decidis fondi la ligan, oni konsentis pri ĉio... kaj tamen la ligo ne estas stariĝinta. Kial? P. Parker povas respondi.

Kaj ĉu tion ĉi, kio povis esti farita tre bone per Esperanto, faros per franca lingvo la «Office Central des Nationalités», antaŭ nelonge kreita en Paris? Bedaŭre!

Kaj nun, vi devas pardoni min, ke tiel longe parolante pri katalunaj aferoj, mi forgesis, ke la unuaj kvalitoj de nia lando estas la sobereco en la vortoj kaj la emo al la praktiko.

Ni lasu do nun la vortojn, kaj eniru en nian taskon kun la fratemo kaj harmonio, kiu jam karakterizis niajn antaŭajn Kongresojn.

JASCINTO BREMON

Grandaj aplaŭdoj, kiuj jam aŭdigis diversfoje dum la tralego, kronis la finon de la parolado de Dro. Bremón.

La delegitoj de la diversaj grupoj salutas poste la Kongreson je la nomo de sia respektiva grupo. Ili estas Sro. Manel Prat delegito de *Olot Stelo*, Olot; Sro. Joan Arnella de *Esperanta Nesto*, Barbará del Vallés; Sro. Andreu Nin de *Frateco*, Vendrell kaj *Semo*, Barcelona; Dro. Pallejá de *Montsanta Stelo*, Ulldemolins; Sro. J. Serrano de *Esperanto kaj Patrujo*, Barcelona; Sro. Lluís Farré de *Monta Grupo*, S. Llorens Savall; Ptro. Josep Casanovas de *Amo kaj Espero*, Girona; Sro. Pere Costa de *Esperanta Idealo*, Sta. Coloma de Farnés; Sro. Miquel Suriñach de *Esperantista Amikeco*, Manlleu; Sro. J. Guillomia de *Esperanta Frateco*, Barcelona; Sro. Josep Serrat de *Esperanta Amo*, Manlleu; Sro. Ferran Bori de *Esperanta Aŭroro*, Barcelona; Sro. J. Piferrer de *Esperanta Semo*, Sabadell; Ptro. Antoni Ribas de *Vika Esperantistaro*, Vic; Sro. Gustau Galcerán de *Laboro Esperanta*, Vilanova i Geltrú; Sro. J. Campdelacreu de *La Rondo*, Barcelona; Sro. Joan Gili de *Badalona Stelo*, Badalona; Sro. Josep Grau de *Barcelona Stelo*, Barcelona; Sro. Ramon Soler de *Ĉiam Antaŭen*, Barcelona; Sro. Francesc Fonta de *Ilerda Espero*, Lleida; Sro. Joan Aulina de *Esperanta Amikaro*, Banyoles; Sro. Domingo Obiol de *Tarragono Esperanta*, Tarragona; Sro. Pellicer de *Nova Semo*, Reus; Ptro. Joaquin Coll de *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj*; Sro. Joan Caparrós de *Universala Esperanto Asocio* kaj Sro. Francesc Casanovas de la *Unió Catalanista*.

Ĉiu parolinto ricevas bruan aplaŭdadon post la vortoj per kiuj li salutis la Kongreson kaj kongresanojn.

Inter la salutoj ricevitaj, kiujn la sekretario legas, estas la jenaj telegramoj:

«Gravan sukceson por la Kongreso. Gekongresanoj akceptu koran saluton. — Margarit.» «Els qui no assistim al Congrès s'hi

adherim de cor i desitjem facin bona feina i éxit. — Tarragono Esperanta.»

Aplaŭde oni akceptas tiajn salutojn.

Dro. Bremón fermis la kunsidon kaj la kongresanoj sin direktis al la placo de Saragossa por inaŭguri la tabulon, kiu ŝanĝis tian nomon per tiu de «Placo de Dro. Zamenhof.»

MALKOVRO DE LA TABULOJ EN LA PLACOJ DE ZAMENHOF KAJ MARAGALL

Sro. Ullés, urbestro, en la nomo de la urbo anoncas al la esperantistoj la propramovan decidon de la Urbestro ŝanĝi la nomon de la placo por tiel honori nian Majstron; kaj tuj li transdonas parolon al Sro. Pujulá y Vallés.

Nia pioniro eldiras belegan paroladon. Li rimarkigas, ke ekzistas en la vivo momentoj, kiam oni sentas la ĝojon esti homo; tiuj momentoj estas dum la honorado de la geniuloj; li diras, ke la surskribon de la tabulo la vetero eble viŝos kaj malaperigos, sed ke sendube ni kaj la popolo de Terrassa bone konservos en la koro la gloran nomon de nia Majstro, kiu estas plej granda simbolo de Amo kaj de Paco. Li rakontas rapide la historion de Dro. Zamenhof kaj elmontras lian pacemon kaj fratemon, kiuj, se oni ilin bone konsideros kaj ĝustestimos, faros ke oni lernu amon al Homaro, vidante la tabulon inaŭguratan.

Kvazaŭ eksplodas la aplaŭdoj, kiuj longe daŭras; kaj la entuziasmo kun kiu oni kantis «La Espero» ludatan de la urbaj muzikistoj montris la ĝojon de la terrassanoj kaj de la esperantistoj esti honorintaj, la unuaj en la tuta Mondo per tia publika pruvo de altestimo, la senmortan nomon de nia kara Doktoro.

Ja, la fakto estas rimarkinda. Terrassa estas la unua urbo, kiu tiel elokvente honoris nepereeble nian Majstron. Ke ĉiuj urboj imitu ĉin, laborema Terrassa, kaj ili formigos la gloran kronon, kiun meritas la elpensinto de nia amata Esperanto. Al ĉi, Terrassa, ĉies laŭdojn por la iniciatibo!

Post tiu raportita ceremonio, la esperantistoj estis oficiale invitatataj de la Urbestro ĉeesti la malkovron de la tabulo, kiu donas la nomon de la kataluna poeto Maragall al placo ĝis nun nomita «de la Teatro».

La Urbestro, — de la balkono de l'nova kaj bela teatro, — diras ke tiuj, kiuj plej multe meritas ke iliaj nomoj estu donataj al la urba placoj kaj stratoj estas la poetoj, ĉar ili estas la enkarniĝo de l'vera

popola animo. Maragall, kiu reprezentis per sia homamo kaj boneco ne nur la animon popolan, sed la tutan Katalunujon, meritas pli multe ol kiu ajn alia, ke lia nomo estu daŭre konservata de liaj samlandanoj. Tial, la inaŭguro de la tabulo, kiu rememorigos ĉiam pri la alte spirita poeto.

Aplaŭdado sonas, la muzikistoj ekludas marŝan kompozicion kaj ni ĉiuj disiras, entuziasme komentariante la komencon de nia III^a.

LABORA KUNSIDO

En la salono de la Urbdomo komenciĝis je la 3^a posttagmeze la unua labora kunsido, pri kiu estas raportite aliloke (Vidu paĝon 475).

SKRIBA EKZAMENO

Post la unua labora kunsido okazis en apartaj salonoj de la Urbdomo la skriba provo de la ekzamenoj, starigitaj de nia Federacio laŭ la regularo aprobita en la Kongreso de Tarragona, al kiuj devas submetiĝi tiuj personoj dezirantaj akiri ateston pri lernado aŭ profesoreco. La ekzamenantoj en tiu ĉi provo estis Sroj. Pujulá, Campdelacreu kaj Grau.

VIZITO AL INDUSTRIAJ LERNEJOJ KAJ ESPERANTA EKSPozICIO

Interesanta estis la vizito al la Industriaj lernejoj, kiun partoprenis ĉiuj kongresanoj. Ni povis konstati, ke Terrassa prave estas fiero je tiu juvelo, ĉar tia estas ne nur la konstruaĵo, sed ankaŭ ĝia enhavo. Ni travizitis ĉiujn fakojn de la lernejo, en unu el kiuj oni prezentas la Esperantan ekspozicion.

Estas ĉefe rimarkinda la multnombra kolekto de esperantistaj gazetoj, propagandiloj, k. c., kiun prezentas Sro. Amades, el Barcelono. Ĝi sola sufiĉas por alporti konvinkon pri nia agado kaj ĝia sekva triumfo al ĉiu nekredemulo. Krom ĝi ankaŭ povas fari tian servon la enhavoriĉa libraro prezentata de Sro. Rosals : ĝi estas kolekto tre altvalora, kiu konsistas el ĉiunaciaj lernolibroj, literaturaj verkoj, broŝuroj propagandaj, k. t. p.

Inter belaj ornamoj vidiĝas granda nombro da poŝtkartoj kaj leteroj intersange ricevitaĵoj de niaj katalunaj samideanoj : ĝi kompletigas la efikon de la aliaj ekspoziciaj fakoj kaj igas la viziton plej agrabla.

Fine, kaj tio altiris ĉies atenton, estas prezentata kolekto de slipoj, en kiuj per pli ol 500 lingvoj estas tradukita unu frazo el la Biblio. Eble tie, por fari pli konvinka tiun elmontron, mankis mondonaco proponita al tiu, kiu konos elemente la duonon de tiu lingvaro. Ni povas certigi, ke tiu ekspozicio estis plej taŭga por vidigi de ĉiuj la utilecon de nia helpa lingvo.

VESPERFESTO ĈE LA PROMENEJO

La Urbeŝtaro regalis la esperantistojn per agrabla festo, kiu okazis post vespermanĝo en la ĉefa promenejo. Nekalkuleble grandnombra estis la ĉeestantaro, kiu tie tre bone pasigis du horojn. La Urba muzikistaro donis belan koncerton, kaj en la intertempoj, popolaj muzikistoj ludis *sardanojn*, kiujn ĝoje dancis nia gejunularo. Ĉe la fino, granda paperbalono, sub kiu oni alkroĉis artefaritajn belajn fajraĵojn, levigis niajn rigardojn al la ĉielarko, kien ĝi perdis kvazaŭ malaperanta stelego.

Multo da kongresanoj vizitis tiam la societejojn enurbajn, kie festoj estis aranĝitaj. Baloj, koncertoj, teatraj prezentadoj allogis niajn kunfederacianojn, kaj ĉiu laŭ siaj preferaj inklinoj ĉeestis ilin. En la «Agrupació Regionalista» kie okazis bele ĉarma florekspozicio la vizitantoj kongresanoj estis oficiale akceptitaj kaj afable regalitaj de ĝia Komitato.

30^a DE JUNIO

VIZITO AL LA ROMEPOKAJ PREĜEJOJ

La arkitektura valoro de la admirindaj antikvaj preĝejoj kondukis al ili matene je la 7^a multajn artamajn samideanojn. Sro. Rossals, antaŭ ĉia rimarkindaĵo, detale konferencis esperante dum la tuta daŭro de la vizito, kiun li pliinterestigis per sia perfekta kono pri la en rapideco studataj artaj konstruaĵoj.

En la preĝejo de Sankta Petro okazis je la 8^a meso por katolikoj, kiun preĝis Pastro Planas, nia fervora Komitatano. Dum la meso Doktoro Coll eldiris en Esperanto belan predikon pri la Virgulino de l'Espero, kiu forte impresis la alestantojn.

PAROLA EKZAMENO

Je la 9^a matene, ĉe la Urbodomo, okazis la parolaj ekzamenoj antaŭ la profesoroj Sroj. Pellicer, Dalmau kaj Campdelacreu. Post

klaraj respondoj al konvena demandaro, fariĝis diplomita profesoro nia kara amiko Sro. Johano Gili, el Barcelono, kiu estis gratulata de la aŭskultantaro. Atingis atestojn pri lernado Sroj. Arturo Cases, el Barcelono kaj Johano Aulina, el Banyoles.

KUNVENO DE K. L. de K. E.

Sub la prezido de Sro. Johano Rosals okazis, je la 10^a matene en la sidejo de «Centro Social», kunsido de la liganoj de Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj.

Pastro J. Coll legis raporton tre kompletan pri la agado de la Ligo dum la pasinta jaro, kiun unuanime aprobis la ĉeestantoj.

Oni akceptis la proponon de «Katolika Stelo» el Sabadell dissendi por legado inter la liganoj la gazetojn ricevitajn interŝanĝe de la bulteno de l' Ligo.

Poste oni elektis, laŭ la interna regularo, Srojn. Johano Rosals, kiel prezidanton kaj M. Gili, kiel Kasiston, por la venonta jaro.

KUNVENO DE U. E. A.

En la Industria Instituto kunvenis la delegitoj kaj membroj de Universala Esperanto-Asocio sub la prezido de Sro. Caparrós.

La delegitoj de Saragossa, Barcelono, Sabadell kaj Tarragono legis raportojn pri la progresoj de U. E. A. en iliaj respektivaj urboj.

Estis legata granda nombro da ricevitaj aliĝoj de esperantianoj forestantaj.

La ĉeestantoj decidis montri sian nekontentecon por la barcelona delegito Sro. Sabadell, ĉar ili opinias ke li ne bone plenumis la taskon de regiona relegito. Sro. Llorach, proponis ke tiu juĝo rilatu ankaŭ kelkajn delegitojn urbajn, kion la ĉeestantaro ne akceptis.

Oni finis la kunsidon je la 11^a.

FESTO DE LA FLORAJ LUDOJ

Jam de antaŭ la 11^a matene plenigis la novan kaj tre grandan teatron «Principal» amaso de terrasanoj kaj esperantistoj deziremaj ĝui la raven de la literatura festo.

Je la duono de la dekdua aperas sur la scenejo la Aŭtoritatuloj de Terrassa kaj la Juĝintaro de la II^a Konkurso literatura. Fariĝas silente, kaj la urbkonsilanto Sro. Font, en la nomo de la Urbestro, prononcas la esperantajn vortojn : «Oni malfermas la feston». Tuj

Sro. Pujulá y Vallés, prezidanto de la Juĝintaro, donas parolon al Dro. Bremón, kiu kiel sekretario legas la verdikton, kiun jene ni publicas:

«Sinjorinoj kaj Sinjoroj:

Antaŭ ol komenci legi la raporton de la Juĝintaro de la II^a Literatura Konkurso de K. E. F. permesu al mi, ke mi proklamu la nomon de la feliĉa aŭtoro gajninta la Naturan Floron, kaj tiun de la Reĝino, kiun li elektis por prezidi nin en tiu ĉi Festo.

Gesinjoroj: la poeto premiita per la Natura Floro estas Sinjoro Clarence Bicknell. La Reĝino de li elektita estas Fraŭlino Concepció Puig.

Permesu ke mi haltu, kaj ni iru peti ŝin, ke ŝi bonvolu okupi la lokon por ŝi rezervitan, ĉar ni ne rajtas daŭri ne estante prezidataj de ŝia Reĝina Moŝto kaj ŝia ama kortego.»

Post tiuj vortoj, Sro. Valentí Alavedra, kiun la poeto premiita delegis por lin reprezenti en la Festo, kaj la aŭtoritatuloj stariĝas kaj ekiras renkonti la elektitan Reĝinon kaj ŝian kortegon.

Pasas kelkaj momentoj kaj la ĉarma Reĝino, elegante vestita, kondukata, brako en brako, de Sro. Alavedra, portante la simblon bukedon el naturaj floroj, sceptro de la beleca festego, sekvata de siaj belaj akompanantinoj eniras en la salonon. La ĉeestantaro starante ŝin salutas per varme brua aplaŭdado, kiu nur ĉesas kiam la bela Reĝino sidiĝis sur sia trono.

La juna kaj simpatia Fraŭlino Concepció Puig, grupanino de «Barcelona Stelo» kaj entuziasmoplena samideanino, estas akompanata de sia ama kortego, kiu konsistas el Fraŭlinoj Agna Viumala kaj Teresa Pascual, el «Esperanta Semo» de Sabadell, Mercé Rey, el «Barcelona Stelo» de Barcelono, Gertrudis Cantarell, Angela Sicart kaj Carme Dalmases, el «Lumon» de Terrassa.

La ĝojon, ke nia Reĝino kaj ŝiaj korteganinoj estas esperantistinoj, ĉiuj kongresanoj esprimas laŭte kun surprizo, kaj estas ĉies la deziro, ke tio sama povu okazi ankaŭ ĉe la festoj de la Floraj Ludoj en la venontaj kongresoj.

Sub la prezido de la Reĝino, de kies manoj ricevas Sro. Alavedra por la poeto Sro. Bicknell honoran pergamenon, Dro. Bremón daŭrigas la legadon de sia raporto.

ORDINARAJ TEMOJ

Originalaj tekstoj

«KONKURSO I. *Originala poezio.* — La juĝistoj post longaj pripensoj, ĉar la nombro da verkoj senditaj al tiu ĉi konkurso estis

granda kaj la manuskriptoj multvaloraj, aljuĝis la premion al tiu, kiu havas devizon «Margherita». Aŭtoro : Sro. Clarence Bicknell.

La merito de la verko de Sro. Bicknell estas pli granda ol tiu de la aliaj verkoj premiitaj per ordinaraj premioj. Tial la juĝistoj aljuĝis al ĝi ankaŭ la Naturan Floron.»

Sro. Alavedra per bona stilo legas la jenan premiitan versaĵon:

VERSAĴO PRI AMO

DEVIZO

«Margherita»

Kiam lunradioj dancis
 Sur la maro orienta,
 Ĝis la vasta oceano
 Ŝajnis nur spegul' argenta;
 Iuj, kiel vojaĝantoj
 Lacaj, sur la supro haltis;
 Iuj, hejmon sopirante,
 En ĉielon ree saltis;
 Sed aliaj, pli kuraĝe,
 Kiel infanar' sen timo,
 Subakviĝis kaj sin kaŝis
 Sur la roka marpavimo;
 Kie ili refariĝis
 Briletanta lunetaro,
 Perloj el argenta lumo,
 La trezoro de la maro.
 Serĉu ilin, se vi volas,
 Kaj se perloj vin konsolas;
 Sed ne estas la trezoro
 Ili por malĝoja koro.

Ankaŭ, ĉar la ter' profunda
 Nigra estis, sen koloro,
 La stelaro ĝin rigardis
 Simpatie kun doloro;
 Kaj rapidis la radioj
 De la suno, de la steloj,
 Por ornami la dezerton
 Kaj ĝin semi per juveloj.
 Or', topazo kaj smeraldo,
 Diamanto kaj rubeno,

Tie loĝis kaj briladis
 Kiel floroj en ĝardeno.
 Dum jarmiloj ili restis,
 Helaj lampoj en karceroj,
 De la supra mond' kaŝite,
 La trezoroj de la tero.
 Se vi serĉi ilin provos
 Eble vi per peno trovos;
 Sed ne estas la trezoro
 Ili por malgaja koro.

Jen! juvel' alia kuŝas
 Ne en malproksimaj lokoj,
 Nek kaŝite sub la ondoj,
 Nek dormante en la rokoj;
 Ĝi trezor' mirinda estas,
 Naskiĝinte en ĉielo,
 Pli valora ol la lumo
 De la sun' aŭ ia stelo.
 En la homa koro vivas
 Fajro el la dia flamo,
 La trezoro el trezoroj
 Kies nomo estas Amo.
 Tiu estas la juvelo
 Kiun ĉi koro tenas;
 Eĉ malforta kaj timema,
 Ĝi la tutan mondon benas.
 Amon serĉu per laboro;
 Amon gardu kun fervoro;
 Amo estas la trezoro
 Por ĝemanta homa koro.

Grandaj aplaŭdoj kronas la legadon, kaj kiam ili estingiĝas la sekretario daŭrigas legante la verdikton.

«Specialan mencion meritas la du verkoj, kies devizo estas «Amo», precipe tiu, kies unua verso diras : «Am' estas ĉie en Naturo». La alia, kies unua verso diras : «En fundo de strato sub lumo malbrila» meritas esti citita por la formo. En la verko «Bukedo» estas tre rimarkinda la bona Esperanto uzata de la aŭtoro, kiu kontrastas kun tre karakteriza difuzeco aŭ plena manko de senco. En la verko «Ne por traktaĵo filozofa...» bedaŭrinde troviĝas rimoj kiel *erara-baro*, *ĵuna-suno*, *vento-silenta*, *aŭtuna-suno*, — libereco uzata de kelkaj bonaj aŭtoroj, sed kiun la juĝintoj tute ne aprobas.

II. *Prozaĵo pri Amo*. — La premio de tiu ĉi konkurso estas aljuĝita al verko kies devizo diras : «En nigra nokto tute sole, mi staras gardon senparole.» Aŭtoro : Sro. Jozefo Grau Casas.

Tiun ĉi premion celis tiom granda nombro da verkoj, ke la juĝantaro longe devis pripensi kaj pristudi por taksi la ĝustan valoron de ĉiu el ili. Ĝenerale la prozo estas gramatike perfekta kaj la stilo tre bona; la juĝantaro konsideras citindaj, krom la premiita, la jenajn verkojn : «Ĉe lunradio, al la amatino», «Mitologio», «Bukedo el nigraj floroj», «Disreviĝo», «La blindulineto», «Ĉe la komenco de ia libro», «En soleco mi trovis mian konfidanton», «Vivu Katalunujo».

Tradukitaj tekstoj

I. *Traduko de la poezio «El reu de mort» de Guimerá*. — Neniu el la naŭ senditaj verkoj meritis laŭ opinio de la juĝantaro la premion; estas tre rimarkinde, ke en kvar, el la naŭ senditaj tradukaĵoj, la Esperanto uzata estas bonega, sed la versaĵo estas plata, senanima kaj eĉ nekorekta.

Konsiderante ke la versaĵo sendita al I konkurso originala, kies devizo estas «Amo», kaj kies unua verso diras : «Am' estas ĉie en Naturo» estas inda je premio, oni decidis donaci al ĝi tiun difinitan por tiu ĉi konkurso. Aŭtoro : Ankoraŭ nekonita. Tiu ĉi versaĵo estis legata kaj multe aplaŭdata.

«II. *Traduko de «Les Senyorctes del Mar» de Ruyra*. — Post atenta studo kaj interkomparo de la verkoj ricevitaj la juĝantaro aljuĝis la premion al tiu devizita : «No temem esculls ni vent traidor, plens de joia avui volem estar. (L'Holandés Errant)» kiu estas vera modelo de traduko. Aŭtoro : Sro. Estanislau Pellicer.

Krom tiu ĉi verko oni ricevis aliajn, kiujn la juĝantaro opinias tre citindaj. Ili estas : «Belo mara min delogas», «La Maro ŝajnas kantadi», «Ĉar tio estis feino, kiu prenis...»

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

I. De «Esperanto Semo» de Sabadell, *Traduko de «La Sembras»*. La premion oni donas al «Ja segarem». Aŭtoro : Sro. Joseph Rosselló Erdinas. Oni legis la belan tradukon, kiu ricevis aplaŭdojn.

II. De «Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj». *Traduko de «Les herbes heroiques»*. El la kvin verkoj, kiuj post zorga elektado estas konsideritaj plej bonaj, meritas la premion tiu devizita : «Mi volas traduki ne litere, sed libere», kiu estas modeleto de simpla kaj flua stilo. Aŭtoro : Dro. Joan Buxó.

Citindaj estas : «Al la bonodora timiano», «Humileco», «Herboj montaj, bonaj herboj», «Ami, jen bezono de mia koro.»

III. De «La Revuo». *Originala aŭ tradukita artikolo pri Scienco aŭ Historio, vulgariga artikolo facile komprenebla por ĉiuj.* — La juĝantaro de tiu ĉi konkurso, kiu konsistis el Sroj. Carlo Bourlet, Georgo Warnier kaj Frederich Pujulá unuanime aljuĝis la premion al la verko «Filozofio, Scienco de Sciencoj». Aŭtoro : Sro. Delfi Dalmau.

Konsiderinte la bonecon de la multaj manuskriptoj senditaj al tiu ĉi konkurso, la juĝintoj kreis duan premion, kiun ili aljuĝis al la verko «Teruriga puno». Aŭtoro : Sro. Joseph Grau Casas.

Plie, ili deklaris publikigindaj la verkojn, kies devizoj estas «La Fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam netuŝebla» kaj «La Persistecon kronos la sukceso», kies aŭtorojn ankoraŭ ni ne konas, sed por kiuj tamen ni petas vian aplaŭdadon.

IV. De «Franca Esperantisto». *Kiaj devas esti la reguloj por bone traduki en Esperanto naciajn kantojn, kanzonojn kaj operajn ariojn?* — La juĝintaro el tiu ĉi konkurso, konsistanta el Sroj. Felicien de Menil kaj Frederich Pujulá aljuĝis la premion al la verko «Nur tie estu via hejmo, kie kanto sonas; ĉar sole homoj malbonaj nek unu kanton konas.» Aŭtoro : Nekonita, ĝis la nuna momento.

V. De Sro. Gabriel Chavet. *Literaturo kreas kaj vivigas lingvon.* — Sro. Gabriel Chavet kaj la ĉitieaj juĝintoj unuanime aljuĝis la premion al «Negrava provo». Aŭtoro : Sro. Jozefo Grau Casas.

Tre citindaj estas : «Senliteratura lingvo estus kvazaŭ mondo el nur ŝtonoj kaj riveroj», «Kateno».

VI. De Esperanto Verlag Moller & Borel. *Paĝo pri la Esperanta Biblioteko Internacia*. — Neniu el la alsenditaj verkoj meritis la premion. La aŭtoroj komprenis la vorton *paĝo* en tro preciza senco. La firmo Moller & Borel tre afable donacis la premion kaj antaŭsendis ĝin. La juĝantaro ĝin konservas por la III^a Literatura Konkurso kaj ĝi estas certa, ke tiam tiu interesa temo estos pli amplekse pritraktita.

VII. De la grupo «Semo» de Barcelona. *Traduko de «L'Emigrant» de Verdaguer*. — La Esperanto de la manuskriptoj estis bonega, sed la Muzoj ne regalis al la aŭtoroj per inspiro. La juĝantaro ne kuraĝis esti pli malavara ol la Muzoj kaj decidis ŝpari la premion al nia kara grupo «Semo» de Barcelono. La premio, do, ne estas aljuĝita; sed ne la gratulojn al la aŭtoroj por la boneco de ilia Esperanto.

VIII. De Moŝto Alfons Sala, deputito. *Enkonduko de Esperanto en la Industriajn Lernejojn*. — Oni aljuĝas la premion al la sola verko ricevita por tiu ĉi konkurso, kies devizo estas: «Donu al mi la junularon kaj mi ŝanĝos la mondon»; kvankam ĝi ne estas ĉefverko li havas apartajn rimarkindajn meritojn. Aŭtoro: Sro. Joseph Albagés y Ventura.

IX. De Moŝto Joan Barata, Deputito. *Esperanto en la praktika vivo*. — Oni aljuĝas la premion al neniu.

X. De Moŝto Francisc Alegre, Deputito. *Esperanto en Komercio*. — Al la verko devizita «Ĝi estas nepre necesa» oni aljuĝas la premion, tial ke ĝi estas korekta kaj bonstila, kvankam iom manka de argumentoj. Aŭtoro: Sro. Joseph Grau Casas.

XI. De «Esperantista Junularo». *Dialogo por infana deklamado*. La du plej bonaj verkoj ricevitaj estas «Cindrulino» (sen devizo) kaj «Malgrandaj Astronomiistoj». Ambaŭ estas tre bonstilaj kaj teatrecaj kaj montras, ke iliaj respektivaj aŭtoroj konas tre bone la spiriton de nia lingvo. La premion oni donas al «Cindrulino» iom pli teatreca ol la alia. Aŭtoro: Fino. Louise Briggs.

La «Malgrandaj Astronomiistoj» meritas Honoran Mencion. Estas citinda: «Simplaĵo».

XII. De Honorinda Ekonomo de Terrassa. *Eklezio amis ĉiam la veran progresadon de la homo*. — Oni donas la premion al tiu, kies devizo estas «Lumon», kie la demando estas bone pritraktita. Aŭtoro: Pastro Joaquim Coll.

XIII. De «Casino del Comercio» de Terrassa. *Laŭvola temo.*

XIV. De la Urbestra Moŝto de Terrassa. *Laŭvola temo.*

XV. De la Urbeŝtraro de Terrassa. *Laŭvola temo.*

La juĝantaro havis vere malfacilan laboron en la traŝlegado, klasifiko kaj elekto de la premiindaj verkoj celantaj al la tri laŭvolaj temoj nomitaj. Post atenta kribrado oni decidis premii:

«Al la maro la koro niu tiras.» Aŭtoro : Sro. Joseph Ventura.

«Koron kompreni povas nur koro». Aŭtoro : Fraŭlinoj Eulalia kaj Teresa Rosell.

«Antaŭ semi, plugu ĉiam». Aŭtoro : Sro. L. Bacardit Raurich.

La unua estas poezio bone rimanta, sed ofte kun iom da manko de pensoj; la dua ankaŭ poezio, bela pro la penso kaj la formo, kaj la tria ŝerca poemeto el tre ŝata spriteco.»

La unuan legis ĝia aŭtoro, kiu ricevis longan aplaŭdadon kaj la duan, kiun ni publicas ĉi sube, legis F^{ino} Eulalia Rosell. Tre bruhan aplaŭdadon ŝi ricevis.

APUD LA KAMENO

DEVIZO:

«Koron kompreni povas nur koro»

Al mi multe plaĉas revante rigardi
 en mia kameno la lignon flamardi.
 De tempo al tempo trakrakas la ŝtupo.
 Ĵetante fajrerojn kun bruo de vipo.
 Rapide fajrero, fluganta rubeno,
 mortante vi falas en mia kameno.

Min dolĉe varmigas kamena la flaŝo
 sed min ne brulvundas. Esperon de amo
 ĉe kor' ĝi vivigas. Brulaĵo lumvarma,
 vi estas simbolo de mia rev' ĉarma!

Mi ne pri volupto, veneno de l' koro,
 revadas : mi revas pri amo, fervoro,
 pasio al suno de vintro simila;
 pri miaj la ŝtormoj haveno trankvila,
 de kiu ja estus pli ĝusta simbolo
 ol ruĝa dianto, modesta violo;

per kiu mi vivus serene feliĉa,
 kaj vi, la amanto revata, ĝojriĉa;
 vivamo en kiu estiĝus la koro
 por ĉiam, samtempe, abelo kaj floro.

Gajege brulante trakraĥas la ŝtupo
 kaj ŝutas fajrerojn kun ruĝo de lipo.
 Sed ve! steloj viaj, flugantaj rubenoj,
 naskiĝas mortantaj en hejmaj kamenoj!

Mi vidas malĝoje ke miaj esperoj,
 fruege malestas ŝajnante fajreroj!

Sro. Bacardit, legis ankaŭ sian verkon kaj oni ĝin aplaudis.

«XVI. De la Direktoro de la gazeto «La Comarca del Vallés»
Graveco de la esperantista gazetaro. — Ne aljuĝita.

XVII. De «Vika Esperantistaro». *Traduko el vika verkisto*. —
 La premion oni donas al «Traduko el hispana lingvo». Aŭtoro : Sinjoro
 Jozefo Grau Casas.

Citinda estas «Tri anekdotoj».

XVIII. De «Universala Esperanto Asocio». — *Praktika signifo*
de U. E. A. Ne estis konkursita.

XIX. De «Olota Stelo». *Traduko de «La Pastoreta*. — Oni
 donas la premion al «Ho mia patrineto» bela traduko, kiu konservas
 la tutan ĉarmon de la originalo. Aŭtoro : Pastro Joaquim Coll.

Jen la verdikto de la Juĝantaro : inspiron ĝi deziris al vi, ver-
 kistoj; kaj inspiron vi havis en via partopreno en la konkurso : kon-
 servu kaj pligrandigu ĝin por venontaj jaroj, por bono de nia lingvo
 kaj de nia lando.»¹

J. BREMÓN.

Preskaŭ ĉiuj premiitoj iris meze de varmaj gratulaplaŭdoj ricevi
 de Ŝia Reĝina Moŝto la premiojn proponitajn. Al la aŭtoroj ne-
 ĉeestantaj estis ankaŭ dediĉata aplaŭdo. Finoj. Eularia kaj Teresa
 Rossell, ricevinte la premion, restis laŭ nacia kutimo en la Pre-
 zidejo.

1. La aŭtoroj de la verkoj citindaj estas petataj konigi sian nomon al la
 Juĝintaro.

Post la distribuado de la premioj Sro. Pujulá eklegas la sekvantan ferman paroladon.

Honorinda Reĝino!

Honorindaj Princinoj!

Respektindaj Moŝtoj!

En la nomo de la komitato de la Floraj Ludoj kaj de la Kataluna Esperantista Federacio, kiun ĝi en tiu ĉi momento reprezentas, mi havas la honoron proponi al vi nian plej profundan dankon por la afableco, kiun vi montris, akceptante la prezidan lokon en tiu ĉi festo de Belo kaj de Amo.

Por la dua fojo en du jaroj ni vidas nian Virinon kaj nian Registaron partopreni en la klopodoj de nia granda afero. Ĝi estas kvazaŭ sanktigo de nia laborado, kaj pruvas evidente, ke kvankam nia celo konsistas el idealoj, ni moviĝas en la realeco de efektiva socia vivo. Al nia voko, la nobla kaj progresema Katalunujo ne restis surda, kaj respondas per siaj intima kaj publika animoj.

Vi, honorindaj reĝino kaj akompanantinoj, alportis al ni per viaj ĉarmaj beleco kaj juneco la intiman parfumon de la familiaj rondoj de nia lando; el viaj okuloj kvazaŭ radias la varmeto de la hejmaj fajrujoj; per via ĉeesto, kvazaŭ vi malfermis al nia fratiga Parolo, la pordojn de ĉiu prapatra domo. Vi estas la lando mem, en tio per kio ĝi estas pli firma kaj fortika : vi estas la familio; vi — la Belo kaj la Amo, kiel manifestacio de la intima animo de nia popolo.

Vi, respektindaj sinjoraj Moŝtoj, en kies manojn nia liberema popolo demetis la forton kaj la povon de la regado, alportis al ni per vi mem la spiriton de nia lando, laŭ kies tradicio la potenco de la aŭtoritato devas esti al la servo, ne de la homa premado, sed de la progresado intelekta. Vi estas la lando mem, en tio per kio ĝi pli multe karakteriziĝas : vi estas nia popolo; vi — la Belo, ĉar vi estas la forto; vi — la Amo, ĉar vi honoras vin, honorante nian movadon, kiu celas larĝan fratigon inter ĉiuj homoj.

Se nia fervora klopodado devus malprosperi — kio certe ne okazos — almenaŭ en la historio, kiu raportos pri nia modesta partopreno en la batalado por Internacia Lingvo, estos paĝo pri vi, kiuj kontribuis per la pompo de viaj juneco kaj insignoj al la tiel multe dezirata de ni ĉiuj venko de niaj idealoj.

Sinjorinoj kaj sinjoroj : konata de vi ĉiuj estas la granda influo de la Katalunaj Floraj Ludoj sur la malvolviĝon de la Kataluna nacieco. Per ili ne nur la lingvo falinta en neuzon, kaj forlasita en la manojn de la malaltaj popolaj rangoj, reviviĝis kaj renobliĝis

en la kantoj de la poetoj, sed ankaŭ la popolo lernis rigardi sin, atentisian historion, kaj komprenis ke la nacio, kiel ĉiu individua estaĵo havas plenumotan celon al kiu ĝi devas direkti siajn fortojn kaj oferojn.

La lingvo ne estas afero natura, sed determinisma rezultajo el la multenombraj fortoj kaj cirkonstancoj, kiuj konverĝas en la nacian vivon: tial oni komprenas, kiel la unuaj vortoj de reviviĝanta lingvo parolas pri la nacio mem, pri ĝia personeco, pri la liberemaj deziroj kaj sendependemaj aspiroj, kiuj ĉefe kontribuis al ĝia formado. Ĉe la infano, la unuaj vortoj estas egoismaj: ĝi lernas nomi la manĝaĵojn, la nomojn de la protektantaj personoj, kiuj ĉirkaŭas ĝin. Tiel ankaŭ ĉe la nacioj la unuaj kantoj parolas pri la starigo kaj defendo de la propra personeco. Tial, la unuaj katalunaj kantoj estas kantoj al la patrujo, al la libereco, al la belaĵoj de la naturo de la propra lando. Tiel en nia klasika Esperanta literaturo troviĝas «La Espero» «La Vojo» «Al la patroj» «Ho mia kor'!» kantoj, kiujn ĉiu esperantisto sentas en la plej intima profundo de sia brusto kiel nerefuteblajn pruvojn de la rezono de nia ekzistado.

Kion ni atingis per kaj por nia nacia lingvo en nia lando, tio ŝajnis al ni atingebla en nia Esperantujo per kaj por nia lingvo internacia. Tial ni enkondukis okaze de la V^a Internacia Kongreso en la Esperantan vivon, la Florajn Ludojn, kiel unuan ŝtonon de tradicio sekvinda kaj kiu, laŭ nia kredo, ne devis kaj ne povis malaperi el nia organizaĵo.

Bedaŭrinde, — eble pro nia kulpo, ĉar ni ne tro sufiĉe propagandis aŭ klarigis ĝin — bedaŭrinde, oni ne tre bone komprenis la celon kaj la spiriton de la Floraj Ludoj, kaj oni konfuzis ilin kun Literaturaj konkursoj, kie oni tro rigardas al la premioj kaj al la rilata merito de la premiitaj verkoj, kie la aŭtoroj estas aplaŭdataj personoj sidantaj en unu flanko kaj la publiko estas personaro, kiu aplaŭdas de flanko tute kontraŭa. Oni ne komprenis, ke en la Floraj Ludoj, la boneco de la verko estas konsiderinda, sed ne la ĉefa afero; ke la pli — malpli granda riĉeco de la premioj estas tute flanka detalo, kiu ne povas aŭ ne devas naski emocion; oni ne komprenis ke la objekto de ilia celo estas la komunio de Popolo kaj Poeto ĉirkaŭ la altaro de Beleco kaj Poezio; la nobligo de la Parolo al la servo de la altaj celoj de Patrolando kaj Homaro; la plialtigo dum unu momento — unu fojon ĉiujare almenaŭ — de nia animo laca de la deviga trairado tra la svarmo de la malsuperaj realaĵoj, la pompa glorigo de la idealistoj kiel kompenso al la abundeco de prozo en la ĝenerala vivado; la apologio de la revo, la diigo de la Homoj.

Tia festo ne povas malaperi el nia internacia movado, kaj ni estas certaj ke ĝi ne malaperos. Nenia festo adaptiĝas pli bone al la sento kaj inklinoj de la esperantistaj koroj.

Mi alprenis la modestan neĝustan nomon de «Literatura Konkurso» ĉar altaj celoj inspiras nin. Ni ne deziris okupi, en nia movado, lokon okupotan de pli grandaj fortoj. Kiam la momento alvenos, okaze de la 10^a Internacia Kongreso en Parizo, ni klopodos apud niaj francaj amikoj por ke ili restarigu la feston de la Floraj Ludoj. Francujo, la patrolando de Clemencia Isaura ne povos resti surda al nia peto; kaj eĉ ni esperas, ke nia festo enradikiĝos kaj restos por ĉiam en la ĉefurbo de la intelekto por ke la tradicio malvolviĝu en pli pompa kaj internacia hejmo.

Se nia deziro malprosperos, tiam ni alprenos sur nin la respondecon de la entrepreno, kaj ni daŭrigos la serion de niaj festoj, kun la nomo de «Floraj Ludoj» tiamaniere ke ili fariĝu pli kaj pli internaciaj por la plej granda bono kaj amplekso de niaj idealoj.

Gesinjoroj : permesu ke finonte, mi ankaŭ danku vin, neesperantistojn, por via afabla ĉeesto inter ni, kiu renovigis miajn entuziasmojn, kaj ĉiujn aŭtorojn, kiuj partoprenis en la konkursoj.

De vi, gensinjoroj, mi petas pardonon por la longeco de mia parolado. Ne persona plezuro, sed trudo de la kolegoj devigis min profiti la okazon publike elmontri miajn celojn kaj aspirojn.

Al vi, verkistoj, premiitoj kaj ne premiitoj, ĉiuj senescepte, dankon ankoraŭ. Se ni estis severaj kaj distingemaj por la juĝo, post ĝi ni ne scias ditingi plu, kaj nia danko kaj amo iras egale al ĉiu. Mi volus per miaj vortoj doni al vi novan kuraĝon por proksimaj luktoj. Vi ne bezonas tion, sed por la okazo, elĉerpu ĝin el la vortoj de la Majstro:

«Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
pri 'l tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
Ni semas kaj semas konstante.»

FREDERICH PUJULÁ

Atente oni aŭskultis la paroladon de nia pioniro kaj oni kronis lian belan verkon per tre longedaŭra aplaŭdado.

La Urbestro per la vortoj : «La festo estas finita» fermis ĝin. La Reĝino kun sia kortego eliris tra la parteroj kaj ili estis adiaŭtataj per varmega senfina aplaŭdo, kiun la ĉeestantoj entuziasme dediĉis al ilia beleco.

Oni forlasis la teatran salonon, post laŭta kantado de «La Espe-

ro», ĝojaj pro la tre bela festo, kiu certigis pri la sukceso kaj la forto de nia granda entrepreno.

FESTENO POPOLA

En unu el la salonoj de la «Casino del Comercio» havis lokon la popola festeno, kiun ĉeestis 150 kongresanoj.

Prezidis la festenon la Reĝino de la Floraj Ludoj, Fino. C. Puig, apud kiu sidis la Prezidanto de K. E. F. Dro. Bremón, la delegito de la Urbestro, urbkonsilanto Sro. Ventalló, la fraŭlinoj de la ama kortego, la provinca deputito Sro. Barata, la urba militestro, la reprezentanto de Ekonomia Moŝto kaj la prezidanto de «Lumon» Sro. Alavedra.

Ĉe la fino tostis Sroj. Ventalló en la nomo de Terrassa, Barata kiel provinca deputito, Nin en reprezento de la barcelona gazetaro, Detché en la nomo de la terrassaj ĵurnaloj, Pujulá, kiu konstatigis la frateman spiriton, kiu prezidas kaj regas ĉiujn niajn festojn, Maynar delegito de U. E. A. en Saragossa, Busqué urbkonsilanto, kaj Bremón kiel prezidanto de nia Federacio.

Ĉiuj parolintoj elmontris siajn bondezirojn por nia agado kaj proponis al ni sian sindonan kunhelpon. Per varmaj aplaŭdoj oni premiis iliajn afablajn vortojn.

Kaj grandare oni iris al la Urbodomo, kie okazis la dua kunsida laboro kaj la fermo de la Kongreso.

LABORAJ KUNSIDOJ

UNUA LABORA KUNSIDO

Sabato, 29^a

Je la 3.^a posttagmeze Dro. Bremon malfermas ĉe la Urbodomo la unuan laboran kunsidon.

Ptro. Joaquim Coll proponas al la Kongreso ke estu nomataj diplomitaj profesoroj de K. E. F. Sroj. Pujulá kaj Bremón, kiuj formis la unuan ekzamen-antaron. Unuanime oni aprobas la proponon.

Sro. Pujulá dankas la Kongreson je sia nomo kaj tiu de Dro. Bremón.

Sro. Piferrer, kasisto, legas la financan raporton de 1911^a aperintan en la marta numero de K. E. Li certigas, ke la nuna stato de niaj financoj estas kontentiga kaj ke la K. E. F. havas certan longan vivon de tiu vidpunkto. Unuvoĉe kaj per aplaŭdado al nia diligenta kasisto estas aprobitaj la kalkuloj.

La sekretario legas poste la proponojn, kiuj aperis en la junia numero de K. E. Dro. Bremón metas en diskutadon tiujn subskribitajn de Sro. Amades.

Tiu ĉi kongresano transdonas la defendon de ili al Sro. Grau. Post defendo de tiu Sro. oni aprobas unuvoĉe la aldonon al la dua paragrafo de la 4.^a regulo:

«kaj iliaj anoj povos pagi la kotizajon dekduone laŭ monatoj. Por tia afero la Prezidantoj sin turnos rekte al la Kasisto-Administranto.»

Same okazas rilate la aldonon al la unua paragrafo de la regulo 5.^a : «kaj Vic-sekretario». Ĝi estas aprobita unuvoĉe.

Pastro Coll petas la parolon por defendi la unuigon de la lastaj proponoj de Sro. Amades, kiujn ankoraŭ oni ne diskutis. Sro. Pujulá, lin respondante, longe klarigas la sencon de ambaŭ proponoj.

Sro. Grau kredas, ke oni devus deklari ke kvankam la loko de kasisto fariĝos konstanta, la persono, kiu ĝin okupos, povos lasi la lokon tute libere kiam li tion deziras. (Vidu no.^a 6 (27))

Dro. Pallejá defendas la forigon de la lasta paragrafo de la regulo 7.^a, sed ne la aldonon al la 5.^a.

Per varmaj kaj facilaj vortoj Sro. Rocamora defendas tiun aldonon; li diras ke ĝi estas konforma al la lastaj financaj teorioj.

Post rektifio de Dro. Pallejá, la kasisto Sro. Piferer dankas la laŭdajn vortojn, kiujn ofte dum tiu diskutado oni sendis al li, sed li petas liberecon por povu eksigi, kiam tio estos al li necesa, el la ofico de kasisto.

Unuvoĉe estas aprobitaj ambaŭ reformoj. Ili estas:

Aldono al la fino de la artikolo 5.^a : «La ofico de Kasisto-Administranto estos konstanta. Kiu plenumas tiun oficon restos en ĝi, ĝis ordono de la Direkta Komitato, kiu ĝin prezentos al aprobo de la venonta kongreso.»

Forigo de la lastaj vortoj de la artikolo 7.^a «La anoj de la D. K. nur povos esti reelektitaj unufojon.»

Pastro Dro. Coll defendas la proponon pri akiro de standardo de la K. E. F. Li proponas por tiu celo la kreon de du komitatoj, unu el ili konsistanta el Sinoj. Rebours de Pujulá, Rosal de Rosals kaj Finoj. Mercé Gili, C. Saltiveri kaj Eulalia Rossell. La alia, el Sroj. Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto de K. E. F. kune kun Ptro. Planas kaj Sro. Pujulá. Li proponas ankaŭ, ke tiuj komitatoj povu esti pliiĝataj per aliaj personoj kaj ke estu malfermata monokolekto sur la paĝoj de K. E.

Oni aprobas per longa aplaŭdado tiun proponon.

Sro. Dalmau petas ke la monokolekto estu tuj komencata.

La Prezidanto komisias Dron. Coll por ke li starigu tiajn komitatojn, kion li akceptas.

Sro. Pujulá opinias, ke Ptro. Coll devas esti ankaŭ komitatano kaj la kongreso decidis tion.

Per mallongaj vortoj Sro. Delclós petas, ke la standardo nur prezentu la stelon kaj koloron de Esperanto.

Post kelkaj klarigoj kaj malgranda diskutado oni proponas, kaj la Kongreso donas unuanime, voĉon de konfido al la pristandardaj komitatoj.

Oni legas proponon pri la starigo de Konservantaro de la Literatura Konkurso. Ptro. Coll legas kaj defendas la regularon per kiu ĝi devas sin regi.

Sro. Rocamora opinias, ke tiu propono devas esti publikigata sur la paĝoj de K. E. kaj donata al enketo publika, por ke oni povu raporti pri ĝi en la venonta Kongreso.

Tial ke Dro. Coll opinias tute same, la Kongreso tion decidas. Poste ĉar estis la datreveno de la mortigo de Sro. Doménec Serdá la kunvenantoj laŭ peto de la Prezidanto starigis kelkajn momentojn por honori la samideanon, kiu tiom laboris por nia K. E. F.

Tiel finiĝis la unua labora kunsido, kiu estis ja tute grava.

DUA LABORA KUNSIDO

Dimanĉo, 30^a

Je la 4^a kaj duono kunvenas la kongresanoj en la salonon de la Urbdomo. Prezidas la kunsidon, kiel la antaŭan, Sro. Bremón.

Li demandas unue al la Kongreso ĉu oni povas pridiskuti kelkajn proponojn lasthore prezentitajn, ne publicitajn sekve en K. E. Oni respondas jese al tiu demando.

La sekretario Sro. Pellicer legas proponon de Dro. Coll per kiu li petas ke la Kongreso petu la Barcelonan Urbestaron, ke ĝi permesu al la urbaj gvardianoj kunporti insignojn de la lingvoj, kiujn ili parolas.

Sro. Aubeyzón diras, ke la estinta Centra Komitato de Barcelono petis jam tion sensukcese. Lin respondas Sro. Dalmau klarigante la eblan kaŭzon de tiu malsukceso kaj oni aprobas la proponon unuvoĉe, post kelkaj paroloj de Dro. Coll, dirantaj ke tiu propono devenas de du urbaj gvardianoj.

Estas legata propono kiun subskribas Sroj Amades, Bordas k. t. p. ĝis 38 subskribintoj. Per ĝi oni starigas komision, kiu zorgos pri la eldono de perioda folio katalune redaktita, kiu estos disdonata en lernejoj, kulturassocioj, k. t. p. La direktoro de tiu folio estos tiu de K. E. kaj la Komisiono estos elektata de la Direkta Komitato de K. E. F. Por pagi la elspezojn, oni proponas minimuman jaran kotizajon laŭvolan de 0'50 ptoj.

Sro. Serrano petas, ke tiu propaganda folio estu ankaŭ hispane redaktita.

Sro. Amades opinias, ke tial ke ekzistas jam Societoj por propagando en landoj de hispana lingvo, ni ne rajtas preni sur nin ilian rolon.

Reparolas Sro. Serrano de sia vidpunkto, kaj Sro. Aubeyzón sin montras konforma al tio, kion diris Sro. Amades.

Sro. Pujulá petas ke, ĉar en Barcelono loĝas grandnombre la francoj, germanoj k. t. p. la folio estu redaktita per la lingvo, kiun oni opinios necesa.

La subskribinto de la propono Sro. Campdelacreu petas, ke ĝi estu voĉdonita tiel, kiel li ĝin subskribis.

Post interesa interdiskutado inter Sroj. Serrano kaj Pujulá oni aprobas per plimulto de voĉoj ke ĝi estu redaktita nur katalune.

Sro. Pujulá diras, ke neniel pro malamikecoj sed nur pro monaj aferoj oni aprobis la proponon tiele. (Longaj aplaŭdoj.)

La sekretario legas proponon subskribitan de Sro. Aubeyzón kaj 12 kongresanoj per kiu li petas al la Kongreso, ke ĝi elektu komisionon por efektiviĝi la unuigon de la barcelonaj grupoj.

La prezidanto diras, ke kvankam la celo de tiu propono estas tute laŭdinda, la Direkta komitato opinias ke la propono ne povas esti pridiskutita en nia

Kongreso, tial ke ĝi rilatas nur tute lokan aferon. La decido de la D. K. estas aprobita per granda plimulto de voĉoj.

Sro. Aubeyzón kredas, ke la aliaj subskribintoj voĉdonis kontraŭ ili mem kaj petas al ili klarigon.

Je la nomoj de la subskribintoj Sro. Rocamora diras, ke ili tute ne kredis, ke tio estis loka afero kaj ke nun sekve ili formetas siajn subskribojn el la propono.

Sro. Pujulá preparolas pri la organizado de la Literaturaj konkursoj kaj petas al la Kongreso voĉon de konfido al la nuna Juĝantaro por ke ĝi mem elektu la novan. Post klarigo de Dro. Bremón oni voĉdonas unuanime. Sro. Pujulá dankas Sron. Delclós por la vortoj, per kiuj tiu ĉi tre laŭdis la laboron de la Juĝantaro de la nuna konkurso.

La Prezidanto prezentas al la Kongreso la oficialajn dokumentojn per kiuj la grupoj de Reus, Olot kaj St. Feliu de Guixols petas, ke la IV^a kongreso okazu en iliaj respektivaj urboj.

Tial ke la dokumento de St. Feliu nur estas subskribita de la loka grupo kaj la aliaj estas subskribitaj de la urbestro kaj ĉiuj lokaj societoj, oni rifuzas, kvankam ĝin dankante, tian peton.

La delegitoj de Olot kaj Reus konsentas, ke la Kongreso voĉdonu ne nur unu, sed la du venontajn kongresojn, sed ili ne konsentas pri la jaroj dum kiuj ili devos okazi.

Sro. Aguadé el Reus faras belan paroladon defendante la efektivigon de la IV^a en Reus. Sro. Prat per ankaŭ belaj paroloj lin respondas, petante ke ĝi okazu en Olot.

Sro. Molgosa demandas, ĉu ne estos kontraŭregule voĉdoni pri du kongresoj.

Parolas ankoraŭ en vigla diskutado por kaj kontraŭ tiu demando Sroj. Pujulá, Molgosa, Pellicer, Marbá, Abadal, Grau, Serrano, Rocamora, Dalmau kaj Rosals.

Oni decidas per plimulto de voĉoj, ke oni nur elektu la venontan kongresurbon.

La sekretario legas telegramon de la Urbestro de Reus ĵus ricevitan, kiu diras esperante: «Nome de la urbo, mi salutas kongresanojn proponante kunhelpon, se ili voĉdonas okazigi la kvaran en Reus. Urbestro Ciurana.» (Longan aplaŭdon.)

La Prezidanto metas en baloton la kongresurbon de la IV^a kongreso.

Estas elektita per plimulto de voĉoj la urbon Olot.

La Direkta Komitato kaj Redakcio de K. E. ne partoprenis en la du lastaj balotadoj.

Sro. Aguadé el Reus sciigas ke li helpas kiel eble plej multe por ke la IV^a en Olot atingu sukceson. Granda aplaŭdado premias liajn noblajn kaj sincerajn vortojn.

Sro. Rocamora petas, ke la venonta kongreso esprimu la deziron ke la V^a okazu en Reus. Li opinias, ke oni devus sendi al la Reŭs'a Urbestro kaj al la tieaj lokaj grupoj dokumenton dankante iliajn proponojn kaj sciigante la deziron ĵus esprimitan de la Kongreso. (Ĝenerala aprobo.)

Sro. Prat, el Olot, dankas la Kongreson por ĝia decido : li antaŭvidas grandan sukceson por la IV^a.

Oni aprobas poste unuanime la jenan financon aldonon al la regulo 7^a, nepre necesan post la aprobo de la aldono al la dua paragrafo de la 4^a regulo aprobita en la unua kunsido : «Povos partopreni la kongresojn nur tiuj, kiuj pagis la monat-kotizaĵojn de la komenco de la Januara monato.»

Estas aprobitaj ankaŭ unuanime dankajn voĉojn al la Urbeŝtaro de Terrassa, al la Aŭtoritatoj, Loka Komitato kaj gazetaro.

Oni aprobas sendi dokumenton al la Ministro de Instruado dankante por la Reĝa Ordono permesanta la instruadon de Esperanto ĉe la oficialaj lernejoj, kaj aliajn al Dro. Zamenhof kaj al Sro. Bicknell salutante ilin.

Sro. Pujulá petas parolon je la nomoj de kelkaj kongresanoj por prezenti al la kongreso la jenan komitaton por 1912^a-13^a:

Sro Romul Rocamoŝa, Prezidanto; Pastro J. Planas Sadurní, Vic-prezidanto; Sro. Estanislau Pellicer, Sekretario; Sro. Manel Bordas, Vic-Sekretario kaj Sro. Esteve Rey, kalkulisto. (Laŭ la aprobita aldono Sro. J. Piferrer restas konstante kiel Kasisto-Administranto.)

Sro. Pujulá per varmaj vortoj laŭdas la agojn faritojn de Ptro. Planas kaj de Sro Pellicer, kaj montras la fervoron kiun ili havas al K. E. F. kaj Esperanto La Kongreso per longedaŭra aplaŭdo akceptas la novan komitaton.

Oni proponas, kaj la Kongreso akceptas, doni dankan esprimon al Dro. Bremon kaj ceteraj komitatoj dum la intertempo 1911^a-12^a, kiun ili kore akceptas.

Sro. Albiñana en la nomo de la Urbeŝtaro gratulas la Kongreson por la sukceso kiun ĝi atingis kaj salutas la Prezidanton, (kiu tiam estis Ptro. Planas) kiel reprezentanton de la tuta kongresanaro.

Finas la laborojn de la Kongreso kune kun varma aplaŭdado la kanto de «La Espero» kaj krioj de «Vivu Esperanto» kaj «Vivu nia IV».

RESUMA IMPRESO

Multaj kongresanoj foriris el Terrassa tuj post la fermo de la Kongreso; en la stacidomo bruas la ĝojkrioj kaj adiaŭoj de niaj amikoj, kiuj iris alporti la entuziasmon, kiun ili ĉerpis el la kongresfestoj, al siaj kolegoj de la respektivaj urboj.

Sur ĉiuj lipoj floris la frazo : ĝis la IV^a en Olot!

Grandnombro de esperantistoj restis en Terrassa ĝis la lundo, kaj multaj el ili ĉeestis la teatran prezentadon dediĉitan al la kongresanoj de la artista bando de Sro. Larra. Ankaŭ la tutan dimanĉon, la verdaj steloj de niaj insignoj vidiĝis en ĉiuj societejoj, prezentante belan kolornoton.

Grava barcelona ĵurnalo (El Poble Catalá) raportis pri la III^a Kongreso de K. E. F. jene :

«La III^a kataluna esperantista kongreso elestis ega sukceso supera al la esperoj de siaj organizintoj. Ĝin ĉeestis ĉirkaŭ 500 kongresanoj el ĉiuj regionoj de Katalunujo.

La decidoj kaj laboroj de la kongreso serene fariĝis kaj iliaj rezultatoj estis videble praktikaj. Ĉiuj personoj alportis al la diskutado tiajn entuziasmon kaj amon al la celo, kiajn oni ne vidas en aliaj kongresoj.»

Ni povas aldoni ke la lasta frazo ĝuste prezentas la karakterizan aspekton de la Kongreso.

Ĉe l' fino de nia raporto, niavice ni devas diri ankaŭ : Karaj geamikoj, ĝis nia IV^a en Olot!



Silento

Meze de tiom da ĝojoj alportitaj al ni de la Kongreso, sin trovas ĉagreno pri kiu ni ne povas silenti. Ĝi estas la agmaniero de *Tutmonda Espero* presorgano de la nuna grupeto «Espero Kataluna». Dum la preparado de la III^a Kongreso, dum la Kongreso mem, *Tutmonda Espero* eĉ unu solan vorton ne diris pri ĝi. Tial ke oni ne povas kredi pri manko de loko, ĉar tiu bulteno publikigas ĉiujn (kaj NUR) ajn cirkulerojn pri ĉio ajn kun la plej malgrandaj detaloj; tial ke ĝi nomas sin *iomete* trograndige «organo de la kataluna esperantistaro» (*sic*), niaj alilandaj samideanoj povus suspekti, ke eble nia organizaĵo kun sia multenombra anaro, gruparo kaj sukcesoj, kun sia grava rilato kun la enlandaj aŭtoritatoj, estas neesperantista aŭ kontraŭesperantista entrepreno, — mi rajtas peti nun klarigojn pri la silento de *Tutmonda Espero*, al niaj karaj amikoj sinjoroj Urbez, prezidanto de *Espero Kataluna*, Alfonso Sabadell, efektiva direktoro de la bulteno, kaj en lasta flanko al Tobella, ĝia presisto.

La honoro de nia kvindeko da grupoj kaj kvincento da membroj postulas tion, krom tiu de la kelkaj bonaj samideanoj, kiuj ankoraŭ restas en *Espero Kataluna*, — ĉar oni ankaŭ povus juĝi suspektinda tian malvarmon antaŭ la sukceso de Esperanto en nia lando.

FRED. PUJULÁ



BIBLIOGRAFIO

Versaĵoj, Georgo Deŝkin. Libro unua. Kun portreto de la aŭtoro. Esperanta Biblioteko Danubo, n.º 2. — Bucuresti. Editura Esperanto. 14, str. Belvedere, 14. Prezo : fr. 0'25. (Sm. 0.100.)

Bona poeto — sinjoro Deŝkin. Facile la versoj fluas el lia plumo. Se mi povus fari ne kritikon, sed demandon, mi demandus, kial li rimigas adjektivojn kun substantivoj, multenombro kun ununombro? Ekzemple : *sunaj-juna-suno* kaj *kanto* — *verdiĝanta* en du strofoj de «Printempaj kantoj»; *liberaĵ-mistera*, *mizeran-misteron* en «Al virino»; *kara -maro*, *fonto-onĉo*, en «Aŭtune» k. t. p. Tiu libereco ŝajnas al mi ne permesebla en Esperanto, kie la vokaloj havas sonojn tute apartajn unuj de la aliaj. Niaj latinaj oreloj sentas tuj la diferencon. En *La Rabistoj* (paĝo 112-113) troviĝas *vunda* kaj *Bruto*, rimantaj kun *profunda* kaj *tuta*. Ĉu tio sekvas la originalon, kiun ni ne konas? Ĉu ĉar la kanto estas popola, tio imitas la nelertecon karakterizan de tiaj kantoj? Ĉu tio estas simpla poezia libereco? En ĉiuj okazoj la rompo de logika regulo ŝajnas bona. Mi eĉ persone ne estas partiano de muldiloj; laŭ mia opinio, la ideo devas regi la rimon kaj eĉ la ritmon, kiuj ofte, per rompiĝo povas esprimi pli bone kaj pli kolore ol per blinda sekvo de regulo. Personne, eĉ ofte ĝenas al mi, la sonorileto pri kiu parolas Carducci. Tial mi ne kritikas, kaj kiel esperantisto, mi simple demandas. Ĉiel ŝajnas al mi, ke ni ne devas trouzi la liberecon uzante ĝin kiel principon.

Fantomoj (fantaziaĵo) el Ivan Turgenev. El la rusa lingvo tradukis Dro. Andreo Fiŝer. Esperanta Biblioteko Danubo, n.º 1. Bucuresti. Editura Esperanto. 14, str. Belvedere, 14. Prezo : fr. 0'25. (Sm. 0.100.)

Turgenev estas sufiĉe konata kiel verkisto, kaj la esperanta stilo de Sinjoro Fiŝer kiel bona. Diri ambaŭ nomojn de aŭtoro kaj tradukinto egalvaloras laŭdan artikolon; tial mi povas ŝpari specimenon de malbona stilo por laŭdi tiun, kiu laŭdon ne bezonas. Mi tamen rimarkigos trouzadon de *ek* kaj *ad* kiel radikojn, kio ŝajnis al mi tre strange («Ni adis flugrapidi» «Mi ekis kun plia atento observi» «ekis malrapide elmoviĝi» k. t. p.) — trouzadon de *je* («plena je eblajo» «simila je folimurmuro» «levintaj je timegiga alteco» «simila je neklaraŭdebla grumblado» «simila je germano» k. t. p.), kaj uzadon de *ĉi* kun tempa adverbo («ĉi-foje»). Laŭ mia opinio tia uzado ne estas bona, ĝi donus al ni «ĉi hore», «ĉi semajne» «ĉi jare» k. t. p. Logike ŝajnas, ke ĉar *ĉi* proksimigas ĝi nur povas esti uzata kun vortoj kiuj *MONTRAS* malproksiman aferon. Se ne la *montreco* almenaŭ la esprimo de malproksimeco estas nepre necesa.

Malgraŭ tiuj ĉi kritiketoj, kiuj eble ne estas ĝustaj, la traduko de Sro. Fiŝer estas leginda kaj neniu devas vidi en ili mallaŭdon al ĝi. Se ni ne citas belajojn, ĝi estas simple ĉar ni ne deziras represi la tutan broŝuron.

TAMEN.



ENLANDA MOVADO

Dro. Román Pallejá, nia kara amiko, delegito de K. E. F. en Uldemolins, havis la malfeliĉon perdi sian patrinon, kiun la Morto forprenis. Ni petas lin volu akcepti la esprimon de l' sincera kondolenco de «Kataluna Esperantista Federacio».

BARCELONA

La «Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj» organizis tre belan kaj sukcesplenan feston la 9^{an} de Junio, por regali la anojn de la kurso de Esperanto de nia Universitato. Partoprenis Sroj. Broncuret, Monjonell, Miquel, Rivera, Mauri, Torrents el tiu kurso, kaj Sroj. Mas, Vilá, Milá el la kurso de Katolika Ligo. Ĉiuj legis esperantajn verketojn, kiuj estis varme aplaŭdataj de la ĉeestantaro. Tre interesan paroladon faris Sro. Pujulá y Vallés, kiu salutis la aŭdantaron je la nomo de la mondo esperantista, kaj konstatis ke la sukceso de la okazanta festo estas ja plej granda kontraŭdiro al tiuj, kiuj asertas ke la katolikoj ne scias partopreni la progreson. Plie li invitis la katolikojn lerni kaj labori senĉese por Esperanto, forigante kelkajn dubojn pri la kreado de la lingvoj kaj lingvo-konfuzo en la Babilona turo. Sro. Pujulá aŭskultis fortajn aplaŭdojn. Dro. J. Coll, Ptro. profesoro de Esperanto en la Universitato, post kelkaj vortoj per kiuj li dankis al ĉiuj partoprenintoj kaj ĉeestantoj, disdonis luksajn diplomojn al la anoj de la Universitata kurso, kaj legis la nomojn de la Sroj. kiuj meritis, laŭ la tribunalo, la *Premion Universitat*. Jen la nomoj: *Unua premio*: 50 ptoj. Sro. Jozefo Monjonell. *Dua Premio* : 25 ptoj. Sro. Antono Miquel. *Mencioj*. Sroj. Jozefo Mauri kaj Ramono Corominas. La premiitoj ricevis la premiojn meze de la aplaŭdoj de la ĉeestantoj. Dum la festo estis kantataj belaj kantoj kaj je la fino estis ludata la kataluna komedio «Los Bandolers».

La laborema kaj senlaca grupo «Ĉiam Antaŭen» okazigis la 9^{an} de Junio tre belan, amuzan kaj propagandan ekskurson. Per granda aŭtomobilo, ornamita per verdaj stelaj kaj flagoj, 45 el ĝiaj membroj veturis al Montserrat, kie ili vizitis la monaĥejon kaj ĉiujn rimarkindaĵojn. Tie ili havis la neatenditan plezuron renkonti francan samideaninon, kiu pasigis en la bela kataluna monto kelke da tagoj.

Laŭ la *ĉiama* kutimo de «Ĉiam...» la ekskursantoj dissemis grandnombre la foliojn propagandajn eldonitajn de nia Federacio. Estas dezirinde ke similaj ekskursoj ofte ripetigu.

Ĉe la grupo «Semo» okazis la 26^{an} de la pasinta Junio interesa parolado pri Terrassa kaj nia III^a Kongreso, farita de nia samcelano Sro. Grau Casas.

Tiu konferenco bedaŭrinde ne estis multe ĉeestata. Sro. Grau pasigis al ni per sia flua kaj elokventa parolo preskaŭ horon, montrante per la kliŝoj, kiujn

afable sendis niaj Terrassaj samideanoj, la plej belajn antikvan kaj modernajn konstruaĵojn, kiujn ni dum la Kongreso havia la plezuron viziti.

Post la konferenco Sro. Grau estis aplaŭdita kaj gratulita de ĉiuj ĉeestintoj.

VILANOVA I GELTRU

Dum la 25^a, 26^a kaj 27^a de Majo okazis en tiu urbo la grava Dua Kongreso de Ateneoj kaj Kulturaj Societoj. La 27^a, ĉe la Biblioteko-Muzeo Balaguer, nia sprita kaj klera verkisto Sro. Pujulá Vallés, faris paroladon pri la temo: «La estonta literaturo. Kiu estos ĝia lingvo?» La ĉeestantaro estis multnombra. Sro. Pujulá, kiun atente aŭskultis ĉiuj, ricevis je la fino justan aplaŭdon por sia laŭdinda parolado. Tiu filologa majstraĵo estos presita.

En la sama Kongreso, Sro. Ll. Jou Olió, el la Komisio de Pedagogio, lerte kaj elokvente parolis pri la jena oficiala temo: «Kiajn lingvojn oni devas uzi en la lernejo de la Ateneoj?» Estis la tria konkludo — unuvoĉe aprobita — de lia disertacio: «En la superaj kursoj de la ateneaj lernejoj oni devas instrui la internacian lingvon Esperanto.» — F. M.



KONGRESOJ KAJ EKSPozICIOJ

Provizora programo de la VIII^a Universala Kongreso Esperantista en Krakovo

11-18-Aŭg. 1912

Dimanĉe: la 11.8. — Inaŭguro de la Kongreso. — Vespere, komuna festmanĝo.

Lunde: la 12.8. — Kongresaj kunsidoj. — Vespere, Jubilea Festvespero.

Marde: la 13.8. — Ekskurso al salminejoj en Wieliczka. — Vizitado de la Kongresurbo. — Vespere, lumbildaj paroladoj.

Merkrede: la 14.8. — Kongresaj kunsidoj. — Vespere, teatraj prezentadoj: por unu parto de la kongresanoj en la urba teatro la tragedio «Mazepa»; por alia parto en la «Teatro de Novaĵoj» la burlesko «Ĉio en ordo», kaba-reto k. a.

Ĵaŭde: la 15.8. — Diservoj kun esperantaj predikoj en katolika kaj protestanta preĝejoj. — Manovroj de la Ruĝa Kruco. — Disdono de la premioj de la Literatura konkurso. — Vespere, balo.

Vendrede: la 16.8. — Kongresaj kunsidoj. — Vespere, teatraj prezentadoj; vidu merkrede. — Ambaŭ partoj de la kongresanoj ŝanĝos la teatrojn.

Sabato: la 17.8. — Finferma kunsido de la kongreso. — Vespere, koncerto.

Dimanĉe: la 18.8. — Festa parado de la krakova garnizono, okaze de la 82^a naskiĝotago de imperiestro Francisko Jozefo I.

Postkongresa ekskurso al Zakopane, vizitado de Tatra-montaro kaj plua vojaĝo al Budapeŝtaj kongresoj.

III^a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Budapest18-22 Aŭgusto 1912^a

Ni ricevis la trian cirkuleron de tiu kongreso, kiu publikigas la proponitan, ne ankoraŭ definitivan, programon.

Manko de loko malpermesas, ke ni publicu ĝin, laŭ ni dezirus.

Esperantista ekspozicio en Trondhjem. Norvegujo

Por plibonigi la staton de nia movado en Norvegujo la Esperantista Grupo en Trondhjem organizas ekspozicion. Ni petas niajn amikojn, volu helpi al ĝia sukceso, sendante al la nomita grupo ĉiuspecajn esperantaĵojn.

LA KOMITATO

**Oficiala Parto**

— La Komitato de K. E. F. delegis Sron. Pujulá y Vallés, por ke li defendu en la Krakova kongreso internacia la organizon de la esperantistaro proponitan de nia kara Majstro, Dro. Zamenhof.

En la okazo se li ne povus veturi Krakovon, la Komitato rajtigas lin transdoni la delegon al alia reprezentanto, laŭ sia bontrovo.

— Ni petas ĉiujn komitatanojn de la grupoj aliĝintaj al K. E. F. ke ili klopodu profiti la konkludon de la III^a kongreso pri aliĝoj pagotaj po 25 centimoj ĉiumonate.

Ni esperas ke tio povos baldaŭ plinombrigi niajn vicojn. Oni turnu sin al Kasisto-Administranto Sro. Piferrer, str. Gracia, 12, Sabadell.

KORESPONDADO

J. Gener. Sta. Coloma de Farnés. Ni dankas vian raporton, kiun ni ne enpresigas pro manko de loko, kaj tiel ke ĝi estas malmulte interesa. — S. E. Vendrell. Dankon. Ĝi estas nepublicebla. — A. Fortet. Olot. Ni transdonis vian saluton al terrassaj samideanoj. — M. P. Antwerpen. Siatempe estos respondata via letero.

LLISTA DE DELEGATS AUTORITZATS PER LA ADMINISTRACIÓ DE K. E. F. PER A REBRE LES QUOTES

Sabadell	Lloc Social	Gracia, 12.
Reus	Sr. E. Aguadé	Presó, 15.
Vilanova i Geltrú	» F. Mestres	Sant Antoni, 1 i 3.
Barbarà	» J. Puigbonet	Sant Pere, 39.
Balaguer	» M. Espar Boquer	Miracle, 7.
Cambrils	Sta. J. Masaguer	Hostal Nou.
Olot	Sr. I. Juanola	Superior, 25, 2. ^{on}
Terrassa	» A. Oliart	Clarís, 24.
Manlleu	» Ll. Coll	Vora del Ter, 21.
Barcelona	» D. Dalmau	Diputació, 327, 3. ^r , 1. ^a
Tarragona	» D. Obiol	Unión, 9, 3. ^r .
Castellar del Vallès	» F. Blanquer	Fonts Calents.
Arbós	» G. Rovirosa	Major, 2.
Vendrell	» S. Esvertit	Cristina Baixa, 5.
Igualada	» A. Mosella	P de la Constitució, 11.
Girona	» F. Anguet	Progrés, 20.
Vilafranca del Panadés	» A. Robreño	Puigmoltó, 14.
Ulldemolins	Dr. Roman Pallejà	Carretera, 2.
Sta. Coloma de Farnés	» J. Gener	Verge Maria, 1, 2. ^{on}
Lleida	» Lluís Abadal	Major, 12 i 14.
La Escala	» Josep Ximinis	Fàbrica géneros de punt
Mataró	» Josep Solà	Sant Josep, 46.
Premià de Mar	» P. Alsina	Camí Reial, 81 i 79.
Tivissa	» F. M. Brú	Avall, 16.
Moncada	Dr. Joan Buxó	
Berga	Sr. Josep Cardona	Farmaceutic.
Sant Feliu de Codinas	» Joaquim Coll	Vicari.
Banyolas	» J. Aulina	Turers, 49.
Sant Feliu de Guixols	» J. Blanch	Caymo, 32.
Vic	» J. Comella	Plassa Major, 18.
Borjes Blanques	» F. Rubinat	
Palafrugell	» J. Marqués Isern	Pals, 1.
Bégas	» J. Esteve Jacas	Arrabal S. Martí, 19.
Manresa	» I. Bosch	Bruch, 1.

Ademés poden enviar-se també directament a l'Administració :
Gracia, 12, Sabadell, amb sagells de 15 centims

NIAJ KUNFEDERACIANOJ CERTE PAR-
DONOS AL NI, KE NI DEVIS OFERI NIAN
AKURATEMON PRO LA TRO GRANDA
LABORO PREPARI TIUN NUMERON,
KIES PUBLIKIGON PROKRASTIS ĈEFE
LA MALHELPOJ RENKONTITAJ ĈE LA
FARADO DE BONAJ GRAVURAĴOJ, ĈAR
LA FOTOGRAFAĴOJ FARITAJ DUM LA
KONGRESO ESTAS JA NEBONAJ

NI DO ESPERAS, KE NIAJ AMIKOJ BON-
VOLOS AFABLE NEATENTI PRI EBLAJ
FORGESOJ KAJ PRI LA NEPERFEKTECO
DE LA GRAFIKA INFORMADO

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO *

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : Frederich Pujulà

Sek. de Red. : Joseph Grau

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO :

*La VIII Internacia Kongreso Esperantista en
Krakovo, Kataluna Esperantisto. — Pri..., Fred.
Pujulà. — Peto, La Redakcio. — El Soldato Kun-
vado, Josefo Grau. — Post la II^a Literatura Kon-
kurso, K. E. — III^a Literatura Konkurso de la
K. E. F., Fred. Pujulà. — Katalunaj efemeridoj. —
Enlanda Movado. — La IV^a Kongreso de K. E. F.,
Josefo Grau. — Oficiala Parto. — Korespondado.*



JARO III^a

Septembro 1912^a

N^{ro} 9 (30)

*Kazraj Redaktoj : Bonvolu interŝanĝi regule
nian revuon kun ni.*

Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al

”Kataluna Esperantista Federacio”

Esperanta Semo	Sabadell
Nova Semo	Reus
Fratega Kunigo	»
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto	Barbarà del Vallès
Olot Stelo	Olot
Lumon	Terrassa
Casino del Comercio	»
Esperantista Junularo	»
Esperanta Juneco	Barcelona
La Rondo	»
Esperanta Fakoj (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Ĉiam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Frateco	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo	»
Unio Katalanista	»
Novan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo	»
Evolucio	»
Universala Frateco	»
¡Supren!	»
Esperanta Aŭroro	»
Esperanta Racionala Grupo	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvoŝalo	Ripollat
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Laboro Esperanta	Vilanova i Geltrú
Esperantista Grupo	Mataró
Kamparo	S. Perpetua de la Moguda
Fratego	Vendrell
Esperantista Amikeco	Manlleu
Esperanta Amo	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Esperanta Amikaro	Banyolas
Ilerda Espero	Lleida
Fratego	S. Feliu de Guixols
Gerona Esperantista Ligo	»
Badalona Stelo	Badalona
Paco kaj Amo	Palafrugell
Verda Stelo	Flix

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : FREDERICH PUJULÁ
Sek. de Red. : JOSEPH GRAU

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : *La VIII Internacia Kongreso Esperantista*, Kataluna Esperantisto. — *Pri...*, Fred. Pujulá. — *Peto*, La Redakcio. — *El Soldato Kunvivado*, Josefo Grau. — *Post la II^a Literatura Konkurso*, K. E. — *III^a Literatura Konkurso*, Fred. Pujulá. — *Katalunaj efemeridoj*. — *Enlanda Movado*. — *La VI^a Kongreso de K. E. F.*, Josefo Grau. — *Oficiala Parto*. — *Korespondado*.

La VIII Internacia Kongreso Esperantista en Krakovo



LA VIII Internacia Kongreso, nia grandioza ĉiujara kunvenego okazis jam en Krakovo plensukcese. Ni ĝojuldetalan raporton pri ĝi ni ne povas enpresigi pro manko de sufiĉa tempo. En la venonta numero de «Kataluna Esperantisto» ĝi aperos. Ni povas antaŭsciigi al niaj amikoj, ke la Kongreso, laŭ propono de Sro. Carlo Bourlet, kiun K. E. en la nomo de K. E. F. sincere dankas, decidis unuanime esprimi *korajn dankojn* al la Urbestroj de Terrassa kaj Sabadell por iliaj decidoj doni la nomon de Dro. Zamenhof al du urbastratoj; pruvante tiamaniere sian estimon por Esperanto.

Ni supreniris alian ŝtupon. Niaj polaj amikoj povas esti fieraj je la granda sukceso de la VIII Kongreso. Ni sendas al ili nian gratulon kaj aplaŭdon. Ni povas esperi. Ni atingos plenan venkon!

KATALUNA ESPERANTISTO

JASCINTO BREMON Y MASGRAU

JASCINTO Bremón ne plu estas nia Prezidanto. Lia parolado, legita en la malferma kunsido de nia III^a Kongreso, estas sufiĉe klara; la aplaŭdoj, per kiuj ĝi estis premiita, ŝparas al ni la klopodon klarigi, ke se li ne plu estas nia Prezidanto, li restos por ĉiam la amiko, la samideano, la fervorulo al kiu ni ĉiuj ŝuldas profundan dankon por la senlaciaj laboroj, kiujn li dediĉis al nia afero.

Dum du jaroj, en la malfacila loko, kiun li okupis, li montris inteligentan komprenon de la tasko, kiu estis al li konfidita. Lia kvietemo, lia energia delikateco, lia egalanimeco, solvis amason da malfacilaĵoj en la unuaj momentoj de nia organizado. Li nun deziris ripozi en la vicoj de la simplaj samideanoj. Li jam tion deziris la pasintan jaron, kaj la kongreso trudis al li novajn servojn al la afero. La malvarmecon de Bremon, kiu tiom multe utilis al nia movado, estas certe tre granda, sed ĝi neniam povos malvarmigi la varmecon de nia estimo kaj danko por li.

ROMUL S. ROCAMORA.

Li estas nova esperantisto. Antaŭ unu jaro neniu konis lin kiel samideanon, kaj en kelkaj monatoj li tiel multe agis, propagandis, laboris, sin oferis por Esperanto, ke li estis nomata Prezidanto de nia «Federacio» per unuanima aplaŭdado de nia III^a Kongreso.

Lia entuziasmo por Esperanto estas tiel granda, ke li delasis siajn politikajn inklinojn por plene sin doni al ĝia propagando. En la Universitato li fariĝis advokato; en la Normala Lernejo — instruisto. Liaj pedagogiaj scioj kaj lia elokventa parolo estas nun al la servo de nia propagando kaj defendo. Ne necese estas laŭdi lin. Liaj agoj lin laŭdos.

Li kun Sro. Rey — prezidanto de «Barcelona Stelo», kaj Sro. Bordas, ankaŭ aligitaj per unuanima ovacio al la Komitato de la *K. E. F.*, certe alportos al ĝi novajn solvojn por nia prospero kaj sukceso.

KORESPONDADO

Nenio estas pli kortuŝanta ol pensi, kiam ni laboras por Esperanto en nia lando, ke malproksime, en ĉiu angulo de la mondo, ekzistas homoj, kiuj laboras por la sama afero. En la nuna momento

eble jam ne estas loko kaj loketo sur la tero, kie la voĉo de nia lingvo ne audiĝis. Tragedia statistikisto elkalkulis ke ĉiun sekundon mortas homo sur la tero. La penso pri tiu gutado de malaperantaj vivoj turnigas la kapon kaj ŝovas nian koron en grandan ĉagrenon aŭ en profundan indiferecon. — Ni atendas la pli gajan, pli optimisman kalkuliston, kiu instruas nin pri la fluo de homoj esperemaj, kiu verŝiĝas en nian movadon. Lin atendente, ni ĝojiĝu per la vido de tiuj grupetoj, kie senlaciaj, fervoraj homoj laboras konstante por la pligrandigo de nia rondo.

Mi ĉestis la fermon pro libertempo de la kurso de «Rosny sous Bois», kaj se mi estus laca, mi certe elĉerpus el ĝi novajn fortojn por daŭri en la batalado. En unu flanko la infaninoj de la lernejo de Sinjorino Monot, en la alia, junuloj kaj junulinoj, maturaj homoj, laboristoj, doktoroj... La karakteriza mikseco de niaj kunvenoj.

Ili demandis min pri vi; mi rakontis al ili. Ni scias ke ni ekzistas, kaj ni ne konas nin unu la aliajn!! Ni diru : ni ne konas nin unu la aliajn, sed ni devas esti konvinkitaj pri la ekzisto de samideanoj, kiuj ĉie laboras por la sama afero. Tiu konvinko estu la kuraĝigilo de la malgrandaj grupoj, de la izolitaj esperantistoj, kiuj eble neniam havos la okazon interparoli kun alilandulo! Kia kredo, kia doktrino povas prezenti tian ekzemplon de sinofero kaj malavareco?!

(Però, sinò parlar amb estrangers, podeu escriure-hi. Els mestres d'estudi que ensenyen l'Esperanto i els professors de nostres grupos podran posar llurs deixebles en correspondencia amb altres deixebles dirigint-se a *MADAME MONOT*. — ROSNY SOUS BOIS. — SEINE. — França. — Els presidents de nostres grupos, que desitjin fer assaber llur adreça per a oferir la correspondencia dels deixebles respectius, tenen a la llur disposició les pàgines del *Kataluna Esperantisto*, on obrirem una secció especial si l'afluencia de peticions ho requereix.)

LA INSTRUISTOJ

En Franclando ekzistas Societo, kiu sidas en Parizo, konsistanta el la membroj de la Franca Instruado. Ĝi estas nomata «L'Esperanto à l'école» (Esperanto en la Lernejo). Ĝia celo estas : 1.^a Centraligi la informojn pri la esperantista movado en la lernejoj. 2.^a Kunordigi la propagandajn penojn en kaj ĉirkaŭ la lernejoj. 3.^a Elserĉi kaj apliki la plej bonan taktikon por enkonduki Esperanton en la oficialajn programojn de la Instruado. 4.^a Fomenti la rilatojn kun la alilandaj pedagogaj esperantistaj grupoj.

Sajnas al mi, ke niaj katalunaj instruistoj esperantistoj estas jam sufiĉe multenombraj, kaj ke ili povus kaj devus starigi similan

societon kun similaj celoj. «Kataluna Esperantisto» kaj mi persone estas pretaj servi ilin sur tiu vojo. Por pliaj detaloj, ili povas sin turni al la Prezidanto de «L'Esperanto à l'école» *Sinjoro J. AIZIERE — rue de Berlin. — ALFORTVILLE-Seine. (Franclando).*

Aliflanke, ili jam certe scias, ke ekzistas «Internacia Asocio de Instruistoj» kiu sidas en ANTWERPEN (Belgujo), *strato Boomsche Steenweg, 444.*

FRED. PUJULÀ

LA RULETO

Kiam pastro Coll, la aŭtoro de la bonega traduko de «La Paŝtistinet», vidis la premion donacitan de la grupo «Olota Stelo», li restis iom surprizita kaj kuntiris la brovojn. Ne; li neniam povos ornami sian hejmon per tiu granda bela busto de belega dekolitita virino. Li klopodis klarigi al ni, ke li ne konis la premion, kiam li tradukis la katalunan kanzonon, per kiu li gajnis ĝin. Tio estis por ni feliĉa okazo, ĉar ni akiris poeziplenan kantaĵon... Sed Pujulà ridetis.

Jen, pastro Coll kaj Sro. Pujulà, kiuj iras al la Bonfara Tombolo de la Industria Lernejoj. Pujulà ludas, prenas la kunrulitan paperon, malvolvas ĝin, legas. Li estas premiita per *Proveligia broŝuro*. Li klarigas, ke li nesciis, kiam li aĉetis la bileton... Pastro Coll ridetas. Sed, jen Pastro Coll, kiu ankaŭ aĉetas... Malvolvon, legadon... Li estas premiita per ruleto!... Li klarigas. Pujulà ridetas. Li ridetas kaj donacas la broŝuron al pastro Coll, kiu ridetas kaj donacas la ruleton al Pujulà.

Dum la tuta Kongreso, oni povis vidi ambaŭ pionirojn, kiuj sin kaŝas por ludeti. «Por kio vi vetas?» «Por la sukceso de tiu ĉi kunsido» «Kaj vi?» «Mi ankaŭ.» La nadlo turniĝas. Para? Senpara?... Unufojon gajnis unu, aliafojon gajnis la alia. Sed la sukceso de la Kongresaj okazintaĵoj ĉiam gajnis.

La ruleto de niaj pioniroj estis kvazaŭ simbolo.



Peto

Ni insiste petas niajn amikojn bonvolu memori, ke dum la III^a Kongreso de KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO, estis malfermata monokolekto por akiri standardon por la Federacio. La liston de mondonacoj, kiu certe kreskos ĉi tiun monaton, ni publikigos per la oktobra numero de KATALUNA ESPERANTISTO.

Ankaŭ ni publikigos la PROJEKTON DE REGULARO POR LA STARIGO DE KONSERVANTARO DE LA FLORAJ LUDOJ DE K. E. F., kiun verkis Dro. Joaquim Coll, kaj kiu laŭ decido de la terrassa kongreso estos donata al publiko enketo.

LA REDAKCIO

El Soldata Kunvivado¹

DEVIZO: «En nigra nokto tute sole
Mi staras gardon senparole.»

El tiuj de mia antaŭ longe pasinta militserva tempo, mi memoras, kiel la plej kortuŝantan, la epizodon, kiun mi priskribas ĉisube. Tion plej interesan, kio skuis pli forte mian animon, mi ne povas traduki per vortoj; ĝi estas io nemateria, kio vibrigis min kortuŝite kiel neniam dum mia vivo, kaj plifirmigis mian opinion, ke sub la soldata uniformo la viroj vere sin sentas fratoj.

Li kaj mi venis samtempe en soldatejon, kaj de la unua tago ni estis kunuloj; sed inter ni ekzistis neniā alinklino. Liaj maldelikata edukiteco kaj kamparana sinteno, kiujn mi rigardis de la alto de mia fiereco, tre apartigis min de li kaj mi nur diris al li la vortojn tutnecesajn. Ĉe instrueja kampo, lia mallerteco fari la taktikajn movojn estis la kaŭzo, kial la instruanta oficiro ofte devigis nian rekrutaron rapidege paŝadi: tiun ĉi punon, kiu en kelkaj okazoj lacigis nin troege, donis al ni nia oficiro, kiam la opaj movoj ne estis farataj tiel ĝustece, kiel li deziras; kaj estas rimarkinde, kiom troe li postulis de ni unuformecon je ĉio.

Mia kompatinda kamarado, ja kontraŭ sia volo, estis kvazaŭ malakordo kaj li suferis duoble, tial ke al la batoj, kiujn li ricevas de la instruanto, ni aldonis nian senkompatan rikanadon, kio igis lin ĉiun tagon pli mallerta. Ŝajnas ke, por ke li estu aparte instruita, li devas esti forigata el nia rekrutaro, kio plibonigos sendube la aliajn rekrutoj-lernantojn; sed, ne: ni devis pene instrui lin, por ŝpari al ni la malamitan punon, ĉar la oficiro postulis, ke li restu kun ni.

Mi lin kompatis senkonscie, per kompatemo miksitita kun ia malŝato, pro interna komparado de miaj agoj je tiuj liaj, konsekvence de kio mi kredis min pli supera, ol lin. Kiel oni bone vidas, mi ja ne estis tre humila!

La urbo, kien oni veturigis nin por militservi, ne estis tre granda. Ĝi etendiĝas sube ĉe kruta montdeklivo, apud rivero akvoriĉa, antaŭ ebena fruktodona kamparo, kiun kunligas kun la urbo ponto jetita trans la rivero. Supre, sur la monta plataĵo la arto de multaj generacioj starigis grandiozan katedralon; sed venis almilito, kaj tio,

1. Premiita en la II^a Literatura Konkurso de K. E. F.

kio estis la templo de la spirito kaj la preĝo, fariĝis restejo de la forto: la grandega preĝejo estis ĉirkaŭita per bastionoj kaj iĝis nevenkebla fortikaĵo. Tamen, la tempo zorgis senutiligi ĝin, alportadante novajn pliperfektigojn en la ĉiuspecajn batalilojn.

Por mi, al kutiminta loĝadi ĉe urbo tridekoble pli granda, la plej bela el mia lando, la urbo de mia militservo enhavis nenion interesan; nur mi ŝatis iradi sur la ponto kaj, haltinte en ĝia mezo, rigardadi la forkurantajn akvon de la rivero, kiu milde kantadis malgajan kanton.

Al li, veninta de la plej malproksima regiono, kutimigita resti ĉe la kamparo, la urbo eble ŝajnis bela, ĉar neniam li eliris for, eĉ por sindistre promeni.

Unu tagon, reveninte de nia mallonga vespera promenado, mi lin rekontis sidantan sur sia lito kun letero ĉe la mano; ĝin li donis al mi, petante min, ke mi ĝin legu al li. Malĝojigajn novaĵojn ĝi alportis: lia patrino suferadas gravegan malsanon kaj la kuracisto certigas, ke ŝi baldaŭ mortos...

Kian profundan malgajon mi vidis ĉe liaj okuloj, kiam li sciigis pri la bedaŭrinda afero! Tamen, nur du larmoj subenglitis sur lia vizaĝo. La morgaŭan tagon li petis permeson por foriri al sia hejmo: ĝin ja oni donis al li, sed ĉar li devas pagi la duonkoston de l' veturado ĝis sia domo, — kiu malfeliĉe staras tiom malproksime — kaj li ne havas sufiĉe da mono, li plej dolore devis restadi ĉe ni.

Post du tagoj venis alia letero: lia patrino mortis, memorante sian filon, kiu malproksime de ŝi ne povas ricevi ŝian lastan ĉirkaŭprenon!

Kiel la alian, mi ankaŭ legis tiun leteron: kiam mi finis la legadon, li komencis plori senkonsole. Lia malfeliĉo kortuŝis min kaj ankaŭ mi ekploris; tiam ŝajnis al mi, ke ni estas veraj amikoj: io iel intima envenis inter nin, malaperigante la malŝaton, kiun mi sentis.

La sekvintan tagon — estis festo — mi eliris de la kazino kun iuj kolegoj miaj; dum kelke da tempo ni promenis kune, kaj forgesante dummomente nian petolan kutiman gajecon, ni ekmemoris pri nia kunulo kaj ni preparolis lian doloron. Poste, mi ilin adiaŭis, por ne iri kune al naŭziga kaftrinkejo, kiun ili ordinare ĉeestis. Mi pasis sur la ponto, haltante rigardadi kiel ĉiam la fluantan akvon; ĝia eterna kantado ŝajnis al mi pli malgaja, ol iam. Kiam mi alvenis trans la rivero, mi ŝanceliĝis, elektante la lokon, kien mi iros, kaj neenirinte en la belan parkon, kies pordoj malfermiĝas antaŭ mi, mi iris antaŭen tra l' ĉefvojo.

Estis somere : la foliplenaj arboj starantaj ambaŭflanke de la vojo moviĝis pro malforta venteto, kiu moderigas la troan varmon; multnombraj paseroj pepadis ĉe la branĉoj kaj de tempo al tempo per sia mirinda kanto najtingalo sin aŭdigis el la aro. Post malmulte, mi pasis apud grenaj kampoj, kiujn la suno similigas al lagoj de fandita oro; la urbo estis jam malproksima, kaj lasinte la ĉefvojon, mi eniris en vojeton, kiu min kondukis apud la riveron. Mia malĝojo je l' malfeliĉo de mia amiko, estis malaperinta; neniel povis esti alie : Naturo ĉiam allogis min, kaj tiam ĝi prezentiĝis antaŭ mi, senkompare bela.

La akvodiafana rivero sonetis ĉe la ŝtonoj de l' bordoj, blanke ŝaŭmante, kaj ĝi ludis ĉe junkejo, klinigante kaj relevante la junkojn, kvazaŭ ĝi volus imiti per ili la ritmajn ondojn, kiujn la vento faradas en la kampoj de l' ora greno, ĵus ridintaj ĉe mia vojiro.

Mi eniris en arbareton; la proksimeco de l' akvo naskis belegan herbejon, el kies forta verdo dise eliris la blankaj trunkoj de la popoloj rekte grimpantaj al ĉielo; kaj iaj floroj montris siajn ĉarmajn kolorojn sur la verda tapiŝo.

Kia rava harmonio naskiĝis de la kantado rivera kaj de l' murmurado de arbaro! Ĝi estis bonsona brueto, kiu tamen ne rompas la plenan silenton de la loko soleca. Logita de mia muta ĝuado, mi eksidis sur la molan herbaron. La akraj nuancoj de mia uniformo malakordiĝis subite je mia ekvido kun la mirinda pejzaĝo, kaj mi tial ĵetis mian rigardon malproksimen, kie la blua ĉiela filtriĝas inter la blankajn arbtrunkojn.

La agrabla malvarmeto de la arbaro dormetigis min, kiam malforta bruo de paŝoj subite min vekis; ĵus estis pasanta preter mi alia soldato, kiu kun la dorso turnita al mi sidiĝis ĉe la limo de la arbareto. Scivolemo portis min apud lin kaj mi rimarkis, ke li fiksas sian atenton sur papero, kiun li levias ĝis siaj lipoj, ĝin ŝmacante; romanece mi pensis, ke li kisas portreton de sia fianĉino, kaj timante esti maldiskreta, mi foriris de tie, kiam dolora singulto reirigis min ĝis la antaŭe nekonita soldato, kiun subite mi ekkonis : li estas mia malfeliĉa kolego. Li rigardis, kvankam ilin ne komprenas, la fatalajn signojn, kiuj parolas al li pri la morto de lia patrino, kaj li forte ploradis, kisante la sensentan paperon, kiu lin igas memori sian malgajan hejmon.

Ja granda estis lia senkonsoliĝo, kiam li sciis per mi la malĝojigan novaĵon; sed, nun, kiam li sin kredis sola, nerigardata de iu, li serĉis en la ploro konsolon al sia malĝojo, kaj sopiris laŭte, ne zorgante, ke iu povas lin aŭdi.

Eltenante miajn larmojn, mi lin konsolis, kvazaŭ mi estus lia frato, kaj mi akompanis lin ĝis la kazerno, kie mi skribis al lia patro doloran leteron, kiun li verkas per sopiroj kaj larmoj.

De tiu tago mi lin amis; kaj ĉar mia malvarma konduto je li tute malaperis, li amis min ankaŭ kun la pasio de sia senkultura animo, kaj ĉiam li atestis al mi sian sinceran dankon.

JOZEFO GRAU



Post la II^a Literatura Konkurso



La aŭgusta numero de «La Revuo» enhavas la verkojn de Sroj. Delfi Dalmau kaj Jozefo Grau, kiuj gajnis la unuan kaj duan premion en la II^a L. K. de K. E. F.

Al nia peto pri la nomo de aŭtoroj de verkoj citindaj bonvolis respondi kelkaj samideanoj.

Sro. Artur Torné estas aŭtoro de «Disreviĝo». (Originalaj tekstoj II.) Dro. Joaquim Coll, verkis «Vivu Katalunujo» citindan ĉe sama konkurso. La versaĵo premiita, kies devizo estas «Am' estas ĉie en Naturo» estas originala de Fino. Maria Posenauer, el Antwerpen.

Sro. Emil Momber, el Germanujo, estas aŭtoro de «La Fundamento de nia lingvo k. t. p.» verko deklarita publikiginda en la konkurso de «La Revuo».

La verkojn citindajn en la konkurso de Sro. G. Chavet verkis respektive Sroj. Delfi Dalmau kaj Enric Aguadé. Al tiu lasta K. E. permesis publikigi per «Las Circunstancias» de Reus sian verkon citindan devizitan *Kateno*.

Sro. Jozefo Grau estas aŭtoro de la verkoj citindaj «Ĉe lunradio, al la amatino» kaj «Ĉe la komenco de ia libro» (Originalaj tekstoj II.), «Belo mara min delogas» (Tradukitaj tekstoj II), «Simplaĵo» (Ekster. temoj XI) kaj «Tri anekdotoj» (Ekster. temoj XVII).

En la versaĵo de Sro. Clarence Bicknell publikigita per la lasta numero de K. E. sin ŝovis preseraro, kiu detruas la ritmon de la verso: *Kiun ĉiu koro tenas*. Oni volu aldoni la literon *u* al la nekompleta vorto *ĉi*.

K. E.



III^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

RENUMANTE la komision, kiun faris al ni la III^a kongreso de *K. E. F.* kaj kolektinte opiniojn pri la ideoj, kiujn mi esprimis per mia prezidanta parolado en la nomo de miaj kolegoj, kaj kiuj ĉie renkontis aprobon kaj simpatian, ni decidis elekti internacian juĝantaron por nia III^a Literatura Konkurso, kiu pretigos la vojon al la daŭrigo de la Internaciaj Esperantistaj Floraj Ludoj.

La juĝantaro konsistos el tri membroj katalunaj : Sro. Joseph Garganta, Pastro Joaquim Coll, kaj Sro. Jozefo Grau; kaj tri membroj alilandaj : Sro. Carlo Bourlet, Barono Felicien de Ménéil kaj Sro. Gabriel Chavet.

Sro. Joseph Garganta, prezidanto de la organiza komitato de nia IV kongreso en Olot kaj de la grupo «Olot Stelo», distinginda heraldikisto kaj filologo, delikata poeto kaj malnova esperantisto, estos en la Komitato la membro unuiga inter la konkurso kaj la kongreso mem, kies ĉefa festo ĝi estas.

Doktoro Pastro Coll, redaktoro de *Kataluna Katoliko*, oficiala profesoro de Esperanto en la Barcelona Universitato, korekta verkisto kaj aŭtoro de la projekto pri organizo de konstanta komitato de Floraj Ludoj reprezentos en ĝi siajn ideojn, kiuj, de ĝenerala vidpunkto, entenas la sentojn de nia kataluna esperantista movado.

Sro. Jozefo Grau, sekretario de KATALUNA ESPERANTISTO, reprezentos en ĝi la Federacion kaj ĝian propagandan presorganon, kiu estos ankaŭ al la servo de la konkurso.

Mi ne opinias necese prezenti la aliajn komitatanojn, kiuj tiel afable akceptis nian inviton. La nomoj de Sro. Bourlet, la eminenta matematikisto vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongreso kaj Direktoro de *La Revuo*; de Sro. de Ménéil, la inspirita aŭtoro de nia himno kaj Direktoro de *Franca Esperantisto*; de Sro. Chavet, la delikata kaj sprita verkisto redaktoro de la *Oficiala Gazeto*, sekretario de la *Centra Oficejo*, — estas sufiĉe konataj de ni ĉiuj, kaj sen ia ajn klarigo ĉiu komprenos la gravecon, kiun ili alportis per si mem al nia entrepreno.

Jen nia laboro finita. En la nomo de Sroj. Bremón, Galcerán, Rosals, kaj en la mia propra, mi dankas niajn eminentajn amikojn, kaj deziras al ili plenan sukceson por la bono de Esperanto.

FRED. PUJULÁ

La enlandaj komitatanoj de la «III^a Literatura Konkurso de K. E. F.» interlatiĝis kun siaj alilandaj kolegoj por la redaktado de la *Alvoko*, kiu aperos en la proksima numero de «Kataluna Esperantisto».

E. K.



Katalunaj efemeridoj

AŬGUSTO

- 14-15 1910. — 1.^a Kongreseto de Esperantistoj de la Provinco en Ĝerona.
 22 1908. — La Kongreso de Dresdno decidis okazigi la V^{an} en Barcelono.
 31 1909. — Parolado en grupo Semo pri la internacia stenografio Aoro, farita de ĝia aŭtoro, la germana samideano Sro. R. Sprotte.
 1909. — Sro. J. Bremon publicigas 4 artikolojn pri la V^a Kongreso en la hispana ĵurnalo «La Vanguardia» kaj notojn pri sama temo en «El Diario del Comercio».
 Pastro Vilà malfermas kurson en la «Lernejoj de Sanktaj Just kaj Pastor».
 La urbaj konsilantoj de Tarragono en oficiala kunsido decidis aĉeti esperantajn lernolibrojn por la urbaj gvardianoj.

SEPTEMBRO

- 2 1909. — Malfermo en grupo Semo, de la kurso pri internacia stenografio Aoro, klarigita de ĝia aŭtoro Sro. R. Sprotte.
 4 1909. — Parolado de Sro. Keating pri Brazilio en la *Ateneu Barceloni*.
 6 1909. — Solena malfermo de la V^a Kongreso en la Palaco de Belartoj de Barcelono.
 1908. — Festo en la teatro «El Bosque» el Barcelono okaze de la IV^a Kongreso de Esperanto. Tenoro Rayer kantas esperante la *Rakonton de Lohengrin*.
 8 1909. — Unuaj Esperantistaj Floraj Ludoj en la halo de la Borso de Barcelono.
 9 1909. — Unua prezentado de «Mistero de Doloro» en la teatro «Romea» de Barcelono.
 10 1909. — Internacia Balo en la Palaco de Belartoj.
 11 1909. — Solena fermo de la V^a Kongreso en la Palaco de Belartoj de Barcelono.
 13 1909. — Doktoro Zamenhof vojaĝas al Valencio kaj estas salutata en Tarragono de la Aŭtoritatuloj el tiu urbo.
 1909. — Prezentado de *Mistero de Doloro* en la publika teatro de Sabadell.

ENLANDA MOVADO

Jubileo de Esperanto

En Sabadell

Grandiozaj festoj, solenigantaj la 25-jaran jubileon de Esperanto, okazis la 14^{an} de Julio en Sabadell, organizitaj de la esperantistaj grupoj de l' Vallès¹.

Matene estis inaŭgurata la marmora tabulo, ŝanĝanta la nomon de la strato *Ronda del Nord* per tiu de RONDA DE DRO. ZAMENHOF.

Ĉe la belega arbaro nomata *Can Feu* okazis posttagmeze prezentado de la kataluna dramo de Adrià Gual, tradukita de F. Pujulà y Vallès, *Mistero de Doloro*.

Vespere koncerto, prezentado de la monologo *La Fotografisto* kaj paroladoj por Esperanto havis lokon en la vasta ĝardeno de la ĥora societo «Colón».

STRATO DE DRO. ZAMENHOF

Je la 11^a matene ekmarŝis el la Urbodomo manifestacio, kiu trairis la urbon ĝis la *Ronda del Nord*, kie antaŭ la nomtabulo kovrita per verda kurtteneto la aŭtoritatuloj okupis estradon. En ĝi troviĝis, krom Sro. Rocamora, prezidanto de K. E. F. kaj Sro. Grau, sekretario de K. E., la urbkonsilantoj Sinjoroj Pascual Salichs, ano de «Aplech Esperanta Grupo», Plans, Monllor, Tres, Dro. Argemí, esperantisto eksprofesoro en «Katolika Stelo», Fontanet, Miserachs, Llagostera kaj Griera.

Meze de entuziasma aplaŭdo de la multegaj alestantoj estis malkovrata la tabulo, bela marmora artaĵo, sur kiu apud la simbola kvinpinta stelo legiĝas la surskribo «Ronda de Dro. Zamenhof». La reprezentanto de la Urbestro, Sro. Pascual Salichs per mallonga parolado laŭdas Dron. Zamenhof kaj esprimas la deziron de la sabadell'a Urbestro lin honori, donante lian nomon al tiu strato.

PAROLADO DE SRO. JOZEFO GRAU. — Nia redakcia sekretario esprimas sian ĝojon partopreni en tiu solena festo, ĉe kiu la urbo Sabadell disfalis unu el la bastionoj de la rutina fortikajo, kiu sole baras nian vojon. Parolante pri la celo de nia agado, li rimarkigas, ke ĝi estas ne nur lingva afero, sed ke ĝi plimulte alcelas al kultura perfektigo de la spiritoj kaj al homamo reciproka. Li diris, ke la festo okazanta pravas elokvente, ke la popolo kataluna havas grandan respekton kaj amon al la aŭtoro de Esperanto, kiu liveris al Homaro pacan kaj aman ligilon. En la nomo de la esperantista gazetaro li proponis sinceran dankon al la urbo Sabadell kaj al ĝiaj konsilantoj, kiuj tiel bone scias esprimi la dezirojn de ĝiaj urbanoj.

PAROLADO DE SRO. ROMUL S. ROCAMORA. — La prezidanto de

1. Kataluna regiono, kies ĉefaj urboj estas Sabadell kaj Terrassa.

«K. E. F.» parolis poste kun la elokventeco, kiu lin karakterizas. Sabadell okazigas hodiaŭ feston, kiu bruos tra la tuta mondo, honorante la nomon de Dro. Zamenhof. Tiu ĉi bela festo, kiu kunigas la klopodojn de ni ĉiuj, vidigante samtempe la forton de nia movado, estas iel la frukto de la penado de tiu fervora esperantisto, de tiu entuziasma samideano, Sro. Doménech Serdá, naskita en Sabadell, kiu malaperis el nia mondo, lasante post si la semon de granda organizaĵo, la «Kataluna Esperantista Federacio». Konvenas do, ke ĉe la inaŭguro de la strato de nia Majstro ni memoru ankaŭ tiun, kiu tiel sindone diskonigis lian verkon. Dankante la Urbestaron de Sabadell, li instigis ĝin helpi la laboradon de la esperantistoj irantaj al paca celo.

PAROLADO DE SRO. PERE PASCUAL. — La reprezentanto de la Urbestro esprimis la dankon de la urbo al ĉiuj ĉeestantoj kaj precipe al la aliurbanoj, kiuj venis pligravigi la feston; kaj en la nomo de Sabadell kriis laŭte: Vivu Zamenhof! Vivu Esperanto!

Longedaŭra aplaŭdado aŭdiĝis ankaŭ post tiuj krioj, kiel post la paroladoj de Sroj. Grau kaj Rocamora.

Tiam la ĥoroj «La Americana» kaj «La Industrial» kantis «La Espero'n», kiun ludas la Urba Muzikistaro. La aliaj ĥoraj societoj alestantaj kantis harmonie la belan *sardanon* de Maragall «L'Empordà», kiu kiel nia himno ricevis entuziasman aplaŭdon.

Tra diversaj stratoj la manifestacio, kiun partoprenis kunportante siajn belajn standardojn, krom la ĥoroj *Orfeo de Sabadell*, *La Americana*, *La Industrial*, *Colón*, *Centre Sabadellès* kaj *Llibertat*, la esperantistaj grupoj *Katolika Stelo*, *Esperanta Semo* kaj *Aplech Esperanta Grupo* el Sabadell, *Esperanta Nesto* el Barbará, *Ĉiam Antaŭen*, *La Rondo* kaj *Barcelona Stelo* el Barcelono, reiris al la Urbodomo, kie la kunirantoj disiĝis, adiaŭnte la aŭtoritaton.

Ni vidis dum la festo, krom la jam diritaj personoj kaj societoj, reprezentantojn de la grupoj *Semo*, *Paco kaj Amo*, *Barcelona* kaj *Espero Kataluna* el Barcelono, *Badalona Stelo* el Badalono, *Esperanta Akvofalo* el Ripollet kaj *Lumon* el Terrassa.

EN LA ARBARO «CAN FEU»

5,000 personoj ĉeestis en la festo okazinta posttagmeze ĉe la arboriĉa arbaro popole nomata «Can Feu». Tie sur ebenaĵo meze de kverkoj ombrodonaj troviĝis la partero de la Natura Teatro, kiu enhavis milon da seĝoj, el kiuj eĉ unu restis neokupita. En la fundo sur altaĵo oni starigis scenejon per helpo de bele pentritaj dekoracioj, grande efektantaj.

Antaŭ la prezentado la Urba Muzikistaro ludis ĉe la «Ebena de Amoro» kelkajn kompoziciojn kaj dum la interaktoj estis ludataj *sardanoj*, kiujn dancis grandenombra junularo.

En unu flanko la aŭtoritatuloj kun la reprezentantoj de K. E. F. kaj de K. E., Sroj. Rocamora kaj Grau, kaj de ĉiuj esperantistaj grupoj jam cititaj, okupis loĝion. La tutan parteron kaj eĉ scenejon ĉirkaŭis grandega amaso da personoj atente aŭskultantaj la aktoran ludadon, kiu komenciĝis je la 5^a.

«Mistero de Doloro» la grandvalora dramo de Adrià Gual, kiun esperantigis

Sro. Pujulà, estis bele prezentata de la sama aktoraro, kiu ludis ĝin dum la V^a Kongreso Internacia. Tio ĉi estas la plej granda laŭdo por la organizintoj.

La arta ludo kaj la belsoneco de Esperanto mirigis ĉiujn neesperantistojn, kiuj post ĉiu akto bruege aplaŭdis.

La prezentado finiĝis je la sunsubiro, kaj estis plej bela la aspekto, kiun prezentis la elirejon de la per palisaro ĉirkaŭita arbaro, kiam la multenombra personaro reiris al Sabadell tra la multaj vojetoj, jen per kaleŝoj, aŭtomobiloj kaj alispecaj veturiloj, jen piede aŭ per bicikloj.

EN LA SIDEJO DE LA HŬORO «COLON»

La fino de la esperantista festaro havis lokon en la vasta ĝardeno de la ĥora societo «Colón», kie antaŭ grandnombra ĉeestantaro ĥoro «La Americana» kantis kelke da popolaj kantoj, forte aplaŭditaj. Sro. Penalva ludis la monologon, originale verkitan de Sro. F. Pujulà, *La Fotografisto*, kiu tre plaĉis al ĉiuj. Poste estis farataj kelkaj paroladoj por Esperanto.

Prezidis Sro. Jozefo Clerch akompanata de Sroj. Argemí el *Katolika Stelo* kaj Rocamora, prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio». Apud ili sidis la membroj de la Organiza Komitato kaj delegitoj de kelkaj societoj.

Sro. Clerch malfermis la feston, konstatante la sukceson kaj efikojn de la okazintaj festoj kaj donis la parolon al Sroj. Dalmau, Nin kaj Rocamora, kiuj elokvente parolis pri Esperanto, transcendeo de la jubileaj sabadellaj festoj kaj frateco de la esperantistaro.

Fine Sro. Clerch dankis ĉiujn por ilia helpo kaj fermis la feston, kiun finis kantado de «La Espero».

Ni devas gratuli la Organizan Komitaton, kaj precipe Srojn. Uriach, Clerch, Penalva, Marcet kaj kolegoj, por la granda laboro kaj konstanta peno, kiun ili havis en la preparado de tiuj belaj festoj, kronitaj de la plej granda sukceso. — G. C.

Barcelona

La solenigo de la 25-jara jubileo de Esperanto estis ankaŭ grava en Barcelono. La 24^{an} de Julio en la grupa sidejo de «Barcelona Stelo», afable cedita al la Organiza Komitato de la Jubileaj Festoj, okazis granda balo, kiun partoprenis la belaj esperantistinoj el ĉiuj barcelonaj grupoj.

Ĝi estis tre agrabla festo, ĉe kiu ni salutis membrojn de la grupoj *Esperanto kaj Patrujo*, *La Rondo*, *Esperanta Aŭroro*, *Barcelona Stelo*, *Espero Kataluna*, *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj*, *Ĉiam Antaŭen*, *Semo*, *Esperanta Movado*, *Universala Frateco* kaj *Badalona Stelo*. Ni ankaŭ vidis tie Finojn Puig, Campdelacreu, Rey, Luis, Parés, Leonor, Cortés, Simó, Sánchez k. a. kaj Srojn. Rocamora, Bremón, Pellicer, Dalmau, Rey, Molgosa, Campdelacreu, Gili, Soler, Cruz, Bartomeu, Llorach, Fritzching, Gobernado, Torné, Falgar kaj multajn aliajn, kies nomojn ni ne povis noti.

La dancado finiĝis je la 2^a matene kaj post kantado de la esperantista himno ĉiuj disiĝis hejmen, parolante pri la ĉarmo de la okazinta festo.

La 25^{an} posttagmeze devis okazi manifestacio al la monumento de la profeto de internacia lingvo, kataluno Aribau, kiun la Provincestro malpermesis pro la stato politika de Barcelono. Ni bedaŭras, ke tiu kultura festo, projektita de pacaj homoj, estis malpermesita. Tamen ni ŝparas komentariojn, kiuj ja ne estas necesaj.

Ĉar la malpermeso estis anoncata lasthore, multegaj esperantistoj kunvenis ĉe la Triumfa Arko; inter ili, reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj grupoj barcelonaj kaj kelkaj membroj de *Esperanta Semo* kaj *Aplech E. G.* el Sabadell kaj *Lumon* el Terrassa, al kiuj oni sciigis la prokraston de la manifestacio.

La saman tagon vespere okazis ĉe la restoracio «Mundial Palace» festeno esperantista, kiun prezidis Sroj. Bremón, Rocamora, Rey, Campdelacreu kaj la membroj de la Organiza Komitato.

Ĉe la desertoj oni familie tostis, kaj Sroj. Bremón, Serrat, Grau, Rocamora, Dalmau kaj Campdelacreu ŝerce alparolis la kunmanĝintojn. Poste en la salono de la hotelo estis dancataj kelke da valsoj kaj oni finis la feston, kiel kutime ĉe niaj kunvenoj, per kanto de «La Espero».

Tiun ĉi feston malfacile forgesos la ĉeestintoj, ĉar ĝi estis tre alloga, ne nur pro la entuziasmo, kiu regis ĝin, sed pro la familia amikeco, kiu elmontriĝis dum ĝia tuta daŭro.

La geanoj de «Paco kaj Amo» volis ankaŭ solenigi la 25^{an} datrevenon de Esperanto, kaj ili tion faris per festeno ĉe la restoracio «Bonavista» en La Rabasada la 21^{an} de Julio. 50 gesocietanoj ĉeestis ĝin kaj propagandis nian lingvon, disdonante broŝuretojn «Pro Esperanto» hispane eldonitajn de la societo «Paco kaj Amo».

En Terrassa

Ankaŭ tie la jubileon de Esperanto solenigis la grupo «Lumon» per belega festo, kiu okazis la 11^{an} de Aŭgusto. Dum ĝi legis originalajn versaĵojn Sroj. Ventura kaj Grané kaj eldiris belajn paroladojn Sroj. Alavedra, Figueras, Martí kaj Solá. Ĉiuj ricevis merititan aplaŭdadon.

En Vilanova i Geltrú

La grupo «Laboro Esperanta» honormemoris la datrevenon de la 21^a de Julio 1887^a per literatura kaj muzika festo. La Prezidanto malfermis la kunsidon per kataluna parolado pri la aperigo de la unua libro de Esperanto. Fino. Eulalia Rosell legis per bonega elparolmaniero la versaĵon *Apud la kameno*, premiitan en la II^a Literatura Konkurso de K. E. F. Fino. Teresa Rosell, belegajn neeldonitajn tradukaĵojn; Sro. Escofet, la admirindan versaĵon de nia Majstro, *La Vojo*; Sro. Vadell, kelkajn versaĵojn de Sino. Hankel; kaj Sro. Codina finis la feston per malmultaj sed interesplenaj vortoj, elmontrante la grandegajn profitojn, kiuj efektiviĝis, se ĉiuj lernus la Zamenhof'an lingvon; la utilojn, kiujn faras ĝi al la Homaro, alportante fratecon al ĉiuj homoj kaj popoloj de

la Tero. Poste, Sroj. Segalés, Barozoain, Recasens, Vadell kaj Escofet ludis kelkajn muzikaĵojn, kiujn same kiel la ceterajn partoprenintojn oni multe aplaŭdis.

En Santa Coloma de Farnés

La dimanĉon 28^{an} de la Julia monato «Esperanta Idealo» okazigis en tiu ĉi urbo noktokunvenon por rememorigi la 25^{an} datrevenon de la publikiĝo de Esperanto.

Je la anoncata horo kaj post malfermo de la kunveno sinjoro sekretario laŭvice donis parolon al jenaj partoprenintoj: Sroj. M. Jofré, M. Gener, J. Rodó, A. Vila, J. Gener, J. Clará, P. Costa kaj Sinoj. R. Vidal, M. Capdevila, T. Vidal, A. Furtiá, M. Rodo kaj J. Rotllan. Antaŭ plenplena ĉeestantaro tiuj geparolintoj klarigis la utilecon de internacia lingvo, kiel fonto de bono kaj transcenda esperantismo; oni deklamis poeziaĵojn, honorante la nomon de Dro. Zamenhof kaj finiĝis tiu fervora festo per amplena parolado de Sro. Prezidanto P. Costa, kiu estis bruege aplaŭdita; ankaŭ estis tiel rimarkinda nia samcelano Jozefo Rodó, kiu disvolvis temon pri la graveco de nia lingvo. — *J. Gener.*

OLOT

La 3^{an} de Aŭgusto, Sro. Delfi Dalmau disvolvante la temon *Influo precipe eduka de Esperanto en la Societo* faris paroladon pri kaj por Esperanto, en «Olota Stelo», kiun oni multe aplaŭdis. La klare prezentitaj ideoj kaj la fervoro de nia samideano multe logis ĉiujn, kaj certe la semo jetita fruktodonas baldaŭ.

Antaŭ nelonge «O. S.» sendis al ĉiu grupo de K. E. F. ekzempleron de parolado de Sro. Garganta pri Esperanto. La grupoj, kiuj ĝin ne ricevis, estas petataj sciiĝi sian adreson al dirita societo.

TARRAGONA

Fininte la kurson, kiun la grupo «Tarragono Esperanta» donas al siaj geanoj, ĝi aranĝis serion de ekskursoj por praktikigi kaj disvastigi nian belan lingvon internacian.

La unua ekskurso okazis la 23^{an} de la pasinta Junio al la najbara vilaĝo Torredembarra, kie la geekkursantoj estis akceptitaj kaj regalitaj de la aŭtoritatoj, per belega nokto-kunveno en la granda teatrasalono de la «Café de Dalt» malavare cedita de ĝia mastro.

La standardo de la grupo estis metata en la balkonon de la Urbdomo.

Antaŭ multenombra ĉeestantaro la Prezidanto Sro. Obiol malfermis la feston kaj parolis fraŭlinoj Juan, Bargés kaj Balart kaj sinjoroj Alegret, Roig, Albornà, Huecas, Vidal kaj Agustí, kiuj estis varmege aplaŭdataj.

Per la lasta vagonaro revenis la geekskursantoj Tarragonon tute kontentaj je la afablaĵoj, kiujn ili ricevis kaj konvinkitaj ke baldaŭ estos realeco la fondiĝo de esperantista grupo en tiu apudmara kaj gaja vilaĝo.

— La 24^{an} de la sama Junio «Tarragono Esperanta» rememoris per intima

noktokunsido la unuan datrevenon de la II^a Kongreso de K. E. F. okazinta en Tarragono la pasintan jaron, kunsido kiun partoprenis ĉiuj komitatanoj kaj la fraŭlinoj, kiuj legis en Esperanto kelkajn verkojn faritajn dum la kurso.

Poste, la ĉeestantoj estis regalitaj per festeno, kaj ĉiuj deziris ke tiaj festoj okazu pli ofte. — *La Delegito.*

K. E.



La IV^a Kongreso de K. E. F. en Olot

LA Urbestro de Olot sendis al la D. K. de K. E. F. dokumenton, dankante la Federacion por la decido okazigi en tiu urbo la venontan kongreson, decido kiun ĝentile ĝi nomas honoro.

Niaj karaj kunfederacianoj el Olot komencis jam la preparajn laborojn de la IV^a kaj antaŭvidante la malfacilecon atingi sukceson pli grandan, ol tiu de la III^a kongreso, kiun la klopodoj de niaj amikoj el «Lumon» igis bela neforgesebla festaro, ili frue komencis la laboron en la espero solvi ĉiujn malfacilaĵojn de sia entrepreno.

Per la venonta numero de K. E. ni sciigos la nomojn de la membroj de la Organiza Komitato kaj de la Propaganda, Literatura, kaj Arta Komisionoj, kiujn oni starigis en la lasta kunsido de «Olota Stelo». Ni bedaŭras ke manko de loko malpermesas, ke ni laŭ nia volo pli amplekse parolu pri la organizaj laboroj de la Olot' a Kongreso.

JOZEFO GRAU



Oficiala Parto

La D. K. de K. E. F. decidis ne aperigi numeron de «Kataluna Esperantisto» la pasintan Aŭguston, ĉar la julia numero enhavis grandan kvanton da materialo.

KORESPONDADO

Sro. E. A. Reus. Pri la permeso petita, estos respondate al vi. — Dro. J. C. Barcelono. Ni ricevis vian karton. — Sro. A. Fortet. Olot. Viaj sciigoj alvenis tro malfrue; tamen ni profitis el ili.

Listo de la ĵurnaloj, kiujn deziras akiri aĉete, intersanĝe aŭ donace, JOAN AMADES, *Peu de la Creu*, 10, tenda. BARCELONA. (Hispanujo.)

Alĝeria informilo (Alĝerio, 1908).
Bulletin de la ligue maritime esperantiste (Paris, 1911).
Ĉila verda steleto (Santiago, 1909).
Eksport ĵurnalo (Frankfurt, 1907).
Esperantaj skribaĵoj (Santiago, 1907).
Estonteco (Armentières, 1910).
Esperantisto (Hyraden Kral, 1908).
Germana fervojo esperantista (Kullestein, 1911).
Juna Stelo (Armentières, 1911).
Junulo (Varsovio 1905).
Kalejdoskopoj de l'Esperantistoj (Askersund, 1902).
Kaukaza Stelaro (Vladikulka, 1907).
Kursa Revuo (London, 1908).
La Idealo (Kolombio, 1911).
La Lumo (Kolombio, 1911).
La Espero (Bulgario, 1889).
Liberaj flugfolioj (Smichow, 1905).
Lingvo Internacia (Luleo, 1889).
Lingvo Internacia (Szargzard, 1902).
L'Esperanto (Milano, 1906).
La Norda Stelo (Pskov, 1906).
Monata Revuo Esperantista (Sodoetelge, 1903).
Mondlingvisto (Sofia, 1889).
Malgranda Revuo (Santo Paolo, 1911).
Militista bibliofilo (Roma, 1910).
Nova Trumpetisto (Hedemora, 1906).
Philatelio Esperanto (Buffalo 1908).
Sonorilo elsasa (Alzase, 1912).
Stelo esperanta (Philadelphia, 1911).
Stelo esperantista (Buenos Aires, 1912).
Usona esperantisto (Washington, 1912).

Ĉar mi kolektas nur po unu ekzemplero, nur unu numero sufiĉas al mi, kiu ajn ĝi estu.

Mi aĉetas kaj vendas malnovajn esperantajn gazetojn.

Kolekto de lernolibroj

Katalunaj kaj Kastilaj

	Ptas.
<i>Fundamento de Esperanto</i> , L. L. Zamenhof (Eldono hispana) . . .	1'25
* <i>Gramatica rahunada de la llengua Esperanto</i> , Sro. Pujulà i Vallès. . .	2
* <i>Vocabulari Esperanto-Català</i> , Sro. Pujulà i Vallès.	3
* <i>Vocabulari Català-Esperanto</i> , » » »	3
<i>Poŝvortareto Esperanto-Català i Català-Esperanto</i> , Sroj. Dro. Bremon, Martí i Aldrich	0'75
<i>Kataluna Ŝlosilo</i>	0'05
<i>Quiere V. aprender Esperanto?</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau. . .	0'50
<i>Gramática y Vocabulario Esperanto</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau. . .	3
<i>Vocabulario Esperanto-Español</i> , Sro. F. Pujulà i Vallès	3
<i>Vocabulario Español-Esperanto</i> , » » » »	3
<i>Primeras lecciones de Esperanto de Th. Cart</i> , A. L. Villanueva. . .	0'60
<i>Manual y Ejercicios de la lengua Esperanto</i> , Inglada-Villanueva. . .	1'50
<i>Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto</i> , Inglada-Villanueva	5
<i>Curso Práctico de Esperanto</i> , Duyos-Inglada	3
* <i>Gramática de Esperanto</i> , Sro. J. Garzon Ruiz	2
<i>Prontuario de Esperanto</i> , » » »	4
<i>Programa d'Esperanto</i> , J. B. Aibiñana	0'25
<i>El Esperanto al alcance de todos</i> , Fernando Soler y Valls.	3

Tiujn verkojn oni povas mendi ĉe nia administracio sendante kune la monon, plus 0'25 ptojn. por la rekomenditaj poŝtelspezoj.

* Bindita 0'50 ptes. plie.

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Graella. - SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : Frederich Pujulà
Sek. de Red. : Joseph Grau

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri... Fred. Pujulà. — Parolo de Dro. L. L. Zamenhof ĉe la malfermo de la VIII^a Internacia Kongreso de Esperanto. — VIII^a Universala Kongreso Esperantista, K. E. — Katalunaj ĉjemeridoj. — III^a Literatura Konkurso, K. E. — Enlanda Movado. — Oficiala Parto. — Korespondado.



Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al "Kataluna Esperantista Federacio"

Esperanta Semo	Sabadell
Nova Semo	Reus
Fratega Kunigo	»
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto	Barbarà del Vallès
Olota Stelo	Olot
Lumon	Terrassa
Casino del Comercio	»
Esperantista Junularo	»
Esperanta Juneco	Barcelona
La Rondo	»
Esperanta Fako (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Ĉiam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Fratego	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo	»
Unió Catalanista	»
Novan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo	»
Evolucio	»
Universala Fratego	»
¡Supren!	»
Esperanta Aŭroro	»
Esperanta Racionala Grupo	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Laboro Esperanta	Vilanova i Geltrú
Esperantista Grupo	Mataró
Kamparo	S. Perpetua de la Moguda
Fratego	Vendrell
Esperantista Amikeco	Manlleu
Esperanta Amo	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Esperanta Amikaro	Banyolas
Herda Espero	Lleida
Fratego	S. Feliu de Guixols
Gerona Esperantista Ligo	»
Badalona Stelo	Badalona
Paco kaj Amo	Palafrugell
Verda Stelo	Flix
Semo	Buenos Aires

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : FREDERICH PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEPH GRAU

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO : *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Parolo de Dro. L. L. Zamenhof de la malfermo de la VIII^a Internacia Kongreso de Esperanto.* — *VIII^a Universala Kongreso Esperantista, K. E.* — *Katalunaj efemeridoj.* — *III^a Literatura Konkurso, K. E.* — *Enlanda Movado.* — *Oficiala Parto.* — *Korespondado.*

PRI...

LA OKA

PA kongreso de Krakovo okazis en plena sukceso. Nia ĝojo estas des pli granda ke dum la tuta jaro la pesimismaj meteorologiistoj ne ĉesis aŭguri la eksplodon de la ventego, kiu devis frakasi unu kontraŭ alia la unuojn de nia ŝiparo. Sed la pilotoj tenis per lertega mano la direktilojn, la maristoj manovris akurate kaj kuraĝe, kaj la vento, kiu devis disŝiri velojn, splitigi masojn, malkalfatri fendojn, balai ferdekojn kaj disigi nian armeon, favore blovas nun al ni, kaj ni amase boardas al la venko kontraŭ la fornaĝanta malamiko. Sama kanto, sama kriĉo aŭdiĝas sur la ferdeko de ĉiu ŝipo; sama deziro brulas en la koro de ĉiu maristaro; kaj tio, kio en la socia vivo estus malbela kaj senkuraĝiga, estas ĝojiga en nia batala movado, kiu nur unusenteco kaj disciplino povas konduki al la venko.

La organizintoj de la krakova kongreso povas esti kontentaj: ĝia dato restos en la esperantista movado ĉe la flanko de la bonaj rememoroj, kaj Esperanto havis la jubileon, kiun ĝi meritis. El nia malgranda, nova ŝipeto je blankaj latinaj veloj ni entuziasme krias trifoje *hura!*

ALINEO

Du monatoj pasis kaj ni ankoraŭ atendas la respondon de nia kolego *Tulmonda Espero* pri la religia silento, kiun ĝi dediĉis al la sukcesoj de la esperantista movado en nia lando. Kiu silentas, tiu konsentas. La afero estas juĝita; ni ne parolos plu pri ĝi. Sufiĉis al ni montri al la esperantistaro tian konduton neniel pravigeblan. Ni nur bedaŭrus, ke du-tri personoj povus kredigi al la eksterlandaj esperantistoj pri divido ĉe la katalunoj. Tio tro kontentigus la malamikojn de Esperanto. Sed ni ne bezonas insisti; oni konas sufiĉe nin. Aliflanke, la graveco de nia Federacio malpermesas al ĝi enmiksiĝi en la internajn aferojn de la grupoj, kaj ĝi jam havas sufiĉe da laboro en la propagando kaj varbado de novaj samideanoj. La fervoraj esperantistoj, kiuj — feliĉe — restas en «*Espero Kataluna*» sufiĉas al si por agi tiamaniere ke la tradicio de la grupo ne restu rompata restante en la escepto; kiu ĉagrenas nin kaj ne tro favoras al ĝi. Nia Federacio estas kvazaŭ jam longa vagonaro, kiu rapide iras al la celo; oni povas tre noble resti ekster ĝi kaj rigardi ĝin pasi, sed oni ne povas sendanĝere meti ŝtonojn sur la relojn. Kiam niaj amikoj de *E. K.* atentos al la malbeleco de tiu ago ili certe malpermesos ke oni agu en ilia nomo tiamaniere.

FRED. PUJULA

LA MANTELO DE L'ESPERANTO

Diplomo de abituriento. Rapida vagonaro : 9 horojn por 100 kilometroj. Ĉar tra la fendoj de la vagonoj eniras malvarmo, la vojaĝantoj ofte malsupreniras kaj marŝadas apud la vagonaro por revarmiĝi. Kvara oficiala ĉefurbo de Katalunujo. Onklino.

La noktoj estas longaj; la spektakloj — malmultaj : kelkaj mallumaj kafejoj, kie grupetoj da homoj tarokas ĉirkaŭ petrolumilo en angulo; kelkaj bilardoj grandaj kiel trogoj, kies eburaj buloj aŭdigas sonojn el *Danse macabre*. La abituriento pasiĝis por la karambolado kaj atutoj.

De post kelke da tempo la esperantista movado sukcesas en la urbo : paroladoj, cirkuleroj, fondo de grupo, artikoloj en la gazetoj... kaj kursoj. Kom-

preneble, la ĉefa argumento — facileco — estas ripetita de ĉies buŝoj. Nur la onklino ne partoprenas la ĝeneralan opinion.

— Jen ankoraŭ mensoguloj, tiuj esperantistoj kun sia facila lingvo. De post kiam mia nevo ŝin donis al la studado de tiu parolo, li revenas el la kursoj je la tria, kvara kaj eĉ kvina matene, lia sano malboniĝis kaj li ne scias ankoraŭ diri «bonan tagon!» Mi timas, ke ili elfuŝas ian alĥemian malbonagon en tiaj kursoj.

Tamen, je la dekunna nokte la esperantistoj sonĝas en siaj litoj pri sufiksoj kaj interrilataj vortoj... Ili eĉ ne suspektas, ke venis en la urbon ĵus bakita abituriento...



PAROLO DE DRO. L. L. ZAMENHOF

ĈE LA MALFERMO DE LA VIII^a INTERNACIA KONGRESO DE ESPERANTO



A unuaj vortoj, kiujn mi volas hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Ĵus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam — post longa naska preparado — aperis publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kiu ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpigas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas en sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

Dudek kvin jaroj da laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo! Tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre nemultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn lacigis la malfacila, grandan paciencon kaj persistecon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj, kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉambrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri ia freneza, mokinda kuriozaĵo; tre multaj al vi en la momento de la apero de Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malplej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis

ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj pacience ŝetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikon.

Dudek kvin jaroj! grandegan gravecon havas tia peco da tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu opinias, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonaĵo nenium incitas, eĉ nenium meditigas, kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvinjara vivo! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malĝraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortigante kaj riĉigante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikigante sian tute definitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, — ni povas pri tio sincere nin gratuli.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj — se Esperanto vivos — ĉu oni tiam povos ankoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povos kompreni esperantiston hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfekte trankviligan respondon. Ĉiu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absolute nenia diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la *reguleco* de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniom diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas

tiel vortoriĉa, kiel verko, skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo. Lingvo, kiu eltenis, la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan generacion kaj estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, sian tute precizan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn, — tia lingvo ne bezonas jam timi, ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas.

La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniu el ni povas senpune malrespekti. La hodiaŭa jubileo estas festo de tiu vivo kaj tempo.

* * *

Por ke ni, vivantoj, povu festi la hodiaŭan jubileon, fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. Nia morala devo estus rememori ilin en la nuna solena momento. Sed ho vel ilia nombro estas tro granda, por ke ni povu ilin ĉiujn citi, kaj krom tio la pli granda parto el ili laboris tiel modeste, ke ni eĉ ne scias iliajn nomojn. Tial, por ne fari maljustan apartigon inter eminentuloj kaj ne-eminentuloj, mi citos neniun nomon. Mi devas fari escepton nur por nia kamarado Van-der-Biest, kies nomo estas ankoraŭ tro freŝa en la memoro ĉe ni ĉiuj, kiu en la pasinta jaro aranĝis kaj prezidis nian grandan ĉiujaran feston kaj kies morto estas sendube ligita kun tiuj grandaj laboroj kaj malagrablajoj, kiujn li prenis sur sin por ni ĉiuj. En via nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de ĉiuj niaj karaj kamaradoj, kiujn dum la pasintaj dudek kvin jaroj forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivis. Mi proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj.

* * *

Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari ĝin tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi «majstron», ke vi ĉesu honori min per tiu titolo.

Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke

mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneco transdonis al la esperantistoj mem. Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn : «tion mi postulas» aŭ «tion mi deziras». Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon [mi — laŭ via deziro — dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon. Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min *antaŭ* vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:

La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono, aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉio, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernas nur la aferon de la lingvo, fortenas de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estas simpatia kaj kiuj timas, ke, fariĝante esperantistoj ili devus rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas, eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinion la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj *dekretoj*, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona *influo*. Estas necese, ke la mondo sciigu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan *majstron*. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu «Majstro», ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.

Multaj en vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spi-

rita parenceco inter mi kaj vi estas laŭvola, ke la esperantismo ne povas esti responda pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ ko vinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio neniu el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj al kutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur *privataĵo*, kiu povas eble esti *bazita* sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel *identita* kun ĝi.

* * *

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: «kiu pli laŭte krias, tiu estas prava». Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se al tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava *socia problemo*, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante *propagandi* nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu *estimon* kaj *konfidon* por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi por komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj «espero, obstino kaj pacienco»; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: «konkordo».

* * *

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo malagrable seniluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos : ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia «kanto de cigno», li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la grava tago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havas por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco per neevitebla natura reago naskis la esperantisman movadon, — ĉu en ĉi tiu grava kaj solena momento li nenion pli havis por diri al ni? Ho, ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantisman, pri ĝia esenco kaj espereblaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi pli ne parolas.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtralehoma, sengenta lingva fundamento, — tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento, ni ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.

* * *

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu ni kunvenis, pretiĝis por ni gastaman akcepton, faris multe, por honori nian aferon kaj por agrabligi al ni nian restadon dum la kongreso. Mi esperas, ke, revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun verŝajne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiuj montris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj kaj personoj, kiuj donis al nia kongreso sian moralan kaj materialan subtenon, mi esprimas en via nomo la plej koran dankon. Plej koran kamaradan dankon ni esprimas kompreneble antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona aranĝo de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron.

VIII^a Universala Kongreso Esperantista

Krakovo 11^a - 18^a Aŭgusto 1912

EN la antikva ĉefurbo de Polujo, bela urbo Krakovo okazis jam la Jubilea Kongreso, majstre organizita; la kongresa komitato ricevis multajn laŭdojn ne nur por la bonega organizo de la festoj sed de la multaj detalaĵoj, pri loĝejo, speciale, el kiuj konsistas kongresa semajno.

Ĉeestis la Kongreson proksimume 1000 esperantistoj. Efektive, tiu nombro ne estas tiel granda, kiel ĉe la antaŭaj kongresoj, sed estas atentinde, ke niaj rusaj samideanoj partoprenis en malgranda nombro, ĉar manko de nehavbla pasporto kaŭzis nevenkeblajn malfacilaĵojn. Tamen, estis impresiga la amaso da kongresanoj en la malgranda urbo, kiu estas Krakovo. Oficiala reprezentanto sendita de la Aŭstria Milita Ministrejo Sro. Gostomski partoprenis ankaŭ en la Kongreso, kaj gajnis al si ovacion per sia unua parolado, ĉe kiu li konstatis, ke Krakovo, dum centjaroj nealmilitebla urbo, estas nun almitita de la Esperantistoj.

Jam ĉe la stacidomo la kongresanoj vidis akceptejeton, kie kun kora bonveno oni havigis al ili klarigojn pri loĝejoj pli bonaj, k. c. Ekzistis ankaŭ alia akceptejo — Kongresa Akceptejo — kie troviĝis esperanta ekspozicio forte interesanta, vendejo, bufedo, monŝanĝejo, skribejo, k. t. p.

Ĉiuj stratoj estis ornamitaj per esperantaj kaj polaj flagoj, kiuj gaje flirtadas, kaj la tramoj portis ankaŭ esperantan ornamaĵon — flagojn kaj foliojn. Tre multe da anoncoj esperante redaktitajn vidiĝis sur la muroj kaj donis al la alvenanta esperantisto tre bonan impreson.

Krakovo, kvankam malgranda, enhavas grandan nombron da interesaĵoj, kiujn amase vizitis la esperantistoj dum la malmulta tempo, kiun la tre plena programo de la Kongreso lasis libera.

Dimanĉo, 11^a. — En la diservoj okazintaj en la diverskultaj preĝejoj tre antikvaj — katolika, greka kaj hebrea — ĉeestis amasego da personoj, kiuj pie aŭskultis la predikojn faritajn en Esperanto de elokventaj pastroj. La saman matenon la plejmulto de la kongresanoj vizitis la monumenton al glora heroo Kosciusko; ĝi estas piramidmonto farita de miloj da Poloj, kiuj alportis plenmanon da

tero en memoro de la nacia heroo. La Urbeŝtaro de Krakovo regalis la naciajn delegitojn per festeno, ĉe kiu la aŭtoritatuloj montris sian estimon kaj aprobon por Esperanto.

Je la 3.^a posttagmeze en la plenplena Malnova Teatro okazis la malferma kunsido de la Kongreso. La Urbeŝtro aŭ Prezidanto — tiel oni lin nomas — salutis la kongresanojn per bela esperanta parolo, kiun oni forte aplaudis. Unuanime estis elektata prezidanto de la Kongreso, Dro. Mikolajski, redaktoro de «Lvova Kuriero». Meze de entuziasma ovacio starigas Dro. Zamenhof kaj legas per klara kaj forta voĉo la paroladon, kiun niaj samideanoj trovas aliloke. Kiam li diris, ke li ne plu aperos antaŭ ni, sed inter ni, krioj «ne, neeble» laŭte aŭdiĝis kaj ĉe la fino de lia parolo la esperantistoj kriegis je lia honoro estimajn *vivuojn*. Poste parolis 23 diverslingvanoj, el kiuj japano, hindo, meksikano kaj usonano; ankaŭ alparolis Sro. Gostomski, reprezentanto oficiale sendita de la Aŭstria Ministrejo de l' Milito, kiu estis varme aplaudata.

Vespere, oficiala verpermanĝo, kie la geesperantistojn havis okazon interkonatiĝi.

Lundo, 12.^a. — Matene okazis kun sukceso la malferma kunsido de U. E. A. Posttagmeze, la unua labora kunsido, ĉe kiu regis granda unuanimeco. Sro. Bourlet faris proponon en la nomo de generalo Sebert pri Budĝeto, kiun oni aplaudis. Aliajn decidojn oni prenis, sed manko de loko malebligas ilin citi. (La oficialan protokolon publikigas la «Oficiala Gazeto»)

Vespere okazis la jubilea koncerto, kiu estis belega. La ĉarma kantistino Ada Sari allogis kantis kaj la granda aktorino de pola teatro Sino. Wysocka deklamis majestajn versojn tradukitajn de la fama stilisto Grabowsky. Nia poeto la malnova esperantisto Leo Belmont faris spritegan paroladon alte ŝatatan. Virvoĉa ĥoro kantis tre bele polajn kaj esperantajn kantojn.

Mardo, 13.^a. — Per nepriskribeble longa vagonaro la esperantistoj veturis al Wieliczka Salminejo, mirindaĵo, kiun neniel forgesos la vizitintoj. En la subteraj koridoroj, en la ĉambroj nuancoriĉaj de la minejo, iluminitaj per belkoloraj fajraĵoj, kies rebrilojn resendis al ni la surfacon de trankvila lageto, la esperantistoj sin sentis ravataj de la natura spektaklo, kiun pliĉarmigis la sonoj de l' gaja balo, partoprenata de la verdstelaj gnomoj, kiuj 400 futoj sub la tersupro pasigis plej bele kvar horojn. En la profundaĵoj de la artefarita kaverna belaj muzikkantoj vokis eksterordinarajn eĥojn; rimarkindaj

estas ankaŭ vastega ĉambro kun sanktfiguroj el salo, subtera stacidomo kun bonprovizita bufedo. La koridoroj de tiu salminejo havas entute 600 kilometrojn!

Merkredo, 14^a. — En la labora kunsido oni decidis prokrasti la demandon pri ĝenerala organizo, laŭ interkonsentoj de Sroj. Mu-die kaj Bourlet, kaj estis aprokata la raporto de la Lingva Komitato.

Vespere, oni prezentis en la granda nova teatro la ĉefan verkon de Slovacki, tragedion «Mazepa» tradukitan de Grabowski. Mirinde elparolis la geaktoroj dum sia tre genia ludado, kaj la ĉeestantoj plej entuziasme aplaudis ilian rolludon. Distingiĝis Sro. Wysocka en la rolo de Amelio, Sro. Sosnowski, kiu ludis la rolon de Vojevodo, Sro. Stanislawski en la ludo de «Mazepa» kaj Sro. Marianski, prezentante Zbignjev'on. Estis dediĉata aplaŭdego al Sro. Grabowski, kiu estis la heroo de la VIII^a.

Ĵaŭdo, 15^a. — Ankaŭ kiel dimanĉe okazis religiaj diservoj en la diversaj preĝejoj kun elokventaj predikoj de la katolika kaj protestanta pastroj kaj de la rabeno.

Je la 5.^a estis disdonataj la premioj en la arkitektura konkurso, kaj je la 10^a vespere okazis Internacia Balo, ĉeestata de multaj esperantistoj kun naciaj kostumoj, inter kiuj ni memoras rusan kaj bohemiajn studentojn, kun studentaj kaj popolaj kostumoj tre interesaj, kolonelon Pollen en mirinda hinda vesto kaj belajn hispaninojn kun ĉarmaj kostumoj.

Vendredo, 16^a. — Matene okazis la dua labora kunsido de U. E. A. Posttagmeze, la tria labora kunsido de la Kongreso; dum ĝi oni elektas Genovon kiel kongresurbon de la IX^a. kaj Parizon por la X.^a en 1914.^a Oni elektas poste la reprezentantojn de la konstanta komitato de la Kongresoj.

Post tiu kunsido Sro. Parrish faris gravan paroladon pri Kalifornio dum kiu li montris belegajn lumbildojn pri tiu lando.

Vespere oni prezentis la operon «Halka». Ĝi estis perfekte kantata de ĉirkaŭ 30 gekantistoj. La scenajoj, orkestro kaj agado estis perfektaj; la muziko estas vere alloga kaj melodias. Poste, en apuda kafejo multe da kongresanoj salutis Dron. Zamenhof kiun akompanis liaj edzino kaj filino, per la kanto de «La Espero». Estis momento de granda entuziasmo.

Sabato, 17.^a. — Je la 9^{1/2}, matene okazas la lasta kunveno de

U. E. A. kaj posttagmeze la ferma kunsido de la VIII.^a Oni voĉdonas dankon al la British and Foreign Bible Society por la intereso kiun ĝi montras por la eldono de la Nova Testamento en Esperanto.

Oni unuanime voĉdonas dankojn sendotajn al la Urbkonsilantaroj de Terrassa kaj Sabadell pro la alpreno de la nomo de *Dro. Zamenhof* por placo kaj strato de tiuj urboj. Sro. René Ferter reprezentanto de nia «K. E. F.» dankis la Kongreson je nia nomo, kaj estis varme aplaŭdata. Sro. Rosentock je la nomo de la komitato de la VIII.^a respondante al la danka esprimo kiun la Kongreso adresis al tiu komitato diras tre kortuŝe kelkajn vortojn kaj la Kongreso estas fermita per la sonoj de «La Espero».

La VIII.^a internacia kongreso de Esperanto jam okazis. Nova triumfo por nia lingvo, nova venko por nia idealo. Vivu Esperanto! (*Laŭ informoj de la delegito de K. E. F. Sro. René Ferter.*)



Katalunaj efemeridoj

OKTOBRO

1910. — La kataluna ĵurnalo «Diario de Villanueva y Geltrú» ekpublikas «Esperantan Rubrikon».
1910. — Fondiĝas la grupo *Stelo Katolika* en Sabadell.
- 6 1910. — Fondiĝas la baldaŭ malaperanta *Centra Komitato* de la Barcelona Esperantistaro.
- 13 1910. — Aperas la 1.^a *Esperanta Rubriko* en la ĵurnalo *La Publicidad* sub la direktado de Sro. Delfi Dalmau.



III^a Literatura Konkurso

Kvankam la membroj de la Juĝontaro de la venontaj Floraj Ludoj komencis jam la preparajn laborojn, la *Alvokon* al la Konkurso pri kiu ni parolis en la laste aperinta numero de KATALUNA ESPERANTISTO, ni ne povas publikigi per ĉi tiu. Tamen ni povas certigi, ke ni publikigos ĝin en la novembra numero.

K. E.



ENLANDA MOVADO

Post longa malsano mortis en Banyoles la patro de nia eksprezidanto Dro. J. Bremón Masgrau. Nia kara amiko scias bone kiom ni lin estimas kaj sekve estas nenecese nun esprimi ke liaj malĝojoj estas ankaŭ niaj; al li kaj lia familio ni sendas nian plej koran kondolencon. Pace ripozu la formortinto!

Nia kara poeto Sro. Josep Ventura el Terrassa estas la aŭtoro de la verko citinda (Originalaj temoj, I) devizita «Bukedo».

Nia diligenta vicsekretario Sro. Manuel Bordas sciigas nin esti la aŭtoro de la verko citinda devizita «Bukedo el nigraj floroj» (Originalaj temoj II).

BARCELONO

— La 2^{na} de Oktobro komenciĝos denove en nia Universitato kursoj de Esperanto gvidotaj de Dro. Joaquim Coll, diplomita profesoro de K. E. F. Unua kurso okazos merkrede kaj vendrede de la 5^a ĝis la 6^a vespere kaj la dua, lunde kaj merkrede je sama horo. La premio «Universitat», konsistanta el 100 pesetoj, estos aljuĝita ĉe la fino de la kurso post konvenaj ekzamenoj al la lernanto, kiu estos pli multe profitinta el la donitaj lecionoj.

— Ĉe Sro. Rocamora, prezidanto de la K. E. F., kunvenis la 8^{na} de Septembro kelke da prezidantoj de la grupoj aliĝintaj al la Federacio por priparoli la proponon pri organizo de festo soleniganta la malfermon de kursoj de Esperanto ĉe ĉiuj grupoj en Katalunujo. Kun granda entuziasmo oni akceptis tiun proponon kaj unuanime estis decidate okazigi grandan feston ĉe la bela salono de la grava societo «Foment del Treball Nacional» kiu afable metis ĝin je nia dispono.

— La «Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj» daŭrigos kurson de Esperanto en la sidejo de la societo «Círcol Barcelonés d'Obrers» (strato Durán i Bas, 9, pral) ĉiujn mardojn, ĵaŭdojn kaj sabatojn de la 7^a ĝis la 8^a vespere. La kurso, kiun klarigos Pastro Claudi Planell, estos komencata la 1^{na} de Oktobro.

La K. L. de K. E. decidis ankaŭ okazigi dum la aŭtuno kelkajn ekskursojn al vilaĝoj katalunaj. Zorgas pri la organizo de tiuj propagandaj agoj Dro. J. Coll kaj Sro. M. Gili.

— La 25^{na} de Aŭgusto la grupo «Supren!» ekskursis sur la monton *Sant Llorens de Munt*. En Terrassa la ekskursantoj rekontigis kun la grupanoj el «Lumon», kiuj plinombrigis ilin. Forlasinte la vagonaron ili salutis aliajn ge-

ekskursantojn de la dirita grupo «Lumon» kiuj sin direktis al Montserrat. Ĉirkaŭ 50 geesperantistoj vizitis la interesan monton, kies belajoj logis ĉiujn. La ekskursantaro sin direktis al *Cavall Bernat* ŝtonego kiu sen helpo de konvena ilaro suprengrimpis Sroj. Morancho, Capella el Barcelona kaj Sro. Casanovas el «Lumon». Poste kaj per helpo de ŝnuro kuniĝis al ili deko da esperantistoj kun la grupa standardo. Ĉe *Can Poble* la esperantistoj estis tre afable akceptitaj de Liaj Moŝtoj la Barono de Quadras kaj lia filo kiuj ilin akompanis al la kavernoj *Cova del Frare* kaj *Cova Nova*. Post la tagmango kiu okazis en *La Mola* (1100 metroj) kaj tra la ruiniĝinta ermitejo de *Santa Agnes* kaj la vilaĝo de Castellar del Vallés oni alvenis al la stacidomo de Sabadell de kie oni alveturis hejmen gajaj pro la bela ekskurso, pri kiu raportis la barcelonaj gazetoj.

La sama grupo organizis aliajn ekskursojn al Montcada kaj al proksimaj kavernoj, kiuj multe sukcesis. La 22.^{an} nokte tiu grupo okazigis balon en sia sidejo en kiu partoprenis multaj gesamideanoj.

— Organizita de «Esperanto kaj Patrujo» okazis la 1.^{an} de Septembro ekskurso al la «Colonia Gñell» (grandega fabriko kaj laborista loĝejo), kiun partoprenis ĉirkaŭ cent esperantistoj, inter kiuj estis belaj samideanoj.

Tra vilaĝo Cornellá oni venis al la «Colonia», kie Sro. Carreras, direktoro de la fabriko, gvidis la ekskursantojn tra ĝi, klarige montrante al ĉiuj la diversajn maŝinojn, instalajojn, k. c., kio multe plaĉis al la vizitantoj. Oni vizitis poste la «Protektasocion» kies direktoro pastro donis al ni tre ĝentile detalojn pri ĝia organizo, kiu meritis de ĉiuj grandan laŭdon.

Post fotografado de l'ekskursantaro oni revenis Barcelonon, kie ĉiuj disiris ĝojaj pro la afableco de la direktoroj de la «Colonia» vizitita.

La sama grupo elektis en sia lasta ĝenerala kunsido la jenan komitaton: Prezidanto : Sro. Joan Blanch. Vicprezidanto : Sro. Pere Domenech. Sekretario : Sro. Joan Viñas. Sekretariino : Fino. Emilia Fontanillas. Kasisto : Sinjoro Manuel Rodriguez. Kalkulisto : Sro. Josep Romagosa. Bibliotekistino : Fino Carme Sandalinas. Membroj : Sroj. Josep Fontanet kaj Domenech Viger. — *Johano Viñas.*

SANT FELIU DE GUIXOLS

La 15.^{an} kaj 16.^{an} de Septembro havis lokon en tiu urbo la III^a Kongreseto de la Ĝerona Esperantista Ligo, kiun ĉeestis samideanoj el multe da urboj kaj vilaĝoj enprovincaj. Per venonta numero ni raportos al niaj legantoj pri la kongresaj festoj. Estis decidate de la kongresanoj, ke la venonta Kongreso okazu en Olot dum la IV^a Kongreso de K. E. F.

REUS

La 19.^{an} de Julio okazis en «Nova Semo» konkurso finanta la kursojn aranĝitajn dum 1911^a-12^a. La tribunalo konsistis el Fino. Teresa Estela kaj Sro. Enric Aguadé, geprofesoroj diplomitaj de K. E. F. kaj Sro. R. Pallejà.

Post parolado de Sro. Aguadé okazis la konkurso kiu partoprenis la sekvantaj gesinjoroj: Finoj. Maria Aguadé, Josefa Anguera, Maria Borrás,

Josefa Felip, Carme Mestres, Antonia Serra kaj Maria Serra; Sroj. Nilo Alsina, Sebastià Castellví, Lluís Ferrer, Joan González, Franciso Simó kaj Jaume Vilalta.

La partoprenantoj bone tradukis la rakonteton de L. Tolstoj «Tri amikoj» kaj fragmenton de la verko «La formortinta Delsuno.» Ĝi estis tre bela festo.

MANLLEU

La grupo «Esperantista Amikeco» okazigis la 18^{an} de Aŭgusto gravan propagandan feston, kiu certe multe fruktodonas.

En la granda provizora dancosalono, starigita okaze de la ĉefa festaro meze de la placo Bernardi, komenciĝis je la 11^a matene la propaganda festo, kiun prezidis Sro. Manuel Roca. Apud li sidis en la prezida loko la urbkonsilantoj Sroj. Joan Riera, Manuel Arbat kaj Joan Codina, fraŭlinoj Concepció, Pilar kaj Serafina Llagostera, aninoj de «Esperantista Amikeco», la profesorino de «Espero Kataluna» fraŭlino Vilalta, kaj la propagandistoj por tiu festo delegitaj de «K. E. F.» Sroj. Campdelacreu kaj Grau.

Sro. Roca malfermis la feston per kelkaj vortoj prezentantaj la parolontojn kaj trandonis la parolon al Sro. Johano Campdelacreu, kiun per aplaŭdoj salutis la alestantoj.

Sro. Campdelacreu klarigis la faciligojn, kiujn oni atingos per la enkonduko en komunan uzadon de la helpa lingvo Esperanto kaj sin plendante pri la moko ricevitaj de la esperantistoj pruvis klare, kiom maljustaj ili estas. Grandaj aplaŭdoj premiis liajn vortojn.

Sro. Jozefo Grau komencis sian paroladon, difinante la esperantan celon kaj atentigante ĉiujn pri la interna ideo de Esperanto. Pruvinte per elokventaj frazoj la eblecon kaj utilecon de internacia lingvo, li esploris la demandon kiel estos atingita ĝia celo, kaj venis al la konkludo ke Esperanto, kies perfektecon kaj simplecon li elmontris, estas la estonta lingvo helpa de la tuta mondo. Fine post refutado de malsaĝaj diroj kontraŭ nia lingvo, li invitis ĉiujn komenci ĝian lernadon. Varma aplaŭdado de la multenombra ĉeestantaro bruis ĉe la fino de lia parolado.

La prezidanto finis la feston, anoncante malfermon de du kursoj por viroj kaj virinoj klarigotaj ĉe «Esperantista Amikeco», kaj dankante la aŭtoritaton por ĝia ĉesto kaj partopreno en nia agado.

Posttagmeze en la grupa sidejo okazis amika interparolado inter la propagandistoj parolintaj matene kaj la geanoj de «E. A.», kiuj plifortigis sian entuziasmon por Esperanto.



Ni ricevis la unuan numeron de «*Vehigolo*» internacia sendependa organo por la defendo de Esperanto, kiu aperis en Parizo dum la pasinta Aŭgusto. Ĝi venas al nia movado por kontraŭbatali la pseŭdesperantistojn, kiuj per sia personema, profitema, mensogema agado provizas je argumentoj la senkaŝaj malamikoj de nia movado.

Ni deziras al ĝi longan vivon kaj ke ĝia laborado estu utila kaj efika por Esperanto.

Malfavora sorto malhelpis nin la kurantan monaton; niaj kunfederacioj pardonu nin.

Sro. Grau, kiu dum foresto de Sro. Pujulá zorgas pri K. E. estis devigata enkorpusigi denove, kiam tiu ĉi numero estis donita al presistoj. Kaj ankoraŭ, la monotipistino, kiu ĝin kompostas, malsaniĝis. Sin anstataŭi estis malfacile... tial la presado kaj apero de la nuna numero prokrastiĝis. Ĉu ni povas kredi je la bonvolemo de niaj amikoj? De ili ni esperas ke afable ne atentos pri la malfrua publikigo de tiuj paĝoj. Kaj se niaj redaktoroj ne revenas, ni pretigu repeti pardonon en la proksima numero!!!

— Troeco da originalo malpermesas al ni publiki, kvankam ĝi estas jam kompostita la «Projekton de regularo por la Literaturaj konkursoj de K. E. F.» Bonvolu pardoni ĝia aŭtoro D^{no}. J. Coll. — E. Pellicer.



Oficiala Parto

Por fine starigi la Konsultan Komitaton de K. E. F. oni invitas la prezidantojn de la grupoj aliĝintaj ĉeesti la kunvenon, kiu okazos la 27^{da} de Oktobro je la 5.^a posttagmeze ĉe Sro. Rocamora, prezidanto de la Federacio, strato Angels, 1, 1.^a en Barcelono. La tagordo konsistas el *aprobo de la funkcio regularo de la K. K. de K. E. F. kaj elekto de prezidanto kaj sekretario.*

La prezidantojn, kiuj ne povos ĉeesti, oni insiste petas volu sendi al la sekretario nomon, adreson kaj daton de sia nskigo.

La provizora sekretario. JOAN AMADES.

La sekretario de K. E. F. ricevis kaj transsendis al iliaj respektivaj adresoj, du leterojn de la konstanta komitato de la Kongresoj adresitajn al la Urbkonsilantaroj de Terrassa kaj Sabadell sciigante ilin pri la decido de la VIII^a kongreso kiun ni publikigas aliloke.

La Administració de K. E. F. prega a tots els Srs. Delegats, que encara no tinguin la liquidació del present any feta, que a la major brevetat se serveixin fer-ho a fi de facilitar les tasques d'administració.

Igualment serveixi dit preg pels senyors que vivint en poblacions on no y ha delegat tinguin a bé enviar la quota directament an aquesta administració.



KORESPONDADO

Sro. B. N. Manlleu. Bedaŭrinde vian sciigon ni ne povas publikigi, ĉar loko mankas. Similajn ni devis ankaŭ forlasi tial la pasintajn monatojn. Tamen, ni dankas vin. — Sro. J. A. Vic. Dankon por viaj gratuloj. Vian artikolon jam kompostitan antaŭ kelkaj monatoj, ni ne enpresis, ĉar tro multe da materialo devigis nin fari tion. Nun eble ĝi perdis aktualecon. — Sro. J. G. Sta. Coloma. Vi estas prava. Vian devizon «konstanteco» vi severe plenumas. Daŭru sur la sama vojo! — Sro. A. F. Olot. Volu sendi al ni laŭ eble baldaŭ la nomaron de membroj de l'organizaj komisionoj de la Kongreso, kiuj definitive estos elektitaj. — Sro. J. A. Barcelono. Tiun kvanton vi devas sendi al la Kasisto Administranto de K. E. F.

LLISTA DE DELEGATS AUTORITZATS PER LA ADMINISTRACIÓ DE K. E. F. PER A REBRE LES QUOTES

Sabadell	Lloc Social	Gracia, 12.
Reus.	Sr. E. Aguadé	Presó, 15.
Vilanova i Geltrú	» F. Mestres	Sant Antoni, 1 i 3.
Barbarà.	» J. Puigbonet.	Sant Pere, 39.
Balaguer	» M. Espar Boquer	Miracle, 7.
Cambrils	Sta. J. Masaguer.	Hostal Nou.
Olot	Sr. I. Juanola.	Superior, 25, 2. ^{on}
Terrassa.	» A. Oliart	Clarís, 24.
Manlleu.	» Ll. Coll	Vora del Ter, 21.
Barcelona	» D. Dalmau	Angels, 1, entl.
Tarragona.	» D. Obiol	Unión, 9, 3. ^r .
Castellar del Vallès.	» F. Blanquer	Fonts Calents.
Arbós	» G. Roviroza	Major, 2.
Vendrell	» S. Esvertit	Cristina Baixa, 5.
Igualada	» A. Mosella	P de la Constitució, 11.
Girona	» F. Anguet	Progrés, 20.
Vilafranca del Panadés	» A. Robreño	Puigmoltó. 14.
Ulldemolins	Dr. Roman Pallejà	Carretera, 2.
Sta. Coloma de Farnès	» J. Gener	Verge Maria, 1, 2. ^{on}
Lleida	» Lluís Abadal.	Major, 12 i 14.
La Escala	» Josep Ximinis	Fàbrica géneros de punt
Mataró	» Josep Solà	Sant Josep, 46.
Premià de Mar	» P. Alsina	Camí Reial, 81 i 79.
Tivissa	» F. M. Brú	Avall, 16.
Moncada	Dr. Joan Buxó	
Berga	Sr. Josep Cardona	Farmacèutic.
Sant Feliu de Codinas.	» Joaquim Coll	Vicari.
Banyolas	» J. Aulina	Turers, 49.
Sant Feliu de Guixols.	» J. Blanch	Caymo, 32.
Vic	» J. Comella	Plassa Major, 18.
Borjes Blanques.	» F. Rubinat	
Palafrugell	» J. Marqués Isern	Pals, 1.
Bégas	» J. Esteve Jacas.	Arrabal S. Martí, 19.
Manresa	» I. Bosch	Bruch, 1.
Buenos Aires.	» Antoni Barrot	

Ademés poden enviar-se també directament a l'Administració :
Gracia, 12, Sabadell, amb sagells de 15 centims

Kolekto de lernolibroj

Katalunaj kaj Kastilaj

	<u>Ptas.</u>
<i>Fundamento de Esperanto</i> , L. L. Zamenhof (Eldono hispana) . . .	1'25
* <i>Gramática razonada de la lengua Esperanto</i> , Sro. Pujulá i Vallès.	2
* <i>Vocabulari Esperanto-Català</i> , Sro. Pujulá i Vallès.	3
* <i>Vocabulari Català-Esperanto</i> , » » »	3
<i>Poŝvortareto Esperanto-Català i Català Esperanto</i> , Sroj. Dro. Bremon, Martí i Aldrich	0'75
<i>Kataluna Ŝlosilo</i>	0'05
<i>Quiere V. aprender Esperanto?</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau . . .	0'50
<i>Gramática y Vocabulario Esperanto</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau. . .	3
<i>Vocabulario Esperanto-Español</i> , Sro. F. Pujulá i Vallès	3
<i>Vocabulario Español-Esperanto</i> , » » » »	3
<i>Primeras lecciones de Esperanto de Th. Cart</i> , A. L. Villanueva . . .	0'60
<i>Manual y Ejercicios de la lengua Esperanto</i> , Inglada-Villanueva. . .	1'50
<i>Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto</i> , Inglada-Villanueva	5
<i>Curso Práctico de Esperanto</i> , Duyos-Inglada	3
* <i>Gramática de Esperanto</i> , Sro. J. Garzon Ruiz	2
<i>Prontuario de Esperanto</i> , » » »	4
<i>Programa d'Esperanto</i> , J. B. Albiñana	0'25
<i>El Esperanto al alcance de todos</i> , Fernando Soler y Valls.	3

Tiujn verkojn oni povas mendi ĉe nia administracio sendante kune la monon, plus 0'25 ptojn. por la rekomenditaj poŝtelspezoj.

* Bindita 0'50 ptes. plie.

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : Frederich Pujulà
Sek. de Red. : Joseph Grau

SENPAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *El la IIª Literatura Konkurso*, K. E. — *Mi amas vin*, Maria Posenær. — *La Virinetoj de l'Maro*, Joaquim Ruyra. — *Projekto de regularo por la Literaturaj Konkursoj de K. E. F.*, Dr. Joaquim Coll. — *IVª Kongreso de la K. E. F.*, K. E. — *Bibliografio*, Tamen. — *Katalunaj ejemidoj*. — *Enlanda Movado*. — *Oficiala Parto*. — *Korespondado*.



Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al "Kataluna Esperantista Federacio"

Esperanta Semo	Sabadell
Nova Semo	Reus
Frateca Kunigo	»
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto	Barbarà del Vallès
Olota Stelo	Olot
Lumon	Terrassa
Casino del Comercio	»
Esperantista Junularo	»
Esperanta Juneco	Barcelona
La Rondo	»
Esperanta Fako (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Ĉiam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Frateco	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo	»
Unió Catalanista	»
Noyan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo	»
Evolucio	»
Universala Frateco	»
¡Supren!	»
Esperanta Aŭroro	»
Esperanta Racionala Grupo	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Laboro Esperanta	Vilanova i Geltrú
Esperantista Grupo	Mataró
Kamparó	S. Perpetua de la Moguda
Frateco	Vendrell
Esperantista Amikeco	Manlleu
Esperanta Amo	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Esperanta Amikaro	Banyolas
Herda Espero	Lleida
Frateco	S. Feliu de Guixols
Gerona Esperantista Ligo	»
Badalona Stelo	Badalona
Paco kaj Amo	Palafrugell
Verda Stelo	Flix
Semo	Buenos Aires

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : FREDERICH PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEPH GRAU

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO : *Pri...*, Fred. Pujulà. — *El 1^a II^a Literatura Konkurso*, K. E. — *Mi amas vin*, Maria Posenacr. — *La Virinetoj de l' Maro*, Joaquim Ruyra. — *Projekto de regularo por la Literaturaj Konkursoj de K. E. F.*, Dr. Joaquim Coll. — *IV^a Kongreso de la K. E. F.*, K. E. — *Bibliografio*, Tamen. — *Katalunaj efemeridoj*. — *Enlanda Movado*. — *Oficiala Parto*. — *Korespondado*.

PRI...

KATALUNA KULTURO

Mi trakuris antaŭ kelkaj tagoj katalunan montaron tra lokoj, kie eĉ veturilaj vojoj ne ekzistas, kaj en vilaĝetoj, en izolitaj farmodomoj, mi konstatis, ke la vorto Esperanto estis jam konata. Ofte ni diris, ke en Katalunujo ne ekzistas persono nescianta, kio estas nia lingvo internacia : mi reasertas tiun diron.

La afero estas tre rimarkinda, se oni konsideras, ke la nombro de senalfabetaj personoj estas granda en nia lando. Laŭ la statistikoj, Katalunujo estas la plej malklera lando en la Hispana ŝtato. La statistikoj tamen ne diras ĉion kaj ne parolas pri la terura enmigrado de la aliaj landoj, kiun ni suferas. Pli ol socia, ĝi estas fizika problemo: nepre estas pli da malklereco en kvadrata kilometro da tero plena de gento ol en dezerta. La respondeco, ĉiel, estas de la registaro, ki

zorgas pri ambaŭ pecoj de tero. Sed la sekvojn nur ni mem suferas.

Mi konas maljunajn samlandanojn, kiuj legigas al si ĉiutage la ĵurnalojn. Tio montras scivolemon, instruamon, kiu en eŭropa organizaĵo povus esti bone profitita.

Eĉ tiuj senalfabetaj personoj scias, kio estas Esperanto. Tamen unuj pro atavismo, aliaj pro manko de rimedoj, kvankam kore esperantistoj, ili prokrastas la studadon de nia lingvo. Certe ili eble neniam bezonos havi rilatojn kun fremduloj, sed kvankam tio ĉi povus ŝajni paradokso, Esperanto ne estas nur internacia komprenigilo, ĝi ĉefe estas en multaj okazoj instrumento de kulturo, vekilo de scivolemo kaj instruigemo. La ekzemploj en nia lando estas multnombraj pri homoj, kiuj en tri-kvar jaroj fariĝis delikataj, instruitaj personoj dank'al Esperanto. Mi havis lernanton, kiu preskaŭ ne sciis skribi kaj hodiaŭ legas pri sciencoj kaj korespondas kun eminentaj esperantistoj alilandaj.

Kiamaniere aĝi, kiamaniere paroli por konvinki tiujn malrapidemajn homojn al la lernado de nia lingvo? Jen estas grava problemo, kiun ni devas studi kaj solvi. Ĉiu ofero en tiu senco estus grande rekompencita. Amikoj katalunaj, pensu pri kiom da fenestroj ni povas malfermi antaŭ niaj blindaj malkleraj fratoj profitante, kiel allogilon, ilian amon al Esperanto.

Certe Zamenhof ne esperis tion de sia elpensitaĵo, sed certe ne estos tiu utiligo de lia lingvo la afero, kiu malpli kontentigos lin.

BARCELONA UNUGRUPIGO

Pri io ĉefaj reguloj jam interkonsentis la delegitoj de la barcelonaj grupoj, kiuj elektis komisionon por starigi regularon de sola granda grupo en nia ĉefurbo. Ĝi ne mirigas nin. Ne gravaĵoj apartigas la homojn, sed detaloj, kiujn la bonvolo povas facile flankenlasi. Pri ĉiuj reguloj oni fine interkonsentis, kaj kiam ni ĉiuj estos membroj de la nova grupo kaj ĝuos ĝiajn utilojn kaj profitojn, ni mem ne komprenos, kiel ni povis resti tiel longatempe apartigitaj unuj de la aliaj.

Ĉiu laboris ĝis nun aparte en sia grupo por ĝia propra honoro krom por la bono de Esperanto. Ni ne bedaŭru tiujn rivaletecojn kies stimuladon fine profitis la progresado de nia komuna afero, sed ni rigardu antaŭen per pli larĝa, pli granda animo. Ni ne timu perdi personecon en la unugrupiĝo, ĉar, kontraŭe, tiu ĉi plivalorigas la individuajn fortojn. La ekzemplo de nia Federacio povas sufiĉi: de post ĝia fondiĝo ne nur la grupoj fariĝis interne pli sendependaj, sed ankoraŭ ilia forto pligrandiĝis per pli efika partoprenado en la movado ĝenerala.

Venu do tiu federacio de barcelonaj grupoj, tiu unugrupiĝo en kiun ni alportos la nun disigitajn fortojn, kiu permesos al ni fondi la Esperantistan Hejmon, kie ne nur la alilandaj, ne nur la eksterbarcelonaj esperantistoj, sed ni mem povos kuniĝi ĉirkaŭ la sama fajro de sama kameno.

Brave jam de nun al tiuj grupoj, kiuj klopodas entuziasme por tiu frata entrepreno.

Reveninte de Franclando mi renkontis sur mia skribotablo amason da korespondadoj, kiuj pli *preferis* resti ĉi tie ol repreni novan vojon por veni renkonti min. Mi klopodos kiel eble plej rapide respondi al miaj korespondantoj, de kiuj mi petas pardonon por la nevolita malfrueco de mia respondo.

FRED. PUJULÀ

JAKO PASERO

Brave! Tiun ĉi fojon vi plaĉis al ni. Jes; nia ĉefa celo estas la organizado de Kongresoj; la interkompreniĝo estas por ni negrava afero. Via Aristofanesa spriteco tre amuzis nin; sed nenia ĝojo estas kompleta kaj ni demandas nin kun teruro ĉu la meningito ŝveligis vian genian cerbon post la elpeno elŝviti tiujn ŝercojn! Ni komprenas viajn dubojn pri la ebleco de nia interkompreniĝo ĉar al via privilegiita inteligenteco ne kaŝiĝas ke, eĉ kiam vi verkas katalune, ni katalunoj ofte ne komprenas vin. Sed tio ĉi forprenas nenion el la admiro, kiun ni havas por vi, ĉar ni ĉiuj scias ke ne via estas la kulpo, sed de la multenombraj gramatikaj absurdaĵoj de via stilo. La homoj estas teruraj: ili elpensis la medicinon por ĝeni la sanon, kaj la gramatikon por ĝeni la verkistojn. Sed ni estas grandanimaj kaj admiras vin, ĉar tute kiel oni povas fari kongresojn ne interkompreniĝante, oni povas esti verkisto ne konante gramatikon. Tiu ĉi kono, cetere, estas malalta malnobla kono bona nur por la ridindaj, esperantistoj.

Kiam unu el niaj kolegoj tradukis verkojn viajn en Esperanton malbonaj viperaĵoj sibilis, ke tion li faris por ridindigi nian landon. La grandaj homoj kiel vi, havis ĉiam malamikojn, sed ankaŭ aplaŭdantojn, kaj ni kantas viajn glorojn, ni, kiuj admiras en vi la fabrikanton de veluro, kiu sciis meti la arton de la fabrikado al la servo de la fabrikado de la arto.



El la II^a Literatura Konkurso

Fino. Jozefino Figueras el Terrasa sciigas nin, ke ŝi estas la aŭtorino de la verko citinda, kies devizo estas: «En soleco mi trovis mian konfidanton» (Originalaj temoj, II)

La aŭtoro de la verko citinda devizita «La blindulineto», (Originalaj temoj, II) estas Sro. Joan Serrano, el Barcelono.

K. E.

Mi amas vin*

DEVIZO

«Amo.»

AM' estas ĉie en Naturo:
 Tilio diras al tili',
 Heder' al fendiganta muro,
 Kaj al floret' la papili',
 Kolomb' al sia kolombin':
 «Mi amas vin! mi amas vin!»

River' murmuras al herbaro,
 Venteto al la foliaro,
 La rosoperlo al foli',
 Kaj al la ter' la sunradi',
 L'amant' al sia karulin':
 «Mi amas vin! mi amas vin!»

La musko diras al la ŝtono,
 Kantadas per plej dolĉa tono
 Al branĉetaro la birdet',
 Kaj la patrin' al infanet',
 La edzo diras al edzin':
 «Mi amas vin! mi amas vin!»

Ho, am', de l' vivo nura ĝojo,
 Vin donis Di' al kreitaĵ',
 Por ke, sur nia dorna vojo,
 Vi estu la plibeligaĵ'.
 Ni kantu do, ĝuante ĝin:
 «Mi amas vin! mi amas vin!»

En tiu amkoncert' de l' mondo,
 En tiu harmonia rondo,
 De l' kant' nur unu restas for:
 Ne diros plu, el varma kor',
 L'amat' al malfeliĉulin':
 «Mi amas vin! mi amas vin!»

MARIA POSENAER

* Premiita en la II^a Literatura Konkurso de K. E. F.

La Virinetoj de l'Maro *

DEVIZO : No temem esculls ni vent traidor;
plens de joia avui volem estari!

L'HOLANDÉS ERRANT

SES knaboj en blua kamizolo, ĉifonaj kaj malpuraj, sidas sur la rokoj, tenante siajn nudajn krurojn pendantaj super la maro, kiu pli ol ofte pufiĝas kaj malsekiĝas iliajn piedojn. Ĉiu havas sian fiŝkaptilon kaj amaseton da vermoj de roko, la mangaĵo plej ŝatata de la fiŝetoj.

Ili kaptas jam de antaŭ kelkaj horoj kaj ĉiuj laŭtigas triumfan kriadon ĉiufoje kiam unu el ili eltiras el la maro iun buŝ-malfermitan marperkon, kiu dismalfermas en la aero la brilan vergetaron de siaj dornozaj membranoj.

La nokta krepusko malfortigadas la helecon de siaj moruskoloraj fumaĵoj. Kelkaj steloj ekbriletas en la blua aero. Bando da korvoj trairas la spacon, fine sin kaŝante ĉe la monton, inter la dubenigraj kaj fendigintaj muroj de antikva kastelo.

Kelkaj el la knaboj, observante, observadante siajn kaptilarojn, kiujn la ondo frape saltigas, ekdormetis. Iliaj kapoj ripozas sur la brusto. Iliaj fingroj malpremas kaj preskaŭ eĉ ne tenas la fiŝkaptilojn, kies pintoj kuŝas en la akvo.

— Ili ne plu mordas — murmuras unu. — Nu, kiel mallume estas! — ekkrias alia, disdirektante la rigardon al la ĉielo. — Ĉu vi volas konsilon mian? Ni dormu ĝis la lunleviĝo. — proponas tria. Ĉiuj alkonsentas. Ili vice apudiĝas, ili jungiĝas metante siajn brakojn sur la ŝultrojn kaj nukojn de la kunuloj kaj ili dormiĝas trankvile en la nokta vetero, apogiĝintaj al roko.

La nokto mallumiĝadas. La luno flavas ĉe sia oriento meze partigita per zono de cindrokolora nebulo. La maro ŝajnas kanti lulilan kanzonon mallaŭtete per raŭka voĉo.

Subite sonas ia malmilda kaj senbrua galopo... trap, trap, patrap'... kaj aperadas la Virinetoj de l' Maro, rajdantaj sur ruĝaj salikokoj kaj aliaj sur grandaj maljunaj kraboj, survestitaj per mara musko.

Ĉiuj ridas dum ili pikas per pinglo de marerinaco la sentajn artikojn de siaj strangaj bestoj, kiuj grimpas sur la glitigaj deklivoj

* Premiita en la II^a Literatura Konkurso de K. E. F.

de la rokaro. Ĉiuj ridas dum ili dismoviĝadas en la pura aero kaj sin skuante forigas de si la malsekecon, kiu akvumas iliajn harojn kaj vestaĵojn.

Ili estas blankaj kiel fiŝa karno. Iliaj delikategaj haroj havas ĉielarkajn nuancojn; brilas sur iliaj kapetoj skvamaĵoj kombiletoj; iliaj manteloj estas verdaj kaj longaj, longaj, treniĝaj; iliaj okuloj estas lumaj gutetoj kiel tiuj, kiujn faras foje en la maro la froto de remiloj. Ekpasinte ili dissendas agrablan maraĵan odoron.

Ĵus ekvidinte la ses fiŝkaptistetojn, ili malrajdiĝas, alproksimiĝas al ili kaj suprenrampas iliajn kruojn... supren...

Unu ridiĝas pensema sur la faldoj, kiuj formas la lipo de unu el la dormantaj knaboj. Dua alkroĉiĝas de la okulharoj de alia knabo kaj rigardas scivoleme tra la fendo de la palpebroj, penante rigardi la okulon. Tiu ĉi observas kontente la pejzaĝon gracie starante sur la verta pinto de la plej alteta el la aro. Tiu ŝirmiĝis per la plej graseta kaj per lia milda kaj varmeta spiro ŝi varmigis siajn manetojn. Kelkaj kune amasiĝas sur la saman kapon. Aliaj ektuŝiĝas kun ektimo sur la pinto de muskolo, kiun ili grimpis de malsamaj lokoj. Ili faras nenian bruon.

Ĉiuj fine iras murmuri misterajn vortojn al la orelo de la dormantoj.

Ili parolas al ili pri la poezio de l'maro, pri la ĉarma moviĝado de la ondoj, pri ĝiaj diversaj kaj belaj koloroj : ili parolas al ili pri la fiŝoj kaj pri la herbejoj kie ili sin paŝtas; pri la ŝtormoj, pri la kvieto, pri la ventoj, pri la plezuroj de longedaŭra navigado, pri la superbelo de la marventegoj... pri io, kion niaj vortoj ne povas diri kaj la fiŝkaptistoj songas, songas ĉion, kion inspiras al ili la feinetoj.

Kiam ili vekigis, la Virinetoj de l' Maro jam malaperis kaj oni nur aŭdas la galopbruon de iliaj strangaj rajdobestoj, kiuj kuras subakviĝi.

Sed la sorĉo jam efektiviĝis. Jam nek ŝtormoj nek iaj suferoj povos detrui en la koro de tiuj knaboj la emon al la marista vivo. Donu al ili bonvivon ĉe la monto kaj ĉiam vi vidos ilin malgajaj kaj alsopiremaj.

JOAQUIM RUYRA
(trad. Estanislau Pellicer)



Projekto de regularo por la Literaturaj Konkursoj de K. E. F.

PLENUMANTE la decidon de nia III^a Kongreso, ni publikigas la gravan projekton de Dro. Joaquim Coll por la starigo de Konservantaro de la Esperantistaj Floraj Ludoj. Laŭ la propono de Sro. Rómulo S. Rocamora, kiun la kongreso akceptis, tiu projekto estas de nun donita al publika enketo. Ni esperas, ke niaj fervoraj samideanoj volos esprimi sian opinion pri ĝi kaj kontribui tiamaniere al ĝia perfektigo.

PROJETE PER A LA CREACIÓ D'UN CONSISTORI DELS JÒCS FLORALS DE K. E. F.

Vist l'exit creixent que ha despertat l'instauració dels Jòcs Florals Esperantistes en els dos anys que s'han celebrat, i judicant d'importancia gran l'aportar-los vitalitat per facilitar llur esplendor i lluiment, se proposa la creació d'un Consistori que, dintre la K. E. F., cuidi en especial de tot lo relacionat amb els Jòcs Florals. El Consistori 's regirà per les adjuntes bases:

- I. — Aqueix Consistori pren a son carrec el cuidar de tot lo pertanyent als Jòcs Florals de K. E. F.
- II. — El Consistori 's compon de socis *honoraris*, *actius* i *protectors*. Els *primers* seran proclamats tals, a proposta del Consistori, en el Congrés anual de K. E. F. o, en son defecte, a l'acte de la celebració dels Jòcs Florals. *Actius* ho seran : *a*) els senyors que hauran format part del tribunal examinador dels Jòcs Florals en els tres primers anys de llur funcionament; *b*) els que obtinguin tres premis ordinaris en els Jòcs Florals; *c*) tots els que, essent professors de K. E. F., hagin obtingut cinc premis en els Jòcs Florals; *d*) aquelles persones que contribueixin al lluiment de l'Esperanto i que seran acceptades pel Consistori a proposta de la Junta de K. E. F. Seran socis *protectors* els que contribueixin amb la quota minima de 5 ptes. anuals per als fins del Consistori.
- III. — El Consistori escollirà, d'entre 'ls socis actius, sis membres cada any, que hauran de formar el tribunal examinador dels treballs. Aquesta elecció haurà de fer-se dintre 'ls quinze dies següents a la celebració dels Jòcs Florals. Tots els membres del Consistori tenen dret al vot per a aquestes eleccions.
- IV. — Els membres del Jurat escolliran, d'entre ells, els que han d'ocupar els carrecs de president i secretari. Escolliran també 'l mantenedor que haurà de pronunciar el discurs inaugural en els Jòcs Florals. El mantenedor podrà esser un membre qualsevol del Consistori.

- V. — Els carrecs de president i tresorer del Consistori seran anexas als carrecs de president i tresorer de K. E. F.
- VI. — Cada any, durant el Congrés, se celebraran els Jòcs Florals a la ciutat on aquell tingui lloc. En el cas de no aver-hi Congrés, el Consistori acordarà l'epoca i el lloc dels Jòcs Florals.
- VII. — El cartell se publicarà quatre mesos abans dels Jòcs Florals.
- VIII. — El Consistori oferirà sempre premis a dos temes originals (un en prosa i un en vers) i dugues traduccions (també una en vers i una altra en prosa). La flor natural se concedirà al treball millor d'entre aquests quatre.
- IX. — Els altres premis podran esser oferts per particulars o societats, sempre que 'u avisin amb el temps corresponent. Els oferidors de premis tenen el dret de nomenar la persona que pot intervenir amb el Jurat qualificador en la concessió tant sols d'aquest premi.
- X. — A l'autor guanyador de la flor natural se li concedeix el dret d'escollir la Reina de la festa, la qual s'encarregarà de la seva tasca segons la consuetut dels Jòcs Florals de la nostra terra. En el cas que 'l guanyador no faci ús del seu dret, aquest passarà a esser atribució del Jurat.

DR. JOAQUIM COLL, PVRE.



IV^a Kongreso de la K. E. F.

La sciigoj, kiujn ni ricevas el Olot, aŭguras grandan sukceson al nia proksima Kongreso. Ni ne povas ankoraŭ komuniki al niaj kunfederacioj detalojn, ĉar la dato de la Kongreso estas malproksima kaj ili povas ankoraŭ esti ŝanĝitaj. Ni diru nur la nomojn de la samideanoj, kiuj formas la komitaton kaj komisionojn kaj tio malaperigos la dubojn, kiujn iu povus havi:

DIREKTA KOMITATO : *Prezidanto*, Sro. Josep M.^a Garganta; *Vicprezidanto*, Sro. Candi Agustí; *Sekretario*, Sro. Antoni Fortet; *Kasisto*, Sro. Manuel Prat; *Financisto*, Sro. Pere Roqué; *Membroj*, Sroj. Josep Boix kaj Pere Cuscoy.

PROPAGANDA KOMISIONO : *Prezidanto*, Sro. Pere Roqué; *Vicprezidanto*, Sro. Isidre Juanola; *Sekretario*, Sro. Antoni Fortet; *Kasisto*, Sro. Joan Vilá; *Membroj*, Sroj. Ramón Aubach kaj Joan Sarola.

KOMISIONO POR LA FESTO DE LA LITERATURA KONKURSO : *Prezidanto*, Sro. Candi Agustí; *Vicprezidanto*, Sro. Josep M.^a Garganta; *Sekretario*, Sro. Joaquim Vayreda; *Kasisto*, Sro. Antoni Serra.

ARTA KOMISIONO : *Prezidanto*, Sro. Josep Boix; *Vicprezidanto*, Sro. Valenti Avellana; *Sekretario*, Sro. Josep Casas; *Kasisto*, Sro. Lluís Trias.

Aliaj komisionoj estas en organizo, tial ke ili povos labori nur post kelkaj monatoj.

K. E.

BIBLIOGRAFIO

Tutmonda Jarlibro Esperantista. 1912 (Korektita ĝis la 1.^a de Junio 1912). — Paris. Esperantista Centra Oficejo. 51, rue de Clichy. Prezo : Fr. 2,50 (1 Sm.)

Ĝi estas la kajero 19^a el la Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj. Ĝi entenas 6 partojn. En la unua troviĝas kolektitaj la ĉefaj dokumentoj, kiuj koncernas la Oficialajn Institutiojn, kun ilia historio kaj la adresaro de iliaj anoj. La dua parto donas la liston de la fakaj societoj kaj institucioj, kiuj aplikas Esperanton por specialaj celoj. La tria liveras la nomaron de ĉiuj propagandaj societoj konitaj de la C. O. Krom la adresoj de la Prezidanto kaj Sekretario de ĉiu grupo troviĝas en tiu parto geografiaj kaj ekonomiaj notoj pri ĉiu urbo kaj la adresoj de la Esperantistaj komercistoj. La kvara parto entenas la liston de la Esperantaj gazetoj. La kvina — liston de personoj, kiuj petis sian enskribigon kiel korespondantoj. La sesa, fine, enhavas la anoncaron.

Aĉeti tiun ĉi libron estas akiri bonan instrumenton por utiligi Esperanton kaj samtempe helpi la funkciadon de la Centra Oficejo.

Autour de l'Esperanto. — Discussion de quelques modifications projetées. — Camille Aymonier, Agrégé de l'Université. Paris. Office Central Esperantiste. 51 rue de Clichy. 1912. — Prezo : Fr. 0.50.

Mi memoras ankoraŭ kun plezuro la belan improvizitan paroladon, kiun eldiris Sro. Aymonier antaŭ kelkaj jaroj en la «Athénée Populaire du Faubourg Saint Antoine» okaze de polemiko kontraŭ malamikoj de nia lingvo. La saman premantan logikecon kaj klarecon de stilo, kiun ni tiam admiris en lia parolado, ni admiras hodiaŭ en tiu broŝuro, kie elegante, delikate, inteligente kaj detale, nia klera kolego pulverigas la argumentojn de kelkaj reformistoj. La Centra Oficejo agis aplaŭdinde eldonante tiun broŝuron, kiun — feliĉe por ni — ni ankoraŭ ne bezonas en nia lando. Sinjoro Aymonier estos certe la unua, kiu pro tio nin gratulos.

Hispanaj Dramoj de Jacinto Benavente. Tradukis Vicente Inglada. Esperanta Biblioteko Internacia. N.^o 23. — Prezo : 0,100 Sm. — Berlin. Esperanto Verlag Moller & Borel.

La bone tajlita plumo de Inglada riĉigis per unu volumo tiun jam interesan bibliotekon. Per korekta, klara, senmakula Esperanto — la Esperanto de Inglada — li tradukis tri drametojn el Benavente, kies naiva filozofio sufiĉas al la gusto de la hispana publiko. Tra la diafana stilo de Inglada, ofte oni vidas kaj sentas la stilon de la aŭtoro. Ĝi estas laŭ mia opinio merito, pri kiu oni ne sufiĉe atentis nun. Oni mezuras sub sama nivelo originalajn kaj tradukitajn verkojn kaj ĝi estas eraro, manko de fido al la valoro kaj stilriĉeco de Esperanto. Legante la «Hispanajn Dramojn» oni kvazaŭ legas hispane kaj tamen neniu

poros nei la bonecon de la Esperanto uzita en ĝi. Plaĉus al mi legi tradukojn el angla lingvo, ekzemple, en bona Esperanto kaj senti la anglan lingvon tra ili. La fleksebleco de nia lingvo tion permesas. Ĝin ne uzi estas ĝin nekoni.

Mi rimarkas : la vorton *holegio* uzitan tri foje en la senco de lernejo (paĝoj 10, 11, 12) kaj eraran nominativon (paĝo 34) «Minuto-post-minuto mi volus ekscii» certe preseraro aŭ komprenebla konfuzo pro la strekoj unuigantaj la tri vortojn, el kiuj unu estas prepozicio.

Ne dezirita. Ni virinoj. el *Pri la Muziko de l' Vivo.* (Van de Muziek des Levens) de Johanna van Wonde. Esperantigis Maria Posenaer. — Kroonstraat, 45, Borgerhout-Antwerpen. Prezo : Fr. 0.50.

«Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li» mi komprenas ke ĉar Maria Posenaer la distinginda sekretariino de la Sepa «retrovis sian propran animstaton, sian propran malfeliĉecon kaj doloron» en la verketoj de Johanna van Wonde, ŝi amis kaj tradukis ilin. Kaj ŝi volos kompreni, ke ĉar ni ne troviĝas en samaj cirkonstancoj, ni ne sentas por ili la saman entuziasmon. Ni konsentas kun ŝi pri la pli granda nobleco de la trosentemo super la indiferenteco kaj malpleneco de la animoj. Sed ankoraŭ ni devus konsideri la kaŭzojn de niaj emocioj kaj la manieron, kiel ni ilin priŝkribas. Kial ni devos juĝi pli alta animon, kiu suferas antaŭ doloro de needziĝinta virino, ol animon, kiu doloras antaŭ socia demando aŭ ĝuas antaŭ eltrovo de solvo al ŝakproblemo en tri movoj? Plie, ĉiu afero havas almenaŭ du flankojn kaj neniu rajtas nomi blinda, tiun, kiu rigardas ĝin de la flanko kaŝita al nia vido. La esprimo «malsanema trosentemeco» estas laŭ mia opinio ankaŭ paradoksa. Vivi estas senti. Trosentemo ne nur estas la plej bona aĵo el la vivo, sed la pliintensigo de la vivo mem. Sed mi suspektas ke fraŭlino Posenaer ne sufiĉe atentis pri la grava diferenco, kiu ekzistas inter trosentemeco kaj sentimentaleco! «Ne dezirita» kaj «Ni virinoj» ŝajnis al ni tro sentimentalaj kaj tre malmulte sentigaj. Ĝi estas persona opinio. Al aliaj ili ŝajnos male. Sed al ĉiu plaĉos la bona Esperanto uzita de fraŭlino Posenaer por la traduko. Kiel esperantisto, mi legis la verkon kun granda plezuro.

La Patrinoj (Rakonto) el Avetis Aĥaronjan. Esperantigis Dro. Andreo Fiŝer. Esperanta Biblioteko Danubo. N.º 3. — 1912. Editura Esperanto. Bucaresti, 14. Str. Belvedere, 14. Prezo : Fr. 0.25 (0.100 Sm.).

Tre interesa, malĝojiga rakonto pri suferoj de patrino, kies mortinta filo ne revenas. Ĝi konatigas nin kun armenaj moroj kaj aferoj. El ĝia legado oni eltiras malĝojan impreson de forlaso kaj doloro. Sro. Andreo Fiŝer tradukis per klara bona stilo, kiu pli rimarkigas la nenecesan uzadon de afiksoj *ad — ek* kiel simplaj radikoj («Suzano adis ankoraŭ stari» «la vizaĝoj ekis iom post iom disfandiĝi» «Ŝi adis preĝi» «Ŝi adis atendi» k. t. p.)

Mi rimarkas : «Antaŭ tiu sankta figuro stariĝis jam ne juna virino, nomata Suzano. Ĝi estis du patrinoj, kiuj fikse rigardis unu la alian... Dipatrino estis tie, supre, Suzano do — malsupre, sur la tero» Kial *do* — konkluda konjunkcio? Eble naciismo. — «Ne unu fojon» kiu tre bone signifas ankaŭ «neniun fojon» por diri «multajn fojojn».

(Al fraŭlino L. B. — En la ekzercaro troviĝas tri fojojn la vorto *simila* kaj neniam sekvita de *je*: «similajn objektojn» «simila al li» «simila al la patrino» La vorto *plena* troviĝas unu fojon kaj sekvita de *je*, sed en alia tekstoj de la Dro. troviĝas sekvita de *de*. Sekve, se oni ne povas kritiki la uzadon de *je*—prepozicio sen memstara signifo — kiam la rekta senco de ia prepozicio ne aperas al ni — ni rajtas kontraŭstari la uzadon de *je* kiam la tekstoj de la Majstro permesas al ni uzi aliajn prepoziciojn.)

Primo Manuale della Lingua Ausiliaria Esperanto. Publicato per inĝiativa della Itala Esperanto-Asocio. 1.^a Edizione di centomila esemplari. — Genova. Cooperativa Esperantista Italiana. Salita Pollainoli 13-4. — 1912. 10 centesimi.

Ni deziras al tiu «verda broŝuro» la 100.000^{an} eldonon da 100.000 ekzempleroj. Jen broŝureto, kiu antaŭdiras al ni grandan sukceson por la 9.^a Internacia Kongreso. Ĝi disflugu, legiĝu, disvendiĝu, disdoniĝu!

Laborista Internacia Kantaro. N.º 2. Norbert Zoula. «Mallibereja» Praha 1912. — Eldonis «La Kulturo», Praha II., Hybernská T. (Labor. Domo). Bohemio-Austrio. Presejo de «Pravo Lidu». — Esperantigis Fjeh. — Prezo: 1 ekz, 4 sd. 5 ekz, 11 sd. 10 ekz, 15 sd. 50 ekz., 70 sd. 100 ekz, 1,25.

Diras la kunpresita noto: Kiam en jaro 1880 sekrete okazis unua kongreso de bohemslava sociala demokratio en malgranda gastejo Svatá Markéta, kaŝita post bastionoj de Praha, partoprenis ĝin ankaŭ Norberto Zoula, lignajisto, poste malliberigita. En malliberejo li verkis la poemon, tiel simplan kaj do tiel plenan de forto, espero kaj brulanta malamo al ekzistanta socia ordo, ke ĝi malgraŭ polica persekutado baldaŭ fariĝis batala kanto de bohemiaj socialistoj Norberto Zoula jam longe ne estas inter vivantoj, sed lia kanto transdaŭris lian morton kaj per esperanta lingvo certe fariĝos serĉata kanto ankaŭ de ceteraj revoluciuloj en tuta mondo.

La lasta Uŝonano. Fragmento el La Taglibro de Kan-Li, princo de Dimf-Ju-Ĉur, kaj admiralo en la Persa Maristaro. Prezentita de J. A. Mitchell. Tradukis Lehman Wendell. — Esperanta Biblioteko Internacia. N.º 20. Prezo 0,100 Sm. — Berlin. Esperanto Verlag Moller Borel.

Hungaraj Rakontoj de Ferenc Herczeg. Tradukis A. Panajott. Esperanta Biblioteko Internacia. N.º 21. Prezo 0,100 Sm. — Berlin. Esperanto Verlag Moller Borel.

Nord-germanaj Rakontoj de Heinrich Bandlow. Tradukis Ella Scheerpeltz. — Esperanta Biblioteko Internacia. N.º 22. Prezo, 0,100 Sm. — Berlin. Esperanto Verlag Moller Borel.

Presitajn kun la kutima zorgo de la firmo Moller & Borel, kaj redaktitajn en la bona Esperanto uzata de la aŭtoroj el tiu Biblioteko, ni ricevis la tri antaŭajn broŝurojn, kiujn ni tre insiste rekomendas al niaj samideanoj.

Paŭlo Debenham. Romano originale verkita en Esperanto, de H. A. Luyken. British Esperanto Association (Incorporated) 133-136 High Holbon, London, W. C. — Universala Esperantia Librejo, rue de la Bourse, Gêneve, (Svisujo). Prezo, 1 Sm.

Ni ricevis tiun originalan romanon, pri kiu ni detale parolos post legado.

Resumo de la Kurso pri Teologio, de kavaliro Le Clément de St. Marcq, Rektoro de la Oficejo. Tradukis. A. Stas, sekretario de «Esperanta Psikistaro» Anvers, 1912. Prezo : 20 cm. 8 sd.

«Tiu ĉi libro estas havebla kontraŭ internacia respond-kuponon de 25 cmoj, 10 sd., de la sekretario de Esperanta Psikistaro, rue Appelmans, 26. Anvers. — Belgujo.

TAMEN



Katalunaj efemeridoj

NOVEMBRO

Parolado de Pastro Vilà en la sidejo de «Amichs de la Instruціó» pri Esperanto ĉe la infanedukado.

Parolado de Sro. Rosals en Tarragono.

Fondas la Grupon de St. Sadurn d'Anoia Sro. Torres Llopart.

Parolado de Sro. Rosals en St. Sadurn d'Anoia okaze de la inaŭguro de la tiea grupo.

- 13 1908. — Gesinjoroj Pujulà alvenas Barcelonon organizi la V^a Kongreson de Esperanto.
- 14 1909. — Solena fondiĝo de la grupo «Lumon» en Terrassa.
1909. — Fondiĝo de esperantista grupo en la *Centro de Lectura* de Reus.
- 25 1908. — Unua organiza kunveno de la Organiza Komitato de la V^a Kongreso en Kafejo de Paris, kun ĉeesto de Sino. Rebours kaj Sroj. Claramunt, Bremon, Sales kaj Pujulà. Oni elektas Srojn, Sabadell, kiel Vic-Prezidanton, kaj Cases kiel Kasiston.
- 27 1910. — Malfermo de la Ekspozicio Esperantista en la sidejo de la grupo *Ĉiam Antaŭen* el Sant Martí.
- 30 1908. — Unua kunveno de la K^o de la V^a, kun ĉeesto de samaj personoj, en la sidejo de «Espero Kataluna». 46 kursoj pri Esperanto estas malfermitaj en Barcelono.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

La 6^{an} de Oktobro okazis, post prokrasto kaŭze de la fervojista striko, la solena malfermo de la kursoj de Esperanto de ĉiuj aliĝintaj al K. E. F. grupoj ĉe la granda salono de la «Foment del Treball Nacional» en Barcelono.

Multaj eksterurbaj grupoj sendis delegiton al tiu festo, el kiuj ni memoras: «Esperanta Nesto», *Barbará del Vallés*, reprezentita de Sro. P. Soler; «Esperanta Idealo», *Sta. Coloma de Farnés*, Sro. Dalmau; «Verda Stelo», *Flix*, Sro. Alabart kaj «Badalona Stelo», *Badalona*, Sro. J. Gili. «Laboro Esperanta» *Vilanova i Geltrú*; «Esperanta Amikaro», *Banyoles*; «Paco kaj Amo», *Palafrugell*; «Herda Espero», *Lleida*; «Olota Stelo», *Olot*; «Vika Esperantistaro», *Vic*; «Kamparo» *Sta. Perpètua de la Moguda*; «Amo kaj Espero», *Girona*; unu el la grupoj de Manlleu sendis aliĝojn kaj la plimulto estis reprezentataj de barcelonaj samideanoj.

El la barcelonaj grupoj ni vidis membrojn de «Paco kaj Amo», «Aŭroro», «Ĉiam Antaŭen», «Barcelona Stelo», «La Rondo», «Esperanto kaj Patrujo», «Esperanta Movado», «Semo», «Esperanta Racionala Grupo», «Supren!» «Novan Vojon» k. t. p. multaj el kiuj estis oficiale reprezentataj.

La Prezidanto de «K. E. F.» Sro. Rómul S. Rocamora malfermas la kunsidon kaj donas la parolon al la Sekretario Sro. Pellicer, kiu legas la liston de la aliĝintaj kaj ĉeestantaj grupoj.

Sro. Delfi Dalmau je la nomo de la profesoroj diplomitaj de K. E. F. mallonge paroladas, historie la esperantan lingvon kaj pruvante la bonojn kiuj sekvas al la alprenado de internacia helpa lingvo.

Pastro J. Planas Sadurní, la Vic-Prezidanto de «K. E. F.», parolas poste je la nomo de la eksterurbaj delegitoj. De ili, li petas varman kaj entuziasman laboron dum la venonta vintro, por ke ĝi neniel povu mortigi nian jam fortikan arbon kaj ke, post alveno de l' printempo, ĝi burĝonu kaj kovriĝu per novaj branĉoj kaj belaj floroj.

Resumis la paroladojn, Sro. Rocamora, dankante la ĉeestantojn kaj la Direktan Komitaton de la «F. del T. N.» al kiu li proponis la servojn de la esperantistaro ĉiaokaze kiam per Esperanto estos eble diskonigi niajn komercon kaj industrion; li esprimis la signifon de la festo kaj sian kredon, ke Esperanto rapide disvolviĝos kiam sur la komercaj leteroj oni legos la vortojn *Oni korespondas esperante*. Li alparolis esperante al la samideanoj petante de ili novajn klopodojn por ke Katalunlando ne restu malantaŭe en la esperantista movado. Ĉiuj parolintoj ricevis longan kaj bruan aplaŭdadon.

La festo, en kiu ni vidis niajn plej ĉarmajn samideaninojn kaj ĉiujn niajn karajn amikojn, estis alia sukceso por nia K. E. F.

—La 26^{an} de Oktobro okazis du paroladoj en la «Associació de la Dependència Mercantil». La parolantoj estis Sroj. D. Dalmau kaj Romul S. Rocamora kaj

iliaj respektivaj temoj : «La evolucio kaj revolucio de la lingva didaktiko» kaj «Komerca kodo kaj internacia lingvo». Ambaŭ kleraj samideanoj estis forte aplaŭdataj.

—Eldonita de la «Instituto de Estudios Superiores» baldaŭ aperos programo de Esperanto, kiu laŭ niaj sciigoj estos afero tute nova en tiaj verkoj. Ĝia aŭtoro estas nia amiko Sro. Delfi Dalmau kun la kunlaboro de Sro. R. S. Rocamora.

Ekskursoj kaj vizitoj. — Dum la pasinta monato okazis kelkaj esperantaj ekskursoj el kiuj ni scias la jenajn:

Organizita de la grupo «Aŭroro» la 20^{an} okazis vizito al la biera fabrikejo «La Bohemia». La multenombraj esperantistoj estis regalataj per la ora trin-kajo post atenta vizito al la ĉiuspecaj laboroj, kiujn oni faras por ĝin fabriki.

La 27^{an} matene la grupo «Supren» organizis ekskurson al St. Ramon. Tiu ekskurso bone sukcesis; same kiel la vizito, kiun la saman tagon vespere la grupo «La Rondo» faris al la «Granja Casanovas»

Novaj kursoj. — Ĉiu grupo malfermis jam siajn kursojn. Ni speciale citos, tial ke ili okazas en neesperantistaj rondo, la kurson, kiun klarigas Sro. Rocamora ĉe la «Asociación de Dependencia Mercantil» gravega societo de komercaj oficistoj, kaj tiun klarigatan de Sro. Dalmau ĉe la «Centre Regional Valencià». La aranĝon de tiu lasta kurso ni ŝuldas al la grupo «Esperanto kaj Patrujo».

Ĉe la «Instituto de Estudios Superiores», Sro. Fred. Pujulà malfermas kurson de Esperanto por samideanoj, kiuj deziros fariĝi profesoroj. Ni esperas, ke niaj samurbanoj ĉeestos tiun kurson plej grandnombre.

OLOT

Por pli bone propagandi la Zamenhofan lingvon, ni aranĝis en nia sidejo, dum la urbaj ĉefestoj, interesplenan ekspozicion de poŝtkartoj, kiu multe vekis la entuziasmon de la grandnombraj vizitantoj. Tiujn tagojn vizitis nin samideanoj el Manlleu, Ĉerono kaj Sant Feliu de Guixols.

En la tria festtago, je la 9.^a nokte okazis en nia sidejo intima kunveno kiun ĉeestis la samcelanoj el la suprecititaj urboj. Partoprenis en ĝi Sroj. Garganta, Prat, Roqué kaj Fortet el «Olota Stelo» kaj fratinoj C. kaj P. Llagostera el Manlleu legante belajn verketojn, kiuj multe plaĉis al la ĉeestantaro.

RUBI

En tiu ĉi urbeto, entuziasma grupano de «Lumon» entreprenis ĉiudimanĉan kurson; espereble K. E. F. baldaŭ kalkulos novan grupon en siaj vicoj.

VENDRELL

Estis belega la propaganda festo, kiu okazis la 25^{an} de Aŭgusto, organizita de la ĉi tiea grupo «Fratego» okaze de la ekskurso, kiun niaj karaj gesamideanoj de la grupo «Tarragono Esperanta» faris en tiun ĉi urbeton. De «Laboro Espe-

ranta» el Vilanova y Geltrú, venis nia kara kolego Sro. J. Escofet kune kun aliaj samideanoj por partopreni en ĝi.

Post la alveno, ni ĉiuj kune iris saluti la urbestron, al kiu ni prezentis la gealvenintojn, kiujn li afable akceptis. Je la 5^a vespere, ni iris, kune kun la standardoj, al loĝejo de la «Orfeo Vendrellenc», malavare cedita, kie okazis la propaganda festo. La granda kaj bela salono baldaŭ tute pleniĝis.

Sro. A. Martorell malfermis la feston proponante la prezidejon al Sro. J. Vidal de «T. E.»; Sroj. J. Huecas el «T. E.» kaj J. Marcé el «Frateco» legis du belajn verkojn, kiujn sendis Sroj. D. Dalmau kaj A. Nin el Barcelono. Finoj. Dolors Navarro, legis belan poezion, kaj Teresa Balart, belegan verkon dediĉitan al la Vendrell'aj fraŭlinoj.

Paroladis Sroj. Ll. Corbella, S. Esvertit, J. Martorell, el «Frateco» Sro. J. Escofet, el «L. E.»; Sroj. D. Roig, F. Agusti, J. Vidal el «T. E.» kaj Sro. A. Martorell, el «Frateco», resumis la paroladojn, dankante ĉiujn geĉeestantojn kaj instigante ilin partopreni en la Esperanta movado. Inter la publiko, oni disdonis 300 foliojn «Tot l'Esperanto en una fulla». Ĉiuj parolintoj, kaj precipe la fraŭlinoj, estis tre aplaŭdataj.

Je la 7.^a horo, ĉe «Frateco» okazis belega «Honora Vino» dediĉita al la geekskursantoj, per kiu ni regalis ilin. Nia entuziasma samideano Sro. Jozefo Galvez, donacis por tio tre bonan vinon. Ĉiuj trinkis por la prospero kaj vivo de nia kara Esperanto kaj por nia majstro, Dro. Zamenhof. Fine, oni kantis «La Esperon». — *La Delegito*.

TARRAGONO

La senlaca grupo «Tarragono Esperanta» okazigis la 25^{an} de Aŭgusto gravan ekskurson al Vendrell, kies delegito raportas pri ĝi aliloke.

REUS

La pasintan monaton okazis ĉe la granda salono de la «Centre de Lectura», solena disdono de la premioj en la konkurso pri kiu ni parolis la lastan numeron.

Kaŭze de troeco de originalo ni ne povas longe raportari pri tiu ĉi grava fakto; ĉiuj urbaj ĵurnaloj parolis pri ĝi kaj iuj okaze laŭdis Esperanton kaj la Esperantan agadon. La festo estis organizita de la grupo «Semo» kaj la Sekcio de Literaturo de la dirita «C. de L.»

GIRONA

La 6^{an} de Oktobro la fervora batalanto de nia ideo, Sro. Jozefo Doménech Alberich, faris entuziasman paroladon ĉe la socia sidejo de «Amo kaj Espero» (Komerca Ĉambro) antaŭ respektinda aŭdantaro. Per facila parolo li atingis konduki ĝin per la penso, tra l' pentrindaj regionoj kaj urboj el Francujo, Germanujo kaj Austrio, ĝis Krakovo la urbo de l' Jubilea kongreso de Esperanto; tiam li pritraktis ĉiujn aferojn okazintajn dum la festoj de la 8.^a kaj poste reveninte hejmen, li *akompanis* la aŭskultantaron tra l'Austriaj Alpoj ĉe Stiria, montris al ĝi la lazurajn akvojn de l'Adriatika maro, eniris Italujon kaj vizitis la belegajn Venezia kaj Milano, kaj jam ĉe la mezamara

marbordo la nekompareblajn Genova, Nice, Montecarlo, Tolon, k. t. p. Bruegajn aplaudojn kaj gratulojn li aŭdis apenaŭ li finis.

Sro. Doménech estis nomita delegito de «Amo kaj Espero» dum la 8.^a kaj post la Kongreso li vizitis Trieste 'n. kaj faris paroladon ĉe «La Rondo Esperanta.» Lia sukceso estis granda, kaj tial la geanaro de tiu grupo nomis lin, ĝia «Unua honora membro», donacis al li artan pergamenon kaj honoran orin-signon. La Capodistria Studenta Grupo elektis lin, kiel «Honoran Prezidanton». Ricevu niaflanke, korajn gratulojn. — *Geronim Borés.*

TERRASSA

Dum la lastaj tagoj de Septembro la ĉi tieaj geesperantistoj havis la grandan honoron esti vizitataj de juna, simpatia ruso nomata Mikaelo Kiperman.

Ĉeestinte en la 8.^a Kongreso li vojaĝis tra Eŭropo haltante en nia urbo, tial ke en ĝi loĝas lia korespondantino, Fino. Angelino Sicart fervora anino de «Lumon» kaj de K. E. F. Ni kun ĝojo konfesas ke tio ĉi por ni estis rimarkinda, gravega fakto, ĉar preskaŭ ĉiuj ni ankoraŭ ne havis la okazon paroli esperante kun eksterlandano.

Kredinde li foriris el ni kontenta, tial ke ne mankis gesamideanoj, kiuj tutkore povis servi kaj akompani lin ĉien en Terrassa kaj ĉirkaŭaĵoj. Liaj akompanantoj ankaŭ ne perdis momenton dum lia restado inter ni por elmontri al tiuj, kiuj ankoraŭ dubetas pri interkompreniĝo per nia lingvo, ke nia diro estas vera.

Al la geanoj de «Lumon» kiuj tiel ĝentile estis utilaj por nia gasto ni esprimas, la plej entuziasme, plenajn dankojn je la nomo de ĝia komitato. — *Valenti Alavedra.*



Oficiala Parto

Essent molts els grupos que no han enviat son *Adresaro* ens es impossible publicar l'*ADRESARO* dels esperantistes catalans com intentavem. Agraïm corralment l'atenció als pocs grupos que 'ns el remeteren.



KORESPONDADO

Sro. J. S., Barcelono, kaj Fino. L. Briggs, Anglujo. Vi povas publikigi viajn verkojn, aldonante la noton: «Kun permeso de K. E.». — Sro. G. B., Girona. Dankon por la raporto. Pri la sendotaj ekzempleroj volu vin turni al nia kasisto, Sro. Piferrer.

Reglament de la

Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer. — Queda constituïda amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon. — L'objecte de la «F. C. d'E.» es l'unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin als esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

Art. tercer. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i previa acceptació del Comitè Directiu.

Art. quart. — La «F. C. d'E.» constarà únicament de membres individuals, que contribuïran al seu sosteniment amb la quota mínima de TRES ptes. anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grup podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que ls membres individuals i llurs membres podran pagar les quotes per mensualitats. Per a aquest fi ls Presidents s'entendran amb el Caixer-administrador directament.

Els Presidents dels grups aderits formaran un Consell Consultiu de la «Federació», an el qual podrà dirigir-se'l President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en que'u cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació», sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en lo que fóra de desitjar per a la millor marxa de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

Art. quint. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vice-president, Caixer-administrador de la revista, Vice-caixer-administrador, Secretari i Vice-secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista. El càrrec de Caixer-administrador serà permanent. El que'l desempenyi continuarà en el càrrec fins a ordre de la Junta que farà ratificar pel pròxim Congrés.

Art. sisè. — Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son càrrec: recollir les quotes dels federats, fer les comunicacions necessàries per als efectes de l'article segon i demés assumptes del regim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre'l Comitè Directiu i els seus representants.

Els delegats podran retenir-se, si'u creuen convenient, en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

Art. setè. — El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys una vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, previa ordre del dia, se donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà'l lloc on agi de celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, se nomenaran els individus que agin de formar el Comitè per al següent exercici, i s' discutirán les proposicions que agin sigut presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i incloses en l'ordre del dia.

Art. vuitè. — El Comitè estarà facultat per crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les Juntes de les quals seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

Art. novè. — Tots els acords de les Assemblees i Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

Art. desè. — Les esmenes que vulguin fer-se en aquest Reglament auran de presentar-se en temps convenient per ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. onzè. — La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la catalana en les Assamblees.

Art. dotzè. — En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.», els fondos existents, o que resultin de la liquidació, passarán a la «Centra Oficejo», domiciliada a París, per a la propagació de l'Esperanto.

Article transitori. — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Sabadell, carrer de Gracia, 12.

LLISTA DE DELEGATS AUTORITZATS PER LA ADMINISTRACIÓ DE K. E. F. PER A REBRE LES QUOTES

Sabadell	Lloc Social	Gràcia, 12.
Reus.	Sr. E. Aguadé	Presó, 15.
Vilanova i Geltrú	» F. Mestres	Sant Antoni, 1 i 3.
Barbarà.	» J. Puigbonet.	Sant Pere, 39.
Balaguer	» M. Espar Boquer	Miracle, 7.
Cambrils	Sta. J. Masaguer.	Hostal Nou.
Olot	Sr. I. Juanola.	Superior, 25, 2. ^{on}
Terrassa.	» A. Oliart	Clarís, 24.
Manlleu.	» Ll. Coll	Vora del Ter, 21.
Barcelona	» D. Dalmau	Angels, 1, entl.
Tarragona.	» D. Obiol	Unión, 9, 3 ^r .
Castellar del Vallès.	» F. Blanquer	Fonts Calents.
Arbós	» G. Rovirosa	Major, 2.
Vendrell	» S. Esvertit	Cristina Baixa, 5.
Igualada	» A. Mosella	P de la Constitució, 11.
Girona	» F. Anguet	Progrés, 20.
Vilafranca del Panadés	» A. Robreño	Puigmoltó. 14.
Ulldemolins	Dr. Roman Pallejà	Carretera, 2.
Sta. Coloma de Farnés	» J. Gener	Verge Maria, 1, 2. ^{on}
Lleida	» Lluís Abadal.	Major, 12 i 14.
La Escala	» Josep Ximinis	Fàbrica géneros de punt
Mataró	» Josep Solà	Sant Josep, 46.
Premià de Mar	» P. Alsina	Camí Reial, 81 i 79.
Tivissa	» F. M. Brú	Avall, 16.
Moncada	Dr. Joan Buxó	
Berga	Sr. Josep Cardona	Farmaceutic.
Sant Feliu de Codinas.	» Joaquim Coll	Vicari.
Banyolas	» J. Aulina	Turers, 49.
Sant Feliu de Guixols.	» J. Blanch	Caymo, 32.
Vic	» J. Comella	Plassa Major, 18.
Borjes Blanques.	» F. Rubinat	
Palafrugell	» J. Marqués Isern	Pals. 1.
Bégas	» J. Esteve Jacas.	Arrabal S. Martí, 19.
Manresa	» I. Bosch	Bruch, 1.
Buenos Aires.	» Antoni Barrot	

Ademés poden enviar-se també directament a l'Administració :
Gràcia, 12, Sabadell, amb sagells de 15 centims

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : Frederich Pujolà
Sek. de Red. : Joseph Grau

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri... Fred. Pujolà. — *III^a Literatura Konkurso de la K. E. F.* — (Eksterordinaraj temoj). — *Literaturo kreas kaj vivigas la Lingvon*, Jozefo Grau. — *Parkurbo Esperanto*, K. E. — *Internacia Konkurso de Stampoj*, Olota Stelo. — *Bibliografio*, Tamen. — *Suscripció per a la senyera de K. E. F.* — *Katalunaj efemeridoj*. — *Enlanda Movado*. — *Per als Federats*, Joan Piferrer. — *Korespondado*. — (Suplemento) *Alvoko al la III^a Literatura Konkurso de K. E. F.*



Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al "Kataluna Esperantista Federacio"

Esperanta Semo	Sabadell
Nova Semo	Reus
Fratega Kunigo	»
Vika Esperantistaro	Vic
Esperanta Nesto	Barbarà del Vallès
Olot Stelo	Olot
Lumon	Terrassa
Casino del Comercio	»
Esperantista Junularo	»
Esperanta Juneco	Barcelona
La Rondo	»
Esperanta Fako (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Ĉiam Antaŭen	»
Semo (Ateneo E. P.)	»
Escola Universitaria	»
Forigu Barojn	»
Esperanta Fratego	»
Kulturo	»
Barcelona Stelo	»
Unió Catalanista	»
Novan Vojon	»
Esperanto kaj Patrujo	»
Evolucio	»
Universala Fratego	»
Supren!	»
Esperanta Aŭroro	»
Esperanta Racionala Grupo	»
Tarragono Esperanta	Tarragona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Gerona Esperantistaro	Girona
Amo kaj Espero	»
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Laboro Esperanta	Vilanova i Geltrú
Esperantista Grupo	Mataró
Kamparo	S. Perpetua de la Moguda
Fratego	Vendrell
Esperantista Amikeco	Manlleu
Esperanta Amo	»
Esperanta Idealo	S. Coloma de Farnés
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Esperanta Amikaro	Banyoles
Herda Espero	Lleida
Fratego	S. Feliu de Guixols
Gerona Esperantista Ligo	»
Badalona Stelo	»
Paco kaj Amo	Badalona
Verda Stelo	Palafrugell
Semo	Flix
	Buenos Aires

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : FREDERICH PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEPH GRAU

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : Pri..., Fred. Pujulà. — III^a Literaturo Konkurso de la K. E. F. — (Eksterordinaraj temoj). — Literaturo kreas kaj vivigas la Lingvon, Jozefo Grau. — Parkurbo Esperanto, K. E. — Internacia Konkurso de Stampoj, O. S. — Bibliografio, Tamen. — Suscripcio per a la senyera de K. E. F. — Katalunaj efemeridoj. — Enlanda Movado. — Per als Federats, Joan Piferrec. — Korespondado. — (Suplemento) Alvoko al la III^a Literatura Konkurso de K. E. F.

NIA FEDERACIO

PRI...



A grafikaĵo aperanta en tiu ĉi sama numero klarvidige montras al ĉiu K. E. F.-ano la rimarkindajn progresojn de nia Kataluna Federacio. Ĉu ni devas kontentiĝi? Jes, kaj ne.

Se ni konsideras la individueman karakteron de nia popolo; se ni konstatas post kalkulado de la nombro de membroj de ĉiu aliĝinta grupo, ke nia K. E. F. estas la plej membroriĉa asocio en nia lando, kiu ne celas profitajn aferojn; se ni rimarkas la miron, kiun ĝi kaŭzas per sia sola ekzisto, en la personoj al kiuj ni pri ĝi parolas, — jes, ni devas esti kontentaj. Sed nun, kiam ni havas en la prezidanta seĝo de K. E. F. la plej optimisman esperantiston, kiun mi konas, sinjoron Rocamora, mi lasas al li la rolon kanti niajn venkojn, plekti girlandojn al nia vojirado, kaj instigi al la dancado ĉirkaŭ la fajro de nia entuziasmo. Dume mi blovos; ne por malvarmigi, ne por estingi, sed por inciti la fajron mem.

Ne; ni ne devas esti kontentaj. Certe ni atingis multon, sed ne tion, kion ni povas atingi. Niaj grupoj kunfratiĝis, nia gazeto pli-graviĝis, niaj kongresoj fariĝas pli kaj pli solenaj kaj imponaj, nia lando, — lando de Internacia Kongreso — restis inde en sia loko; sed ni ne povas kontentiĝi. Mi ne scias, kion promesas al ni la proksima jaro, — eble progresojn kiel la nuna, — sed la statistiko montras evidente, ke dum la pasinta, ne *ĉiu* K. E. F.-ano alportis novan membron. La nombro ne duobliĝis. Ĝi estas bedaŭrinda. Ĉiu el ni devus konsideri kiel devon, la varbadon de nova esperantisto kaj lian aligon al la ĝenerala asocio. Mi paroladis, verkis artikolojn, organizis kaj laboris senhalte por Esperanto; mi estas certa, ke kelkajn homojn mi allogis al nia afero. Tamen mi juĝus mian jaron malsparita, se mi persone, private ne estus esperantiginta kaj aliginta al K. E. F. unu homon, kiel mi faris. Agu tiel, gesinjoroj : en via urbo, vilaĝo, domo, hejmo, familio, celu UNU personon, kaj konstante laboru al-ĉirkaŭ li. Vi havas unu tutan jaron por sukcesi, kaj vi certe prosperos. Nun, kiam milito estas en la tago do, ni povas diri — esprimante per strategiaj terminoj — ke neniu fortikaĵo rezistas tutjaran sieĝon.

Imagu nun la sekvojn, se dum unu jaro nia nombro duobliĝus! Ni faris multon, sed ni havas multon por fari. La grupoj devas labori en siaj urboj, sed la gruparo, la «K. E. F.» devas labori eĉ en la lokoj kie ne ekzistas esperantistoj aŭ neorganizitaj esperantistoj, por krei grupojn, fari paroladojn, organizi allogajn festojn. Ne ĉiuj niaj propagandistoj estas riĉaj por sufiĉi per si mem al siaj vojaĝaj elspezoj; necese estas, ke la «K. E. F.» monhelpu ilin kaj tion ĝi nur povos fari, kiam dank'al la pli granda nombro da membroj, ĝi povos difini apartan kason al tiaj propagandaj elspezoj. — Kelkaj grupetoj en malgrandaj vilaĝoj vivadas malfacile kaj pro manko de rimedoj ĝiaj membroj ne povas labori per ĉiuj siaj fortoj kaj volo. Necese estas helpi ilin, ilin riĉigi, sendi al ili librojn, gazetojn, propagandilojn, kuraĝigi ilin, sentigi al ili, ke ni vivas en frataro kaj la ĉies fortoj estas al la servo de la plej malfortaj.

Ni vivas en lando, kie nur la sukceso posttrenas la homojn. Sed ni, esperantistoj, tro ofte ripetadis pri ia internacia, aparta flanko de nia animo. Ni estu superlandaj : ni provu, ke ni havas manojn ne nur por aplaŭdi la sukcesintojn, sed ankaŭ por helpi la laborantojn. Dum la proksima jaro ni devas krei grupojn kaj alporti la Esperantan parolon en la plej negravajn vilaĝojn, — nian forton, kie troviĝos unu izolita semo klopodanta ĝermi.

Ni pligrandigu la rondon, ni vivu por ĝi, por ĝia alta celo : unuiĝo en kaj por Esperanto.

SESDEK ŜAKPROBLEMOJ

Mia distinginda amiko Sro. Jozefo Paluzie, la konata eldonisto, per kies lernolibroj preskaŭ ĉiuj ni lernis, rakontis al mi tre amuzan anekdoton de sia esperantista vivo, kiun mi raportos por la ĉies plezuro kaj instruo de la propagandistoj.

Kiam Sro. Paluzie eldonis sian verkon «*Sesdek Ŝakproblemoj*» li sendis ekzemplerojn ne nur al Esperantistaj gazetoj sed, kompreneble, ankaŭ al la gazetoj, kiuj sin okupas speciale pri ŝakludo. La *Revue d'Echecs* (Bruxelles-Belgique. — 15 Aŭg. 1909) raportis pri la ricevo de tiu verko por la jenaj vortoj en franca lingvo:

«Ni ricevis kolekton de problemoj de Sro. J. Paluzie eldonitan en volapük... pardonon! en esperanto. Ni recenzos ĝin en nia sekvanta numero.»

La impresado de la redaktoro estas videbla; li ridetis rigardante la libron, kaj li ŝercas. Sro. Paluzie atendis fortan atakon, se ne kontraŭ la verko mem, kontraŭ la lingvo, en kiu ĝi estis redaktita. La sekvanta numero de la *Revue d'Echecs* alvenas; la redaktoro parolas tiel:

«Sesdek Ŝakproblemoj de J. Paluzie y Lucena, 337, str. Diputació, Barcelono (Hispanujo). Sub tiu ĉi titolo la bonega hispana problemisto Paluzie aperigis en lingvo Esperanto kolekton el siaj pli belaj problemoj. La ideo ne estas malbona. Al la ŝako, universala ludo, mankas universala lingvo. Nun, escepte se oni estas poligloto, ne estas rimedo por sekvi la fluon de la ŝaka literaturo. Tio, kio estas verkita en unu lingvo, ofte restas senutila por la alilandaj diletantoj. Por solvi tiun malfacilaĵon, estus necese, ke ĉiu aŭtoro publicu siajn verkojn en Esperanto, universala lingvo. Kiel diras la programo (*sic*), Esperanto estas helpa lingvo, kiun ĉiu civilizita homo devus koni krom sia landalingvo; ĝi estas tre riĉa, tre fleksebla, tre facila al la lernado kaj prononcado de ĉiuj popoloj; ĝi estas neŭtrala lingvo; ĝia adopto vundos nenian trosentemon nacion; unuvorte, oni nur bezonas legi la enkondukon por koni ĉiujn kvalitojn de Esperanto.»

Post ĉio ĉi, kion povus subskribi kiu ajn propagandisto de nia lingvo, la redaktoro dediĉas kvin liniojn al laŭdoj al la verko mem. Jen kial, dank' al artikolo, kiun en kelkaj lingvoj aldonis Sro. Paluzie al sia verko, homo kiu komencas ŝerce kaj mokete, finiĝas tiel serioze, ke ĝi preskaŭ forgesas la aferon pritraktitan de la verko!

FRED. PUJULÀ

FERVOJISTA STRIKO

Oni vokas la rezervanojn.

La horoj estas longaj en la netrairataj de vagonaroj stacidomoj. Rigora deĵoro. Oficiroj mezuradante laŭlonge la kajojn. Cigaredpecoj sekvas cigaredpecojn inter la relojn. Soldatoj staras gardon ĉe ĉiu angulo, flanke de ĉiu enuanta valizo, apud ĉiu pordo. Popolamaso rigardas scivoleme, atendas nesciante kion, komentarias fantaziajn.

La okaza telegrafisto — ne, mi ne nomos lin — oscedas kontraŭ la kvadranto sub rigardo de grava serĝento, kiu paŝadas legante broŝureton. De tempo al tempo, post sonoro, la nadlo tremetas, skue rondiras kaj haltas super la literojn, valsas nerve, kaj vekas novan pli larĝan oscedon. «Sen novaĵo»... klak, klak, klak...! «Sen novaĵo!» — «Ankaŭ same» «Nu, kiu vi estas fine?» — Mi? Mi estas N. — Ne eble! Ĉu N. la prezidanto de...? (Ne, mi ne nomos la grupon!) — La sama! — He, kiel vi lasis la movadon en via urbo? — La samideana interparolado daŭras longe. Kiam la telegrafisto levas la kapon, li renkontas la severan rigardon de la serĝento, kiu staras malantaŭ li kun la brakoj plektitaj sur la brusto.

— (Jen mi havos!) — Nu! Sekvu min!... Kaj malproksimen, for de la ĉies rigardado, la serĝento kondukas la interne tremantan telegrafiston. — Jes, mi kulpigis, tamen... konsideru. — Nu! For ĉi tio! Diru: ĉu la verboj en ĝi regas akuzativon?

Kaj li pretiĝis noti la klarigon sur sian ŝlosilon.



III^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

En suplemento al tiu ĉi numero ni publikigas la liston de Ordinaraĵoj temoj de la III^a Literatura Konkurso. Laŭ ĝia noto VIII ni aperigas ĉi sube tiun de

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. *Premio de «La Revuo»*. TEMO: Verki originalan kritikon aŭ studon pri artisto aŭ literaturisto kaj pri lia verkaro. La amplekso de la artikolo ne devas superi dek paĝojn de «La Revuo». PREMIOJ: 1.^a 30 frankojn da libroj el la katalogo de la firmo Hachette & Cie. 2.^a 20 frankojn da libroj el la sama katalogo. Noto. La premiitaj manuskriptoj apartenos al «La Revuo» kaj estos publikigitaj en tiu gazeto.
- II. *Premio de la firmo Adev & Borel*. TEMO: Paĝo pri la «Esperanta Biblioteko Internacia». PREMIO: 3 Ekzempleroj de ĉiu ĝis nun aperinta broŝuro de la «Esperanta Biblioteko Internacia».

Literaturo kreas kaj vivigas la Lingvon *

DEVIZO : Negrava provo

Kiam mi iomete pripensis tion, kio estas Lingvo, ŝajnis al mi ke ĝi estas kvazaŭ rozujo. Kaj dum pripensado pri Literaturo, ĝi ŝajnis al mi la medio, kie la rozujo elkreskas. Kaj mi venis rapide al la konkludo ke, tiel same, kiel rozujo sen medio kie kreskadi mortus, Lingvo sen Literaturo mortus ankaŭ.

Sed, foje, veni rapide al ia konkludo ĝenerale akceptita, povas esti malutile; tial ke, se oni aplikas tiun procedon en ĉiajn rilatojn, oni venos iam al tute malveraj konkludoj. Estas, pro tio necese argumenti la rezonadon, apogante ĝin sur firmajn bazojn, ĉar nur tiel oni povos alveni al konkludoj konfidindaj.

Lingvo estas io miksa el *korpo* kaj *animo*.

Ni nomas Lingvo la aron de sonoj — vortoj — per kiuj ni esprimas aferojn, materiajn aŭ nemateriajn, — kaj la regularon, al kiu ni submetiĝas, uzante kaj interrilatigante la vortojn por esprimi ideojn. Lingvo, do, estas ne nur la leksikono — aro de vortoj, — aŭ la sola gramatiko — aro de reguloj, — sed la kunigo de ambaŭ aferoj.

La *korpo* de Lingvo estas la aro de vortoj — afero materia — taŭgantaj al ni por esprimi ideojn, kiuj estas la *animo* ĝia.

Se ni esploras tiun ĉi animon, ni konstatos ke la ideoj, el kiuj ĝi konsistas, estas tute samaj ĉe ĉiuj lingvoj, pro tio ke kian ajn penson ni povas esprimi diversmaniere; ni povas sekve forlasi konsideradon pri la animo de Lingvo, ĉar ĝi estas sama ĉe ĉiuj idiomoj. Ĉio de ni dirota rilatos tial nur lingvakorpon.

Lingvo estas nepre bezonata ĉe la homa vivado; ĝi estas tio, kio diferencigas la homon de ĉio restanta en la Mondo, kaj ĝi estas tiel samesenca kun liaj bonesto kaj vivmaniero, ke la dekadenccon de Lingvo sekvis ĉiaokaze defalo de la popolo ĝin parolanta.

Tio estas klare komprenebla : ne senigante la homon je lia inteligento, eĉ konservante al li ĉiujn liajn povojn, vi forprenu de li la povon esprimadi siajn pensojn, interŝanĝadi kun similuloj siajn ideojn, kaj donu al li kompanse eĉ tutan dekon da brakoj : neniel li diferencigos je la bestoj. Sed, forprenu ĉiujn liajn membrojn, ĉiujn

* Premiita en la II^a Literatura Konkurso de K. E. F.

liajn brakojn, kaj lasu al li parolpovon — kaj la homo daŭros estante la reĝo de la Naturo : la Homaro progresados kiel nun, senĉese.

La homo celadas pliperfektigi, kaj pliperfetiĝi sekve ĉion, kio lin ĉirkaŭas. Se en la antaŭa paragrafo ni konsentis, ke la lingvo estas lia ĉefa, nepra progresilo, ni devas konsenti, logike, ke se per ĝi li devas pliperfektigi sian ĉirkaŭantaĵon, ju pli perfekta estos la laborilo, des pli perfektaj estos, ĉe samaj kondiĉoj, la faritaj laboroj.

Krom tio, ĉe lingvo okazas same kiel ĉe akvo : kiam ĝi fluas, ĝi konserviĝas pura kaj diafana; sed, haltinte, starante, ĝi putriĝas iom post iom iĝante netravidebla. Por ke lingvo ne putriĝu tiele, la homo estas devigata ĝin fluigi kaj uzadi, ĝin konservante kaj perfektigante — kaj tiam li sin donas al verkado, al kreado de Literaturo.

Literaturo estas do, la pero per kiu la homo pliperfektigas sian Lingvon.

Homaro parolis nur unu lingvon. Ĝi disopiĝis kaj ĉiu aro, — laŭ la influoj de la naturaj ecoj de la loko, kie ĝi enloĝiĝis, kaj kiel konsekvenco de tio, ke la parolvortoj estas io intime kunligita kun la organoj de parolo, — deŝanĝadis la primitivajn sonojn, aliformigante malrapide sian lingvon, ĝis alveno al reciproka nekomprenejo; el ĉiu lingvo, kiu deveniĝis tiel, naskiĝis sammaniere aliaj, kaj el tiuj ĉi — ankoraŭ aliaj; ĝis oni venis al lingvoj, kiujn ni nomas vivantaj, uzataj nuntempe en la mondo.

Dum ia lingvo kreskadis, ekzistis nur la rozujo de nia bildkomparo, sole kun foliaro. La idiomo estadis malglata, maldelikata. Sed literaturo ekiĝis; la homo komencis esprimi la Belon per parolo, — kaj la rozujo ekburĝonis : literaturo estis kvazaŭ aero nutranta la florontan kreskaĵon; kaj, ĝi ja ne similis nur je nutra aero, sed ankaŭ je lumo.

La kreitaĵoj vegetantaj en mallumo, ne vidataj de lumradioj estas tutblankaj. Tio ĉi estas fenomeno elkonita de ĉiu instruitulo. La bestoj, stalaktitoj, stalagmitoj, k. c. kiuj restadas en la interno de kavernoj, ne ricevante lumkison estas senmakule blankaj.

Tio sama estis ĉe la rozujo de nia rakonto. Sen literaturo ĝiaj floroj estis sennuance blankaj, sed tiu ekeksistis, la rozoj ricevis ĝian lumon kaj varie belkoloriĝis. Tiam rozujo estis bela. Sin nutrante per la radikoj — klasikuloj, antaŭirantoj — kiuj eniĝas en la teron de la antikva deveno de la lingvo, kaj sin orname ŝirmante per folioj — vulgara parolo, ordinara lingvo — ĝi naskis belajn rozojn, — literaturaĵojn.

Sed tiuj ĉi neniel ekzistus, se antaŭe medio, kie elkreskadi ne

estus ankaŭ ekzistinta. Se la homo ne estus sentinta bezonon esprimi daŭre la Belon, igante nepereigeblaj per io materia, sentebla, la forflugantajn sonojn de lingvo, tiu ĉi ne estus kreskinta, ne estus florinta.

Literaturo, medio kie florkreskas Lingvo, estas sekve la sola elemento ĝin viviganta.

Tamen, Literaturo ne nur partoprenas en la vivigado de Lingvo, sed ankaŭ en ĝia kunkreado.

Ĉiuj lingvoj fariĝis blinde. Same kiel homo, sin ekzercante korpe, kreskadas, ankaŭ lingvo uzate kreskis, kaj ellaboradate, iel memkreiĝis, tial ke ne entute naskiĝinte subite, sed iompostiome, ĝi kreadis sin mem, blinde tamen, kaj senkonscie.

La perilo per kiu ni partoprenis en la kreado de Lingvo estis Literaturo. Ĝin ni povus difini jene : Literaturo estas aro de elmontraĵoj lingvaj ĉe kiuj la homo priskribas aŭ admiras la Belon per la parolo.

Komence, la homo eksentis la Belon *grosso modo* kaj la lingvo per kiu li ĝin tradukis egalvaloris samgrade je la belonsentado. Sed tia sentŝatado fariĝadis pli subtila kaj ĝi bezonis, por esti ĝuste esprimita, perojn pli adekvatajn, esprimformojn novajn, kiuj poste venis riĉigi la lingvon. Tiuj ĉi nove enkondukitaj formoj forpelis la antikvajn, neĝustajn, ilin anstataŭante, kaj estante anstataŭitaj siavice de aliaj pli novaj, kiuj poste iĝis ankoraŭ ne sufiĉe precizaj.

La lingvo, tiel, deŝanĝiĝis malrapide, kaj la literaturo estis la kaŭzo de tia ŝanĝado, ĉar se la homo ne estus volinta esprimi la Belon per Lingvo — kio estas Literaturo — tiu ĉi ne estus ekzistinta kaj la lingvo ankaŭ ne estus kreskinta ellaboriĝante, aliformiĝante de embrio en vivantaĵon.

Ni konstatas, do, ke Literaturo estas kio kreas Lingvon kaj ĝin vivigas kaj kreskigas.

Ni diris supre, ke la homo konstante celas pliperfektigon, kio estas aksioma, ne bezonante pruvon. Ni aldonis, ke lia nepra pliperfektigilo estas la Lingvo kaj ni pruvis, ke tiu ĉi kreske grandiĝas dank' al la Literaturo.

Sed ni konsentis ankaŭ, ke des pli perfekta devos esti Lingvo, ju pli alta estas la stato de perfektigo de la homoj ĝin uzantaj, ĉar se tio ne okazus ili ne povus esprimi grafike ĉiujn subtilaĵojn de sia penso.

Estas do necese, nepre, ke la Lingvo evoluciadu, por ke ĝi povu sekvi la antaŭenmarŝadon de la Homaro ĝin uzanta. Kaj tial ke

la maniero tion atingi estas la kulturigo de Literaturo, necese estas pliriĉigi kaj pliperfektigi tiun ĉi, por ke la Lingvo ne mortu, nenigante kun si la popolon, kiu ĝin parolas.

Tiu ĉi lasta konkludo estas tute atentinda de la Esperantistoj.

Efektive. Ĝis nun ni parolis abstrakte pri la malsamaj lingvoj, kiujn la diversaj popoloj uzas, kaj ni konsideris la efikojn produktitajn en tiuj aluditaj lingvoj.

Nun, ni estas en la okazo konsideri, ke Esperanto ne nur rilatas unu aŭ kelkajn popolojn loĝantajn sur Tero, sed ĉiujn ope, kaj ke, se ne nuntempe, almenaŭ pli malfrue, ĝiaj kreskado kaj florado rilatos la tutan Homaron. Estas pro tio tutnecese, ke ni zorgu atente la pligrandigon kaj kreskadon de nia Literaturo; kaj kvankam ni, internacilingvanoj, ne devas timi neregulajn, blindajn ŝanĝojn de lingvaj formoj, ni devas klopodi, ke la evolucia anstataŭigo de iaj formoj per aliaj pli perfektaj estu nur konsentita kiam estos palpeble elpruvita ĝia taŭgeco.

Alimaniere, ni povus ekpereigi grave la estonton de nia sankta entrepreno.

Ĉi tiuj konsideroj estas nekompletaj. Ĉiu paragrafo da tiom interesa afero povus esti temo de unu traktato. Mi nur skizis supraĵe la proponitan demandon, en la espero ke la klara bonkompreno de miaj legantoj plenigos la foreston de tiaj tezoj, kiujn ni ordinare akceptas kiel pruvitajn, tial ke elstudado pri ili postulus fortojn, kiujn mi ne havas.

JOZEFO GRAU.



PARKURBO ESPERANTO

Pri tiu tre grava kaj serioza entrepreno ni ne povas hodiaŭ longe raportti. Por atingi la efektivigon de tiu plano la Propaganda Ligo fondita por tiu celo akiris jam apud München (Germanujo) unu milionon da kvadrataj metroj da tero. Niaj kunfederacianoj, kiuj volos ricevi detalajn sciigojn, povas dume sin turni al la PROPAGANDA LIGO PARKURBO ESPERANTO, Grafelfing München, 8 Pfandhausstrasse, petante la ilustritajn prospektojn senpage dissendatajn — K. E.



Internacia Konkurso de Stampoj

organizita de «Olot Stelo»

La grupo «Olot Stelo» aljuĝos:

- 1.^e Premion al la esperantista societo aŭ grupo, kies stampo havos pli grandan artan valoron.
- 2.^e Premion al la esperantista societo aŭ grupo, kies stampo pli bone simbolas la ideon de l'Esperanto.
(La premioj konsistos el : Diploma, Memorigaĵo-Jarlibro de la Kongreso, Jarabono al «Kataluna Esperantisto.»)
- 3.^e Honoran diplomon al la aŭtoroj de la premiitaj stampoj.

NOTOJ.

- I. «Olot Stelo» rajtigas la juĝantojn aljuĝi tiom da mencioj, kiom ili opinios necesaj (Diplomo, Memorigaĵo-Jarlibro de la Kongreso.)
- II. La konkursantaj stampoj devos esti stampitaj sur kartoneto el formato poŝtkartal
- III. Ili devos esti senditaj antaŭ la 1.^a de Marto 1913.
- IV. La stampo de «Olot Stelo» ne partoprenos la konkurson.
V. La senditaj stampoj estos ekspoziciitaj dum la Kongreso.
- VI. La atesto de ricevo kaj verdikto aperos en la gazeto «Kataluna Esperantisto».
- VII. La stampoj kaj korespondaĵoj pri la konkurso devos esti sendataj al la Prezidanto de la Organiza Komisiono, Sro. Pere Roqué, strato Pardal, 13, Olot (Katalunujo-Hispanujo)
- VIII. La juĝantaro konsistos el la jenaj sinjoroj:

Prezidanto : Sro. Anton Serra, Direktoro de la Fabrikejo de Ceramiko «La Carmelitana». *Vic-Prezidanto*. — Sro. Melcior Domenge, direktoro de la Akademio de Belartoj kaj Industriartoj en Olot. *Sekretario*. — Sro. Martí Casadevall, skulptisto en la laborejo «Las Artes Religiosas». *Vic-Sekretario*. — Sro. Mariano Batlle, sub-direktoro de la «Arte Cristiano» kaj fotografia kritikisto. *Membroj*. — Sro. Josep Berga, direktoro de la «Lernejo de Belartoj», vic-prezidanto de la Komitato de la Muzeo-Biblioteko de Olot, Akademiano de la Reĝa Akademio de Belartoj de Sankta Ferdinando en Madrido. Sro. Toribio Sala skulptisto en «El Sagrado Corazón». Sro. Josep M.^a Garganta, prezidanto de «Olot Stelo» kaj de «G. E. L.» Sro. Manel Prat, sekretario de «Olot Stelo» kaj de «G. E. L.» Sro. Josep Boix, vicsekretario de «Olot Stelo».

Olot, Novembron 1912.

Por la Organiza Komitato

La Prezidanto
ANTON FORTET

La Sekretario
PERE ROQUE

BIBLIOGRAFIO

Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj. (Eldonoj noj. 1016-1018, 1032-1034, 1037, 1054, 1063 de la firmo «Posrednik» (Peranto). L. Tolstoj. *Dio, unu por ĉiuj.* (Surata kafejo.) — Prezo: 5 sd.— *Unu animo en ĉiuj*, Prezo: 5 sd.— *Unua ŝtupo, aŭ senmortiga nutrado.* — Prezo: 11 sd.— Tradukitaj de A. N. Sarapov.— *Dio vidas veron sed ne baldaŭ diros.* — Prezo: 5 sd.— *Du maljunuloj*; Prezo: 17 sd.— *Kaukaza militkaptito.* — Prezo: 9 sd.— *Per kio homoj estas vivaj.* — Prezo: 8 sd.— *Kie estas amo, tie estas Dio.* — Prezo: 7 sd.— *Sieĝo de Sebastopolo.* — Prezo: 17 sd.— Tradukitaj de N. Kabanov.— Por mendoj sin turni en la ĉefan librotenejon de la eldonoj de «Posrednik»: Moskvo, Arbato, 36, d. Testov, al 1. 1. Gorbunov.

La firmo POSREDNIK (Peranto) el Moskvo, fondita de L. Tolstoj en 1885 kaj nun esperantia entrepreno «starigis kiel sian taskon eldonadon de libroj disvastigantaj ideojn de la frata unuiĝo de homoj kaj de ĉio vivanta en mondo». Ĝi nepre devis adopti Esperanton kiel plej adekvatan instrumenton por tiu nobla celo, kaj ĝi aplaŭdinde dediĉas al la memoro de sia eminenta fondinto serion de esperantaj eldonaĵoj, kiuj aperados sub la nomo de «Tutmonda Biblioteko».

Se la loko ne mankus al mi, mi povus eldiri nun la longajn konsiderojn kiujn kaŭzis en mi la vido de tiuj naŭ broŝuroj, entenantaj verkojn de Tolstoj, per kiuj komenciĝas tiu biblioteko. Preskaŭ neniu homo el nia generacio kaj el tiuj, kiuj la nian sekvas, ne sentis almenaŭ dum unu momento profundan simpatian kaj admiron por la genia literaturisto. Kiam tuj post lia morto la kinematografejoj projekciis filmojn el la vivo de Tolstoj ĉiuj barcelonanoj sin interpuŝis reciproke por esti la unuaj konatigi kun la intimaj agoj de la favorita aŭtoro. Ĝi estis kvazaŭ febro! Sed kiujn ideojn havis niaj samlandanoj pri la ideoj de la grafo? Ho ve, tio jam estas eĉ nedivenebla. La plimulto, kiu ne konas francan lingvon, legis la Tolstojajn verkojn per hispanaj tradukoj, kiuj ne kondukis aŭtorojn kaj eldonistojn al eŝafodo ĉar la homaro, kiu faris leĝojn por puni la frakason de korpa membro ne decidis ankoraŭ leĝodiri, ke la cerbo estas la plej respektinda kaj protektinda el la homaj organoj. Tiuj tradukoj faritaj tra franca lingvo de homoj, kiuj plej ofte ne konas la francan nek eĉ la hispanan lingvojn estas la plej trafa ekzemplo de la grado de malnobleco, kiun homoj povas atingi allogitaj de mona profito. La verkoj de Tolstoj estas en ili torturitaj, senigitaj je ĉapitroj, je paĝoj da teksto! ofte plilongigitaj! por ke ili entenu en antaŭdifinita nombro da paĝoj! Nedelikataj eldonistoj, profitante la neekziston de internacia literatura kontrakto inter Rusujo kaj Hispanujo ŝtelmetis manojn sur tiujn verkojn, kaj dum ili, en kelkaj jaroj, de simplaj kompostistoj fariĝis milionuloj, la tradukintoj enspezis po soldo la paĝo! Kaj eĉ ne unu centimo transiris la rusajn doganojn!

Amikoj esperantistoj, profitu nun la okazon konatigi kun la veraj verkoj de Tolstoj kaj uzu ilin propagandante Esperanton por senmaskigi la ekspluatistojn de l'intelektu per la rimarkigo de la falsaj tradukaĵoj. Vi kontribuos duoble en la kulturo de nia lando.

* * *

La Esperanta Scienca kaj Literatura Libraro (Krakovo, Strato Retoryka 10. Aŭstrio-Galicio) rekomendas al ni presadon de cirkulero, kaj ni pro manko de loko ne povas komplezi ĝin entute. Malgranda eliraĵo donos tamen ideon al niaj legantoj:

«Samideanoj! Ĉu nia literaturo longe ankoraŭ devas sole servi al esprimado de belsonaj frazoj kaj subtilaj parolturnoj? Aŭ ĉu prefere jam venis la tempo, ke ĝi fariĝu luma disportanto de ĉiuj utilaj kaj fruktodonaĵoj — potenca bata: lilo kontraŭ ĉiuj nigraj fortoj kaj perfortoj, premantaj la mondon?! Por almenaŭ en malgranda mezuro efektiviĝi tiun ĉi idealon, ni, subskribintoj decidis eldoni serion da libroj, kiuj per la sekvanta eco principe diferencas de similaj eldonaĵoj. «Ĉiu libro kostas tiom, kiom kostas ĝia preso.» C. Kronenberg. E. Pfeffer. A. Czubyński.» Post alsendo de almenaŭ 1. Sm. ĉiu grupo aŭ aparta samideano ricevos senprokraste kaj aŭfrankite kolekton de jam aperintaj libroj en amplekso de almenaŭ 640 paĝoj da teksto.

Al tiu libraro apartenas la jena verko:

Ekonomio Socia. Kio ĝi estas kaj kion ĝi instruas. — Dro. J. B. Marchlewski. —

Prezo : 10 sd. (25 cntoj.). Laŭ la pola eldono esperantigis Emilo Pfeffer. 1912.

Ĝi estas la unua el la jena serio : *Historio de l' Granda Franca Revolucio*, F. Perl. — *La moderna alkoholismo*, Dino. Daszyńska-Golińska. — *La teksistoj*, G. Hauptmann. — *La politiko de l' popolo*, Dro. A. Menger. — *La deveno de l' homo*, W. Bolsche. Tre interesa verko. Bona Esperanto. Flua stilo.

Petaloj. — Aro da versaĵoj originale verkitaĵ en Esperanto de Czeslaw Kozlowski.

— Kiew. Eldono de Cz. Kozlowski. — Malo-Vladimirska. 26. 1912. — Mendebila rekte de l'aŭtoro (supra adreso); dum Junio-Aŭgusto : St. Olšanica, Kievska. gub., Prusy. Prezo : 0.250 Sm. Transpagiloj de Ĉekbanko estas akceptataj.

Por niaj latinaj oreloj ne ekzistas rimo inter nominativo kaj akuzativo (vian respond-vorton — kvazaŭ antaŭ morto; per blanka tavolo — sub neĝo primoln) nek en simila jena versaĵo:

«En ĉi tiu tago pala
Mi trovis sur korto
la kanteman najtingalon...
ĝi estis jam morta.»

Tia konstruado estas en nia literaturo sufiĉe nekorekta, kaj ni kuraĝas opini, ke nia maniero kompreni la versan muzikon devas esti ankaŭ aplikita al la Esperanta versofarado. Ĝi estas afero, kiu ne rilatas nur la lingvon, sed ĉefe la belon. Senrimaj versoj estas multe pli agrablaj al orelo, ol versoj kies rimado estas ne unueca, kaj povas kredigi nelertecon de l'aŭtoro.

TAMEN

★ ★ ★

SUSCRIPCIO
PER A L'ADQUISICIO DE LA SENYERA DE K. E. F.

Sr. A. Codorniu	25	Ptes.
» J. Amades	5	»
» J. Buxó	5	»
» G. Galcerán	5	»
» E. Pujulá	5	»
» E. Pellicer	5	»
» J. Monjonell	3	»
» J. Piferrer	5	»
» P. Ustrell	5	»
«Esperanta Semo»	5	»
Sr. J. Romeu Ambrós	1	»
Total		69 Ptes.

Segueix oberta la suscripció.

Katalunaj efemeridoj

DECEMBRO

1909. — La kataluna ĉiutaga ĵurnalo «El Poble Català» ekpublicas esperantan rubrikon redaktotan de Sro. Robreño el Vilafranca.

— La ĵurnalo «Diario de Barcelona» publicas interesajn artikolojn de inĝeniero Dro. F. Pons pri Esperanto.

— La ilustrita gazeto «Feminal» publicas artikolon de Sinjorino Rosals pri la kataluna virino en la Esperanta movado.

— En la «Lernejo de Sant Ramon de Penyafort» el Vilafranca del Penadès, fondiĝas studenta asocio sub la nomo «Studenta Esperantista Juneco».

— En la «Lernejo de la Sankta-Koro-de-Jesuo» el Vic, direktata de la Dominikaj Monaĥinoj, malfermiĝas kurso de Esperanto.

— Dro. Joseph Mor fondas la grupon de Cervià.

— Fondiĝas grupoj en Artesa kaj Borges Blanques.

31. — Festeno en *Mundial Palace* kun ĉeesto de 200 kunmangantoj organizita de la lernantoj de Esperanto honore al la profesoroj.



Okaze de la IV^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio» kiu havos lokon en Olot, la grupo «Oloti Stelo» organizos gravan ekspozicion esperantistan de revuoj, broŝuroj, verkoj, fotografajoj de membroj de grupoj, k. t. p., kaj ĝi petas ĉiujn grupojn kaj samideanojn, ili volu kontribui al la sukceso sendante esperantaĵojn al la Prezidanto de la Organiza Komitato de la Stampa konkurso Sro. Pere Roque — Pardal, 13, Olot. — Katalunujo-Hispanujo.

ENLANDA MOVADO

El 16 d'Agost mori a Litzelstetlen, avent complert els 81 anys, en Martí Schleyer, l'inventor del Volapük. Fou el primer ome qui obtingué resultats practics de la llengua internacional per ell inventada. Nosaltres que admirem en ell al precursor de nostra idea, ens asociem a la dolor dels qui plorej la perdua del gran ome.

SANT FELIU DE GUIXOLS

La 15-16^{an} de Septembro okazis en tiu urbo Kongreseto de Ĝerona Esperantista Ligo, kiun ĉestis 79 samideanoj kaj aliĝis sep grupoj. La 15^{an} jam de antaŭ la alveno de la vagonaro atendis en la enveturejo la membroj de «Frateco» kun ĝia standardo, reprezentantoj de enurbaj societoj, raportistoj de lokaj jurnalaj, k. t. p.

Kiam la vagonaro alveturis, muzikistaro ludis *La Espero*'n, kiun kantis la esperantistoj, kaj post salutoj, bonvenoj, k. c. ĉiuj gesamideanoj aliris al la Urbdomo, kie la Urbestro Sro. Durán kaj kelkaj Urbkonsilantoj atendis ilin. Per bela parolado la Urbestro salutis la kongresanojn kaj deziris rapidan progresadon kaj baldaŭnan sukceson al nia Esperanto, kiun li parolis dum li malfermis la III^{an} Kongreseton de Ĝ. E. L. meze de varma aplaŭdado. Sro. Campistol, prezidinto de la II^a dankis afable liajn vortojn.

La grupo «Frateco» regalas tiam la samideanojn per honora vermo en la trinkejo «El Dorado»

Posttagmeze ĉe la Urbodomo okazis labora kunsido. Aprobinte la financon raporton de la Ligo, la kunsidantoj decidis, ke la venonta kongreseto de Ĝ. E. L. havu lokon en Olot, kaj oni tial elektis, kiel ĝiajn prezidanton kaj sekretarion, Srojn. Garganta kaj Prat, respektive, kiuj havos samtempe la samajn oficojn ĉe la komitato de la Ĝerona Ligo. Tiu komitato devos logi ĉiujare en la urbo, kie efektiviĝos la sekvonta kongreseto. Ankaŭ estis decidate, translokigi la nunan sidejon de Ĝ. E. L., en la grupon de Girona, kaj akiri standardon por la Ligo.

Oni faris poste viziton ĉe la fabriko de elektro, kie la Direktoro kaj oficistoj bone akceptis la vizitantojn. Vespere kelkaj el la anoj de *Frateco* ludis la triaktan komedion de Schiller «La nevo kiel onklo» tradukitan de Sro. Stewart. Ĉiuj ludantoj bone prezentis siajn rolojn kaj ricevis fortan aplaŭdon de la multaj alestantoj.

La 16^{an} oni ekskursis je la deknua matene al la bela loko «Segaró». La vojaĝo, kiun oni faris per barko, estis agrabla. Tie la ekskursantoj gaje festenis kaj dum la tostoj Sro. Delfi Dalmau petis de ĉiuj entuziasmon kaj konstantan helpon por atingi la plenan sukceson, de ĉiuj deziratan. Sro. Rodó, de Santa Coloma, legis originalan poezion kaj lia fratino fraŭlino Mario ludis katalune *La Espero*'n. Ili ambaŭ estis varme aplaŭditaj. Fine, Sro. Presas, prezidanto de la Organiza Komitato dankis ĉiujn por la helpo donita kaj deziris al la IV^a bonan

sukceson. Krioj *Vivu Esperanto*, *Vivu Zamenhof*, aŭdiĝis ĉe la fino post kantado de nia himno.

Vespere post kunsido, ĉe kiu oni konkludis peti la Urbestaron bonvolu alpreni la nomon de nia Majstro por unu strato, estis ludataj en la «Mara Promenejo» kelke da sardanoj. Multaj gejunuloj dancis kun niaj gesamideanoj la katalunan dancon.

La senlaca propagandisto Sro. Delfi Dalmau, faris publikan paroladon grandare ĉeestatan de ĉiurangaj urbanoj pri la temo *Libereco, Amo kaj Progreso sin trovas en Esperanto*. Per sia facila parolo nia amiko vekis fortan simpatian al nia ideo kaj ricevis merititan ovacion.

Bela bukedbalo kronis la festojn de la III^a Kongreseto de la ĝeronprovincaj samideanoj.

BARCELONO

En la komercista societo «Foment del Treball Nacional» la prezidanto de K. E. F. faris interesan paroladon la 21^{ma} de lasta Novembro.

Antaŭ klera ĉeestantaro, kiu premiis per laŭta aplaŭdado lian belan propagandon, Sro. Rómulo S. Rocamora disvolvis elokvente la anoncitan temon, dirante, ke feliĉe Esperanto komencas esti akceptata de niaj komercistoj, kiuj antaŭ nelonge ankoraŭ ne atentis pri ĝi. Ĝuste tio, li diras, estas la por ni plej kuraĝiga afero, tial ke nur tiuj elpensitaĵoj, kiujn komercistaro prenis kun interese, atingis plenan venkon. Aludas la faman komercan kodon nomatan «Libre del Consulat de Mar», kiu alformigis sian spiriton en ĉiujn komercajn kodojn de la ceteraj popoloj, nur tial, ĉar ĝi estis verkita en la tempo, kiam tia kodo estis necesa. El tiu fakto li konkludas, ke niaj komercistoj devas la unuaj grandare uzi Esperanton, kaj tio havigos al ili influon kaj gravecon efektivaĵajn, tial ke venis jam la tempo en kiu la mondo bezonas helplingvon.

Li citas, kiel ekzemplon montrantan, ke la mokoĵe la esperantistoj nenion valoras, tion kio okazis ĉe Kristanismo. Malgraŭ ke ĝi aperis, kiam la mondo ĝin forte bezonis, la homaro ricevis ĝin kun mokoĵoj kaj ĝin kontraŭbatalis. Ĉe aviado, kiun antaŭvidis la antikvaj grekoj — li aludis fabelon pri Ikaro — kaj profetis la genia Leonardo da Vinci, same okazis, kaj tamen nun ĝi estas fakto, kiu per si mem sin trudas al la antaŭtempaj mokintoj. Videble, do, la ideoj devas por plene flori atendi ĝis multa tempo forpasis: oni ne povos pro tio, aserti ke Esperanto ne progresis; dum 25 jaroj ĝi disvastiĝis mirinde.

Li prezentas komparon inter la senordo reganta antaŭ la enkonduko de la decimala komuna sistemo de mezuroj kaj pesunuoj kaj la nuna ĥaoso lingva, kaj montras ke, tiel same kiel tiu sistemo solvis tian senordon, Esperanto solvos la lingvan problemon. Ne solvos, ĝi solvis jam ĝin; konstati nur la elokventan fakton: en la internaciaj konkursoj katalunaj, multajn premiojn gajnis ne katalunoj, kaj niaj samlandanoj atingis eksterlande premiojn kaj honorojn ĉe similaj konkursoj. Sen Esperanto tio ne estus ebla: malfacileco de l' naturaj lingvoj ĝin malebligas.

Tamen, ni vidas ke multaj katalunoj, eĉ ne bone konante nian lingvon, ekstudas alian fremdan, kiun ili ne sukcesas entute posedi. Sed ni ne kontraŭstaras

kvankam ni bedaŭras tion. Tiuj senprofite lernintaj, tial plej multe povos taksii la valoron de nia lingvo, kiu ĉe ĉiuj ordoj plenumis la kondiĉojn de tia. Dokumentaro, — revuoj, katalogoj, ĵurnaloj, korespondaĵoj, k. t. p. — kiun li montras, klare tion pravas.

Fine, invitante la komercistojn pripensi la elmontritajn ideojn, li certigas ke ni havos kuraĝan persistecon laboradi kaj propagandi ĝis tiam, kiam nia komercistaro uzados Esperanton, kaj profitos el ĝia utileco.

Multaj aŭskultintoj gratulis la parolinton kaj trarigardis la dokumentojn, kiujn Sro. Rocamora alportis por pravigi siajn asertojn. Al la kara prezidanto de K. E. F. ni ankaŭ kore gratulas por bela parolado, kiun ni skize raportis. — J. G.

— Manko de loko malpermesas, ke ni publikigu leteron, per kiu Sroj. Jako Claramunt, Jozefo Puig, Petro Rovira kaj aliaj el *Esperanta Racionala Grupo* kore dankas niajn samideanojn de Tarragono por ilia sindona kaj afabla helpo, kiun ili ricevis dum sia vizito tra la interesantaj antikvaĵoj de la II^a Kongresurbo de K. E. F.

— La diplomitaj profesoroj de K. E. F. okazigas ĉiumerkrede je la 10^a vesperĉe la grupo *Semo* (Ateneu Enciclopedic Popular, str. Carme, 30) legokurson, kiun povos alesti ĉiuj geesperantistoj.

MANLLEU

La propagando, okazigita de «Esperantista Amikeco», kiun faris en Aŭgusto Sroj. Jozefo Grau kaj Johano Campdelacreu, jam donis frukton. La du kursoj por ambaŭ seksoj donataj en la sidejo de la grupo estas tre ĉeestataj. — B. Nogué.

VENDRELL

La grupo «Frateco» laŭ peto de kelkaj entuziasmuloj invitis la gesamideojn de «Laboro Esperanta» kaj «Tarragono Esperanta», kiuj elektis por tio reprezentantojn, organizi propagandan feston en la najbara vilaĝo Calafell, por fondi esperantan grupon. Ĝi okazis la 27^a de Oktobro kaj dum ĝi parolis Sroj. J. Jané, el Calafell, kiu prezidis; Ll. Corbella, kiu legis belan laboron de A. Martorell; J. Marcé, D. Roig, de T. E. : J. Escofet, de L. E. kaj J. Martorell. Resumis la paroladojn Sro. J. Jané, sciigante la geĉeestantojn, ke la esperanta grupo el Calafell, estos nomata «Laboro kaj Kulturo». La festo tre sukcesis. La multnombra ĉeestantaro tre entuziasme aplaudis la parolintojn.

— La esperanta grupo «Frateco» elektis la jenan komitaton : *Prezidanto* Sro. J. Martorell : *Sekretario*, Sro. S. Esvertit : *Kasisto*, Sro. Ll. Corbella : *Bibliotekhisto*, Sro. R. Batlle. — *La Delegito*.

Ĉiuj samideanoj, kiuj sendos la kotizon de Sm. 6 (Fr. 15) al la Komitato de la 9.^a Universala Kongreso en Ĝenovo, (adreso : Kongreso de Esperanto — Genova-Italia) ricevos senpage de tiam la gazeton «Itala Esperantisto», kiu detale raportos pri la preparoj de la Kongreso.

PER ALS FEDERATS

Grans són les millores fetes en aquesta revista, durant l'any que acabem, i més grans voldríem fer-les els que estem encarregats de vetllar per la prosperitat de la nostra aimada K. E. F. A mida del creixement d'aquesta, hem anat augmentant l'importància i les condicions materials del KATALUNA ESPERANTISTO, i segurament els nostres companys de Federació n'han estat ben joiosos. També nosaltres, que, volent seguir la via empresa, aviem projectat per a l'any vinent un augment en el nombre de pàgines de K. E. Però, al fer els comptes necessaris per formalitzar el presupost del pròxim any, hem trobat unes quantes dificultats d'ordre administratiu, que 'ns impedeixen realitzar el nostre desig, i de les quals volem parlar als nostres benvolguts companys.

Una d'elles, la principal, es el no gaire interès que posen alguns federats i delegats en facilitar les tasques de l'Administració, deixant d'enviar desseguida aquelles quantitats, import de quotes, que han d'esser-nos remeses, o esperant, per fer-ho, que per nosaltres els siguin demanades. Això constitueix un gran entrebanc, tota vegada que no podem disposar d'altres cabals que 'ls que produeix la recaudació de quotes; i, essent grans les despeses a que avem d'atendre, ens trobem qualque vegada en presència de dificultats innecessàries.

A més, serà bo recordar als nostres *kunfederacianoj* que es molt lloable feina procurar, prop dels amics, o parents, o coneguts, que 's facin socis de la nostra organització, ja que 'l que 'u fa així no sols contribueix a l'expansió de l'Esperanto, sinó que beneficia sos propis interessos, puix per un preu reduït se li servirà una revista que de dia en dia augmentarà d'importància.

A quin dels nostres companys no li serà possible aconseguir que un germà, o un amic o un company de grup, se federi per a l'any vinent? Tots podrem fàcilment fer-ho: imagineu l'expansió de la K. E. F. si tots ens ho prenguessim amb interès! Esperant que així 'n fareu, acompanyem, amb el present número, un butlletí d'adesió, i 'us preguem que, al remetre-nos lo abans possible les vostres quotes, procureu ajuntar-hiles dels nous companys que aureu reclutat.

Es aquesta una tasca fàcil si 's té en compte que, entre 'ls milers de socis que integren els 49 grups adherits a la Federació, són moltíssims els que encara no 'n són membres, amb tot i veure amb gran simpatia l'entitat capdal de l'Esperantisme a Catalunya. Pel bé de l'Esperanto i del propi de cadascú, vos estimula a treballar fins a doblar el nostre nombre de socis.

JOAN PIFERRER


Caixer-Administrador de «K. E. F.»

KORESPONDADO


Sro. A. Torné, Barcelono. Vi povas publikigi vian verkon citindan, aldona la noton: «Kun permeso de Kataluna Esperantisto». — Sro. S. Esvertit. Vendrell. Nian gratulon al vi; vi sendube sukcesos aligi al nia Federacio la novan grupon.

GRAFIKAĴO DE LA PROSPERADO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

ALĜINTAJ SOCIETOJ



INDIVIDUAJ MEMBROJ



— Ni rekomendas la abonon al —

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909)

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj «*Princo Serebrjaniĵ*» kies prezo por ne-abonintoj estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913, — krom 12 n-roj de l'gazeto, — senpage ricevos donace belan Esper. libron :

ORIENTA ALMANAKO

el la lingvoj japana, ĥina, araba, ĥinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p., ĥ. t. p.
«La Ondo» aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16 — 24 paĝ. Formato 17 X 26. Bela kovrilo

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj), Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.)

Anonco en «*Koresp. Fako*» 3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl. = 2, 120 sm). oni sendu al librejo «*Esperanto*» (Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando) aŭ al aliaj Espero librejoj — poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko.

Oni abonas «*La Ondo*» 'n ĉe la Administracio de «*K. E.*», str. Gracia, 12. — SABADELL

Ĉiuj gazetoj, kiuj petis de ni interŝanĝe la publikigon de anoncoj, estas insiste petataj, bonvolu sendi al ni la tekston de sia, ĉar solvinte la malhelpojn, kiuj malpermesis al ni aperigi rekomendajn anoncojn, ni povos ilin publikigi sur niaj paĝoj. Nian jenan tekston volu represi la gazetoj, kiuj deziros interŝanĝon de anoncoj.

LA REDAKCIO

KATALUNA ESPERANTISTO

ĈIUMONATA GAZETO ORGANO DE LA «*KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO*»

(50 societoj — Pli ol 500 individuaj membroj)

Redaktoro : Fred. Pujulà

Sek. de Red. : Joseph Grau

La membroj de la Federacio ricevas senpage ĝin

Kotizaĵo : 4 fr. (1,600 Sm.)

ADRESO : STR. GRACIA, 12. SABADELL — KATALUNUJO

La redakcio de.... akceptas mendojn de abono